

LINGVO * LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo. Budapeŝt, IX. Soroksári út 38. V. 6. Hungarujo. Aparte aĉetebla. Unu numero kostas 0,20 sv. fr. aŭ egalvaloron. Tri numeroj kune ekspedataj kostas nur 0,30 svisaj frankoj aŭ proksimuman egalvaloron.

Aperas kvaronjare • Nro 1. 1937

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

LA RIFUĜEJO

— N. Kurzens —

Dum la lego de l' nova Emba-libro »Maria kaj la grupo« (verko, kiu kun surpriza fideleco spegulas la internan vivon de l' esperantistoj kaj — maloftaĵo! — faras tion en formo vere literatura) pleje min kaptis la pensokomplekso, sumiĝanta en la frazoj: »... la sento de senlima soĝeco kaj forlasiteco, la perdo de la vivĝoj povas instigi la homojn al grandaj oferoj, ĉar la sopiro de la animo devas manifestiĝi en ia formo« kaj »iu... tamen nepre devas elŭti el si la varmon kaj sentemon: per ia ajn vojo, en ia ajn formo«.

Ĝi plifirmigis min en la konvinko, kiun la sperto formas en mi jam de pluraj jaroj, dum mi observas la Esperantan literaturon: kiuj kapablas labori — ne venas; kiuj venas — ne kapablas labori.

Nome: fortaj, centprocente kapablaj homoj nur tre-tre malofte donas sin tute al Esperanto, kiu ja nek kiel idea movado, nek kiel lingvo (apud la kolosa *English!*) okupas nuntempe elstaran pozicion. Ili elektas laborkampon pli pezan, ĉar pli aspiratan: nur venko, akirita en fortostreĉa lukto, satigas la ambicion, donas ĝojon de plenumiĝo.

Kaj al Esperanto sin tute donas nur tiuj, por kiuj la konkurlukto en Esperantujo estas ĝuste la plej altpostula, kiun ili povas entrepreni per siaj etvaloraj sortoj: la seniluziĝintoj, por kiuj la liberaj ventoj de l' »ekstera mondo« evidentiĝis tro malmildaj, la laborritmo tro febra, la konkurenco tro forta...

Kiu sentas sin tro malforta por la mondo, rampas en rifuĝejon kaj konstruas tie sian propran mondeton, en kiu li povas esti io.

Ĝi rigardu la »verkistojn« de iu provinca urbeto en ajna lingvo (kaj paralele — la »verkistojn« de preskaŭ ĉiuj Esperantaj periodaĵoj) — kio mankas al ili? de la nomo, kiun oni presas per sama farbo, sur sama papero, kiel la nomojn de Milton, Goethe, Puŝkin, ĝis la okulbrilo de gimnazistinoj, ĝis la flustrado respektiga, plena de dolĉa teruro: Ho, la poeto! — ĉio, kiel decas. Aŭ ni rigardu la junulojn de iu vilaĝo, kiuj aranĝas sportfeston kaj gravmiene registras siajn »rekordojn«. Ĉu grave, ke por 100-metra kuro ili bezonas 20 sekundojn, ĉu grave, ke ili rekordulo saltas ne pli alte, ol 1,10 m? Rekordo estas rekordo, poeto estas poeto. La vundita memamo ricevas sian balzamon, la malsata ambicio estas kontentigita. Verŝajne — ĉio en ordo?

Jes, se ni rigardas la »verkistojn« de l' Esperanta Literatura kun tia bonvola komprenemo — kiel homojn, kiuj ja »devas elŭti el si la varmon kaj sentemon per ia ajn vojo, en ia ajn formo«, kiel malfeliĉajn, kompatindajn homojn, kiuj en la ekstera, frosta mondo sentis sin ekzilitoj kaj kiuj, jen, trovis varman rifuĝejon, kie kuraci siajn rompitajn flugilojn en la memkreita iluzi-mondeto, — se ni tiel rigardas, do, efektive, ĉio estas en ordo.

Sed se ni konsideras, ke Esperanto ja pretendas fariĝi helplingvo por la tuta mondo, ke ĝi, sekve, devas konkuri (kaj venke konkuri!) la naciajn lingvojn, — nin ekregas dubo...

Ĝi pli ol dubo: ja estus simple mallogike kredi, ke literaturo de »rifuĝejo« povus iam atingi la nivelon de literaturo »ekstera«, se la unuan kreas preskaŭ nur homoj, kiujn la dua »pesis kaj trovis tro malpezaj«.

Feliĉe, mi povas diri »preskaŭ«, ĉar ja ankaŭ verajn talentulojn oni renkontas en la Esperanta literaturo. Sed ili estas tre-tre malmultaj,

TRIAN JARON

komenkas per tiu ĉi numero nia gazeto: *Lingvo-Libro*. Kiel la sorto de ĉiu gazeto esperantista, ankaŭ ĝi ne havas tian kvanton da abonantoj, kiam ĝi certe meritus. Sed ni ne volas plendi. Tute same ne, kiel dum jaroj, kiam ni laboris ĉiam kaj persiste sen plendo. Malgraŭ tio ne, ke nia pasinta jaro estis plena de rifoj, malhelpoj ne antaŭvideblaj. Eble ni eĉ ĝojas al tiu jaro. Ni ekkonis pro tio niajn verajn amikojn kaj ni scios tion taksati ankaŭ en la proksimaj, pli bonaj jaroj. Ni danku ilin ĉi tie publike. Ni danku tiujn, kiuj fidis nin ankaŭ tiam, kiam pro la malsano de nia administranto falis la enspezoj al la 15% de la normalaj enspezoj, kiam tiu malsano kaj kelkaj aliaj obstakloj malhelpis al ni eĉ aperigi la unuan numeron. La grandan rezistopovon de nia entrepreno kaj de niaj amikoj montras tio, ke ni ekvivis plene kaj nia nova vivado estos eĉ pli florplena ol la antaŭa.

Ni vivas kaj niaj planoj funkcias. Ili antaŭvidas la eldonon de ĝis nun ne spertita kvanto da libroj. Sed ĉi tie ni ne parolu pri tio. Ni nur raportu, ke la dua numero de tiu ĉi jaro aperos post du monatoj, la tria numero de *Literatura Mondo* post monato kaj ĉe la kvara ni estos atingintaj plenan regulecon. Gojigos nian amikojn la du novaj kaj interesaj gazetoj, kiujn ni presos en la proksimaj semajnoj kaj la finpretigo de ĉiuj libroj, kies aperon ni jam promesis antaŭ kelka tempo. Malgranda pacienco ankoraŭ kaj oni havos ne nur la promesitajn, sed kiel antaŭe kutime, eĉ pli da novaĵoj el via

eldonejo LITERATURA MONDO

Pri la Plena Gramatiko

Estimata sinjoro Kalocsay,

En »Lingvo-Libro« mi legis, ke vi volas vidi la »44 aliajn ekzemplojn«, kiujn mi kolektis el la verkoj de d-ro Zamenhof. Nu, jen vi povos vidi ilin, ĝuste transskribitajn, malgraŭ ke vi ŝajne dubas pri mia honesteco, kredigante, ke ne ĉiuj apartenas al la ĉirita kategorio.

La frazo jam citita estas n-ro 32. en mia listo.

En la Lingva Respondo 11. Zamenhof skribis:

»ĉiufoje, kiam ni sen timo de malkompreniĝo povas doni al la uzanto liberecon, ni devas tion ĉi fari kaj permesi al li uzi laŭvole *diversajn* formojn (se ili nur ne estas kontraŭ la leĝoj de nia lingvo aŭ kontraŭ la logiko aŭ komprenebleco), anstataŭ postuli, ke li nepre uzu ĉiam nur unu formon.«

Nu, s-ro de Beaufront per sia arbitra pseŭdoregulo postulis, ke ni uzu *adverbojn* en senobjektaj esprimoj, kaj lia postulo ne estas konforma al la Zamenhova principo, supre esprimita.

Nomu ĉi tiun principon ŝanceliĝa uzado, se vi volas; mi nomas ĝin prefere »Zamenhova libereco«. For la arbitrajn katenojn!

Vin salutas via fervora kolego,
William Bailey

EL LA VERKOJ DE D-RO L. L. ZAMENHOF

Adjektivoj en esprimoj senobjektaj

1. — Sciigi mem, ... kio estas parolata pri mia afero, estas por mi tute ne ebla. — Dua Libro, p. 8.
2. — La nombro 10,000,000, pri kiu estas parolata en mia unua verko. — Dua Libro, p. 13.
3. — Amase stari sur la strato estas malpermesita. — Dua Libro, p. 24.
4. — Tie ĉi estis tiel agrabla por mia dorso! — Dua Libro, p. 39.
5. — Estus dezirata, ke ia instruita societo prenu ... — Aldono al la Dua Libro, p. 1.
6. — Se la kongreso eĉ trovas necesa ŝanĝi la lingvon. — Aldono al la Dua Libro, p. 4.
7. — Kunligi jam antaŭe la sorton de l'lingvo internacia kun la estonta kongreso — estus tre malprudenta. — Aldono al la Dua Libro, p. 4.
8. — La sola ŝanĝo, kiun ni trovas necesa fari mem. — Aldono al la Dua Libro, p. 5.
5. — Krei ilin mem estus ne permesita. — Aldono al la Dua Libro, p. 11.
10. — Sed tute ne estas postulata, ke ... — Aldono al la Dua Libro, p. 11.
11. — Por mi *persone* estus kompreneble multe pli opor-

tuna teni la sorton de l'lingvo internacia en miaj manoj. — Aldono al la Dua Libro, p. 12.

12. — ĉiu laboru tiel, kiel li trovos la plej bona. — Aldono al la Dua Libro, p. 13.
13. — Apud ĉiu verko estos dirita, kiu ĝin eldonis, kiom ĝi kostas. — Aldono al la Dua Libro, p. 17.
14. — la genio de sinjoro Schleyer ne trovis necesa fari kun sia elpensajo iajn provojn praktikajn. — La Esperantisto, 1889, p. 12.
15. — Sed la plej bela kaj mirinda estis por ŝi, ke ... — La Esperantisto, 1889, p. 21.
16. — sed la plej bela estas, ŝi diris, kuŝi en la lumo ... — La Esperantisto, 1889, p. 22.
17. — al la plej juna estis ankoraŭ longe malpermesita sin levi. — La Esperantisto, 1889, p. 22.
18. — tiam estos teorie decidita ĉu Viaj proponoj estas bonaj. — La Esperantisto 1889, p. 23.
19. — En ĉiu vivanta lingvo estas permesita uzi nur tiujn formojn ... — La Esperantisto 1890, p. 32.
20. — »oni« devas elekti — sed ne estas dirita kiu kaj kaj kiel. — La Esperantisto 1890, p. 33.
21. — ĉiu gazeto, en kiu estas parolata pri nia afero. — La Esperantisto 1890, p. 51.
22. — Unu amiko trovis ne konvena, ke ĉiu Ligano devas aboni la »Esperantiston«.
23. — Pri la ricevataj markoj, kovertoj k. t. p. estos kvitancata en nia gazeto. — Esperantisto 1894, p. 22.
24. — eble ŝajnos stranga, ke ni presas iaforte proponojn. — Esperantisto 1894, p. 39.
25. — Laŭ la unua rigardo ŝajnas ne kredebla, ke ... — Esperantisto 1894, p. 186.
26. — Plej bona estos, se vi ĝin forgesos! — Hamleto 39/22.
27. — Se eble poste trovos mi utila ŝajnigi, ke mi perdis la prudenton. — Hamleto 39/29.
28. — tiam estas certa — ĉu li volas aŭ ne — ke li iras. — Hamleto 144/4.
29. — Mi pensis ... , ke bele skribi estas ne konvena por eminentaj homoj. — Hamleto 158/6.
30. — Ĉu ne estas ebla, ke ni komprenigadu per ia alia lingvo? — Hamleto 162/18.
- (Tiel en la unua eldono; la ŝanĝo eble estis farita de s-ro de Beaufront por la Hachette eldono kune kun multaj aliaj arbitraj ŝanĝoj.)
31. — la redakcio de eldonoj de »Posrednik« trovas bezona diri kelke da vortoj pri tio. — Esperantisto 1895, p. 24.
32. — kvankam la plej bona estus silenti pri ili. — Lingvo Internacia 1896, p. 29.
33. — ĉu li ne trovos utila publikigi la leteron. — Lingvo Internacia 1904, p. 339.
34. — la gazetoj ne trovas necesa eniĝi en tion. —

kaj tio, precipe en la traduka literaturo, ege limigas la evolu-eblojn. Novaj rezervoj freŝa forto necesas. La sola solvo: oni eduku ĝin; per zorga kribrado, por konscia selektado oni trovu kaj levu el la multkapa, sed mizere senforta armeo de la »literatura provinco« tiujn, kiuj fortas sufiĉe, por rezisti kaj elteni la liberajn ventojn de metropolo. Oni levu ilin, en la vera senco de l' vorto, ĉar la nuna praktiko, kiu metas la pli kapablajn samnivele kun la senkapablaj, sufokas la laborojon de la unuaj, kaj tio endangerigas la nivelon de l' tuta Esperanta afero.

Jes, se oni deziras fari Esp-on konkurkapabla, oni ĉesu premii en novelkonkursoj verkaĉojn, kiuj laŭkvalite estas nenio alia, ol ordinaraĵ skribtaskoj de lerneja knabo; oni ĉesu aperigi eĉ en la sola vere serioza literatura revuo, apud verkoj efektive altkvalitaj, aĵojn, kiajn oni ordinare renkontas nur en »provinco«; oni kutimiĝu ne laŭdi en recenzoj tion, pri kio oni povas kaj devas diri nemion krom rekta kaj sincera mallaŭdo.

Oni ĉesu kulturi atmosferon de rifuĝejo!



Petu nian detalan
ilustritan prospekton!

35. — ni subskribintoj... trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon. — La Deklaracio de Boulogne, 1905.
36. — ni trovas necesa doni la sekvantajn klarigojn. — Hilelismo, 1906.
37. — se la Akademio trovas necesa anstataŭigi en ili la »uj« per »i«. — Lingvaj Respondoj, p. 34.
38. — ĉu ĝi trovas bona, ke mi mem komencu la tradukadon. — Antaŭparolo al Genez, 1910.
39. — li opiniis nekonvena tiel laŭte kribi. — Jabeloj I. 99/30.
40. — la ŝtrumpa rubando... opiniis nekonvena respondi pri tio. — Jabeloj III. 6/18.
41. — kiel vi trovas bona kaj justa agi kun ni, tiel agu. — Josuo IX. 25.
42. — kion vi kaj viaj fratoj trovas bona fari el la cetera argento kaj oro, tion laŭ la volo de via Dio faru. — Ezra VII. 18.
43. — ĉion ceteran, kio estas necesa por la domo de via Dio, kion vi trovas bona doni, donu el la reĝa trezorejo. — Ezra VII. 20.
44. — li trovas nesufiĉa meti la manon sur Mordehajan. — Ester III. 6.
45. — Mi trovas bona konigi la pruvosignojn kaj miraklojn. — Daniel IV. 2.
(La kvin citatoj el la Malnova Testamento estas de Zamenhof, ne de la Biblia Komitato.)

William Bailey.

Estimata Sinjoro! Kiel mi antaŭvidis, viaj ekzemploj pravigas ne vin, sed min. Per mia rimarko, kiun vi aludas, mi tute ne volis »dubi pri via honesteco«, tio estus tute ne pardonebla, kaj krome tute ne akordigebla kun la alta respekto, kiun mi al vi sentas. Mi konjektis nur, ke tiel multaj ekzemploj povas ekzisti nur tiel, se inter ili troviĝas ankaŭ objektaj predikativoj, do formoj, kiuj devas stari regule en adjektivo.

Efektive, viaj ekzemploj ne estas samspecaj: ilin oni povas dividi en kvar kategoriojn:

a) En pluraj — mi konfesas, surprize multaj — ekzemploj oni trovas predikatan adjektivan anstataŭ ad- verbo en frazoj, en kiuj la subjekto estas infinitivo aŭ propozicio, aŭ tute mankas. Tiaj estas la ekzemploj 1—5, 7, 9—13, 17—21, 23, 26, 28—30; sume 21. Tiuj estas vere kontraŭaj al la nun reganta regulo postulanta ad- verbon.

b) En tri ekzemploj (15, 16, 32) la adjektivan formon plene pravigas la arakolo, kiu subkomprenigas substantivon: la plej bela estas samsignifa kun la plej bela afero. La adjektivo do en ĉi tiuj ekzemploj estas regula, ĉar ĝi estas substantive uzata.

c) En du ekzemploj (24 kaj 25) la predikato estas *ŝajnas*. Ankaŭ tie ĉi la adjektiva formo estas pravigebla, eĉ pli ĝusta ol la adverba. Nome *ŝajnas* estas rigardata tie ĉi kiel senpersona verbo, kiu entenas en si mem la subjekton, same kiel *pluvas*. Ni faris en la dua eldono noton pri tio kaj ankaŭ en la teksto ni faris la respektivajn korektojn. Ni ŝuldas tion al via bonvola atentigo kaj ni esprimas al vi ĉi tie nian dankon.

d) En la ceteraj ekzemploj (6, 8, 14, 22, 27, 31, 33—45; sume 19), la adjektiva formo estas plene regula, tiel ke la adverba formo estus rekte erara. Guste pri tiaj okazoj mi aludis en mia rimarko, kontraŭ kiu vi protestis.

Efektive, kie oni devas uzi adverban predikativon? En frazoj, en kiuj mankas la substantiva aŭ pronoma subjekto! Sed en ĉi tiuj frazoj tia subjekto ja ekzistas, do nenio motivas la adverban formon. Ĝia uzo do povis deveni nur el sintaksa miskompreno. Cetere, la saman miskomprenon faras ankaŭ vi, kiam vi kunigas en unu kategorion la ekzemplojn sub a) kaj d).

Se nun ni rigardas la deventempon de la cititaj Z-aj ekzemploj, ni vidas, ke ĉiuj apartenantaj al la kategorio a) estas datitaj antaŭ 1900 (tiam aperis la *Commentaire*

de Beaufront). El la postaj tempoj eĉ per via admirinda orienteco kaj diligento vi ne povis trovi tian ekzemplon.

Kion tio pruvas? Mi kredas, ke ne estas arbitra la sekvanta klarigo.

Farinte la regulon de la adverba predikativo, ŝajne Z. komence iom dubis pri la ŝancoj de tiu neinternacia formo. Tial li ne volis ĝin nepre trudi kaj, por montri tiurilate sian liberecon, li mem uzis kelkfoje adjektivajn formojn. Sed post kiam Beaufront faris el lia intenco devigan regulon kaj lin obeis ĉiuj esperantistoj, li rekonis, ke ĉi tiu interesa Esp-a idiotismo estas plene vivkapabla. Do de tiam li severe tenis sin al ĝi. Tio estas komprenebla — li devis evidente ĝoji, ke lia unua intenco pruviĝis realigebla.

Ne temas do pri tio, ke Beaufront trudis al la esperantistaro ion ne-zamenhofan. Male, li trudis al ili plene Z-an formon, pruvante al Z. mem, kiu ĝoje lasis sin konvinki, ke ĝi estas trudebla!

La adjektivaj formoj do estas simplaj arkaismoj el la tempoj de hezito. Ilia uzo sekve estas ne-zamenhofa, ĉar ĝi signifas hezitatadon pri afero, pri kiu Z. ekde 1900 neniam hezitis plu.

(Kalocsay).

*

Al s-ro E. Marcelé. Estimata sinjoro! Vi verkis pri la Vortfarado de la P. G. traktaton, kies amplekso estus 32 plenaj kolonoj en ĉi tiu gazeto. Bedaŭrinde, la redakcio ne volas disponigi tiom da loko por la publikigo de via verkajo. Sed ĝi rajtigis min respondi al vi kiel eble plej mallonge. Tion mi faros en la nuna kaj en la sekvantaj numeroj, kaj mi faros ĝin kun ĝojo, ĉar tiel mi havas ree okazon klarigi aferojn, kiuj al kelkaj eble ne estas ankoraŭ nekontesteble evidentaj.

Mi rimarkas antaŭ ĉio, ke viaj kritikoj tre ofte estas klarigeblaj per tio, kion vi esprimis jene: »malmultajn momentojn mi povis dediĉi al la esploro; mi do legis rapide kaj intermite«. Efektive, la kaŭzo de viaj eraroj estas plejofte du aferoj: aŭ vi miskomprenas mian tekston, aŭ vi tro rapide formas regulon, ne konsiderante ĉiun faktan aŭ eblajn. La regulo devas esti kiel eble plej simpla — tio estas rajta postulo. Sed ĝi ne povas esti tiel simpla, ke ĝi ne validu. Kiam vi riproĉas al nia analizo komplikecon kaj anstataŭigas ĝin per analizo pli simpla — plej ofte via analizo estas erara pro tio, ke ĝi ne estas valida ĝenerale; ni elektis la pli malsimplan analizon ja ne pro ia emo al komplikeco, sed pro nia klopodo je ĝenerala valideco.

Nun ni vidu viajn punktojn:

1. Vi riproĉas nin pro tio, ke ni distingas afiksoidojn kaj nomas ilin radik-anstataŭaĵoj. Sed vi miskomprenas la motivojn de tiu distingo. Ne tial ni distingas la afiksoidojn, ĉar ili povas esti uzataj kun finaĵo kiel la veraj radikoj (ilo, ano, ema ktp.): tiel ja povas esti uzataj ankaŭ veraj afiksoj (eta, ega, mala). La kaŭzo de la distingo estis tio, ke tiuj afiksoidoj funkcias ĉe la vortfarado simple laŭ la reguloj de la vortkunmeto, tute kiel la ordinaraĵ radikoj, dum la veraj afiksoj ne obeas la leĝojn de la radikkunmeto. El tiu ĉi vidpunkto do la afiksoidoj estas pli parencaj al la veraj radikoj ol al la veraj afiksoj. Ne estus do gramatike klasi tiujn du tiel diferencajn kategoriojn en komuna grupo.

Ni vidu ekzemplon: ano estas samsignifa kun *membro* kaj en siaj kunmetoj ĝi kondukas same kiel *membro* kaj estas anstataŭebla de ĉi tiu sen ia diferenco de formo aŭ signifo: *Klub-ano* = *klub-membro*. Oni povas do diri, ke *ano* estas nur la anstataŭaĵo de *membro*. Same: *ema* estas samsignifa kun *inklina* kaj estas anstataŭebla de ĉi tiu: *dank-ema* = *dank-inklina*. Sed nun ni rigardu -et; ĝia senco estas *malgrand*, sed ĝi tute ne estas anstataŭebla de ĉi tiu: *urb-eto* ekzemple ne estas *urb-malgrando*; same: -eg = *grand*, sed *domego* ne estas *domgrando*.

An kaj et do estas esence diferencaj, eĉ se oni signis ilin per komuna termino. Tiun eraron ni volis ĉesigi kaj mi bedaŭras, ke vi insistas pri la malnova eraro.

2. Al vi ne plaĉas »elementoj kompletigendaj« kaj volas ĝin anstataŭigi per »nekompletaj«. Sed nekompletaj

La prepozicia nulo

La pacienculo eble diros al si, ke scienco ne multe koncernas tiun ĉi artikolon. La verkanto do rapidu diri, ke la fundamenta principaro de ĉiu scienco estas mezuro, nombro, kaj proporcio. Post kalkulo de pli ol 100.000 prepozicioj, afiksoj, korelativoj, kaj nuancoj de prepozicioj apartaj evidentigis tre precizaj proporcioj. En la libroj de eminentaj verkistoj manifestigis mirinda harmonio inter la proporcioj de variaj specoj de vortoj. Tabelojn pri la ofteco de propozicioj kaj aliaj oni trovas en la ENCIKLOPEDIA DE ESPERANTO de Literatura Mondo kun artikolo pri ili. Nenion necesas plu divenadi. Kaj nenie oni vidas tiom da divenado, opiniado, kiom en certaj artikoloj pri la lingvo, kaj eĉ en artikoloj el altaj lokoj, kie oni ordinaro supozus, ke iom da firma fakto kuŝas anstataŭ tio. Kompreneble la verkanto ne povas ĉie armi tiun ĉi artikolon per sciencaj pruvoj; tio eĉ ne estas lia celo. Sed raciemo certe trovas en ĝi ion, kio lin instigos por pli severa pensado en la vera scienco pri Esperanto Generala, kiu devos esti pli ellaborita, ol iu ajn nacia lingvo. Nur la lingvistudento komprenas, kiom malmulte da scienco ekzistas pri la grandaj lingvoj de Racine, Puŝkin, Edison, kaj Einŝtejn hodiaŭ.

Konsultante la PLENAN VORTARON, ni vidas, ke ĉe la diversaj prepozicioj kaj konjunkcioj tie estas signifitaj sub numeroj la diversaj nuancoj kaj sencoj kiujn ili posedas. Do ni ordu ilin en Tabelo (vd. tuj sube). En tiu Tabelo la unua ĉiferkolono montras la nombron da sencoj, kaj la dua la nombron da gramatikaj karakteroj. Pri la signifo de »gramatika« kaj »radika karaktero« oni studu la PLENAN GRAMATIKON de Kalocsay kaj Waringhien, spaco mankas tie ĉi por detala klarigo.

PREPOZICIOJ

de	12	1
por	8	1
kontraŭ, kun, per		
el, en	6	1
	5	1
malantaŭ, laŭ, sub, inter, antaŭ, ĉe, al		
	4	1
post, sur, pri, ĉirkaŭ, tra, super		
	3	1

estas ankaŭ la finajoj, kaj tiujn oni devis klasi aparte. »Kompletigenda« esprimas ĝuste tion, kion oni devas esprimi: »kiun oni devas kompletigi«. Do ĝi ŝajnas al mi perfekta termino.

Solstariva, kiun vi kondamnas, ne signifas »memstara«: ĉi tiun lastan terminon ni uzas en alia senco: »en Esp-o ĉiuj elementoj estas aŭ povas esti memstaraj«. Ankaŭ »solstara« ne taŭgas, ĉar ĝi dirus, ke ĝi ĉiam staras sola. Nur *solstariva* esprimas tion, kion ni volas esprimi: »kiu povas stari sola«. Cetere, por trovi la sufiksoidon -iv, vi ne devas konsulti Ido-vortaron: ĝi troviĝas ja en la komenco de la Plena Vortaro, inter la teknikaj sufiksoj. Kaj — kie oni povus uzi teknikan sufikson, se ne en la kreo de teknika termino?

3. Vi diras, ke *belajo* estas *bela ajo*, »laŭ koncepto ĝenerale akceptita de la esperantistoj«.

Nu, tiu koncepto estas ĝenerala eraro. Se ĝi estus ĝusta, la du frazoj: »tiu virino perdis siajn belajojn« kaj »tiu virino perdis siajn belajn ajojn« estus samsignifaj. Sed tiaj ili nepre ne estas! La dua frazo signifas, ke la virino perdis ajojn (objektojn), kiuj estis belaj; la unua signifas, ke ŝi perdis tiujn proprajojn, en kiuj manifestigis ŝia beleco.

Do, kiam ni ne akceptis tiun »ĝeneralan koncepton«,

ekster, po, krom, sen, trans, pro

	2	1
preter, anstataŭ, malgraŭ, apud, da		
	1	1
ĝis, dum	1	2
SPITE	1	0 (prepozicieca)
JE	0	1

SPITE ŝajnas, laŭ Z., prepozicio, sed, laŭ la PLENA VORTARO, ĝi estas adverbo. Do SPITE perdis la prepozician gramatikan karakteron, eble pro sia aspekto de verbofino, ITE, oni uzas ĝin kiel prepozicion eble nur en la paĝoj de NIA GAZETO. JE laŭ la fundamento estas vorto sen definitiva senco, sed laŭ la vortaro ĝi estas iom pli difinita. Laŭ mia opinio JE devas resti por ĉiam nulo, sen radika senco, spite al la vortaroj. DUM kaj GIS estas ankaŭ konjunkcioj, kaj pro tio la cifero » en la tabelo.

Dum jarcentoj la progreso de la matematika scienco estis malgranda pro la manko de unu elementa koncepto kaj ties simbolo. Tiu gravega kaj graveda koncepto estas la idearo pri NULO, kies simbolo estas kompreneble O. Ĉu oni miras, se suferas ankaŭ la progreso de nia lingvo? Fakte, Kalocsay kaj aliaj uzas tiun ĉi prepozician nulon instinkte laŭ tiu ĉi teorio sen ia mencio en siaj teoriaj skribaĵoj, kio estas iom stranga, ĉar ili ja klopodas difini kaj klarigi preskaŭ ĉion alian. Nu, nulo estas stranga simbolo. Kaj JE estas stranga prepozicio. NULO estas la ĉefŝtono en la templo de l' moderna matematika scienco. Penu solvi ordinaran problemon uzante la latinan sistemon de nombroj per literoj, kaj spertu la teruran perdon de tempo. Nu, en nia sistemo araba, tiel false nomata, la nulo faras nenion en adicio aŭ subtraho, sed en divido aŭ multoblo ĝi strange influas nombrojn. En la nombro 0123, nulo adicias nenion, sed en 1230 ĝi dekobligas 123 laŭ nia dekuma sistemo. Laŭ la dudekuma sistemo ĝi multobligas per dudeko. La bazo ne gravas, al NULO restas ĉiam la sama multobligata funkcio, per kia ajn signo oni esprimas la nombrojn. La funkcio de NULO estas firme enradikiĝinta en la sistemo. Per freneza aldono de centoj da novaj signoj oni ja povus esprimi ĉiun nombron, de unu ĝis cent, per aparta signo, sed tio nur balastus la memoron kaj neniel influas la

ni faris tion ne por trudi arbitre nian regulon de kunmeto al tiu ĉi okazo. Estus ja tre simple klasi *aj* inter la veraj afiksoj, por kiuj ne validas niaj kunmet-reguloj. Sed ni devis apliki nian analizmetodon por ricevi la veran sencon de *belajo*, tute ne identan kun *bela ajo*.

Ni diras, ke *aj* signifas ĉi tie: konkretaĵo, sperteblaĵo kaj ĝi estas simple apudmetita al la adjektivo, kiun ĝi substantivigis antaŭ si per sia vortefiko, kiel substantiva ĉefelemento. Do *belajo* estas *bela ajo*, t. e. belo, kiu estas ajo: belo, kiu estas sperteblo. Alidire: *belajo* estas, vere, *aja belo*, t. e.: ne abstrakta, sed sperteblo belo. Tiu analizo estas tute analogia al la analizo de aliaj apudmetoj: *soldatkamarado* (kamarada soldato), *membro-abonanto* (abonanta membro); *oratormajstro* (majstra oratoro). Simile kondukas ankaŭ la sufiksoido -in, ĉar *instruistino* estas *instruisto ino*, t. e. *ina instruisto*.

Do, ni tute ne deflankigis de la »vera, Zamenhofa Esperanto«, kiel vi diras. Ni, tute male, konstatis la veran lingvuzon, kaj samtempe ni konstatis, ke tiu vera lingvuzo ne konformas al la »ĝenerala koncepto«. Kaj, ĉar la »koncepto« povas esti erara, sed la lingvuzo oni devas respekti, ni serĉis koncepton konforman al la efektiva lingvuzo.

(Daŭrigota)

realecon de la bazaj funkcioj. Kaj oni vidas, ke la aldono de cent novaj prepozicioj neniel forpuŝus JE, sed nur pezigus la lingvon. La problemo temas pri la korekta uzo de JE kaj ne pri la bezono de novaj vortoj en la lingvo.

La prepozicia stoko de la lingvo entenas ĉirkaŭ tri-dek kvin vortojn. Nu, se oni adicias la nombrojn en la unua kolono de la tabelo, oni ricevos entute ĉirkaŭ 112 nuancojn. Certe oni povus trovi apartajn vortojn por esprimi per speciala vorto ĉiun nuancon, sed la kreo de tia nombro da prepozicioj nenion reale aldonus al la lingvo, krom balaston por la memoro. Kaj krom tio, la nuancoj por DE nombras dekdu, kiuj ĉiuj rilatas al elirpunkto realo: aŭ metafora (kaŭzo). Unu vorto do ŝajnas sufiĉi por ili. Se en la lingvo ekzistus nur dek vortoj, la rilatoj eblaj inter ili estus dekoble dek. Oni vidas, ke la rilatoj esprimeblaj per prepozicioj kaj konjunkcioj estas preskaŭ sen limo, ĉar ĝi ĉiam estas la potencumo de ties nombro. Ĉiu prepozicio povas laŭ la cirkonstancoj, esprimi abstrakton aŭ ĝeneralan sencan. La kreo de prepozicioj devas ĉesi iam, kaj laŭ mia opinio tiu tempo estas nun. Oni ofte klopodas uzi DE anstataŭ JE, tiel esperante eviti ĉi lastan, sed se la sorto de JE estas cedi al DE, tiam oni trovos baldaŭ du prepoziciojn kun la sama funkcio, kaj tiam VERE ekzistos nedifinita prepozicio JE LA UNUA FOJO. Nun JE funkcias laŭ perfekta difinita maniero, kvankam oni devas konfesi, ke estas iom da nedifiniteco en la kapo de certaj uzantoj.

Zamenhof donis al la solstaraj literoj, troveblaj ĉe la finoj de vortoj, precizajn gramatikajn funkciojn. Nu, gramatika funkcio absolute neniel, neniam estas senco. Ekzistas radikoj kun originalaj gramatikaj karakteroj en la vortaro. Ĉiu fina litero donas al la vorto la respektivan gramatikan funkcion. Rigardu.

adjektivo	A
adverbo	E
infinitivo	I
onomo	O
ordono	U
akuzativo	N
multigo	J

Cu la leganto ĝenas sin pri la signifo de tiuj literoj? Absolute ne. En la angla lingvo oni foje aldonas tian literon ne ĉe la fino kiel en Esperanto, sed ĉe la komenco. Do »BED« (lito) kun la adverbs A formas »ABED« kiu signifas »EN LA LITO«. Oni formas »A-FOOT« (piede) per aldono de tiu A al FOOT (piedo). Nu, tia uzo de la literoj en nia lingvo estus kontraŭ ties spirito sed ekzistas alia speco de vorto, kiun oni uzas tiel sen klara konscio pri la afero.

A ĉe la fino de vorto simple avertas la leganton pri la gramatika funkcio de tiu ĉi vorto. Se la vorto estas tro longa, la peno por kompreni ĝin pligrandigas. Prepozicio estas aparte skribita vorto, kiu avertas la leganton antaŭe, ke sekvas serio da vortoj, kiuj kune formas vorton parenkan al adverbo aŭ adjektivo. Ni vidis en la tabelo, ke ĉiu prepozicio havas sencan, krom JE. Por kio utilas JE? Oni indiferente skribas PER LA MANO aŭ PERMANE. PER diras ke la adverbo estas maniera. ENMANE estas loka adverbo. Kiam la senco ne permesas du interpret-ojn, neniu prepozicio necesas. En la vorto BLUE oni neniam konfuzas ideon pri tempo, loko aŭ kaŭzo. En la vorto TAGE oni neniam konfuzas ideon pri spaco aŭ maniero, ĉar TAGE esprimas klare la ideon pri tempo. De la simpla litero E, kiu havas nenian sencan, sed nur gramatikan funkcion, sufiĉas. Nu, kion oni faru, se la vico da vortoj estas tre longa? Jen la kerno de la demando. Cu oni skribu la monstron PERSIADEKSTRA-BLANKAMANE aŭ simple PER SIA DEKSTRA BLANKA MANO? Vi scias la respondon same bone kiel mi. Rigardu tiun kompatindan E ĉe la fino, kiu estas perdita kiel

infano en granda kolekto da kongresanoj. En la unua ekzemplo, ĉe la kunskribita serio da vortoj, la E-litero faras la adverbon. En la dua, kun inter-spacoj, la prepozicio faras la saman. Kio okazas al adverbulo tiel farita, se la senco estas perfekte klara sen prepozicio kaj TRO LONGA POR KOMBINO KUN E ĈE LA FINO? Tiam prepozicio, kun senco, aldonus kromsencan neutilan. La respondo estas, ke JE necesas kaj sufiĉas. Do oni skribu: Li komprenis ĝin JE LA UNUA FOJO EN SIA VIVO. Li iris JE LA DUA HORO POST SIA ALVENO. La akuzativa N faras la samon, sed tio estas alia afero.

JE estas la absoluta prepozicio. Eble la leganto demandas, kial Zamenhof, kiu pensis pri preskaŭ ĉio, kiam li elpensis la ostaron de la lingvo, neniam deziris fari prepozicion respondan al la A por adjektivo ktp. La respondo estas, ke JE funkcias precize laŭ la sama maniero kiel A, E, I, O, kaj U, sed ĝi staras antaŭ la kunmetita radikoj, al kiu ĝi rilatas, kaj ĝi funkcias kiel aliaj prepozicioj. Necesas, ke oni komprenu la funkcion de ordinara prepozicio. Prepozicio rilatas serion da vortoj sekvantaj ĝin. Dank' al ĝi la tuta komplekso havas la funkcion de adjektivo (pli ĝuste: epiteto) aŭ adverbo (pli ĝuste: adjekto). Oni povus demandi, kial do meti prepozicion? La respondo estas, ke ia vorto devas stari tie, por montri la nudan funkcion, nenion aldonante tamen al la propra senco. Kion aldonas NULO al la nombro 19007? Unu signifas 10000. Naŭ signifas 9000.000 signifas neniam da centoj kaj neniam da deko. 9 signifas naŭ unuojn. Adiciante.

10000	unu dekobla mil
9000	naŭ mil
000	nulo
7	sep

19007 deknaŭ mil sep.

JE diras al ni »Mi staras tie ĉi nur por averti, ke la serio da vortoj post mi funkcias kiel unuo kun gramatika funkcio de adverbo aŭ adjektivo, kies senco en si mem estas klara sen iu el miaj prepozicioj.

DO JE ne estas malriĉa orfo en la prepozicia familio, sed la patrino de la aliaj. JE estas sendependa, neŭtrala, kaj senkondiĉa vorto.

KE estas neŭtrala, absoluta subjunkcio. Per ĝi oni subjunkciigas adverbojn kaj prepoziciojn libere laŭ la regula uzo de la aliaj gramatikaj partikloj, A, E, I, KTP. KE estas aparta sufikso skribita sen streko kaj sen gluiĝo. JE estas aparta prefikso skribita sen streko kaj sen gluiĝo. Kial? Ĉar JE kaj KE ambaŭ rilatas ne al la unua vorto, sed al ĉiuj kune. Do oni skribas SEN KE, POR KE, SPITE KE PRO KE, SUFICE KE, KONDICE KE, kaj ĉe DUM KE kaj GIS KE, se oni ne scias, ke tiuj lastaj estas originalaj konjunkcioj, kaj pro tio ne bezonas la KE.

« Analogo laŭ JE ne ekzistas en nacia lingvo sciata de mi. Sed en la angla lingvo abundas ekzemploj, kie aliaj supozataj difinitaj prepozicioj perdas la propran sencan, por funkcii kiel JE; kaj tiel konfuzo sekvas konfuzon, kiam komencanto klopodas ilin kompreni. Do, vi diras, ke JE tamen havas nedifinitan sencan? Absolute ne! nenio estas pli difinita koncepto! La granda bezono por absoluta prepozicio, kia JE, estas sentata de la menso, kaj se nacia lingvo ne havas prepozicion tian, iu alia prepozicio devas perdi sian sencan laŭ hazarda elekto de la verkisto, kiu serĉas vorton, al kiu mankas senco. Des pli malbone por la nacia lingvo. La nedifinitaj prepozicioj en nia lingvo, se tiaj ekzistas, certe estas la ceteraj, kiam oni per ili anstataŭas JE.

Ni ne misuzu JE, kiam ni estas mense lacaj, dubantaj, neelektemaj, nek ĉe la elĉerpigo de nia esprimpovo.

Fenton S. Standliff.

Pri Juda Gramatiko kaj reformo en la juda lingvo

— de Dr. X. —

La sekvantan artikolon verkis Zamenhof. Ĝi aperis en la judlingva revuo »Lebn un Visŝaft« (»Vivo kaj Scienco«). Nr. 1. de la jaro 1909 aperanta ĉe la eldonejo Boris Kleckin en Vilno sub red. de A. Litvin.

La konata gramatikisto kaj leksikografo Z. Rajzn skribas en sia »Leksikono de la juda literaturo, gazetaro kaj filologio« dua eldono, I-a volumo, paĝo 1039, pri tiu ĉi artikolo de nia Majstro jene:

»... 3 jarojn Zamenhof labor's super judlingva gramatiko...« »... Lia judlingva gramatiko restis ne publikigita, kaj nur post 30 jaroj li malgrandan parton el ĝi eluzis en kelkaj artikoloj por »Lebn un Visŝaft« de A. Litvin 1909 I., VII., IX. sub pseŭdonimo X, kie li proponis ŝanĝi la judan alfabeton je la latina; tiu propono kaŭzis grandan diskuton en la ĵurnalo de Litvin samkiel en la cetera juda gazetaro.«

Kaj efektive, kiam oni foliumas la sekvajn numerojn de la supra revuo oni konstatas en la speciale destinita rubriko »parolejo« viglan diskuton por kaj kontraŭ. Ĉio denove pravas pri la multflankeco, granda interesiĝo de Zamenhof pri ĉiuj apartaj kulturaj bezonoj de kelkaj nacioj.

Ni opinias, ke, kvankam la temo de la artikolo ne koncernas Esp-on, niaj legantoj ĝin legos kun intereso, kiel Zamenhofan verkon, kiu estas tre karakteriza pri lia pens-maniero kaj labormetodo.

*

La aŭtoro de tiu ĉi artikolo, eminenta lingvisto estas konata ne nur inter granda parto de la juda legantaro, sed multe pli ankoraŭ li estas konata al la tuta kultura homaro pro siaj altgrade gravaj lingvoreformaj laboroj.

En tia demando, kia estas la reformo kaj gramatiko de la juda lingvo, por la leganto certe estos interese aŭskulti la opinion de tiu ĉi mondekona aŭtoritato en lingvaj aferoj. La problemon, kiun ni nun tuŝas, ni rigardas tre grava. Ni pensas, ke por mi la projekto de reformo, kiun entenas ĉi tiu artikolo, estas tro serioza, kaj kiel ajn granda estas la kompetenteco de la aŭtoro, ni devas kalkuli ankaŭ kun la psikologio de la popolo. Ni opinias, ke tio estas je tiom afero popola, ne kiom scienca kaj kultura. Pro tio la redakcio detenas sin dume de iu ajn propra eldiro pri la reformo, kiun la estimata aŭtoro projektas. La demandon pri ŝanĝo de la juda alfabeto je la latina ni prezentas por diskuto kaj presas la sekvantan artikolon je la respondeco de l' estimata aŭtoro, kiu bedaŭrinde ne volis malkaŝi sian plenan nomon.

La redakcio.

*

Mi amas la tiel nomatan »jargonon« ege, sed pro diversaj motivoj, pri kiuj ne estas ĉi tie la loko paroli, mi dubas, ĉu la jargono havas ian estonton kaj ĉu estas generale inde, ke ni deziru por ĝi ian estonton. Oni tamen ne povas kontesti la fakton, ke la jargono ekzistas kaj por longe ekzistos. Milionoj da niaj fratoj parolas kaj por longe parolos ĝin, egale ĉu ni agos por aŭ kontraŭ ĝi. Pro tio ni devas la jargonon serioze trakti.

Por milionoj da niaj fratoj restas, kaj longe restos la jargono kaj la jargona literaturo la unika spirita nutraĵo akirebla. Pro tio ne estus superflue zorgi pri tio, ke tiu nutraĵo estu pli malpli konvena, ke la jargona literaturo — se oni ne povas jam esti sen ĝi — alkiutimigunian amason al kelka »homeco« kaj sistemo, ke oni ĝin skribu ne »kiel al iu plaĉas« sed unuece pure kaj korekte laŭ la veraj reguloj de nia lingvo...

Jes, laŭ la reguloj de la jargona gramatiko, ĉar ne

nur la lingvo de la hotentotoj aŭ aŭstraliaj sovaĝuloj havas gramatikon, sed kiel ajn strange tio povas soni por multaj judoj — ankaŭ la lingvo de la judoj posedas sian difinitan kaj severan gramatikon. Alie ne povas esti, kompreneble, ĉar, sen tio, unu judo la alian ne komprenus. Nur la sklava humileco kaŭzas, ke ni multfoje ripetis tiun stultan frazon, ke la lingvo de la judoj estas »jargono sen gramatiko«. Kaj kaŭzas, ke niaj jargonaj skribistoj opinias, ke judlingve oni povas skribi libervole, kaj ju pli oni sin retiras de la efektiva popoljargono, despli la lingvo fariĝas komprenebla kaj ĝusta.

Por nia amaso aliaj lingvoj restos ankoraŭ por longe nealireblaj kaj ĝi devas legi ekskluzive judlingve. Do mi ne pereigu almenaŭ ĝian eblon legi per la neglekto de niaj aŭtoroj, la amaso ellernu sisteme, uzisian lingvon laŭ regule kaj tiam la juda lingvo estos precize tia sama faktoro potenca de civilizo por judoj, kiel por ĉiu ne-judo, ne komprenanta aliajn lingvojn, lia gepatra, en kiu li povas legi.

Inter la judoj estas multaj, kiuj ne komprenas la jargonon sed ili volonte ĝin ellernus; inter la ne-judoj estas multaj, kiuj volus konatiĝi kun la lingvo de la judoj. Tamen, ĝi, nun al homo, kiu ne loĝas en juda medio, estus pli facile lerni la lingvon de iu afrikana gento, ĉar ties gramatikon li povas akiri, sed ellerni la lingvon de milionoj da kulturaj en la tuta mondo konataj judoj estas absolute neeble! Bona gramatiko kaj konvena vortaro de jargono farus la lingvon, fine, atingeble facila por ĉiu lernonto.

Sed, se mi deziras el jargono fari lingvon, kiu havu kulturigan signifon por la judaj amasoj kaj samtempe estu lernebla por ĉiuj, kiuj ĝin ne komprenas kaj deziras ĝin lerni, ni devas antaŭ ĉio enkonduki por la jargono la latinajn literojn. La hebrea alfabeto kun la punktado anstataŭanta la vokalojn, kun la nedifinitaj, komplikaj S K T V kaj H-literoj, inter kiuj estas maleble nuanci¹⁾; kun la absolute malklara prononco de multaj literoj ekz. »Vov«²⁾ legiĝas kiel »V« »U« kaj »O«; A I. E. povas esti eldiritaj kaj ne, kaj iliaj elparolo estas tute neklara; B. K. P. T. S oni devas aparte punkti, se oni volas ilin legi tiel kaj ne alia tiu alfabeto estas tute neadaptita al nuntempa lingvo kaj faras la uzon de jargono en ĉiuj rilatoj malfacila.

Se la jargono — ni supozu — eĉ naskiĝus, kun la hebrea alfabeto, oni ankaŭ tiam devus ŝanĝi tiun neoportunan alfabeton je alia pli oportuna kaj tiun, kiu estas uzata en plej multaj civilizaj lingvoj, (ĉe la fieraj germanoj la latina alfabeto jam delonge komencis, elpuŝi la germanan pro tio, ke la latina estas pli facila; la latina, kompare kun la hebrea, estas ne nur pli bona, sed la kontrasto inter ambaŭ alfabetoj estas granda). Se la jargono eĉ estus pure semida lingvo kaj sekve laŭspirite ligita kun la hebrea alfabeto, oni ankaŭ devus pro oportuneo ŝanĝi la alfabeton je la latina. Sed ridinde kaj stulte estas resti ĉe la hebrea alfabeto, kiam ni scias,

1) En originalo troviĝas apud S-litero ankoraŭ 2 literoj, kiuj kun kaj sen punktoj en respektiva loko ankaŭ legiĝas kiel S. Apud K T V kaj H troviĝas po unu tiaspeca samsona litero.

La tradukinto.

2) Nomo de litero, kiu en la moderna juda lingvo havas preskaŭ ekskluzive la signifon de nia esperanta vokalo U.

La tradukinto.

ke la ĵargono apartenas al la familio de arĵaj lingvoj; tio signifas, ke la maniero, laŭ kiu la arĵaj lingvoj skribiĝas, estas por ĝi ne nur oportuna sed tute natura, kaj la treege neoportuna kaj tute ne adaptita hebrea alfabeto estas al ĝi perforte mikroĉita.

Oni povas respondi al mi, ke la hebrea abfabeton la juda amaso jam konas, dum la latinan ĝi devos dekomence lerni. Sed al ĉiu estas ja konate, ke la plimulto de la juda amaso, kiu scipovas legi kaj skribi, scias jam nun tre bone la latinan alfabeton; kaj la cetera malplimulto, kiu legas judlingve, sed ne scias la latinan alfabeton, povas ĝin ellerni dum unu aŭ kelkaj horoj. Kaj la malgranda tempo, kiun ili al tio fordonas, utilos al ili ĉiokaze. Kaj ne forgesu, ke la ellerno de la latina alfabeto estas por ĉiu eĉ neklera judo tre facila afero, dum la ellerno de la nuna juda ortografio, por tiu, kiu ne estas al ĝi kutimiginta de infanece, estas, eĉ al tre klera homo, malfacila afero, tiel ke por ĉiu, kiu ne edukigis ĉe la ĵargono, kaj tiaj judoj pli kaj pli multigigas estas preskaŭ tute neeble ellerni la lingvon de siaj propraj fratoj. Komparu kaj elektu!... Do, de tiu ĉi flanko ekzistas jam neniam refutaĵoj kontraŭ la enkonduko de la latina alfabeto, kio estas sendube afero treege necesa.

Vere, nia okulo estas jam kutima al la ĵargono kun la hebrea alfabeto kaj la unuan tempon la ĵargono skribita kun la latina alfabeto havos strangan aspekton en niaj okuloj. Pli ol unu rutinulo verŝajne ridetos pri la »europeigita« ĵargono. Sed en tia grava afero, kia estas kutimigi la popolon al ĝusta legado kaj skribado kaj krei por la inteligentularo liberan aliron al la lingvo kaj literaturo de siaj fratoj — en tia grava afero la kutimo de la okulo, kompreneble, havas nenian signifon kaj se troviĝos tiaj, kiuj ridos, mi devas al ili respondi per malŝata silento. Sed se estas tre malfacile lukti kontraŭ kun la malnova kutimo, mi povas ja agi same kiel la germanoj en tiu okazo, enkonduki la latinan alfabeton poiole. Tiel ekzemple la ĵargonaj gazetoj povos unu el siaj fakoj komenci presi per latinaj literoj, poste pligrandigi la nombron de tiaj fakoj, ĝis la legantoj fine al kutimigis al la nova alfabeto, kiu kun la tempo tute elpuŝos la malnovan hebrea.

II.

Mi proponas la latinan alfabeton en sekvanta formo: Aa, Bb, Cc, Cĉ, Dd, Ee, Ff Gg Hh Ĥh Ii Jj, Kk, Ll, Mm, Nn Oo, Pp, Rr, Ss, Sŝ, Tt, Uu, Vv Zz.⁴⁾

En la juda lingvo oni tre ofte renkonta literon, kiun oni eldiras tre mallonge kaj kvankam ĝi ne estas simila al unu el la sonliteroj ĝi servas tamen kiel sonlitero ĉe la kreo de silaboj. Car en juda lingvo⁵⁾ tiu litero⁶⁾ venas ĉiam anstataŭ la germana e mi proponas, ke oni ĝin skribu ĉ. Ekzemple, en la vorto menĉen (homoj) oni ne aŭdas post la ĉ (tŝ) ian difinitan sonliteron, tamen aŭdigas ia obtuza literosono, kiu formas la silabon, ĉar la vorton menĉen oni ne povas ŝoldiri unusilabe. Laŭ analogio kun franca lingvo mi nomas tiun ĉi literon

⁴⁾ En la originalo sub ĉiu litero de la supra alfabeto estas eldonita ĝia prononca traduko per hebraj literoj. Car la alfabeto proponita de nia Majstro por la lingvo »Jidiŝ« tute similas nian esperantan, mi ĉi tie ne donas ĝian prononcan tradukon en Esperanto. Ni presigas la supersignitajn literojn kun Esp-a supersigno; en la originalo ili havas nur superstrekon anstataŭ ĉapeleto. Z kaj z respondas al la Esp-a J kaj j. La tuta proponita alfabeto similas nian Esperanton. Pruvo de severa logiko, kiu gvidis nian Majstron en ĉiuj rilatoj kaj proponoj. *La tradukinto.*

muta e. E kaj ĉ estas du apartaj literoj du apartaj sonoj kaj ne povas anstataŭi unu la alian ekzemple: Meren (ina nomo) oni ne devas legi Merĉen kaj inverse, brikĉen (pontoj trans riveroj) — brikĉen (piedbati), ĉepen (kroĉi) kaj ne ĉepen, cupĉen (ŝirtaŭzi) kaj ne cupĉen. Oni devas skribi la vortojn kiel ili eldirigas, ne atentante la germanan ortografion. El la tri ĉefdialektoj la litva, pola kaj volinia mi elektis la unuan, ĉar tiu ĉi estas pli pura kaj pli regula.

1. Erare estas skribi auf (sur) anstataŭ af, unz (nin) anstataŭ undz k. t. p.

2. Erare oni kutime skribas en tiaj vortoj kiel hant (mano) vant (muro) k. a. la literon d ĉe la fino ĉar oni opinias, ke t estas ne akre alparolita d. Kie la judlingva vorto finiĝas per d, tie la Judoj elparolas tiun literon akre. Multaj vortoj, kiuj havas en germana la literon d, havas en juda t kaj inverse. Ekzemple: en germana: Wind Hund en juda: vint (vento) hunt (hundo). Pli akre tio aŭdigas ĉe hintlah (hundetoj) vintĉl (venteto). Germane: Schwert, Bart, jude bord (bardo) ŝverd (glavo); berdah (barbetoj) ŝverdlah (glavetoj).

3. Ekzistas nenia bazo skribi en multaj vortoj la duoblajn apudsonajn literojn, la literon h k. t. p., pro tio, ke oni skribas ilin tiel en germana. Duoblan apudsonan literon la h oni devas skribi nur en tiaj vortoj, kie oni povas ilin klare aŭdi. Signifas, ke eraro estas skribi gott (dio) anstataŭ got, vissĉn (scii) anstataŭ visĉn, nehen (kudri) anstataŭ nejen, ŝtodt (urbo) anstataŭ (ŝtot), leihen (prunti) anstataŭ lajen k. t. p. Nur ĉe kelkaj vortoj ni rigardas necesa enkonduki apartajn nebezonaĵajn literojn, por apartigi ilin de aliaj vortoj.

Kelkaj ekzemploj estas ĉi tie citataj. betĉen (sterni liton) betĉen (peti, sin turni kun peto). cohĉlĉn (pagi monon) col (colo, mezuro, dekduono de futo). diĉh (maldika la kontrasto de dika) diĉh (leĝo) diĉhnen (servi, esti dungito).

grobĉh (fosi kavajon) grob (dika, la kontrasto de maldika).

ŝtehren (malhelpi ne allasi) ŝterĉn (stelo en la ĉielo) sterrĉn (frunto, parto de la kapo), ŝvehr (bopatro) ŝverĉn (juri, doni ĵuron) ŝverr (peza kontrasto de facila) kaj ankoraŭ aliaj.

Generale, kiu volas skribi aŭ paroli puran kaj ĝustan judan lingvon kaj ne ian miksaĵan lingvon, devas atenti sekvantajn ĉefregulojn:

1. Atenti la gramatikajn regulojn, sur kiuj la lingvo estas konstruita (modifon de la vortdeklino de la substantivoj, konjugacion de la verboj k. t. p.), gardi firme tiujn ĉi regulojn kaj ne skribi libervole, ne subdoniĝi al personaj kapricoj, ne obei la regulojn de fremdaj lingvoj.

2. Kiel eble oni devas uzi pure judlingvajn vortojn aŭ tiajn vortojn, kiuj jam fiksiĝis en la juda lingvo, kaj estu nepermesite uzi tro da fremdvortoj, kiujn oni senpripense transportas el ĉiaj lingvoj. La juda lingvo estas tre riĉa kaj nur pro nia neglekto ni nin turnas tiel ofte al fremdaj vortoj kaj forlasas la proprajn.

3. Kie efektive mankas vorto kaj ni estas devigitaj

⁵⁾ Zamenhof transiras de ĵargono al la propra nomo de la lingvo »Jidiŝ«. Kelkloke Zamenhof uzas por ĝi la esprimon »juda lingvo«. El ambaŭ nomoj mi elektis por la traduko la esprimon »juda lingvo« pro pli bona orientiĝo de la esp. legantaro, kvankam pli ĝusta — estus elekti la unuan t. e. »Jidiŝ« ĉar efektive tiel la lingvo nomiĝas ĉe ĉiuj ĝiaj parolantoj.

La tradukinto.

⁶⁾ Sekvas en parentezoj la hebrea e

La tradukinto.

TRI VERSLIBRETOJ.

Alois Norbert: *La mondo ridas*. 6¼ paĝoj. Eldono de la aŭtoro. Prezo: 1 S.

Preferu plori oni emas foliumante tiun ĉi libron, plori pro tio, ke libroj, starantaj sur tia spirita kaj vers-
teknika nivelo povas aperi ankoraŭ en nia literaturo, eĉ
se nur en propra eldono. Vi eble riproĉos al mi la in-
dignon kaj demandas min, kial malutilus malbonaj ver-
soj, se la aŭtoro memkoste volas ilin ĝui en presita
formo? Jes, vi pravus, se temus pri nacilingva libro, sed
en nia literaturo la afero ne estas la sama. Imagu nur,
ke nova adepto prenas ĝin en la manon (li ja serĉos unue
facilan legaĵon) kaj plu ne prenos en manon esperantan
versvolumon, aŭ eĉ tute seniluziigas pri la lingvo, kiu
produktas nur tiajn versojn? Kaj ankoraŭ: en la lastaj
tagoj mi legis en nacilingva gazeto artikolon de nacilingva
verkisto pri Esperanto kaj inter aliaj misinformitaĵoj li
skribis, ke »oni montris esperantajn versojn, kiuj fariĝis
en korektaj jamboj kaj trokeoj, la rimoj bele kunsonoris,
ili posedis ĉiun kriterion de l' verso kaj tamen ili ne estis
versoj«. Nu, ĉu vi ne pensas, ke al tiu verkisto oni
montris versojn similajn al ĉi tiuj? En tiaj kazoj la
recenzisto devas formeti ĉian indulgemon, li havas solan
devon: diri la veron rekte. Kaj se la aŭtoro estas bonkre-
dema esperantisto, li ne ekkoleros kontraŭ la kritikisto
kaj en la estonto havos plian memkritikon kaj ne publik-
igos versojn, kiuj taŭgas por malvasta amika rondo,
grupaj vesperoj, sed neniel en la presejon.

Aŭditajn anekdotojn prilaboras la aŭtoro en la
libreto, certe ne la plej bonajn anekdotojn... Kaj sufiĉe
sukcese li platigas eĉ la pli bonajn! La prezentmaniero
senas ĉian lerton kaj klopodojn artistajn. Kvazaŭ Schwartz
neniam estus verkinta! Mi eĉ suspektis la aŭtoron, ke li
ne konas la Schwartz-ajn versojn, ĉar en kontraŭa kazo
kiel estus eble, ke li nenion lernis de li, almenaŭ
memkritikon...

Kaj la lingvo! Neniam mi skribus tiel senindulge,
se la lingvaĵo de la libro ne estus tia, kia ĝi estas... Jen
ekzemploj: »La bubo sed novan deziron prezentas« (vere
oni devas esti genie maltalenta, por ne skribi aŭtomate
la ĝustan vortordon: Sed novan deziron la bubo prezen-
tas.) »Estis bela tre piano«, »Kiom sed da mono kostos
ĝi«, »Jen okazis sed subite«, »Kaj pro unu nur fripono«,
»Por ke restu li punito, Oni sed en sama tago Lin for-
pelis sen hezito«, »Ne li sentis ian timon« »Kaj venos
terura jen fino« »Pagu tiom li da oro« k. t. p. k. t. p.

ĝin krei, ni devas ĝin krei ne senpripense, sed adapti
ĝin al la ĝenerala karaktero de nia lingvo.

Koncerne la vortuzon ni povas fiksi sekvantajn
regulojn:

I. unue, oni devas serĉi pure judlingvajn vortojn,
kiuj per nenio aŭ malmulte similas germanajn aŭ hebre-
ajn k. c. Ekzemple estos erare diri:

cindhelcél (alumeto), dum ekzistas la vorto *švebel*;
fartaušén (ŝanĝi) anstataŭ *farbajtén, di art* (maniero)
anstataŭ *der ŝtejgor, fil* (multe) anstataŭ *a sah* k. t. p.

II. La judaj vortoj, kiuj estas prenataj el la ger-
mana, devas esti uzataj en la formo, kiun ili havas en
juda lingvo kaj ne en germana. Ekzemple, estas eraro
diri *kugél* (kuglo) anstataŭ *koul, antvortén* (respondi)
anstataŭ *entfern, enkél* (nepo) anstataŭ *ejnikel, creh-
lén* (rakonti) anstataŭ *dercejlén* k. t. p.

III. Oni devas eviti vortojn, kiujn oni uzas en unu
regiono aŭ eĉ iu klaso de homoj. Oni devas do, eviti la
uzon de provincismoj, aŭ germanaj kaj hebreaj vortoj,
kiuj estas malmulte bezonataj; ĉefe oni devas eviti
slavajn vortojn, ĉar la unuaj estas iel proksimaj al la
juda preskaŭ tute fremdaj kaj plejparte nekonataj al

Ĉu post ĉio ĉi oni miroj, se la aŭtoro kredas rimo »nun
vi — do vi«? Ĉu oni miroj, ke la personaj pronomoj en
pli ol naŭdek imparoj servas rime? S: jnas al mi, ke mi
citis sufiĉe por pravigi ĉi kritikon.

K. Langgaard: *Esperanto-poemoj*. 16 paĝoj. Eldon-
ejo: Sefo-Danio. 1937. Prezo: 0.50 dkr.

Kion signifas la titolo? Esperantlingvaj poemoj jam
aperis antaŭ ĉi tiu volumeto, do kial akcenti la esperant-
lingvecon de ĉi tiu eta kolekto konsistanta el tradukaĵoj?
Sajne ĉiuj estas tradukitaj el la dana, sed troviĝas rusa
popolkanto, ĉu ankaŭ ĝin la aŭtoro tradukis el la dana
aŭ el la rusa originalo? Ne estas montrita la nomo de l'
aŭtoro eĉ la jenaj poemoj: »La dana kanto« (ĉu nacia
himno?), »En Danlando«, »Al Hawai«. Grandpretendaj
ne estas la poemoj, nek la traduko. Sed ĉarmajn versojn
oni povas trovi foje-foje, jen:

»Kunprenu min al Hawai,
Al la fabela land',
suno, feliĉo kaj amo
apud la palma strand!
Kaj ni kantos inter palmoj
je la son' de la gitar.
Kunprenu min al Hawai
ĉe la tropika mar'«

Cetera la verstekniko estas tiu de komencanto. Kaj
oni povas nur miri, kiel nelernemaj estas la nunaj kom-
encantoj: kvazaŭ la ĝisnunaj venkoj, de la esperanta
verso ankoraŭ ne estus okazintaj, ili neglektas la ĝis-
nunajn akiraĵojn kaj komencas versi, kvazaŭ la lingvo
nun estus naskiĝinta... Jen, tiu nelernemo kaŭzas, ke
en la volumeto oftas la adasismoj, la aŭtoro certe kredas
ilin rimoj kaj neniu klarigis lin ankoraŭ pri la kontraŭo.
La personaj pronomoj ankaŭ en ĉi tiu volumo ludas
gravan rim-rolon... »La via metala kanto« — la uzo
de la artikolo gramatika eraro, same la uzo de akuzativo
en »ĝis enon de l'kor« (sufiĉe stranga esprimo!). Sur
la titolpaĝo aplombas: unua eldono... Nu, mi esperas,
ke la tradukanto baldaŭ atingos al pli supera evolu-
grado kaj li mem malhelpos duan eldonon el ĉi tiu, ankoraŭ
nematura, libreto.

N. o. a. Liventhal: *Esperantio — ĉefe en Danio*. 16
paĝoj. Eldonejo: Sefo-Danio, 1937. Prezo: 0.50 dkr.

Certe la plej simpatia volumo el la trio. Ĝi enhavas
originalaĵojn de la juna aŭtoro. Nu, ankaŭ li devas
ankoraŭ multon lerni, sed nepre vekas la simpation lia
modesteco, per kiu li ne pretendas esti poeto:

la amaso de judoj, kiu ne loĝas en Rusujo.

IV. Nur tiuj slavaj vortoj (ĉefe polaj) kiuj estas
uzataj en juda lingvo (almenaŭ en Rusujo kaj Polujo)
jam depratempoj, de multaj jaroj, devas resti kaj ne
povas esti anstataŭataj per germanaj vortoj, kiuj ĉiu-
okaze estos fremdaj por la popolo. Ekzemple estas mal-
permesite diri *fussbodán* (planko) anstataŭ *podloge tej-
mašin* (samovaro) anstataŭ *samovar* k. s.

V. Mankantajn vortojn oni devas peni krei de judaj
vortoj, kiuj jam ekzistas, aŭ enkonduki germanajn vort-
ojn, sed, kompreneble en judlingva spirito. Ekzemple,
kiam ni enkondukas la germanan vorton *ergāncán* (kom-
pletigi) ni devas tiun modifi je *dergančan*. Alie, tio
restos fremda por la juda lingvo. Novajn hebreajn aŭ
slavajn vortojn oni ne devas enkonduki. Se anstataŭ
mankanta vorto troviĝas jam enkondukita hebrea vorto,
sed ne estas ankoraŭ de ĉiuj bezonata, tiam ni povas ĝin
lasi, ĉar nun aŭ pli malfrue oni alkutimiĝos al ĝi; sed
se la vorto enkondukita estas slavdevena kaj ne estas
ankoraŭ de ĉiuj uzata, tiam ni devas ĝin nepre ŝanĝi je
vorto prenita el la germana lingvo.

El la juda tradukis: S. Guterman.

»Mi ne estas ja poeto,
sed nur eta pedagogo.«

Kial do li aperigas poemojn, se li ne estas poeto? — demandas la leganto. La poeto-pedagogo respondas en sia »antaŭpoezio«: »Certe ĉiu normala plenkreska persono sentis iam la nerezisteblan deziron: verki ion en la poezia lingvo. Dum la maloftaj momentoj de tiu natura malsano mi skribis la sekvantajn poemojn«. La temaro de ĉi tiuj malmultpretendaj versoj estas nemultspeca: kelkaj ŝercaj amindum-poemoj, kelkaj satiraĵoj pri la esperanta vivo (eble ĉi tiu flanko promesas plej multe da evolu-kapablo), kelkaj dediĉ-poemoj, kiuj prezentas danajn gvidantojn de la movado, kaj naiv-voĉa petolado kontraŭ unu el la longbarbuloj de la esperanta poezio. Jes, ĝuste la vorto »naiva« pleje karakterizas ĉi tiun verketon, estas ĝia naiva ĉarmo, kiu pardonigas kaj foje-foje eĉ forgesigas la primitivecon de l' tuto. Tiaj strofoj legiĝas facile:

»Bonan tagon kaj vesperon«,
»Ĝis revid« — mi ĉiuj diras.
Fortan havas ni esperon,
Nia lingvo bone iras.

Lerni iun novan vorton —,
Ni ne volas kaj ne povas.
La studad' bezonas forton —
Guste tion ni ne trovas.«

Malgraŭ ĉi tiu verketo mi estas konvinkita, ke mi ne trompiĝos kredante, ke en la esperanta literaturo ni renkontiĝos ankoraŭ kun la nomo de Liventhal.

Lali Blond.

H. SIENKIEWICZ: KAPTITAJ EN NUBIO. (Trad. Frato Wigbertus Van Zon. Eld. J. M. Krijnen, Vught, Nederlando. 120 p. Formato 17×21 cm. Prezo: sv. fr. 2.10 broŝ. kaj 3.10 bind.)

La novelo enhavas aventurojn de du forrabitaj infanoj, kiuj feliĉe liberigis. La vera publiko de tia rakonto estas la infanoj. Sienkiewicz sendube sciis la manieron rakonti interese kaj ankaŭ tiu ĉi novelo certe katenas la intereson de sia publiko. Mi kredas, ke mi tute precize difinis la lokon de tiu ĉi rakonto. Mi ja tute ne volas diri, ke ĝi ne povus esti favorata legajo de nia komencintaro, eĉ... Facila, agrabla formo, varia enhavo kaj ne laste la eksterordinare klara kaj sendube unuaranga traduko proponas la verkon en la atenton de la nomita publiko.

Guste la boneco de la traduko rajtigas min fari kelke da rimarkoj. La plej granda parto de tiuj ĉi rimarkoj rilatas nur stilajn pezajojn. Plejparte ili ne estas tro gravaj; kaj mi povas ree aserti, ke en mezkvalita traduko la nombro de similaj kaj multe pli gravaj malĝataĵoj aperas kvin-sesoble pli multaj.

Sufiĉis lin rigardi en la okulojn... ni legas sur la 12-a paĝo, sed pli volonte ni vidus la formon: sufiĉis rigardi en liajn okulojn.

Lau mia opinio oni devus jam ĉesigi la superfluan uzadon de la sufikso en tiaj »vortoj, kiaj estas realeco (realo), proksimeco (proksimo), saĝeco (saĝo). Por ilustri la diferencon mi citas nur unu tian frazon, en kiu ni trovas la sufikse ŝarĝitan vorton: »... mi pensis, ke vi havas pli da saĝeco.« La frazo tuj aspektas pli natura kaj pli facile fluganta, se ni diras: »Mi pensas, ke vi havas pli da saĝo.«

Stranga estas la frazo: »... la suno brulis sur la kapojn de la rajdantoj.« (p. 20.) La traduko ja ne estas tute facila; la tradukinto ja fremdis al la solvo: la suno bruligis (ardigis) la kapon de la rajdantoj.

Kelkaj pli malfacilaj vortoj estas klarigitaj en notoj, sed la klarigoj ofte diras nenion, ekz: vulturo — taga rabobirdo, sed ofte tute mankas klarigo ĉe tiaj vortoj, kiel ekz. ramfasto, kiu certe ne estas konata al komencinto. Oni preskaŭ ne povas eviti la uzadon de vortaro ĉe tiuj, kiuj jus komencis lerni kaj kvankam la intenco

tiurilate estas tre laŭdinda, ĝi ne estas tute kaj konsekvence plenumbla.

»Stas ne unu momenton dubis, ke... — estas legebla sur la 41-a paĝo — anstataŭ: Stas eĉ unu momenton ne dubis.

»Ne pli ol cent paŝojn estis la distanco.« La akuzativo evidente estas eraro. (58-a p.)

La absoluta puritaneco de la stilo, cetere laŭdinda kelkloke kreas kuriozaĵojn: »Stas kaj la juna negro estis formelintaj la mortigitajn arabojn...« (Iom tro pedanta kaj preskaŭ negoca vorto pri ago, per kiu oni enterigas, aŭ kovras kadavrojn.) El la sama speco estas la tro klariga »bekinterfrapado de cikonto«.

Tre interesa estas la jena ideo-konstruo: ... estis mallumege... Por rimedi al tio... Tiu »por rimedi« tre plaĉas al mi, sed estus pli klare uzi alian prepozicion post tio.

Definitive eraroj estas la jenaj, troveblaj sur la 89-a paĝo: *teruriga* anst. *terura*. La alia: *Ĉiujn li kaptis ekster la viroj, kiuj ĝis nun mortis pro la variolo*. La ĝusta vorto estas *escepte*.

Oni ankaŭ devus deĉifrigi pri la peza formo: *kutimigita* kaj ekuzi anstataŭe: *kutima*, kiam miskompreno ne minacas.

La rimarkoj ŝajnas esti tro detalaj, sed ili ja ne estas direktitaj ĝenerale kontraŭ tiu ĉi libro, sed estus noteblaj preskaŭ ĉe ĉiuj esperantaj presajoj. Do tiu ĉi detaleco erarigu neniu pri la vera valoro de la traduko.

F. Szilágyi

EDMONDO DE AMICIS: KORO. Libro por knaboj. Tradukita el la itala lingvo de * Eldonejo A. Paolet, S. Vito Tagliamento. Prezo: 12.— liroj + 2.50 sendkostoj.

En frua infanaĝo mi renkontis tri verkojn, kiuj donis al mi la vojelektan impreson: Don Kihoto (de Cervantes), Koro (de Amicis), Mumio de Zarathustro (de Kupcsay). Mi bone rememoras, ke la unua verko igis ridi miajn samaĝulojn, sed ĝi vokis kelkfoje larmojn el miaj okuloj. Versajne mi eksentis, kiel malfacile kaj vane estas portadi la krucon de la primokata idealismo. La dua verko, Koro, inspiris celdifinojn al mia infana animo. En ĉiu instruisto mia mi serĉis la instruistajn tipojn de la verko kaj en ĉiu lernejkamarado mi deziris retrovi la knabajn heroojn de la romano. Mi mem deziris fariĝi »koro«, nura homa koro. La tria verko metis la punkton al mia naiva decido.

Jardekoj pasis, sed dume mi renkontis ofte la verkon de E. de Amicis. De tempo al tempo kvazaŭ mi pilgrimis al ĝi por refreŝigi en la idealismo de la verkinto, kies vortoj iam tiel forte influis min. Ofte mi aĉetis la verkon por donaci al la fileto de mia gastiganto. Pli taŭgan libron mi ne konis por knaboj. Kompreneble ekzistas centoj da unuarangaj verkoj por la junularo, sed en neniu mi retrovis tiun amospiran sincerecon, tiun edukan forton, kiuj ĉe ĉiu paĝo de tiu ĉi verko reliefiĝas per majstra simpleco. Lau mia opinio, »KORO« estas ĝuste tiu verko, kiun oni devus enkonduki; devig: en ĉiun elementan lernejon kiel legolibron. Ĝi instruas la ekevoluantan infanon pri nobla batalo por idealoj, vekas en la animo de la etaj homoj la senton de la homa solidareco, sugestas la penson, ke la mirakloj de la homa koro estas almenaŭ tiel gravaj, se ne pli, ol la kulto de la muskoloj por fariĝi utila filo de la nacio kaj tiu de la tuta homa familio.

La subtitolo de la verko, »Libro por knaboj«, ŝajnas al mi, povus havi kompletigon: »por gepatroj kaj pedagogoj«. Car efektive ĝi estas libro por tiuj, kiuj dezirus eduki generacion humane pensantan; libro por tiuj, kiuj ofte forgesas en la hodiaŭa egoista mondo, ke ili havas ankaŭ koron kaj ke tiu ĉi koro estas pli ol karnopeceto regulanta la sangcirkuladon; libro por tiuj pedagogoj, kiuj ne ĉiam memoras pri tio, ke la bonkoreco, la enprofundiĝo en la infananimon pli facile transportigas la distancon inter la sciencoj kaj junaj mensoj ol la pedagoga rigoro, instruista dignoteno, kaj ne malofte tiu kruelo de plenaĝulo, kiu refutan spiton, malobeemon

vekas en la infanoj. Tiu ĉi libro instruas la infanon pri amo al lia instruisto, kaj la instruiston delikate avertas pri lia respondplena tasko, tre malfacila, sed plej nobla.

La esperanto-eldono de la verko estas tre plaĉa, la traduko elegante flua kaj al ĉiu esperantisto mi rekomendas *ĝian legadon*. Vere laŭ enhavo kaj stilo ĝi taŭgas bonege por la komencantoj tiom pli, ĉar la spirito de la verko estas tre proksima al la idealo de nia Majstro mem. Per ĝi ni bone akcelas la karakterevoluon de la infano kaj sukcese rememorigas la plenaĝulojn pri tempo, kiam la pacon garantiis la homa solidareco, amikeco, helpovolo kaj kompato. *Jobo.*

DRAGUTIN TADIJANOVIC: KANTO AL MIA KORO. El la kroata tradukis Josip Velebit. Eldono de la tradukinto. Zagreb, 1936. 64 paĝoj.

Gluiĝo al la familio, funebro pro la patro kaj frato, funebro pro la mortinta amatino, intensa respiro al la infaneco kaj kune kun ĝi sopiro al la kamparo, feliĉa scenejo de papilio ŝvebpeza knabaĝo: jen la ĉefaj temoj sur la ne tro vasta liro de Tadijanoviĉ. Se unuavide lia mondo ne ŝajnas tre multebraka, tamen tuj frapas la leganton la forteco de la interna impulso, tamen tuj ektuŝas la varma spiro de ĉi tiu sekrete ardanta poeta brusto.

Li apartenas al transira generacio: kamparan-filo, kiu ankoraŭ ne kapablis ekŝati la urbon, sed mi apenaŭ kredas, ke ia returno al la forlasitaj kampoj kvietigus lin... La malŝatata urbo tro forte ekkaptis lin... Tia transireco neeviteble kunportas maltrankvilon, nekontenton, ian nedifineblan sopiradon. Kelkfoje la priprento pri la forlaso de l' hejmo survestas tragikajn tonojn:

»Mi ne zorgas familion fondi
Nek brilas la vizaĝo pro feliĉo hejma;
Patra domo, for de mi, pereas.«

Aŭ:

»Ho, kara panjo mia,
Ho kara animo mia!
Eĉ nun vi pensas:
Sinjoras mia filo urbe.

Sed via filo vivas urbe per fremdul-favoro
Kaj versojn skribas, ha, ha... kaj skribas versojn!
Foras de li plugkampoj patraj,
Foras la plugkampoj. — Neniam mi ilin plugos, neniam plugos!«

Sed ne estas nura negativo en ĉi tiuj versoj, kiel pozitiva flanko de Tadijanoviĉ montriĝas unuafaje lia socia sento, liaj okuloj tute ne fermiĝas antaŭ la urba mizero, lia koro ne surdas kontraŭ la malŝanceloj de l' vivo. Kaj ĉi tie eĉ indigneto eklaŭtas sur lia liro, ni legu nur la versojn pri sinjoro Lamian.

Esence pozitiva trajto de lia individueco estas lia june freŝa vivjeso, kiu nekontraŭstareble trarompas ĉiun mallumon de la malĝojo. Estas ĉe li preskaŭ konsekvenco, ke ian mornan bildon fermas subite inundo de la plejhelo. Ekzemple la prem-humoran Baladon pri buĉitaj ŝafoj finas la sekvaj strofoj:

»La manoj kruelaj forte ĉiun faligas:
Sen malcedem', genue alpremita,
Ĝi akceptas morton per tranĉil', en sango.
Safar-dekdu' falpendas jen, de sur la fer-kolono.

Okuloj vitraj; — lan' sangplena; — piedoj rompaj.
Post dekliv' la sun' aperas. — Dum reiro
Al paŝtistino ŝajnas eĉi, blekad' obtuza, fore.
Paŝtej' pro herba ros' trembrilas en la suno.«

Kaj ĝuste en tiu ĉi optimista eksereniĝo de lia mondvido mi vidas garantion por tio, ke Tadijanoviĉ maturiĝos trans sia nuna junece melankolia periodo kaj alvenos al heroe triumfa kompreno de l' vivo.

Trafoliumante la libron la senrimeco de l' versoj iĝas monotona, laciga. Estas rimarkinde, kiel rapide forvelkas, malaktualigas volumojn, kiuj enhavas nur «enrimajn, liberritajn versojn. Vere nur tiuj saviĝas en la estonton, en kiuj la poeto sukcesas krei por sia verso ŝtale duran ritmoverteblon... Nek Tadijanoviĉ, nek Velebit ŝajnas sukcesa en tio. Mi supozas, ke Velebit tradukis formfidele, sed en ĉi kazo li estus farinta pli ĝuste, se ĉe kelkaj versoj li estus uzinta rimojn, ekzemple en la verso »En la lunbrilo« la manko de rimoj estas ĝena. Pravas la poezian talenton de l' tradukinto, ke li klopodas helpi kontraŭ la grizeco de la formo, li lerte uzas aliteraciojn, li konscias pri la sensa valoro de la sonoj. Ni ekzemplu nur per du citaĵoj:

»El fulga fumotub' al steloj grimpas griza fumo«
kaj
»Kaj forfantomis la florar' kaj florvendejo varma«.

Kvankam troviĝas en la traduko malglataĵoj, kvankam kelkfoje sentiĝas la lukto por la ĝusta sinnesprimo, estas nekontesteble, ke Velebit serioze laboras por atingi la altan poezian stilon.

Anstataŭ »malvarma« la tradukinto uzas »kolda«. Nu, certe ĝi pli plaĉas al li ol »frida«, proponata en la »Parnasa Gvidlibro«. Kaj li havas planan rajton por tiu prefero. Sed se ni iom enpensiĝas, ni rekonos, ke temas pri io alia ol prefero. La aŭtoro de ĉi linioj ekzemple preferas »aprezi« al »apreci«, rolanta en la Parnasa. Tamen de la apero de tiu libro li uzas »apreci« kaj rezignis la individuan preferon. Kial? Nu, certe ne tial, ĉar li konsideras la libron ia diktatora edikto, kiu estas netuŝebla, sed ĉar li rekonis, ke la leganta publiko rajte postulas ioman unuecon en la uzata poezia lingvo. Ĉe la kontraŭuloj de la alta poezia lingvo ni vane serĉas komprenon, do ni atentu, ke ni senbezone ne ĝenu niajn bonvolemajn legantojn. Kaj okaze de »frida« tiu bezono certe ne ekzistas, ĝi estas almenaŭ tiel bona kiel »kolda«. Kompreneble mi ne diras, ke »kolda« estas malplaĉa, sed se »frida« jam estis uzata plurfoje, se ĝi rolas en la Parnasa, kial proponi novan vorton? Se al iu »frida« tro malplaĉas, ĉu ne estus pli racie uzi »malvarma« kaj atendi ĝis »frida« enradikiĝos aŭ malaperos? Rezigni pri io preferata estas ofero, sed kolego Velebit montriĝas tiel inteligenta adepto de nia esp-a kulturo, ke mi rajte esperas de li rekonsideron de la afero.

Lali Blond

XII-A SOMERA UNIVERSITATO. Konferenco de instruistoj — Konferenco de Virinoj. 15.5×23 cm. 64 paĝoj. Eldonis: Albrecht Dürer-Verlag, Wien, VII., Bandgasse 28. Prezo 5 resp. kuponoj ĉe Internacia Esperanto Muzeo, Wien I.

Kortega konsilanto Hugo Steiner kunmetis la tre valoran libreton, enhavante la paroladojn sciencajn kaj lingvajn okaze de la lasta universala kongreso en Vieno. Ni devas bedaŭri, ke ne ĉiujare aperis tiaj libretoj pri la kongresparoladoj, ĉar ilin oni devus laŭlegi ĉiulande dum grupkunvenoj por tiuj, kiuj ne povis ĉeesti. Precipe la prelegojn de A. Müller pri la Ligo de Nacioj, de E. Spielmann pri Internaciaj Unioj, de Kalocsay pri la perspektivoj de nia literaturo kun versitaĵoj, de J. R. Scherer, ktp. La prelegon — laŭ mia scio ne okazintan — de hungara ŝtatestretario emerita: dro Hantos oni devus laŭlegi en la grupoj de la apudnubaj landoj. Tre valora estas la teksto de Lidja Zamenhof; kaj la prelegoj pri la instruado ĉiuj estas konindaj. Ili devus esti partoj de »Vivaj Gazetoj« kaj kelkaj aperi tradukite en priinfanaj kaj edukaj revuoj, unuavice tiu de Marie Borel. Estu tiu ĉi libro ne nur konservata dokumento pri pasinta laboro, sed vivanta vorto en ĉiuj landoj.

En la tradukitaj artikoloj estas kelkaj nekorektaĵoj, ekzemple: »Rigardu en ili la ŝirmistoj la popoloj« (rigardu en ili la ŝirmantojn: akuzativo kaj ne profesiaj ŝirmistoj!), sed ili nenion forprenas de la ĝenerala enhavo.

LA HOTELAJ KUPONOJ KAJ BENZIN-KUPONOJ POR LA FREMDULOJ EN ITALUJO. Instrukcio pri acetado kaj uzado. 1937. XV. Ente Nazionale per le Turistiche, Roma, Via Vittorio Veneto, 62. Italujo. Poŝformato. 96 paĝoj.

Ni devas gratuli, ke la itala turismo tiel progreseme uzas Esperanton kaj prezentas en Esperanto praktikajn instrukciojn por la turistoj, kiuj iras al Italujo, konigante la veturfavorojn, uzojn de hotelkuponoj, ĉekoj, benzinoĉekoj, ktp. kaj plenan laŭlokan liston de la hoteloj, kie la hotelkuponoj validas. La senpaga kajero estas necesa por ĉiu vizitanto de Italujo.

P. B.

✓ GEORGO F. WATES: PROGRESADO KAJ LA PASINTECO (Ekrigardo tra la tempaĝoj). El la angla tradukis: William Bailey. Eldonis: The Esperanto Publishing Co. Ltd., Heronsgate Rickmansworth 152 paĝoj. 12.5×19 cm. Prezo: 3/6 s. + afranko 6 p.

Kiel la aŭtoro mem anoncas en sia antaŭparolo al la Esperanta eldono, li ne multe pritraktas la teoriojn de progresado, sed priskribas kelkajn grandajn epokojn de la mondhistorio, kaj lasas ilin fari propran impreson. Koncize kaj objekte li prezentas faktojn, kiuj konsistigas la esencon de lia honeste, konsciencie kaj senpartie verkita libro. Jam de la unua ĉapitro li demonstras, ke ofte la progreso estas nur iluzio, kaj li konsilas rigardi en la pasinton por vidi kion la historio povas al ni instrui. La homa evoluo, tra kiu sentiĝas konstanta strebo al plibonigo, montras senĉesan alternon de perfektigo kaj dekadenco. Ege malrapide realiĝas la etikaj aspiroj, ĉar sur la morala kampo ekzistas nenia sepmebla boto, kiu transportus la homon al la »venonta pli bona mondo«.

Unu el la plej instruaj ĉapitroj estas tiu pri Mahomet kaj la Islamo. Bonege la aŭtoro akcentas la viglajn kontrastojn en la komplika personeco de la profeto. Kapitano tirana, kruela kaj malĉasta, li montriĝas ankaŭ lojala, grandanima, justa kaj kompatema homo. Al siaj admirindaj moralaj preskriboj, li miksas incitojn al sangverŝado kaj promesojn pri ĉielo, kie regas lukso kaj volupto.

Same temperamentan naturon kaj same akrajn nekonsekvencojn posedas Luther, ofte netolerema kaj perfortema bigotulo. La aŭtoro faras interesan komparon inter li kaj Erasmus, al kiu mankas ĉefe tiu fizika kuraĝo, kiu ĉiam karakterizis la sintenon de Luther.

La paralelo inter Voltaire kaj Rousseau estas rimarkinde ĝusta kaj donas traŭfan bildon pri ilia epoko. Ankaŭ la ĉapitro pri la kaŭzoj kaj rezultoj de la Franca Revolucio estas sufiĉe sugestia. Sed plej karakterizaj pri la spirito de la aŭtoro estas la lastaj paĝoj de la libro. Lia realisma priskribo de la industria sistemo en Anglujo kaj lia skizo pri la nova Japanujo atestas, ke male al multaj angloj, li ne hezitas vidi la mankojn en la propra lando kaj la eventualajn avantaĝojn de aliaj nacioj. Tio estas kvazaŭ rebato al la malnova skolo, kiu depost la apero de la *Filozofio de l' Historio*, de Fr. Schlegel, proklamis la absolutan superecon de la anglo-saksa raso super ĉiuj aliaj kaj precipe super la koloraj.

Tial mi rigardas la libron de s-ro Wates tre valora instruilo en epoko, kiam la oficialaj lernolibroj estas farĉitaj per sukeritaj mensogoj pri la meritoj de la patrolando aŭ prezentas la tutan historion de la nacio kiel preparon al la nun reganta reĝimo.

La traduko estas bela kaj konsciencie farita. La stilo fluas klare kaj agrable. Nur kelkajn etajn rimarkojn mi deziras fari, ĉar, kiel diras s-ro Bailey, la bagateloj faras la perfektecon.

Troviĝas multloke nenecesaj sufiksoj: individualismo, industrialismo, racionalismo (individuismo, industriismo, raciismo); -emeco (-emo plene sufiĉas, ĉar ĝi nepre entenas la ideon de abstrakteco); geometriisto (geometro). Kelkfoje ĉe la uzo aŭ forgeso de la artikolo sentiĝas influo de la angla lingvo: ekz-e: tra ĉiuj la sektoj, aŭ forlaso de la antaŭ la vortoj naturo, tempo, progreso, ktp. Mi notis: estos necesa resumi kelkajn... (necese); kon-

sterniga (konsterna); vastiĝis anstataŭ *disvastiĝis*; degrado anstataŭ malnobligo aŭ sendignigo; interklarigisto anstataŭ interpretisto. La »pro kaj kontraŭ« sur paĝo 11. estas verŝajne preseraro.

La uzado de majuskloj ĉe la jenaj vortoj estas nek kutima, nek Zamenhofa: Juda, Greka, Greklingve, Ĥina, Franco, Japano, Arabo. Kial oni ne piednote klarigis la neologismojn: patristika, sinekuristo, huĝenoto, ŝiboleto, municipa kaj Hinduo? Se tiun lastan oni opinias necesa por signi antikvan hindon, oni devus paralele uzi *heleno* por antikva greko.

Kaj por fini, mi devas diri, ke tiaspeca libro tre suferas de la mirinda konfuzo, kiu en Esperanto regas pri la propraj nomoj. Parte la tradukinto havas propran sistemon, parte ne. Kial uzi la anglan lingvon por la titolo de la verkoj de Erasmus, kiu ja verkis latinlingve? Kaj kial Vittenbergo (duonasimilita) apud Bâle (franc-lingva)? Kial Kung-fu-tze apud la esperantigita (!) Buddo? Tia aferstato ne povas daŭri, kaj se nia plenrajta Lingva Komitato ne kapablas proponi taŭgan solvon, estas necese, ke bonfara diktatoro trudu sian kompetenton. Lin ni aklande salutas!

La preso estas tre bona kaj la kartonspeca papero donas al la 152-paĝa volumo aspekton de komforta diktaco. Dankon al ĉiuj, kiuj kontribuis al ĝia eldono!

Henry Vatré

✓ LECIONOJ DE MONDLINGVO »ESPERANTO«, de Mieczysław Sygnarski, dua aldono tute ŝanĝita kaj kompletigita per vortaretoj. Bydgoszcz 1935. 108 pĝ. 22.5×14.5 cm.

Lernolibro por Poloj, zorge presita, grandformata. Ni povas senrezerve rekomendi ĝin al la neesperanta publiko. Karakterizas ĝin malrapida, intensa progresigado de la lernanto tra 25 lecionoj, ĉar la lernolibro celas publikajn lernejojn pli ol grupajn kursojn, kaj estas atentinde, ke la unua eldono de la lernolibro posedas eĉ stampon de ministeria aprobo por la polaj lernejoj.

Jen kelkaj kritikoj, el lingva vidpunkto: La aŭtoro, antaŭvidante la respondon, demandas: *Kiuj estas en la klaso?* En nia lingvo, same kiel en la aliaj hindoeŭropaj lingvoj, oni kontentiĝas per: *Kiu estas en la klaso?* Post tia demando la respondo povas esti: homo, lernanto, gasto ktp. aŭ: homoj, lernantoj, gastoj ktp. Komparu: *Wer ist in der Klasse? Who is (there) in the classroom?* ktp. La respondo: *Ein Schüler* aŭ: *Mehrere Schüler, A pupil*, aŭ: *pupils*, do egale estas, ĉu ni atendas la respondon en la unu- aŭ en la multenombro. Tiu faktan, ke la eŭropa lingva spirito influis Esperanton, ne ŝanĝas eĉ la fakto, ke *kiuj* (ne: kiu) estas ĝusta kaj korekta en frazo simila, sed en sama: *Inter kiuj okazas la interparolado?* Ĉi tie venkas eventualan fremdan influon la logiko: ĉar interparolado povas okazi nur inter pli ol unu persono, tial do: *inter kiuj*, ne: *inter kiu*.

Uzado de: *Kiuj* estas en la klaso, estas same pedanta, kiel pedanta estus uzado de: *Kioj* estas sur la tablo, nur pro tio, ke ni atendas la respondon: *Krajono*, libro, plumo kaj papero. Ĉar el esperantolingva vidpunkto ne ekzistus baro por »kio«, fariĝi multenombra. La sola baro estas la komuna sento de la plejparto de la uzantoj de Esperanto.

En § 55. troviĝas eta neĝustajo, nome ke *ĉiuj* esp. numeraloj estas senfleksiaj. Estas atentinde, — mi kutimas ŝerci en Esp. kursoj — ke nia esperantista popolo estas popolo de grandaj riĉuloj: neniun nombro en Esperantujo estas sufiĉe grava kaj konsiderinda. La unua grava cifero en Esperanto ne komenciĝas pli frue ol ĉe... miliono. Kaj poste jam venas la aliaj gravaj ioj: miliardo, biliono, triliardoj ktp.

Iom konfuzos lernantojn en lec. 9-a la uzado intermiksa de »3o groŝoj por unu funto« kaj, aliloke, »po unu funto«. La aŭtoro bonvolu decidigi sin (kaj la lernantojn) pri tiu »gravega« problemo.

Mi konsilas ne doni en § 68 kiel ĉefekzemplon de uzado de *-eblo* la dubinde ĝustan »povebla«. Prefero ŝanĝu ĝin kontraŭ »farebla«.

Simile en § 72 mi ŝanĝus »malvidebla« kontraŭ la pli facile klarigebla »nevidebla«. Kiu el ni povas senhezite aserti, kion signifas »malvidi«!?

»Ĝi estis la granda puno por la knabo« en § 80 postulas forigon de »la«. Samloke: »Kiu povis nur viziti ŝin?« La frazo igas pensi kvazaŭ temas pri tio, ke la patrino, kiu povis sole viziti ŝin, ne povis fari ion alian al sia infano, ekz. kisi ŝin, k. s.

Mi konsilus forlasi la ekzemplon: ekloĝita, ekloĝata en § 123, kaj anstataŭe doni ian facilan, nekunmetitan verbon.

Anst. »ni iris amuzi sin« (p. 58) pli bone estus diri: nin.

Sur p. 75 anst. ĝistempaj restaĵoj, mi preferus: (sur)-teraj restaĵoj, ĉar iel mi sentas, ke ne ĉiuj komprenos facile, ke temas pri la korpo de mortinto.

Pri la metodo, mi preferus, se en ĉiu leciono post la gramatiko venus senprokraste la ekzercoj, kies temo estas la samlecionaj gramatikaĵoj. Komparu ekz. 5-a, 6-a k. a.

Sume kaj resume, la libro estas tre certe, malgraŭ la kritikindaj lokoj, kiuj ja ne konsistigas erarojn (eĉ malĝusta uzado de »la« estas konsiderita de Zamenhof ne kiel eraro), perfekte uzebla. Ĝia vasteco kaj la klara presmaniero, la grandaj literoj kaj la bona vortareto, kiu troviĝas en la finaj paĝoj, sendube kontribuos al ĝia disvastigo.

Leo Dreher.

✓ INTERNACIA INFANARO. VERDA STELETO. Verkis V. Seriševa, Barnaul, Siberio. — Eldonejo: T. Silva, Via S. Maria alla Porta, 2. Milano. Italio, 1926. 79 p. kun foto de V. Seriševa, desegnaĵoj, muziknotoj.

»Tiu ĉi lernolibro estis atendita de la esperantistaro el ĉiuj landoj. Ĝi estas trafita esperantista internaciismo, ĉar ĝi interpretiĝas per si mem sen alia nacilingva rimedo. La geknaboj ja ĝoje salutas ĝin... ĉar... sen lacema studado pri gramatikaj reguloj. Sed ĝin festos tiuj modestaj studemuloj, kiuj apartenas al la laborklaso... Ni kore dankas Varvara'n Seriševa'n, kiu imagis ĝin, verkis kaj ilustris, kiu antaŭeksperimentis ĝin... antaŭe en lernejo de Barnaul...« jen kelkaj vortoj el la antaŭparolo de Abigaille Zanetta.

Oni povas plene aprobi tiujn ĉi vortojn. La grand-litera preso kaj la multaj bildoj kun simplaj klarigaj tekstoj ebligas uzadon ĉe popollernejanoj kaj gelaboristoj en la tuta mondo en kursoj, sen uzo de nacilingvaj tradukoj. Ĝi taŭgas bone por rekta metodo! La bildoj estas iom tro simplaj, sed por infanoj eble eĉ pro tio pli taŭgaj, ol modernaj artistaj bildoj. Kelkaj mankoj ne difektas la libron, eble dua eldono korektos ilin. Mi mencias: mankas ĉe la koloroj: »griza«. La piedon de besto oni ne nomu: »manego«! La kanttekstoj estas ne nur naivaj, sed nepoeziaj: »Hundideto, nigr' nazeto. Ĉu vi volas lerni? Estu saĝa, sidu rekte, Flanken ne balancu.« Nek ritmo, nek rimo kaj la apostrofigo de adjektivo: »nigr', malgrand'« ne estas allasebla, eĉ en infanlernolibro. La aŭtoro ofte uzas »iru«, anstataŭ »venu«: Panjo, iru al mi? Ne en ĉiu lando estas komprenebla, ke nigra hundeto estas konstante nomata »Skarabeto«. Oni ne povas uzi »ig« ĉe tiaj ekzemploj: »knabo vestigas, viro kombigas« anstataŭ: »knabo vestas sin«, »viro kombas siajn harojn«, aŭ »patrino vestigas knabon, homo kombigas viron« kiam laŭ la desegnaĵo la patrino »vestas« la knabon, la homo »kombas« — Oni ne povas uzi »ne eĉ«, kiam oni jesos. Kelkfoje estas tia erara frazo, ekz.: »Anstataŭ, mia kokineto mi ne prenos eĉ vian ansereton!« diras vulpo kaj ĝi efektive volas diri, ke ĝi prenos la ansereton. Kial uzi »je« anstataŭ »por«? (p. 73.) — »Ili bonvolu skribi iliajn rimarkojn« ĝuste: »siajn rimarkojn«. Ĉi tiuj rimarkoj celas la plibonigon en estonta eldono, ili estas malmultaj kaj la tuta libro plene taŭgas por infanetoj en lernejoj kaj familiaj hejmoj. Uzu ĝin ofte kaj sukcese!


✓ LA JUNA VIVO. Jarkolekto 1935—1936. Dua jaro. Dekdu numeroj. Kun multaj fotoj kaj desegnaĵoj. Prog-

resa kaj komenca kursoj. 184 paĝoj kunligite en paperkovrilo, prezo sv. fr. 1.50. Adreso: West-Grafdijk (N. H.) Nederlando. (Surpresita eldonnombro: 5000!)

Ĉefa manko, ke tia kompleta, kunigita jarkolekto de revuo devus havi enhavliston, kiel la plej multaj revuoj. Jam ĉe la unua jarkolekto mi menciis tiun mankon. Alia afero: la enhavo kaj bildoj estas ankoraŭ ĉiam iom nemodernaj, en la stilo de antaŭmilitaj infangazetoj. Sed ĉio alia direbla estas nur laŭdo, rekomendo kaj ĝojo, ke tia gazeto daŭre ekzistas. Ĝi celas eduki en Esperanto kaj progresigi la 12—18 aĝan junularon. La abundaj artikoloj, longaj, mallongaj, rakontoj, kantoj, anekdotoj, enigmoj, dialogoj, precipe tiaj artikoloj, kiel: »La giganto egoista« (de Oskar Wilde, sed kial mankas ties mencio?); »La feliĉa princo« (de la sama verkisto, sed jam menciita!); tri infanteatraĵoj (inter ili unu laŭ fabelo de Andersen), muziknotoj de kantoj tradukitaj de J. Van Schoor, donas konservindan valoron. La kolekto estas taŭga donaco por junuloj, bona libro por komencantoj, uzebla en progresaj kursoj. La korespondadrezoj ĝojige plimultiĝis. (Kial mankas kelkloke ĉe tradukoj la nomo de la verkisto?) Salutinda estas la klarigaj artikoloj pri la birdoj en niaj ĝardenoj. Sed kial okupi eĉ paĝon pri opinioj de aliaj gazetoj pri »La Juna Vivo«, ĝi jam montris, ke ĝi meritas la vivon, progresu kaj ampleksiĝu! Ni malkaŝu, ke la lerta kaj meritplena redaktoro estas s-ino E. v. Veenendaal-Bouwes, al kiu ni deziras pluan sukceson. Kiel eble plej multaj grupoj kaj kursoj havigu tiun ĉi malkaran legolibron por infanoj, junuloj kaj ĉiuj komencantoj.

P. B.

Plena Gramatiko II-a eldono, pro la plikariĝo de la paperprezoj aperos nur en aŭgusto. Ni petas la abonantojn al ĝi, pacienci ĝis tiu tempo.



Desegno de ing. arĥ. HORÁK, la plej fama ĉeĥoslovaka afiŝplanisto, unua premio aŝia ekspozicio en Berlino, Toronto

M. DE WAARD: DEMANDARO KAJ RESPONDARO PRI LA HISTORIO DE LA ESPERANTO-MOVADO. (Eld. W. J. Thieme & Cie, Zutphen. P. 88. Prezo H. guld. 1.40).

La libro enhavas 128 demandojn kun ĉ. 200—250 subdemandoj kaj deta'aj respondoj pri la historio de la ĝenerala movado. Tiun parton kompletigas la historio de la nederlanda movado. La demandaro estas tiom pedanta, la respondaro estas tiom klara kaj konciza, ke eĉ recenzisto, kiu havas profesie specialan »ga'on«, povas nur laŭdi. La aŭtoro aŭ kompilanto tuŝas eĉ la analizon pritraktadon de la movado, kio preskaŭ ne estus postulebla ĉe tia ekzamena verko. Por ke mi ne tute neu mian taskon, jene mi protestas kontraŭ la jena demando: »Kion vi scias pri la franca pioniro? Kvankam Beaufront sendube estis pioniro kaj franca, tamen ne li estis la sola franca pioniro. Sed ankaŭ tion nur flank' mi rimarkas kaj la verkon pl'enfide mi rekomendas en la atenton de tiuj, kiuj deziras kontentigi eĉ la plej severajn ekzamenantojn de la Esperanto-movado.

La ekstera formo de la libro laŭdas la eldonejon.

F. Szilágyi

JULIO BAGHY: LA VERDA KORO. (Eld. La nederlandaj gemikoj de la aŭtoro. 100 p. Prezo: 1.— gld.)

»Mi deziris doni ne *majstran verkon*, sed simplan legolibron... literaturajn pretendojn mi ne havas...« — senkulpigas sin Julio Baghy en la postparolo de sia rava »pedagogia« romano kaj la subskribinto devas defendi la verkon kontraŭ la aŭtoro mem. Tiu ĉi simpla, subtila rakonto pri la siberia esperantista vivo estas unu el la plej perfektaj, plej konsciaj verkoj de nia literaturo. La rakonto kaj la stilo de la rakonto estas majstre agorditaj kaj iom post iom ne nur la komencinto, sed ankaŭ la longbarbuloj de la movado varmigas kaj sentas korvarmon kaj kunsenton al la figuroj de la romaneto. Mem la medio estas eksterordinare interesa: Siberio, tuj post la miŭto kaj kvankam Baghy rakontas preskaŭ nur pri la tiea vivo de la esperantismo, tiurilate li pliigas la gravecon de la verko, ĝi ja iĝis samtempe kroniko. La libro rekreas heroan periodon de nia movado, heroan periodon kaj heroan batalejon, la militkaptitajn tendarojn, kie homoj, ŝlositaj inter la barojn de la milita malamo, revis pri la frat-amo kaj faris tion kun la forto de la korprema kontrasto. Dank' al la reviviga forto de la baghya arto, rekreigas antaŭ ni la preskaŭ transtera atmosfero de la siberiaj urboj kaj urbetoj, kie raso, nacioj renkontiĝis en la plej kaprica kaoso kaj kie japanoj, ĉinoj, rusoj, hungaroj, aŭstroj, germanoj, poloj, amerikanoj ekkantis la Himnon: »En la mondon venis nova sento!« Tiun ĉi apoteozan renkonton de la homaj grupoj profundigas la pli-malpli felica renkontiĝo de la opaj homaj sortoj; post la »alklimatiĝo«, kion necesigas la speciala stilo, ni plenintereze kaj plen-kunsente amas la paŝtel-desegnaj figurojn, la ĉarmajn ĉinajn gefratojn, la serioze belan polinon, la amerikanon, kiu montris sin kuraĝa, kaj ni bedaŭras, ke la hungara instruisto ne estis kuraĝa... — Post la rakonto oni trovas la pedagogian materialon de la libro, la gramatikan materialon, la registron de la uzataj vortoj, demandojn, konsilojn al la kursgvidanto kaj resumon de la gramatiko, tabelojn kaj la listigojn de la prepozicioj kaj la afiksoj. (Tiuj lastaj sen klarigoj, nur kun klaraj ekzemploj; la aŭtoro ja supozas, ke la lernanto jam scias la afiksojn kaj la ekzemploj tre vokas eĉ la forgesitan scion.) La libro havas bonegajn kunlaborantojn. Unuaŭvice ni menciu K. Kalocsay, kiu sur kvar paĝoj resumis la sintakson. La ilustraĵoj tre bone harmonias kun la libro; pro ili ni povas laŭdi Péter kaj Miklós Ehrlich, la titolbildo estas laŭdinda verko de S. Berggren, entute internacia grupeto ebligis, ke tiu ĉi jam delonge necesa verko aperu kaj ĝia apero estu inda. Ankaŭ la presejo de A. Szalay faris bonan laboron. — Ĉe la margeno por notoj mi povis ĝustigi nur unu frazon: »Pensu, kion ĝi signifas por tiaj orfaj homoj, kiel ni estas.« Sendube estas nur glito, Baghy certe volis skribi: kiaj.

Kiuj instruas Esperanton, ofte spertis, ke estas la plej malfacila problemo de la daŭriga kurso, kiel solvi la demandon de la akompana literaturajo. Sendube, la romano de Julio Baghy estas unu el la imageble plej perfektaj solvoj. Kaj ankaŭ pri tio oni ne povas dubi, ke la verko estos tre populara pro sia agrabla, facila stilo, interesa temo, alloga rakontmaniero. Kaj certe ĝi plifortigos en la novverduloj tiun spiriton, kies ekziston oni nuntempe volonte neus. Kaj tial mi estas speciale

MUUSSES ESPERANTO BIBLIOTEKO

Redakcio: J. Glück, T. Jung kaj J. H. I. Willems.

Esperanto - Eldonejo: J. Muusses-Purmerend. (Nederlando.)

No. 1. La grandaj filozofoj kaj la universala lingvo. 32 p. Verkis: Julius Glück.

La unua volumo de ĉi tiu nova esp. biblioteko temas pri la klopodoj kaj projektoj de tiuj grandaj filozofoj, kiuj serioze okupiĝis pri la problemoj de Lingvo Internacia. Jen, aro da geniaj homoj, filozofoj, spiritaĵoj gvidantoj de la homaro, kiuj volis solvi la lingvan kaoson per la kreo de filozofia aŭ scienca lingvoj. Aŭ krei almenaŭ skriban lingvon, t. n. pasigrafion, ke la homaro almenaŭ skribe povu interrilatiĝi. Descartes, Comenius, Leibniz, John Wilkins, Nietzsche, (ke ni menciu nur la plej konatajn nomojn el la libreto) okupis sin por solvi la nefacilan problemon.

Por propagandistoj vere ne malfacila verko.

Kion diris ekzemple Leibniz pri la Universala Lingvo:

»... signoj, kiuj esprimas ĉiujn niajn ideojn, estigos novan lingvon, kiu povos esti skribata kaj elparolata: ĝia farado estos tre malfacila, sed oni ĝin facile lernos... ĝi mirinde servos por la interkomunikado inter pluraj popoloj.«

»Tiu ĉi lingvo estos la plej granda organo de la racio. Mi kuraĝas diri, ke tio ĉi estos la lasta peno de la homa spirito, kaj kiam la projekto estos efektiva, nur de la homoj dependos esti felicaĵoj, ĉar ili havos ilon, kiu ne malpli servos entuziasmigi la racion ol la teleskopo servas por plifortigi la okulon...«

Mi estas certa, ke neniu eltrovaĵo estas tiom grava kiel ĝi, kaj nenio kapablas tiom eternigi la nomon de la elpensinto. Sed pli fortajn motivojn mi havas pri tio pensi, ĉar la religio, kiun mi plenumas fidele, min certigas, ke la amo al Dio konsistas en arda deziro, havigi la komunan bonon, kaj la prudento diras al mi, ke nenio pli kontribuas al la komuna bono de ĉiuj homoj ol tio, kio ĝin perfektigas.«

»Se unu lingvo ekzistus en la mondo, la homaro gajnus la trionon de sia vivo, kiun ĝi ja nun oferas pro la (multaj) lingvoj.«

No 2. Rusaj noveloj de M. J. Lermontov kaj D. N. Mamin-Sibirjak. 32 p. Tradukis: A. Filatov.

Tiu ĉi volumo enhavas du rusajn novelojn. Unu estas »La fatalisto« de Lermontov, ĝi estas la finĉapitro de lia fama romano: »Heroo de nia epoko« kaj rakontas tragikan okazaĵon el la vivo de malgranda kaukaza garnizona

dankema al la aŭtoro, kiu kaŭzis al mi hodiaŭ tiel saturan plezuron. Mi finas laŭ la maniero de Baghy: Mi estu hundo, se mi legis pli aglablan »pedagogian« romanon. *F. Szilágyi.*

JARLIBRO DE LA INTERNACIA ESPERANTO-LIGO 1937. Heronsgate, Rickmansworth (Herts.) Anglujo. 258 paĝoj. Kun antaŭparolo de L. Bastien kaj la fortepianaj muziknotoj de la himno.

En ora koloro aperas en la jubilea jaro frue kaj surprize tiu ĉi jarlibro. Ĝi pruvas la sukcesan kaj diligentan laboron de C. C. Goldsmith, ĝenerala sekretario de IEL kaj ties kunlaborantoj. Ĝi pruvas ankaŭ, ke vere granda parto akceptis la novan organizon, kiel sekvanton de lastjara UEA, ĉar — la findato de la redaktado estis nur februaro — ne nur la enhavo estas pli ampleksa, ol estis la lastjara, kiu aperis nur en junio, sed ankaŭ la delegita listo enhavas samvaloran liston, ĝia amplekso estas eĉ per 8 paĝoj pli multa, kaj ni ne forgesu, ke bedaŭrinde Germanujo tute mankas nunjare! Certe, se oni estus atendinta ĝis junio, tiu ĉi jarlibro estus ankoraŭ pli ampleksa, ĉar la gazeto de IEL aperigas en ĉiu numero novan liston de delegitoj. (Listo kaj raporto de Japanujo aperis pro malfruo ankaŭ nur en la oficiala gazeto. Esperable, ili aperos en promesita aldono!)

La tuta enhavo estas 68 paĝojn pli granda, ol tiu de 1936. Praktika novaĵo estas aparta listo laŭfaka de fakdelegitoj. Kial ne de ĉiuj? Enestas plena raporto pri la viena kongreso, krom la estrara, akademia, lingvo-komitata, ktp. adresaroj, la adresoj de 31 landaj societoj, el kiuj, krom la svisa, ĉiuj aliĝis al IEL, kiuj lastjare estis en UEA. Enestas adresoj de 97 esperantaj gazetoj (kiu certe ne estas kompleta, ekzemple mankas »Dia Regno«). Valora estas mallonga raportaro pri la movado en diversaj landoj. Ni trovas en ĝi ankaŭ paroladon de E. Malmgren pri la propagando. La detala radio-statistiko estas utila, sed kial mankas statistikoj po-lande kaj kune pri la movado, pri la nombro de delegitoj kaj landoj (Mi kalkulis 58 landojn kun delegitoj!) kaj kial ne enestas la adresaro de la fakaj societoj. Kun bedaŭro ni ne trovas multajn konatajn nomojn inter la delegitoj, sed ni retrovas tre multajn el la malnovaj UEA-delegitoj, kio pruvas fidon kaj fidelecon al la estraro, eĉ sub alia nomo. Vere la delegitojn multofoje ne interesas, ĉu ankaŭ la naciaj societoj partoprenas en la centro aŭ ĉu ĝi estu nur »individua« organizo, la devizon de individueco uzas nun kelkaj samideanoj, sed la plimulto de la delegitoj neniam sentis ĝin genata de la centra laboro kaj plenumas sian servadon samideane kaj bonvole.

Ke la partopreno de naciaj societoj ne malhelpas la delegitan sistemon, plej bone pruvas, ke la nombro de delegitoj kompare la lastjara (junia!) jarlibro ĝuste en tiuj landoj kreskis (Brita, Franca, Nederlanda, Sveda, ktp.), kies landaj societoj fariĝis membroj kaj mal-kreskis en landoj, kies societoj ankaŭ antaŭe ne estis membroj!

Ne hezitu do per membreco akiri la jarlibron.

P. A. B.

urbo, kie rusaj oficiroj foje ekdisputas kaj vetas pri tio, ĉu ekzistas vere antaŭ-destino, ĉu nia sorto estas vere antaŭskribita aŭ ne.

La dua novelo estas tre kortuŝa rakonto de Mamin-Sibirjak pri la maljuna Eleska kaj lia fidela amiko kaj samsortano en la vasta Siberia praarbaro: Muzgarko la malgranda vogula hundo. Ili nur unufoje dum la jaro vidas homojn, kiam vintre alvenas la veturigistoj por ripozi dumvoje kelkajn horojn en la praarbara ripozejo, kiun gardas la maljunulo.

Sed foje mortas la maljuna, fidela hundo kaj baldaŭ sekvas ĝin ankaŭ la maljuna Eleska, kiu ne povas forgesi sian karan hundon.

Ambaŭ noveloj estas ŝajne simplaj rakontoj, sed tiom emociplenaj, profundaj kaj majstre verkita, ke oni ne povas ilin plu forgesi.

No 3. De Muheddin ĝis Mundilatin. Mondlingvaj projektoj tra la jarcentoj. Verkis: Teo Jung. 34 p.

Jen tre interesa verko el la plumo de nia senlaca kaj energia batalanto Teo Jung, ĉefredaktoro de »Heroldo de Esperanto«. Ĝi resumas kaj tre klare konigas al ni la plej interesajn kaj plej gravajn mondlingvo-projektojn de la malnovaj ĝis la plejnovaj.

Li parolas plej unue pri araba scienculo Muheddin, kiu en la 16-a jarcento inventis jam mondlingvo-projekton: »Balaibolan«, sed bedaŭrinde la projekto perdis.

Li klarigas la diferencon inter *pasigrafio* kaj *pasilatio*, do inter lingvoj nur skribeblaj kaj lingvoj paroleblaj.

Li mencias, ke la unuaj skribeblaj lingvoj havis modelojn jam en la antikvaj hieroglifoj kaj en la ideografiaj signoj de la ĉinoj.

Certaj signaroj vere enkondukiĝis en



Ervin Pál-Preiss

Grafikaĵoj

la praktikan vivon, destinitaj por difinita kampo, kiel ekzemple la *navigaciaj flagsignoj*, laŭ kiuj per 18 varikoloraj flagetoj oni povas kunmeti preskaŭ 80,000 kombinaĵojn kaj laŭ speciala internacia kodo oni povas deĉifri ilin. Aŭ la tre praktika *decimala klasifiko bibliografia*, kiu ebligas facilan enordigon de ia ajn libro en ia ajn biblioteko de la tuta mondo.

Aŭ la *kemiaj kaj matematikaj formuloj*, *astronomiaj signoj*, la *muziknotoj* kaj la diversaj *kodsistemoj*.

»Sed ĉiu vera lingvo ja devas esti parolebla, por prave porti la nomon de lingvo.«

La paroleblaj mondlingvo-projektoj havas du ĉefajn kategoriojn: *lingvoj aprioriaj* aŭ *filozofiaj lingvoj* kiuj estas kreitaj laŭ fantazio kaj *lingvoj aposterioriaj* aŭ *empiriaj lingvoj* kiuj estas kreitaj laŭ la modelo de la naturaj lingvoj.

Ekzistas krome t. n. *miksita lingvoj*, kiuj tiom ŝanĝas, deformas la modelon de la naturaj lingvoj, ke la artefarteco superas ilian naturecon.

Teo Jung, kiu ankaŭ mem faris mondlingvo-projekton, sed modeste ne publikigis ĝin, donas *skemojn* pri la ĉefaj lingvoprojektoj. Ekzemple la *skemon de la filozofia lingvo* la *cifero kaj nombro-sistemon de Leibniz*, la *muzikan lingvon de Sudre* »*Solre sol*«.

Ili estis teoriaj ludaĵoj, ili celis tro alten, ili estis tro fantaziaj, sed Leibniz jam palpas la veron kaj eklaboris pri arte farota lingvo *sur la bazo de latino*.

Kiam aperis »*Volapük*« en 1880, ŝajnis, ke la problemo estas solvita. Ĝi faris grandan sensacion kaj mirinde rapide disvastiĝis, ĝi havis jam 316 lernolibrojn en 25 lingvoj! *Volapük* prenis kiel modelon la vorttrezoron de la angla lingvo, sed ĝi arbitre ŝanĝis, ĝis nerekonobleco la vortelementojn.

Zamenhof devis veni, por trovi la »*ovon de kolumbo*«, la ĝustan solvon: »oni devas uzi la jam konatan lingvomaterialon, precipe la jam ekzistantan internacian vorttrezoron kaj cetere, ĝis plejeble alta grado, simpligi la gramatikon.«

Sed post la apero de Esperanto ne ĉesas la lingvo-projektoj! Venas ŝajne la plej danĝera: *Ido*, la »*sciencoza*« lingvo, pli da reguloj, eĉ esceptoj, vortaro pli ampleksa ktp. Sed oni ĉiam reformas ĝin, ĝis fiasko.

Jen, la tre interesa »*Occidental*«, ĝi jam estas tiom ellaborita, ke apenaŭ oni povas ĝin diferencigi de iu vivanta okcidenta lingvo. Aŭ *Anglic*, *Basic English*, *Novial*, *Mundilatin*.

Teo Jung tre sprite skribas, aludante al la multaj lingvoprojektoj eĉ post Esperanto, ke »la eltrovo de nova

mondlingvo ja prezentas nenian malfacilaĵon — post tiom da antaŭaj projektoj faritaj. Oni povas »koli mondlingvon« eĉ kun ia speciala kvalito, ekzemple lingvon speciale por *sciencistoj* kiu devus esti la plej precizige detala; lingvon speciale por *neklervaloj*, kiu devus esti tre primitiva, simpla, eventuale tute ne ekzistu gramatiko; aŭ lingvon speciale por *poetoj*, ĝi havu laŭeble ampleksan vortaron, vorton por ĉiu esprimnuanco, por ebligi al la poetoj kiel eble plej riĉan esprimmanieron. Ekzistu multaj vortoj facile rimantaj, ankaŭ multaj unusilabaj (t. n. viraj) rimoj.«

La verkon finas komparaj tekstoj el la »*Patro Nia*« en la latina kaj en la diversaj mondlingvaj projektoj.

Tre utila kaj rekomendinda verko!

Ni scivole atendas la plurajn volumojn de ĉi tiu nova biblioteko.

László Halka.

EN LA NEBULO tre facila legolibro. Originale verkita de Christian Hougaard. Dua Eldono. Dansk Esperanto-Verlag — Aabyhoj — 1937. Prezo: Dana kr. — 50; 23 paĝoj.

La libreto estas destinata por progresaj kursoj kaj por tiuj, kiuj finis kurson, ĉar ĝi, simile, kiel la — bedaŭrinde aparte nehavebla — noveleto »*Kat Jen kaj Nik Nek*« kaj la libro »*Verda Koro*« de Baghy, komencas per simplaj frazoj kaj en kadro de rakonteto gvidas al pli malfacilaj gramatikajoj. Ĝi similas al la nomitaj Baghy-verkoj ankaŭ per tio, ke ĝia temo estas Esperanto, la interna ideo, la ideala laboro por la lingvo. Noblaj homoj per helpo de riĉulo sur aparta insulo formas modelan, idealistan esperanto-landon, kiu devas esti bazo por esperantigi la tutan teron. Mi ne komprenas, kial oni nomas tiun ĉi projekton »*aventuro*«, kiu »*efektiviĝis*«. Por mi »*aventuro*« havas alian signifon. La teksto estas vere bonege taŭga por komencantoj. Mi nur miris, ke en tia instrua libreto, prezentanta familion, mankas la esprimo »*filo*«, »*gefilo*«, kaj patro diras »*rigardu niajn geknabojn*«, kvankam temas pri »*gefilo*«, (paĝo 16.). — Ne estas ĝusta la uzo de imperativo post »*se*« (»*Se ni ĉiam vivu*«, laŭ mi: »*se ni ĉiam vivus*« aŭ »*vivos*« p. 20.) En la frazo »*Vidu, kiel belegan vidaĵon*« (p. 21.) aŭ forestu »*kiel*«, aŭ ne necesas la akuzativo!

En frazo »*apenaŭ ĝi haltas* (la vagonaro) antaŭ ol la pasaĝeroj eliras el la vagonoj« (p. 13.) ne estas klara la uzo de »*antaŭ ol*«, ĉar la »*halto*«, eĉ se ĝi okazas »*apenaŭ*«, ne povas rilati al antaŭa, sed nur al ia posta okazaĵo. Eble ĝi estus pli klara jene: »*apenaŭ ĝi haltas* por ebligi al la pasaĝeroj la eliron.« Sed mi ne daŭrigas. Vere, in-

struaj verkoj devas esti laŭeble tute perfektaj, sed la dua eldono de tiu ĉi libreto pruvas ĝian bonan uzadon — espereble ne nur en Danujo — pro sia malkareco kaj pro sia bela ideo ĝi meritas vastan uzadon! P. B.

MONDFAMA KURACBANLOKO KARLSBAD. Ĉeĥoslovakujo.

14 paĝa bela, fotoilustrita fald-prospekto kun kolora titolpaĝo, kaj gvidanta nin tra la konata saniga banloko. Antaŭ jardekoj la venditaj albumetoj ne havis tiajn belajn, klarajn bildojn, kiel tiu ĉi senpaga kajereto, presita en bona Esperanto.

POR SKOLTOJ KAJ JUNULKURSOJ mi aparte varme rekomendas la legadon de la malmultekosta, ampleksa verko »*KORO*« de De Amicis. La libro pro siaj noblaj ideoj estas valora legaĵo por skoltaro.

TH. KILIAN: ESPERANTO. Ĉeĥa lernolibro, ekzercaro kaj vortaretoj esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-esperanta. 111 paĝoj, 10×19 cm. 49 paĝoj gramatiko, 22 paĝoj vortaretoj. Eldonejo: Knihtiskárna a nakladatelství Pokorný a spol. Brno. Prezo 6 ĉ. kr.

Bedaŭrinde mi ne komprenas la ĉeĥan lingvon, sed ke la lernolibro estas tre bona, pruvas, ke ĝi estas de kvar jaroj jam la tria eldono, 9—12-a milo! La Esperanta teksto vere estas lerte farita, por komencantoj taŭge kunmetita, montrante gradon de grado la vivon de familio, kiu finiĝas per kongresa vojaĝo kaj ties raporto. Dudek lecionoj, ĉiuj, kiel opaj tegoloj, firme konstruas la gramatikan scion de la lernanto. Nur du aferojn mi trovas ne rekomendindaj: en unu leciono estas kunigita la tuta tabelo de la simplaj vortoj (iu, kiu, ĉiu) kaj en alia samtempe instruata la kunmetitaj formoj de la verbo (anta, ata). Ĉar tiuj ĉi estas la plej malfacilaj partoj de la gramatiko — malgraŭ ilia logika sistemo — certe estas pli facile dividi ilian instruadon en du aŭ pliajn lecionojn kaj nur fine montri kune la tabelon kaj bildon por pli bona komprenado. Kial tute ĉe fino kaj ne tuj ĉe la gramatika parto estas la konata bildo pri la prepozicioj kun barelo.

Tiel en la ekzercaro, kiel en posta klariga teksto, estas prezentitaj, kiel la mondorganizo, nur IEL kaj TAGE, kvankam oni devus prezenti ankaŭ kelkajn aliajn. Kaj la lernanto miros, kiam post finstudo li aperas en la vivo kaj ekscias, ke ekzistas ankaŭ UEA.

Aparte valora estas la 34-paĝa legolibro-parto enhavanta 50 rakontojn kolektitajn el ĉiuj kontinentoj, verkitajn de diversaj aŭtoroj; tiuj donas pretan materialon por daŭriga kurso, pruvante tuj la praktikan valoron de Esperanto.

P. B.

KURESSAARE *san: gŝlima kaj mara kuraĉloko en Estono.* 8 paĝa ilustrita prospekto kun ko'ora kovrilpaĝo. Ĝi allogas al estona marbordo kaj sanigejo, kiu meritis pli grandan famon en la mondo.

GAJA EKZERCARO KAJ AMUZO de Carl Walter. Eld. Carl Walter, Berlin W. 35. Graf Speestr. 24. 40 paĝa ilustrita kajereto. Prezo du resp. kup.

La kajeroj de Walter — jen jam la tria — estas ĉiuj varme rekomendindaj por progresaj kursoj kaj grupvesperoj. Anekdotoj, spritaĵoj, enigmoj, ekzercaj tekstoj kaj societaj ludoj varias en ili. En la nuna estas precipe bonaj kelkaj trafaj amuzaj versoj pri gramatikaj, sufiksoj kaj prefiksoj. Mi rekomendas foje kune eldoni la tri kajerojn ĝis nun aper-

intajn, en unu malkara kajero. Jen unu el la versetoj:

»-ulo«: *vira* persono,
»-ulino«: *virin'*:
la edzo: *karulo*,
kaj ŝi: *karulin'*.

kaj iu diru, ke en Esperanto estas nur reguloj sen escepto. Uzu ĝin kaj amuziĝu bone!

P. B.

FOIRO DE PARIS Universala kaj Internacia. 15—31. Majo 1937. Eldonis Foiro de Paris, 23 Rue N. D. des Victoires, Paris (2e).

6 paĝa prospekto kun bonaj fotoj prezentante la Parizan foiron. Imitinda la surpriso sur la paĝoj: »Esperanto uzata«. La aldonita oficiala »Karto de Aĉetanto« kun la foirplano estas ankaŭ en Esperanto.

VEREMA RAPORTO PRI LA GERMAN—MOLSA MILITO. Maljunaj historietoj libere rerakontitaj de P. Th. Justesen. Eldonis P. Th. Justesen, Fannerup pr. Kolind, Danujo, 1936. Prezo: d. kr. —.60 aŭ 2 resp. kup. 24 paĝoj.

Ne timu, ne temas pri milito, sed pri strangaj, bonhumoraj aventuroj de simplanimaj danaj vilaĝanoj. Facila legajo por komencantoj, amuza kaj bonstila. Kelkajn nekorektaĵojn mi trovis, ekzemple: »oni videtas la ĉefurbon«. Kial ne nur »vidas«, aŭ »iom vidas«? »Monokula« anstataŭ »unuokula«! »Nintuj sciros, se vi estas ses aŭ sep«. Anstataŭ *se*, metu *ĉu*! Kelkaj preseraroj: p. 5. fronto (frunto), p. 7. ankaŭ (antaŭ), p. 10. eksakte (ekzakte), p. 17. meretita (meritita), p. 20. tiam (tiom). Se vi deziras, en kurso aŭ grupo, bonan amuzon, legu kune la kajeron! P. B.

Poŝtistoj! Telegrafistoj! Telefonistoj!

Internacia Esperanto-Kurso

por la geoficistaro de Poŝto, Telegrafo kaj Telefono en ARNHEM, 12-17 Julio 1937.

Post la grandsukcesaj internaciaj Esperanto-kursoj por P. T. T.-geoficistoj, okazintaj en la jaroj 1933, 1934 kaj 1936, la Internacia Cseh-Instituto de Esperanto en kunlaboro kun la Generala Direkcio de la Nederlanda P. T. T. kaj kun la Internacia Ligo de Esperantistaj P. T. T.-Oficistoj (ILEPTO), ankaŭ en ĉi tiu jaro organizas

internacian kurson de Esperanto por la geoficistaro de P. T. T., kiu okazos en la Esperanto-Domo en Arnhem (Nederlando), dum la tagoj 12-17 Julio 1937.

La kurso estos gvidata de *Andreo Cseh*, laŭ lia konata metodo (sen lernolibro, sen uzo de nacia lingvo, sen hejma laboro, en praktika kaj amuza maniero) kaj ĝi kapabligos al skriba kaj parola uzo de la lingvo Esperanto en simpla ĉiutaga interrilato.

Kurs-kotizo 6 — guld; por plua ano de la sama familio 4.— guld.

Aligante oni sendu la kurskotizon kaj mendu la hotelon, pagante la pension-prezon por almenaŭ du tagoj.

Adreso por aliĝoj kaj informpetoj: *Internacia Cseh-Instituto de Esperanto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.* (Poŝtkonto: Den Haag 162626).

En la nuna numero ni prezentas grafikajojn de Ervin Pál-Preiss. La desegnoj aperis kiel propagandmarkoj kaj estas havebla ĉe *Literatura Mondo*, Budapeŝt, IX. Soroksári ut 38. Prezo: —.25 USA-dolaroj po cent pecoj.

Felelős szerkesztő: Bleier Vilmos

16

Festvidéki Nyomda Vácon (F. ű, v.; Békák Gyula)

Felelős kiadó: Bleier Vilmos

Ni informas la AELA-anojn de la serio B. de 1935. ke la dua libro de la serio

Van Loon: Rigardu la Teron

estos dissendata en la fino de junio.

Ni informas la AELA-anojn de la serio 1936/37. ke la unua libro

La strato de Fiŝanta Kato

aperos ĝis la fino de julio.

La pluaj libroj aperos en rapida sinsekvo, unu post alia.

Pro la malsano de nia administranto la nuna numero aperas tiom malfrue. La tria numero aperos ĝis la fino de julio, la kvara numero ĝis la fino de aŭgusto kaj la aliaj du numeroj aperos do laŭ orde. La dua numero de *Lingvo-Libro* aperos ĝis la fino de aŭgusto, kun la kvara numero de *Literatura Mondo*.

Enciklopedio de Esperanto daŭriga volumo estas redaktata. La volumo aperos en la sekvonta jaro.



Sampoŝte ni ekspedas al ĉiu mendinto la **JUBILEAN LIBRON** de *J. Baghy—K. Kalocsay*.

LINGVO * LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapest, IX. Soroksári út 38. V. 6. Hungarujo. Aparte aĉetebla. Unu numero kostas 0.05 USA dol. aŭ egalvaloron. Tri numeroj kune ekspe-dataj kostas nur 0.10 USA dol. aŭ proksimuman egalvaloron.

Aperas kvaronjare • Nro 2 1937

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Miaj rememoroj pri Zamenhof*

Dank' al la verko de D-o Edm. Privat, »Vivo de Zamenhof« kaj al la skribaĵoj de diverslandaj samideanoj la esperantistaro jam konatiĝis kun la bela karaktero de nia Majstro.

Estis vera privilegio koni D-on Zamenhof, kaj tiuj feliĉuloj, kiuj havis la honoron lin renkonti ĉu private ĉu dum la internaciaj kongresoj neniam povos forgesi la modestan, afablan, helpeman Doktoron.

Jam je la fino de 1909 aŭ en la komenco de 1903 mi komencis korespondi kun la tiama D-o Zamenhof. Je mia granda surprizo kaj kun vera plezuro mi ricevis respondon por tiel diri returnkuriero. Imagu kiom fiera mi estis montrante la unuan poŝtkarton de la »Aŭtoro de Esperanto« al miaj amikoj esperantistaj (tri aŭ kvar varbitaj de mi) kaj aliaj. Ili ne povis kredi ke tia eminenta persono estis skribinta al sensignifa ulo kia mi? Tiu unua poŝtkarto por La Lingvo Internacia. Ĝi estis kaj ankoraŭ estas unu el miaj plej ŝatataj posedaĵoj esperantaj.

Pli granda estis la miro de la samaj amikoj, kiam kelkajn monatojn poste, D-o Zamenhof konsentis pruntedoni al nia nove fondita »Lovena« grupo la solan ekzempleron de lia fotografaĵo (en sia posedo) por eldoni la unuan poŝtkarton kun lia portreto eldonitan en Belgujo. (Tiu fido al nekonatuloj entuziasmigis la grupanojn).

Poste, de tempo al tempo, mi korespondis kun la Majstro (titolo, kiun li tre malŝatis pro modesteco) pri temoj diversaj kaj ĉiam respondo klariga aŭ kuragiĝa alvenis sen prokrasto. Pripensinte la aferon en postaj jaroj, mi ĝojis ke neniam mi perdigis al la kara Doktoro valoran tempon pro bagatelaĵoj, ĉar mi povis imagi kiom da laboro li havis respondante ĉiam tuj al ĉiu korespondanto.

Unu el la plej feliĉaj tagoj dum mia esperanta vivo estis tiu, kiam mi havis la honoron kaj plezuron konatiĝi persone kun D-o Zamenhof, en 1905. Survoje al la Unua Kongreso en Boulogne sur Mer Li haltis en Parizo, kie li estis gasto de la Pariza esperantista grupo kaj oficiale prezidis disdonadon de premioj al diplomitoj de la S. F. P. E. Mi estis inter la kelkaj

* Ni presigas ĉi tie artikoleton, malfrue venintan por la *Ora Libro*.

instruistoj gratulitaj de la Majstro pro sukceso de iu lernanto, kaj kompreneble estis fierega pri la honoro farita al mi. Sed kio eĉ pli fierigis min, estis la fakto, ke aŭdinte mian nomon li memoris pri nia korespondado kaj min gratulis pro miaj laboroj en Belgujo kaj Francujo sur la esperanta kampo. Samtempe mi estis mirigita pri la simpleco kaj modesteco de tiu geniulo, kiu ŝajnis trovi pli da plezuro en la kompanio de »ordinaraj« esperantistoj ol en tiu de la »eminentuloj«.

Mia dua renkontiĝo kaj pli intima kaj ofta kontakto kun D-o Z. okazis dum la »Tria« en Cambridge, kie mi deĵoris kiel honora helpsekretario de la Kongreso. Tie, mi povis sufiĉe atente studi la karakteron de tiu milda pacema homo, kiu malŝatis honorojn kaj aplaŭdojn sincere donitajn kaj certe bone meritajn. Fakto neforigebla el mia memoro okazis iun vesperon antaŭ la prezentado de komedio »Bardell kontraŭ Pickwick«. La teatro estis plenplena je esperantistoj ĉiulandaj kaj la aktoroj pretaj ludi. La eminentuloj kaj organizantoj, ĉiuj estis en sia loko. Nur unu persono forestis! Kaj pro tiu foresto ĉiuj estis konsternitaj. Ĉiuflanke oni aŭdis la demandon: »Kie estas Zamenhof? Kie estas Zamenhof?« Oni lin ŝerĉis vane!

Iel, mi deĵoris malantaŭ la scenejo kaj nur hazarde mi aŭdis la alvokon. Tuj mi kuris al amiko Bolinbroke-Mudie, unu el la »Trio por la Tria«, kaj sciigis al li ke la Doktoro estas kun ni en la kulisoj. La Majstro klarigis poste, ke vidinte la popolon sidantan en la teatro li ne kuragiĝis aliri sian sidlokon pro ia stranga timo. Efektive li timis la aplaŭdojn, aŭ pli bone la ovacion kiun li poste ricevis enirante la halon. Li estis esperinta alveni la teatron frue, kaj nevidate, tuj post la komuna vespermango ĉe la »Grenvendejo«, sed pro ia kaŭzo li malfruiĝis.

Dum preskaŭ ĉiuj kongresoj ĝis la milito en 1914 estis mia privilegio paroli kun D-o Ludoviko pri temoj plej diversaj: propagando, lingvaj demandoj kaj eĉ pri la »Rajtigataj Delegitoj«! Ĉiam li estis preta aŭskulti al argumentoj, kaj neniam deziris trudi sian propran vidpunkton.

D-o Zamenhof estis vere homa, kaj parolante kun iu ajn samideano private li interesigis pri lia aŭ

Pri la Plena Gramatiko

RESPONDO AL S-RO MARCELÉ (Daŭrigo)

4. Vi ripročas, ke laŭ ni *ĉagrena* estas samtempe *ĉagrenanta* kaj *ĉagrenita*. Nu, kion fari, se tre bonaj aŭtoroj, ankaŭ Zamenhof mem, tiel dusence uzas tiun vorton? Vi eldonas malpermesan edikton — ankaŭ tio estas solvo. Sed ĉu oni povas ekstermi formojn tiel kutimajn? Kaj ĉu estas eble, ke ĉiuj bonaj aŭtoroj eraris ĝis nun. Ni pravas, ke ne. Ni montras, ke *gramatike* tiuj formoj estas pravigeblaj. Sed ni atentigas ankaŭ pri tio, ke tiun gramatikan eblon oni devas ne trouzi, ĉar, sen la helpo de kunteksto, ĝi povas esti erariga. Jen, denove, la sama afero, kiel antaŭe. Ni *klarigas* konstatitan lingvuzon, vi kondamnas ĝin. Kaj tamen, vi akuzas nin pri neobeo al la vera Esperanto. Ni povas respondi nur, ke la vera Esperanto estas ne via logikaĵo, sed la *uzata* lingvo.

5. Vi diras, ke *ig* posedas sencan esence pasivan. Tio estas tute arbitra elpensado, ne konforma al la vivanta lingvo. Jen la Zamenhofaj formoj: *putriĝi, disfluiĝi, deglitiĝi, estiĝi, pendiĝi, dormiĝi, reviviĝi*, en kiuj *ig* havas pure aktivan sencan. Denove ni staras sur la bazo de la »vera« Esperanto, kaj vi faris por vi apartan lingvon.

6. Vi diras, ke la analizo de *senkora* estas *sene kora*. Nu, mi devas respondi, ke nenion solvas tia analizo, kiu ne havas sencan. Poste vi diras, ke *senkoro* estas *sena koro*. Sed kion signifas *sena*? Se *ĉirkaŭa* signifas: estanta ĉirkaŭ io, *sena* signifas: estanta sen io. Sekve: *sena koro* estas: koro estanta sen io: koro, al kiu mankas io. Kaj post ĉio ĉi, vi diras, ke *senkora* devenas de *senkoro*; do — *senkora homo* estus: homo havanta koron, al kiu koro mankas io. Jen kiaj strangaĵoj estiĝas, se oni volas analizi tro simple.

Nun ni rigardu la vorton laŭ nia sistemo.

Unue ni sintezu ĝin el ĝia senco, kiu estas: *karakterizata de la eco esti sen koro*.

Car tiu karakteriza *eco* estas la koncepto *sen koro*, oni povas fari apudmeton:

(sen koro)-eco

kaj al tiu ĉi komplekso oni alroĉas la a-finajon, kies senco estas: *karakterizata de*. Ni ricevas do:

(sen koro)-eco-a

post la ellaso de la apudaj finaĵoj ni ricevas

senkoreca

sed *ec* estas preskaŭ ĉiam ellasebla antaŭ -a. La preta formo do estas:

senkora.

Nun ni analizu la vorton *senkora*.

Sen povas rilati nur al substantivo, sekve ĝi memstarigas la a-finajon kaj en la kunmeto validiĝas la substantiveco de *kor*. Ni ricevas do:

(sen koro)-a

A, kiel adjektiva ĉefelemento, substantivigas la antaŭan komplekson kiel unu tuton, do kroĉas al ĝi la o-finajon:

(sen koro)-o-a.

Sed kion signifas tiu latentia o? Car *esti sen koro* estas *eco*, ĝia senco povas esti nur *eco*:

(senkoro)-eco-a.

Ni diru tion en vortoj: *karakterizata de la eco esti*

sen koro. Tiel ni venis al la senco, laŭ kiu *senkora* estas vere uzata.

Tiel do nia komplika analizo kondukis al la *efektiva* senco de la vorto, dum via simpla analizo kondukis al absurdaĵo. Kiu el ili valoras pli?

Estas interese, ke tion vi rekonas ĉe la vorto *ĉirkaŭurbo*. Vi diras, ke laŭ mi ĝi estas »ĉirkaŭa urbo« kaj ke »tio estas ĝusta laŭ la konstrua formo, sed ne tre ĝusta laŭ la senco«. Nu, tio estas miskompreno de via flanko: ni neniam analizis tiun vorton tiamaniere; tio ja estus kontraŭa al niaj kunmet-reguloj. Efektive, tiu analizo estas via propra, kaj, kiam vi mem konstatas, ke ĝi ne respondas al la senco, vi kondamnas vian propran analizmetodon, ĉar ĝusta analizo ja devas esti konforma al la vera senco. Finfine vi venas al la sama rezulto kiel ni: o (*ĉirkaŭ urbo*). Sed tio al vi ŝajne ne plaĉas, ĉar vi klopodas elturniĝi per iom da ruzo: vi diras, ke oni simple ne analizu! Jes, vi diras, ke »se oni diras: »Mi ĵus vidis mian najbaron«, ĉu la aŭdanto pripensas nepre, ke tiu ĉi frazo estas komprenebla nur post la analizo: »Mi ĵus vidis la homon, kiu loĝas apud mia domo.« Nu jes! Ankaŭ tio estas bona rimedo ne lasi sin konvinki, se antaŭ nerefutebla argumento oni ŝtopas al si la orelojn.

7. Vi diras, ke *centjaro* ne estas »grupo da cent jaroj«, kiel oni iam pensis, ĉar poste oni konstatis, ke tio estas erara. Kiu konstatis? En nia himno ni kantas: »Forte staras muroj de miljaroj« kaj *miljaro* estas tute analogia al *centjaro*. Denove mi demandas: kiu konstatis tion kun oficiala valideco, kontraŭ la uzado de tre bonaj esp-istoj? Kaj — kiu uzis iam la vorton *centjaro* en la senco, kiun vi proponas: »datreveno post cent jaroj«? Kaj kial ĝi estus *regula* en tiu ĉi senco? Kia analizo povus montri, ke ĉi tiu senco vere enestas en la vorto? Nek regulo, nek konvencio pravigas tian uzon; ĝi estas via propra elpensado.

8. Vi diras, ke »*senforta* estas *sene forta* = forta en maniero de iu, kiu posedas nenian forton kaj praktike: apenaŭ forta«. Mi estas tute perpleksa antaŭ tia klarigo: mi simple ne komprenas, ne povas sekvi ĝiajn logikajn transkapiĝojn. La vorto *sene* estas preskaŭ neniam uzebla, do estas iom malfacile fiksi ĝian sencan. Tamen, oni povas fari frazon, en kiu oni povas ĝin — iom nekutime — apliki: »li promesis veni kun sia amiko, sed li venis *sene*«. *Sene* do estas *estante sen io*, ĝi ĉiam subkomprenigas *ion*, same kiel se oni diras: *belaj floroj estis ĉirkaŭe*, oni subkomprenas *ion* aŭ *iun*, ĉirkaŭ kio aŭ kiu estis tiuj floroj. Oni povus diri: estas homoj fortaj kun kuraĝo kaj estas homoj fortaj *sene* (t. e. fortaj sen kuraĝo). Sed kiel oni povas esti forta *sen forto*? Neniell! Oni povas esti nur -a *sen forto*, tio estas: havanta la kvaliton, kiun esprimas la komplekso *sen forto*. Kaj ĝuste tion diras nia analizo: (sen forto)-a.

9. Vi severe kondamnas la Zamenhofajn vortojn *perlabori* kaj *perforti*, ĉar ili ne konformas al via sistemo. Nia sistemo tute bone klarigas ilin. (Kiu do estas pli »Zamenhofa« el ni? Mi demandas tion ne por min kovri per Zamenhof (ankaŭ li povis ja erari), sed pro tio, ke vi senĉese parolas pri »vera, Zamenhofa Esperanto« kaj

sia familio, vivo, ktp. Li estis ĉiam preta konsili, kuraĝigi kaj helpi. Li ĝojis aŭ malĝojis kun la samideanoj laŭ la ĉirkonstancoj, kaj pri tio mi povas atesti laŭ persona sperto.

Dum la teatra ludaĵo, okaze de la V-a Internacia Kongreso en Barcelono, D-o Zamenhof iel aŭdis, ke du kongresanoj, junulino angla kaj samideano belga, ĵus fianĉiĝis. Je la granda miro kaj certe neesprimebla plezuro de la feliĉaj gefianĉoj la Majstro venis al ili, dum paŭzo, por ilin gratuli en sia nomo kaj en tiu de

sia edzino. Tiuj gratuloj kaj la varma manpremo de la Majstro estas neforgeseblaj, kaj sendube malmultaj havis la feliĉon ricevi tiajn gratulojn el la buŝo de D-o Zamenhof mem.

Kiel mi diris jam, estis granda privilegio koni la Majstron; kaj tiuj, kiuj havis tiun privilegion, neniam povis forlasi la movadon. Restas en ilia koro speciala loko por la kara Doktoro, kiel ankaŭ por lia mirinda edzino kaj fakte por la tuta Zamenhofa familio.

Paul Blaise.

kontrastigas al ĝi nian sistemon. La fakto estas, ke nia sistemo centprocente sekvas la Zamenhofan lingvuzon, dum vi konstante deflankiĝas de ĝi. Vi faris »simplan sistemon«, sed tio estas via propra sistemo. Ni faris komplikan sistemon, ĉar ni sistemigis la efektivan vortkunmeton kaj ni devis serĉi sistemon, kiu al ĝi konformas.

Vi diras, ke ni diras malbonaj la vortojn *martelado*, *penikado*, *brosado*, kaj proponas anstataŭ ili la vortojn *martelbato*, *brostiro peniktuŝo*. Nu, tio estas eraro. Ni diras nur, ke *ado*, per la forto de analogio, enportas en tiujn ad-vortojn la senco de daŭro. Kaj tio estas vera. Se mi diras: *li purigis la jakon per sola broso*, oni komprenos, ke li plurfoje tiris tien kaj reen la broson, sed tiun brostiradon li faris nur unufoje. Kiel do oni esprimu tion, ke li nur unufoje trairis la broson sur la jakon, ĉar ĝi estis malpura nur en unu loko kaj por la purigo sufiĉis unu tiro. Evidente, la frazo tekstos jene: *li purigis la jakon per sola brostiro*. Same unu *martelado* signifas unu *batadon* per martelo, dum unu *martelbato* signifas unu *baton*.

10. Vi insistas pri tio, ke laŭ la »vera Esperanto« *bonaĵo* = *bona aĵo*; *beleco* = *bela eco*; eĉ vi asertas: »La apliko de liaj principoj (pruvo, ke ili ne taŭgas) kondukas Sron Kalocsay al neĝusta rezulto.« Sed poste vi diras: »Evidente la analiza formo ĉiam malsimilas al la sinteza«. Tio estas: *bonaĵo* malsimilas al *bona aĵo*. Nu la signo = signas egalecon, kiel do oni povas ĝin apliki inter formoj, kiuj »evidente malsimilas«? Vi diras, ke la neegaleco rezultas el la malsimileco de la formoj. Jes, vi estas prava. Sed nia analizo montras ankaŭ tion, *kial* tio okazas. Do ŝajnas, ke niajn perfektajn ekvaciojn oni tamen ne povas nomi »neĝusta rezulto«.

11. Nun ni rigardu tiujn ekvaciojn. Laŭ nia sistemo:

		belo
belo	=	beleco
		belajo
		belulo

Sed ĉar tiuj diversaj sencoj de unu sama vorto estigus konfuzon, oni uzas la resuman formon *belo* nur por signi la abstraktaĵon *belo*, dum la aliajn konceptojn oni esprimas ordinarare per la supre montritaj precizigaj sufiksoidoj.

La analizo de tiuj sufiksoidaj formoj okazas per simpla apudmeto; do *belajo* = *belo aĵo*; *beleco* = *belo eco*; *belulo* = *belo ulo*. Ni jam montris supre, ke tia apudmeta analizo ekzistas ankaŭ ĉe kunmetoj de radikoj: *membro-abonanto* = *membro abonanto*; *scienculo-pedagogo* = *scienculo pedagogo*.

Vi rekonas, ke tia analizmetodo estas »simpla kaj logika«. Tamen, vi diras ĝin bona nur ĉe *beleco*, dum ĉe *belajo* kaj *belulo*, laŭ vi, la afero jam fusiĝas, ĉar »belo« entenas nek en sia radikoj nek en sia finaĵoj ideon pri objekto aŭ pri individuo.

Nu, tie ĉi vi eraras. Via eraro devenas de tio, ke laŭ vi *belajo* estas *bela objekto* kaj *belulo* estas *bela individuo*. Kaj pri *belajo* mi jam supre pravis, ke tio ne estas ĝusta; eĉ vi mem ja rekonas, ke la analiza formo malsimilas al la sinteza.

Ni rigardu, kion signifas *belo*.

Bela estas adjektivo, signanta ies kvaliton. *Bel-o* estas substantivigo de *bela*, do ĝi signas, ke tiu kvalito ne apartenas al io, sed estas rigardata kiel memstara koncepto.

Belo, kiel memstara koncepto estas komprenebla dumaniere: abstrakte, kvazaŭ filozofie kaj konkrete kvazaŭ enkorpiĝinte. Kiam poeto verkas odon al la *Belo*, li pensas pri tiu abstrakta koncepto; kiam oni parolas pri la *belo* (beleco) de virino, oni diras per tio, ke tiu abstrakta kvalito karakterizas tiun virinon, estas ŝia propraĵo; kiam oni diras: ŝiaj *beloj* (belajoj) velkis — oni diras per tio, ke velkis tiuj trajtoj, en kiuj enkorpiĝis ŝia beleco; fine, kiam oni diras: ŝi estas la *belo* (belulino) de la societo — oni esprimas (tre emfaze), ke ŝi reprezentas en tiu societo la enkorpiĝintan belon.

Do *belajo* ne estas *bela aĵo* (aĵo kiu estas bela), sed

belo aĵo, t. e. aĵo, kiu estas la belo mem, en kiu manifestiĝas konkrete la belo.

Ankaŭ *belulo* ne estas simple *bela homo*, sed individuo, en kiu konkrete manifestiĝas la belo. Efektive, se oni aŭdas: »bela homo«, oni pensas pri homo, kiu okaze estas bela; sed aŭdante »belulo«, oni pensas unuavice pri belo, beleco kaj nur duaavice pri tio, ke tiu belo estas manifestiĝinta en individuo.

Jen do, nia analizo perfekte klarigas tion, kion vi mem konstatis iom mirante: ke la analiza formo ĉiam malsimilas al la sinteza. Aŭ, pli ĝuste, malsimilas nur via malĝuste analizita formo, sed nia ĝuste analizita estas plene kaj perfekta identa.

12. Vi diras, ke *tajlorino* estas *ino de tajloro*. Sed kio estas *ino de tajloro*? Nu, nenio alia ol *konkubalino de tajloro* (malsate esprimita).

Tajlorino povas esti nur *tajloro ino*, t. e. *tajloro* kaj samtempe *ino*.

Vi pledas por la formoj *bonino*, *belino* ktp. nek Zamenhofaj, nek uzataj. Nia sistemo klarigas ilin jene:

bonino estas *bono ino*, t. e. *bono* kaj samtempe *ino*.

Sekve tiaj formoj ja ne estas absolute malĝustaj, sed ili estas same nekutimaj, kiel *bono* en la senco de *bonulo*. Jen denove, nia analizmetodo konformas al la ĝenerala lingvuzo, ĉar ĝi konstatakas la nesufiĉecon de tiuj formoj. Male, via sistemo legitimas ilin, do vi venas al rezulto, kiu estas kontraŭa al via idealo: al la »vera, Zamenhofa Esperanto«.

13. Ni interpretis la senco de *-eblo* per *taŭga por -ado*. Tion vi kondamnas, kaj vi eĉ suspektadas, ke ni intence konfuzas *-eblo* kun *taŭga*, por malfortigi la senco de *-inda* kaj pravigi *-eblo*.

Nu, ni uzis *taŭga* ne el tia ruza motivo: ni volis simple interpreti »eblo« per similsenca adjektivo. Kaj *taŭga* ŝajnas taŭgi. Legebla manuskripto ja estas manuskripto taŭga por tio, ke oni ĝin legu.

Vi diras, ke oni ne povas diri »trairebla vojo«, ĉar *trairi* estas netransitiva kaj la akuzativo post ĝi (*trairi vojon*) estas nur »tolerata«. Sed kial ne estu same tolerata la pasiva participo (la vojo estas traŭrita; la celo estas alvenita) kaj fine, kial ne estu same tolerata ankaŭ *eblo*. Vi denove faras arbitran edikton, nekonforman al la Zamenhofa lingvuzo.

14. Mi ne volas longe paroli pri viaj rimarkoj rilate niajn proponojn, ĉar tiuj proponoj tute ne tuŝas la esenco de nia sistemo: ĝi estas tute kompleta ankaŭ sen ili. Ni proponis ilin nur akceli pli grandan klarecon aŭ pli grandan oportunecon, sed ni tute ne diras, ke ili estas nemalhaveblaj por la lingvo. Do mi faras nur unu rimarkon. Tio, ke ian koncepton oni povas *iel* esprimi, tute ne signifas, ke propono por pli oportuna esprimmaniero estas senutila. Se tiel estus, oni povus tute trankvile elimini multajn sufiksoidojn kaj diri: *grupmembro* (*grupano*), *legmerita* (*leginda*), *aminklina* (*amema*), *ŝipguidanto* (*ŝipestro*). Sed tian eliminon certe neniu volus fari: oni ja ĝojas pri la oportunecon, kiun la sufiksoidoj prezentas. Nu, sama oportunaĵo estus, se oni povus diri *japaneska* anstataŭ *japanimita* aŭ *japanmaniera*.

15. Vi diras ke *igi* = *igi -i* post ĉiu substantivo kapabla naski verbon. Sed *ŝtono* naskas *ŝtoni* kaj tamen *ŝtonigi* ne signifas *igi ŝtoni*, sed *igi ŝtono*.

Ke *marteligi* tamen signifas *igi marteli*, tion oni povas klarigi alie, per la senca logiko. Nome, en verba kunmeto la radikoj *martel* povas signifi nur la instrumenton, per kiu oni faras la respektivan agon. Do ĝia senco estas *per martelo*, aŭ pli simple: *martele*. La analizo do estas:

martele-igi.

Sed *igi* ne povas rilati al *martele*, ĉar ĝi postulas antaŭan adjektivon, kaj, postulante ĝin, ĝi ankaŭ kreas ĝin, alkrucante la latentan a-finajon:

martele-a-igi.

Martele, siavice, estas adverbo, kaj, laŭ nia sistemo, ĝi do povas esti nur flankelemento de verbo. Ĝi do kreas tiun verbon, enmetante la latentan i-finajon:

martele-i-a-igi.

Provoj de juda gramatiko

D-ro X.

I.

En la lasta numero de »Lingvo Libro« estis presita artikolo Zamenhofa »Pri juda gramatiko kaj reformo en la juda lingvo«. Kiel la leganto memoras, en mia antaŭrimarko al la traduko mi menciis ankoraŭ du similajn artikolojn de nia Majstro aperintajn en la pluaj n-roj de »Lebn un Visnshaft« (»Vivo kaj Scienco«), nome en la n-roj 7 kaj 9.

Bedaŭrinde mi povis trovi en mia hejmurba biblioteko nur la n-ron 1. de tiu ĉi revuo, el kie mi ĝuste elprenis la tradukitan Zamenhofan artikolon aperintan jam kiel dirite en »Lingvo Libro«.

Profitante la okazon de la 29-a jubilea kongreso, mi komencis serĉi en Varsovio la pluajn n-rojn kaj fine trovis ilin en la biblioteko Br. Groser.

En n-ro 7. troviĝas samtema artikolo s. t. »Provoj de juda gramatiko« kaj en n-ro 9. letero s. t. »La provoj de la juda gramatiko«, ambaŭ sub pseŭdonimo X.

Prezentante ambaŭ artikolojn al la esperanta legataro, mi volas ĉi tie esprimi mian plej koran flankon al la administrantaro de la biblioteko Br. Groser en Varsovio, kiu ebligis al mi la trovon kaj tradukon de la supre menciitaj Zamenhofaj verkoj.

Varsovio, en la tagoj de la 29-a jubilea kongreso (aŭgusto 1937).
S. Gulerman

La juda lingvo estas dividita en du ĉefdialektojn:

1. la tiel nomata litva
2. kaj la tiel nomata pola.

Inter tiuj du ĉefdialektoj troviĝas ankoraŭ kelkaj de dua kvalito, kiuj estas miksaĵoj de ambaŭ ĉefdialektoj. Tiuj ĉi diversaj dialektoj estas tamen similaj*), ili diferencas nur laŭ la maniero de prononco de kelkaj sonlitteroj kaj dusionlitteroj; tial sufiĉas elekti unu dialekton, skribi la sonlitterojn tiel, kiel ili estas eldiritaj en ĝi, kaj indiki, kiel ili estas eldiritaj en la alia dialekto.

Mi elektis la litvan dialekton, ĉar ĝi estas pli pura kaj pli regula. Mi opinias superflua nun pli longe halti ĉe la diversaj dialektoj, ĉar tio ne havas gravan signifon por la lingvo. La rusa lingvo ne ŝanĝiĝas, ĉu oni legas *hospod* aŭ *haspod*, *ĉasi* aŭ *ĉesi*; ne ŝanĝiĝas la germana lingvo pro tio, ĉu oni parolas *majn* aŭ *mein*, *hojte*, *hajte* aŭ *heute*.

*) Tiaj vortoj, kiel ekzemple la poljudaj *jah*, *ec*, *enk* (provincismoj en la pola dialekto de la juda lingvo signifantaj *mi*, *vi*, *vin*. La unua *jah* estas karakteriza por la varsovia parolmaniero. La trad.) estas nur provincismoj (vortoj uzataj en difinita loko) kaj ne devas eniri la komunan literaturan lingvon.

En tiu ĉi komplekso *i-a* estas verboadjektivo antaŭigebla per *ada*: la senco de la vorto do estas:

martele-ada-igi = *marteladigi*.

Pli simple: *martel*, kiel instrumento, subkomprenigas post si la agon, kiun oni faras per ĝi.

Nia sistemo, ekstreme fleksebla, laboranta per latentaj finaĵoj, senclogiko ktp. do tute bone legitimas tiun vorton. Male, via sistemo devas fiaski antaŭ la vorto *ŝtonigi*, kiel mi supre montris.

16. Vi diras, ke laŭ ni *ifi* = *produktanta*. Tiun sencion *ifi* havas en Ido. Laŭ nia propono *ifi* estus *igi -o*, *ŝanĝi en -on*, sekve *ifiĝi* estus *igi -o*, *ŝanĝiĝi en -on*.

Ni parolu iom pri ĝia neceseco. Antaŭ ĉio, ni ripetas tie ĉi, ke *ifi* estas proponata kiel pure teknika sufikso, kiun do oni ne bezonas en la komuna lingvo.

Igi signifas: fari, ke io estu io aŭ ia. Do:

Sidigi ion: fari, ke io estu sida.

Varmigi ion: fari, ke io estu varma.

Ŝtonigi ion: fari, ke io estu ŝtono.

Ĝis nun, la afero estas en ordo, ĉar la flankelementoj de *-igi* en la supraj ekzemploj funkcias laŭ sia gramatika radik-karaktero. La malfacilaĵoj komenciĝas nur tiam, kiam oni devas pluformi per *igi* finaje pluformitajn vortojn:

Ekzemple: *igi loki* kaj *igi loka* estas esprimeblaj nur per la komuna formo *lokigi*; same: *igi ŝtoni* kaj *igi ŝtono* nur per la komuna formo *ŝtonigi*; same: *igi acida* kaj *igi acido* nur per la komuna formo *acidigi*.

RIM. Oni *igas acida* salon, se oni almetas acidon; kaj oni *igas ĝin acido*, se oni ŝanĝas ĝian metal-radikon per hidrogeno.

Teorie same dusenca estas ankaŭ la vorto *ŝtatigi*, ĉar ĝi estas komuna formo por *igi ŝtata* (ŝtatigi lernejon) kaj por *igi ŝtato* (ŝtatigi nomadan popolon). Tamen, tiu ĉi dusenceco neniam ĝenas, kaj ankaŭ teorie ni pravigas ĝin per nia regulo, laŭ kiu *igi* estas ĉiam *igi -a*, do la dua frazo tekstas: *igi nomadan popolon ŝtata*, kaj *-a* ĉi tie havas la sencion: »kiu estas -o«.

Supre mi montris, ke laŭ la senclogiko estiganta latentajn finaĵojn, ankaŭ *marteligi* povas esti uzata en la senco *igi marteli*.

En la komuna lingvo eĉ la dusignifeco de *ŝtonigi*

estas ĉiam forigata de la kunteksto (ŝtonigi vojon per laboristo; la kalka akvo ŝtonigis la floron).

Sed por la teknika lingvo, kie pli granda precizo estas necesa, ni faris la jenan proponon:

1. post adjektiva kaj verba radiko la senco de *igi* estas ĉiam *igi -a*; sekve *acidigi* signifas nur *igi acida*. La senco *igi -o* estas esprimata per *ifi*; do *igi acido* estas *acidifi*.

2. post substantiva radiko, kiu signas instrumenton aŭ materialon, aŭ kiu estas senpere pluformebla per *-i* ĉiam validiĝas la adverba senco de la flankelemento, do tiu flankelemento ĉiam kreas post si agan elementon. Sekve: *ŝtonigi* estas nur *igi ŝtoni*, *lokigi* estas nur *igi loki*. La aliajn signifojn oni devus esprimi per *ifi* (*ŝtonifi*), kiam temas pri *igi -o* kaj per *-aligi* (lokaligi), kiam temas pri *igi -a*.

Efektive, tiuj okazoj estas tre maloftaj. *Ifi* kaj *aligi* do servus plie por fari kelkajn terminojn unufoje por ĉiam, ol por esti aplikitaj ĉiupaŝe dum parolo.

Per la supraj pritraktoj, mi kredas, sufiĉe klare mi ilustris nian principon: kompletigi teorie la Esp-an vort-sistemon ĝis la pleja perfekteco, sed ne trudi tiun perfektecon por la komuna lingvo, kie ni lasas grandan liberon uzi la klarigan povon de la kunteksto.

17. Vi diras, ke *sciigi* estas malbona en la senco *eksci*, ĝi signifas nur *igi sciata*. Tamen, oni ne uzas »la afero sciigis«, sed oni trovas ĉiutage la esprimon: »mi sciigis pri la afero«. Vi do teorias.

Vi legitimas la vortojn *starigi*, *sidiĝi*, *kusiĝi*, per tio, ke ili estas *igi stara*, *sida*, *kusa*. Sed tute same: *boliĝi*, *putriĝi*, *disfluiĝi*, *dormiĝi* (Zamenhofaj) — estas *igi bola*, *putra*, *disflua*, *dorma*. Mi tute ne vidas kaŭzon por via severa distingo.

Vi argumentas kontraŭ *vidati* per tio, ke »oni ne scius, ĉu ĝi signifas *esti vidata*, *esti vidato*, aŭ *esti vidate*«. Nu, mi ne volas nun pledi por *vidati*, sed mi tute ne povas imagi okazon, en kiu tiu trisenceco (eĉ se ĝi ekzistas) estigus konfuzon. *Homo vidatis*. *Domo vidatis*. *Vidatis*, *ke li estas malriĉulo*. Kie estas ebla la miskompreno de tiuj tri frazoj? Ne estas bone, se oni volas ĉiel ajn serĉi argumenton por antaŭe farita opinio. Kiu tro pravas, ofte nenion pravas.

(Daŭrigota)

K. Kalocsay

Pretekste de Revuo de Revuoj

Vi scivolos eble, kial estas tiel mal-longa mia nuna raporto, kial mankas la mencio de multaj gazetituloj. Nu, adresu al mi riproĉojn kaj insultojn nur koncerne la enhavon de la artikolo; tiujn, kiuj koncernas ĝian malenhavon (aplaŭdu, ĝisostaj mal-istoj) bonvolu adresi al Bleier... Ĉar jene estis la afero:

Hodiaŭ antaŭtagmeze kiel kutime mi ŝvitadis en la oficejo, la varmeĝo jam de kelkaj tagoj estis tute neeltenebla. Sed fine ja ĉio havas finon, ankaŭ la oficialaj horoj kaj kun plifaciliganta koro mi trenis min hejmen en la espero, ke post la tagmanĝo mi tramos al proksima naĝejo por savi min de apopleksio. Mia maljuna kuiristino (ti-pa meblospoco trovebla ĉe oldaj fraŭloj... ŝi eĉ ne scias, kian eminentan rolon ŝi ludos foje en la Esperanta

La Internacia Centra Kavoj*

— Jes, kara, — sentence konkludis Casendish — jam definitive forpasis la ora tempo, kiam oni povis blinde fidi ĉiun esperantiston. Kaj tio simple pruvas, ke la movado fine eniris la maturagon — li almetis redonante al mi la lastan romanon de Emba, kiun mi antaŭ nelonge pruntis al li. — Via senbrida propagando nepre varbas ankaŭ misinklinaĵojn homojn, kaj mi neniam kredis, ke lingvo eĉ la plej bona povas kuraci friponon. Male, se vi enkondukos lupon en la ŝafaron, vi nur incitos lian apetiton. Kaj cetere, kredo al mi, jam antaŭ la jaro 2000, la samideanoj tiom abundos en la infero, ke necesos aparta kavoj por ili!

Kaj li foriris lasante min tre revema, kiel oni diras ĉe ni en Francujo.

— Nu, eble Casendish pravas, mi pensis poste. Kaj mi imagis tutan kongresan svarmadon, kiu, laŭ dekreto de la Subteraj Potencoj, abrupte enfalas ĝis la fundo de la *Città Dolente*. Enpense mi sekvis la damnitajn pekulojn, kiujn pokaravane, englutatas niĝraj rok-fendegoj.

Ne en arbaro obskura mi paŝis, sed sur dekliva herbejo, kie loge buntis la floroj de l' malbono. Kaj ne aperis al mi la glora Virgilo

* Tiu ĉi rakonto povas servi ankaŭ kiel literatura enigmo. Bonvolu diveni la verajn nomojn de la rolantoj!

Tial mi proponas regulon: skribi ĉiam tiel, kiel elparolas la litvaj judoj; tie tamen, kie ĉe la litvaj judoj estas malfacile diferencii inter *aj* kaj *oj*, oni devas atentigi la polan dialekton. Ekzemple la litvaj judoj elparolas preskaŭ egale la vortojn pano kaj larĝe.²⁾ Sed ĉar la polaj judoj elparolas *brojt* kaj *brajt* tial oni devas skribi *brojt* kaj *brajt*.

II.

Oni devas skribi la vortojn, kiel ili estas eldiritaj kaj ĉu teni sin ĉe la germana ortografio. Tiel ekz. oni ne ĝuste skribas *aŭf* anstataŭ *af*, *uns* anstataŭ *undz* k. t. p.

Ne korekte oni skribas en tiaj vortoj kiel *hant*, *vant* k. a. la literon *d* ĉe la fino, ĉar oni opinias, ke la *t*, kiu aŭdiĝas ĉi tie, estas efektive »*d*«, kiun oni ne klare elparolas. Kie la juda vorto efektive finiĝas per »*d*«, tie la judoj tiun ĉi literon klare elparolas. Multaj vortoj, kiuj en germana lingvo havas la literon *d*, havas en juda lingvo *-t* kaj inverse; ekz-e:

1. germane: hund, vind; jude: hunt, vint.

(Pli klare tio aŭdiĝas ĉe hintlah, a vintl.)

2. germane: bart, ŝvert; jude: bord, ŝverd, ŝverdlah.

Same mi ne vidas kaŭzon, kial estus necese skribi en multaj vortoj duoblajn literojn, la literon »*h*« kaj ankoraŭ similajn, ĉar ili estas tiel skribitaj en la germana lingvo. Duoblan literon, la literon »*h*«, kaj similajn oni devas skribi nur en tiuj vortoj, kie ili aŭdiĝas akre. Sekve, estas erare skribi *gott* anstataŭ *got*, *vissen* anstataŭ *visen*, *nehen* anstataŭ *najen*, *stodt* anstataŭ *ŝtot*, *lajhen* anstataŭ *lajen* kaj ankoraŭ aliaj.⁴⁾ Tamen en kelkaj vortoj mi opinias necesa tian ortografion por ilin apartigi de aliaj vortoj. Tiuj vortoj estas jenaj: aŝ (cindro. *La trad.*), aj (ĝis); baŝehren (tondi la harojn), beŝeren (destini); beten (sterni liton), betn (peti) ktp.⁵⁾

Nur rilate la literon »*h*« komence de la vorto, mi

²⁾ Prononcata de ili egale brejt.

La tradukinto.

⁴⁾ La ekzemploj signifas laŭvice: Dio, scii, kudri, urbo, prunti.

La tradukinto.

⁵⁾ Sekvas ankoraŭ multaj ekzemploj en la originalo.

La tradukinto.

proponas atenti la germanan ortografion, ĉar en kelkaj regionoj oni ne elparolas la *h*, dum en aliaj tro multe.

III.

En la juda lingvo oni renkontas faktojn de asimilo de apudsonaj literoj. La asimilo konsistas en tio, ke se troviĝas du vortoj (aŭ vorto kaj antaŭsilabo), el kiuj la unua finiĝas kaj la dua komenciĝas per apudsona litero — tiam la apudsona litero parte aŭ tute aŭ almenaŭ laŭ la kvalito de ĝia malmoleco simile eldirigas kiel la apudsona litero de la pli grava vorto. Ekz. *s'tut zah* oni legas *stutsah*. Oni devas tiajn vortojn skribi sen ŝanĝoj kaj la asimilon uzi nur en parolo.

Asimilon oni renkontas en tiaj okazoj:

1. Kiam la verbo finiĝas per »*t*« kaj post ĝi sekvas la pronomoj *du*, *zi*, *zah* (vi, ŝi, sin. *La trad.*) aŭ kelkaj aliaj vortoj ne havantaj logikan akcenton, ekz.: *vosvilst du?* (kion vi volas? *La trad.*) oni elparolas *vilstu* aŭ eĉ *vilste*, ĉar la judoj elparolas ĉiun sonliteron ĉe la fino (kiu ne havas akcenton) preskaŭ ĉiam »*e*«; *vu vohjnt zi?* (kie ŝi loĝas? *La trad.*) legu *vohjntsi*; *er ŝemt zah* (li hontas. *La trad.*) legu *er ŝemtsah*; *er hot do gevolt blajbu* (li volis ĉi tie resti. *La trad.*) legu *er hoto gevolt blajbu*; *es past doh nit* (ne konvenas. *La trad.*) legu *spastoh nit*; *vos maht dos op?* (Kiom gravas? *La trad.*) legu *vos mahtos op?* Nur: *er hot do gevolt blajbu* (tie ĉi kaj ne tie) oni legas kiel ĝi estas skribita.

2. Kiam sinsekvas la vortoj *niŝt* aŭ *nit* kun la vorto »*do*« (tie ĉi. *La trad.*) kaj ĝi estas sen akcento ekz. *es iz do un es iz fort nit do* (estas kaj tamen ne estas. *La trad.*) legu *sido un si fort niŝto*.

3. Ĉe kelkaj verbaj antaŭsilaboj kaj afiksoj asimiliĝas la apudsona litero kun la unua apudsona litero de la verbo, kvankam paralele kun la asimila formo oni uzas ankaŭ la sensanĝajn formojn. Ekz. *opgeŝniten*, legu *oggeŝniten*; *opkohen* legu *okkohen*; *aropvarfen* legu *arovarfen*.⁶⁾

El la juda: S. Guterman.

⁶⁾ La ekzemplaj vortoj signifas: detranĉita, kuirita, dejeti.

La tradukinto.

profetanta la Vertragon, sed mia bona patrono Ridmondo Nigra kun la testamento de la Verda Kato. Ĉar vojon mi ne vidis, laŭ kiu direkti la paŝojn, mi turnis min scivole al mia protektanto. Sed antaŭ ol li povis penson esprimi, nin surprizis konata voĉo el nefora distanco:

— Aĉetu la Gvidlibron tra la Infero, laŭ Dante, en majstra traduko de Koloman la Kolosa. Nemalehavebla verko! Profitu la favorprezon! Unika okazo!

En la sama momento ni rimarkis junan viron, kiu facilpaŝe dancas sur ŝnuro streĉita inter du arboj. Sub li fluis rivero timige profunda, en kiun li jetis reklamilojn kun la surskribo: *Literaturo Mondona*.

— Mil ventrikloj! — blekis mia gvidanto — ĉie vi flaras negocon! Diru, kion vi fiŝas tie ĉi?

— Puno mia: neniam stari sur firma grundo — ĝoje rebatis la akrobato. — Sed ĝuste por vi mi havas aferon. Temas pri tio, ke tute novan planon mi elpensis. Ion grandiozan. Sed komencu mi bezonus...!

— Espereble ne monon, ĉar tion ni ne havas. Ja senpaga la eniro tien. Cetere bonvolu ne tiel klopodi, ĉar leĝo trudas ĉiun enpezon lasi ĉe l' enpaŝo!«

Por respondo, la viglulo simple eltiris el sia poŝo kelkajn paraĝrafojn de internacia leĝaro kaj tre lerte jonglis per ili.

— Ĉu vi ne kuniros? ni demandis.

— Nun ne, ĉar tie iom ŝtormas mia edzino nekontentiginta pri mia konduto.

Kaj efektive tempesto ŝajnis alproksimiĝi.

— Vi prefere enkuru rifuĝejon, konsilis Ridmondo, montrante unu el la tri niĉoj, kie en la antikva tempo trioble gardostaris la Kerbero trikapa.

Sed la akrobato rifuze skuis la kapon kaj ekpakis siajn librojn.

— Jam delonge okupitaj! li acide enjetis.

Akra scivolo min spronis al la niĉoj. En la unua, sur ŝtoko nuda, sidis en la pozo de beatiginta fakiro, viro ne malpli nuda, apud kiu kuŝis kruĉo, barelo kaj lampo rompita. En sia kompleta forrifuzo de ĉia civilizo, tiu nova Diogeno rigardis ne nur sian kruĉon malutila, sed ankaŭ sian barelon kaj lampon. Per tiu lasta li longe serĉis veran homon, sed trovinte nur degenerintajn simiojn, li fine rezignis pri ĉia socia vivo. Li estis Petro la Solulo.

La duan niĉon okupis viro varmsanga. Sian barelon kaj sian kruĉon li jam tute malplenigis, kaj sian lampon estingis. Ankaŭ li sidis en beata pozo, sed apud li kuŝis belega virino. Dolĉe kaj pasie li flustris al ŝi: — Ho, Malina, kial eterne surdi al mia deziro kaj tamen premi mian sangon kiel Vin-ŝtono? Ho, mia bela Tanagra, ĉu vane mi faris al vi lokon en mia niĉo? — Li estis Georgo la Maŭro.

Super la tria niĉo pendis metala ŝildo, sur kiu brile paradis: 1) la vorto *Inform-oficejo*, 2) brita blazono, 3) la jena orlitera devizo: *En la komenco Dio kreis la komforton*. De ekstere ĉio aspektis tiel diskrete alloga, ke mi nevole enŝovis la nazon en la ĝicet-similan fendon: Sur la nove farbita barelo staris la brila lampo, kaj sur la plialtigita kruĉo sidis eta, brunhara viro, kiu vigle movis la malicetajn okulojn kun tre serena esprimo. Li ŝajnis farti tre hejmece kaj lasis la impreson, ke ĉie li IEL sukcesus bone instaligi.

— Kio je via servo? li afable demandis. — Mi organizas vizitkaravanojn, aranĝas plurtagajn restadojn, gvidas ekskursojn, redaktas jarlibrojn, konsilas eksigojn, entreprenas propagand-vojaĝojn, kaj pacigas la plej senesperajn disputojn. Ĉu eble vi deziras reklamon en la venonta Infera Almanako? Li proponis transdonante la ĉiaran ekzempleron.

— Ni vidos ĉe la reveno. Eble ni bezonos viajn servojn!

— Tudeluzki! Nomu min Tiny la Etulo!

Sed laŭpaŝinte la subteran riveron ni jam venis al la Urbo de l' Turmento, en kiun min grunte enlasis Karlo la Minotaŭro. Rerakonti ĉion, kion Dante vidis signifus perdi valoran tempon. Sufiĉas diri, ke la tutan doloran vojon ni digne traŝvitis, ĝis ni trafis antaŭ abisma puto, sur kies fundo flagris la tri literoj I. C. K.

Mian scivolon, sed bedaŭrinde ne mian soifon, tuj kontentigis Ridmondo: »Internacia Centra Kavoj« li triumfe suspiris. — Ĉion fosis Teofilo per peco de rompita regulo. Giganta laboro, kiun perfide subfosis la Centra Potenco! Fu! kiel varmege kaj eĉ ne troviĝus vino en tiu ĉi kuvo!

literaturhistorio, kiel mangigistino de tiel eminentega kritikisto...), do ŝi anoncis al mi, kiam mi transpaŝis la sojlon, ke alvenis pakajo, de Literatura Mondo. Nu, tio estis nenio eksterordinara, ja ofte venas libroj, presprovajoj. Nur monaj mandatoj daŭre malkutimas veni...

— Ĉu ĝi estas sur la skribotablo? — mi demandis senzorge.

— Ne. Jes. — ŝi respondis iom konfuze. — Ĝi... ili estas en la ĉambro.

Nu, mi ne multe zorgis pri ŝia balbutado, sed iris rekte al la ĉambro. La pordo ne volis malfermiĝi, io malhelpis. Per la tuta pezo de mia robusta korpo mi ŝovis la pordon internen, fine ĝi cedis iom kaj tra la breĉo mi rigardis en la ĉambron. Preskaŭ mi svenis... La tuta ĉambro estis plenkla plena de gazetoj! Skribotablo, divano, la suproj de la ŝrankoj, eĉ la supro de la forno... kaj kompreneble la planko ne montris eĉ kvadracentimetran malplenan lokon, ĝis homalteco ĝi plenkla plenis!

— Kion ĉio ĉi signifas! — mi stertoris al mia terurita nutr-angelo. Kaj balbute ŝi rakontis, ke aperis antaŭ la domo la ŝarĝaŭto de Literatura Mondo kun ok fortaj junuloj, ili anoncis, ke s-ro Bleier sendis ilin kun pakajo. Kaj ili komencis la transportadon... Kiam ili estis pretaj, ili transdonis ankoraŭ nomkarton de Bleier kun kelkaj surskribitaj vortoj.

Senvorte mi transprenis la karton, sur kiu jenis ĉi vortoj:

Kara Lali Blond, jen la materialo por la Revuo de Revuoj. Mi konfesas, iom malfrue mi ĝin sendis, sed oni ne povas helpi. Mi scias, ke vi tamen enpoŝtigos la pretan artikolon plej malfrue morgaŭ matene, kiu templimo efektive estas neniel prokrastebla. Saluton, Bleier.

Nu, tio estis surprizo! Eĉ al miaj harditaj L. M.-nervoj... malgraŭ ke ni estas sufiĉe kutimigintaj al diversaj surprizoj. Por ekzemplo mi malkaŝas al vi nur unu el niaj redakciaj sekretoj; tamen, mi tre petas vin, ne parolu pri tio al Bleier, aŭ al la koncernuloj. Konsentite? Do, temas pri la pola numero. La poloj sendis severan uzadon, ke la polan numeron ni liveru plej malfrue ĝis la 25-a de julio. Nu, materialon ili apenaŭ sendis ankoraŭ, ni ĝuste havis pri tio, ke ni devas aerpoŝte urĝi la tujan alsendon de ĉia ajn materialo; ĉar apenaŭ la kvarono de la necesa materialo alvenis ĝis tiam. Kaj tiam, la 20-an de julio alvenas letero, en kiu oni iom naive demandas, kiu estas la plej lasta dato de materialalsendo, por ke la preta numero alvenu je la 25-a en Varsovio. Do jen, ankaŭ tio estis surprizo!

Ce tia fluo de niaj aferoj, vi ne miros, ke post momenta konsterniĝeto mi tute trankvile manĝis mian tagmanĝon, poste mi malvestis min kaj en nura naĝ-pantalono mi rompis vojon al la skribmaŝino, sidigis kaj decidis ŝviti super la gazetoj kaj la maŝino ĝis noktmezo. Kompreneble, mi povis fari nenian sistemigon, mi simple prenis en la manon, kio venis en ĝin, legis hazarde tion, kio frapis miajn okulojn kaj, mortlaca, mi finis fine la taskon. Jen, kion mi hazarde trovis:

Bulgara Esperantisto rezervas signifan lokon al literaturaĵoj, eĉ, en la januara-februara numero oni povas legi, ke la landa movado en la lasta tempo ekfortiĝis, kaj inter la simptomoj de tiu plifortiĝo la gazeto ĝoje raportas, ke ĝi povas prezenti novajn poetojn! Jen, en Bulgario oni ne samopiniis kun *Nia Gazeto*, kiu (kiel mi jam raportis en mia lasta Revuo) rigardas la ekfloron de la poezio la plej grava danĝero por la movado... En ĉi tiu numero aperis humora poemo, signita per la litero »H«, el ĝi mi citu:

»Sed pleje plendas,
alarme lamentas

la esperantistaj societoj — la grupoj,
ĉefe la kasistoj, la monavidaj lupoj,
ili la in-di-fe-rent-ulojn pacajn
la mal-la-bor-em-ul-ojn lacajn
ĉiam per altrudo turmentas,
ilian nepagemon malatentas.
Bedaŭrinduloj! Vane ili admonas
ĉar ili ne konas

la esperantistan devizon:
neniam pagi kotizon.«

En la junia numero de *Nederlanda Esperantisto* aperis poemo, subskribita de G. Beneker kaj titolita: La plej bona amiko. En ĝi troviĝas tiaĵoj: »Tirano ŝajnas li, Sed donas pac' al mi«, aŭ: »donas ripoz' al mi«. Ke la aŭtoro ne scias gramatikon, estas kompreneble; se li tamen deziras versi, eĉ tion oni povas kompreni; sed ke la tuta redakcio de *Nederlanda Esperantisto* ne scias la gramatikon, tio ŝajnas al mi tute neimagebla... Estas eble, ke la redaktoro de *Nederlanda Esperantisto* ne amas poemojn. Sed li devas havi tamen tiom da heroeco, ke li legu la poemojn, kiujn li volas publikigi!

En *Verda Revuo* troveblas ĉiam tre interesaj bildoj raportantaj pri diversaj geografiaj vidindaĵoj aŭ pri diversaj momentoj de la tekniko aŭ de l' homo vivo. Kelkfoje ankaŭ la aldonitaj artikoloj estas interesaj. Sed la »Bibliografio«-rubriko... Nu, la granda recenzista kanono sur ĝiaj paĝoj estas certa sinjoro J. Holzleithner, el Gmunden. La Esperanta poezio estas lia kor-afero, konstante turmentas lin profundaj zorgoj pri la bona stato aŭ la mis-

Ni penis nian vojon malsupren, helpe de lampo, kiun konfidis al ni saĝa virgulino, pastrino de San Michele. Dum ni kaskadis laŭ la ŝtupoj kirlaj, venis renkonte al ni maljuna homo unukrura kaj tre simila al la »Lama Kuriero«. Li prezentis sin:

— Mi estas Teo, la heroldo. Ciutage mi trenas min supren por tie kanti la *Atlan Kanton de la Lamo*. Mi maljuna kaj jam de jaroj ne plu jungas Pegazon. Nur piede mi iras. Kaj nun vian venon mi devas nepre anonci al la Centra Potenco. Preĝu por mi, Sinjoroj!

— Horremus! ni kortuŝe samtempis.

Kaj ni pluŝis interne de la teruraj ringoj. Fine nin akceptis brite sobra kaj milrideta bonulo, Johano la Komercisto. Anstataŭ la esperitan viskion li ofertis al ni kelkajn sekajn ŝercojn, kaj post kelkminuta babilado ni estis enlasitaj al la trono de la Centra Potenco, kiun ĉirkaŭis aro da konkubinoj. El la privata konversacio kun Johano la Komercisto ni lernis, ke la Centra Potenco ne ĝuas la konkubinojn, sed nur gardas ilin kiel Eŭnuko, ĉar liajn multajn pekojn punis kastrado.

— Saluton, ho Ventra Potenco! — ni kruco-signis.

— Kion vi volas? Ĉu por patroniĝi? En neoportuna momento vi venas. Ni ĵus instaligis, kaj ne ĉio pretas. Ni estas tre okupata! Ni vokos nian sekretarion. — Jozefo! bonvolu okupiĝi pri la gastoj.

Enkuris Jozefo, sed anstataŭ saluti, li senpere demandis:

— Ĉu vi ne kunportis foto-aparaton? Ho ve! Jam de 23 jaroj oni ne faris bildon de mi! Kaj mian tutan kolekton ili fordifektis, la senĝenaj friponoj! Mia puno! mia turmento! mia torturo!

Ridmondo komentis al mi: Kiam la esperantistoj okupis la novan kavon, ili ne povis rikolti sufiĉe da promesoj (de personoj promesintaj lerni la lingvon) por ĝin pavimi, kiel oni kutime faras en la Infero. Do ĝin oni devis pavimi per la fotoj de Jozefo, kio cetere apenaŭ sufiĉis, tiel, ke oni devis komp'etigi per la poŝtkartoj de Lihtenstejno.

Jozefo melankolie nin kondukis al la Centra Kavon, aranĝita sub la aŭspicioj kaj laŭ la normo de la Centra Potenco. La terura spektaklo tiel draste efikis al mia kara patrono, ke li eltiris sian pipon el la poŝo kaj kurage ĝin ŝtopis. Sed subite ĝi falis de liaj manoj...

En angulo, tute apude, nin superstaris homo najlita al kruco; kaj ĉiuminute alflugis vulturo, kiu mordis lian koron. De lia brusto senĉese fluis sango laŭlonge de lia korpo, kiun pie viŝis virino en longa nigra ŝalo.

— Ho vi, kial tian rabian turmenton suferas — ni kompatis.

— Mi ĉiam suferis, mi estas Infano de l' Sufero! — kaj li respekte kraĉis sur la virinon. — Vidu la Vulturon de l' Turmento, kiu denove sagas al mi de sur tiu roko abi-sena...

Kaj jam sur lin flugis la fia rabo-besto. Ni devis forturni la vizaĝon. Ĉielfendan blasfemon elspulis la viro. Liajn kruojn milde ĉirkaŭpremis la virino. Ili estis Rinaldo kaj Mellina.

Ciuflanke elstaris ĝemantaj torturatoj, kies vidon ni ne herois toleri. Kun mano sur la okuloj ni trakompatis la tutan kvartalon ĝis eta ponto super torento, kiu la sangavidajn disigas de la aliaj damnitaj. Nin aliris junulo febla, pala, kiu lamentis per voĉo lante softa:

— Mi verŝis sangon por poemo, dum min kaptis la traduka febro.

Kaj li plupaŝis tenante blankan floron en la sangmakulita mano. Sed subite li sin turnis, kaj per voĉo ankoraŭ pli softa:

— Diru, ĝentilaj paŝtistoj, ĉu vi ne renkontis kelkie Amalian, kiu por kis' amika la lipojn proponus?

— Nun jes, nun jes, ŝi tie trans la rivero koketas kun rido dubuŝa, kvazaŭ formiko, kiu jam ne memoras sian subteran kuron.

— Ho ve senpove dista! — ĝemis Ludoviko Dolĉa.

Sur roko, apud la akvo sidis bela malgaja viro kun liro en la mano. Li atendis la tajdon kaj nostalgie ripetadis:

— Mi plenumis dolĉan krimon, kaj min obsedas la penso pri mia Nita, postlasita, sur la vojo al Edeno. Sed la plej terura estas, ke mi perdis mian Erudicion en la senbrida karn-orgio! Ho mi, sortorompita Or-feo!

Forlasante tiun paganon, ni longe, ĉe la bordo, tiris la paŝojn laŭ la vojo almonta, ĝis loko kie disbranĉigis la torento. Tie nin atentigis homo kun verda stelo sur la brusto.

— Rigardu, rigardu, ĉu la du fluoj estas egalaj?

— Ne, ni sagace respondis, ili estas diversaj, sed ne egalaj.

— Kia estas la dekstra fluo?
 — Verda kaj pura! — ni kune tondris.
 — Kia estas la maldekstra fluo? Faru belan frazon!
 — La maldekstra estas nigra kaj malpura!
 — Mi dankas, vi estas bonaj lernantoj. Mi ne pikos vin per mia kvinpinta pedagogia meblo, se vi dividos kun mi la heredaĵon de la Verda Kato. Ĉu vi konas la regulojn de la matematiko?

— Jes, sed ĝuste via parto plaĉas al mi!
 — Vi estas azenoj kaj nur la infero apartenas al vi!

Ĉe la maldekstra fluo triumfis ŝlima lafo, el kiu emergis du kapoj. La unua molbuŝe bombastis:

— Mi naskiĝis sur akro-pola; mi lerte profitis la recepton de Paŭlo la Fruktisto por mia grenkampo, kiun virbove sabris Koloman la Kolosa; mi kaj mia kunulo spicas la tro sengustan torenton, ĉar mi estas Salo kaj li Majorano!

— De Vömokoto Internacia — emfazis la dua kapo.

En la pureco de la dekstra fluo naĝis Fiŝeto serĉanta la Honestan Urbon.

— Atentu — li nin avertis — tie (ĉi) dronis Kabe!

Ĉu nestis, ĉu ne nestis, eble trans la Infertorento nestis oĉjo Francisko, tute sola kiel la malkontenta eta birdo.

— Mi nestas sen muzikilo kaj eĉ sen mi mem! — li kompleze plorgemas. — Min forlasis ankaŭ mia kara onklino, kiu iam pace toleris mian babiladon. Kaj mi devas fabeli ĝis la tempo-fino. Ho, eĉ se vi estas nur senkoraj Nekrasovoj, kompatu blankbarban maljunulon, kiun muelas la Turmento!

— Toleru, — ni kuraĝige diris — ĉar se vi ne estus maljunulo, ankoraŭ pli longe daŭrus via turmento!

En la Torento ĝiszone revis Stelano. Kredeble li pensis pri la homoj sur la Tero.

En tiu momento preterpasis virin-grupo, kiun vipe pelis la Granda Eŭnuko. Ili estis ĝuste tiuj konkubinoj, kiujn eble tro nutris la karno malpia. Inter ili mi rapide rimarkis Aminuŝka Senmantelo kaj la budapeŝtan triopon: Kruca Margareta, Maria Mal-virta, Maria Sajnoscia. En marĉon de bolanta plumbo ilin skurĝe devigis la Granda Eŭnuko. Tiun vidon elteni ne povis komencanto, kaj ni tuj alidirekte faris nian vojon.

— Ho, Milda, — mi subite konsterniĝis — vi, Reĝino de l' Nordo, vi kia! martiras en ĉi varmega loko?

— Pro solidareco — ŝi vikle rediris — kaj mi restos en la Urbo Flama ĝis degelos mia kristala koro kaj bonodore floros mia paduŝo. Sed afablu, paradizaj kurieroj, ĉu ne ĉi tie mi lin renkontos?

Ciukaze ni ne lin renkontis, sed arleken-vestitan viron, kiu kolektis sangajn korojn de sur la vunda tero. Li larme ridis al ni kaj profetis la venon de la Nova Pento, dum sango ŝajne fluis el liaj okuloj. Sed gustuminte liajn larmojn, ni konstatis nian eraron, ili estis el ŝiropo.

— Vidu, karaj, li konfidis, mizere mi devas vagaĉi en ĉi tiu putra kelo ĝis tute forviŝigos de mia suferplugita vizaĝo la spuro de la mil knabinaj kisoj! Jam la duono foje malaperis, kiam Poliena larme lavis mian konsumitan vangon, sed tuj poste ŝi tien alstampis novan kondamnon. Min persekutas la eterna virino!

— Vi estas Filozofo, Profeto, Amanto, Poeto!

— Mi estas nur Homo laca pri la migra farso, kaj miaj piedoj estas lacaĵo ĉevaloj; jam ili ne ĝisatingos mian savon; sed, vi, amikoj, kiuj reiros inter la homoj, diru al ili, ke eĉ ankaŭ kun groŝoj en la poŝo estus mi feliĉa. Sed... ho, Poliena, ĉu estus inde reveni?

Kaj prenante de sur la rokoza vojo la dispremitan koron de la sankta Fiza, Johano la Bardo, flugis al novaj aventuroj, senatente al la dornoj, kiuj ŝiris liajn piedojn.

Sur dezerta miniatura insuleto Robinsono Tempesto meditis, kion subtilan li enŝovos en la notlibrojn, kiujn poreterne taskis al li la Fato:

— Mi estas obsedita — li konfesis kun tikla mistero.

— Ankaŭ Nikolao Or-feo tion asertas — rimarkigis Ridmondo.

— Eble, sed mi ne perdis mian Erudicion; jen la diferenco!

— Oni povas perdi nur kion oni posedas. Eble la ĉapelinon vi perdis?

— For! Ne difektu mian etoson, eĉ se nur per grenereto...

— Vivu la brita digno! — kriis de rokosupro viro en blankaj

vojoj de nia versarto... Ekzemple, en sia recenzo pri la libroforme aperintaj prelegoj de la XII-a Somera Universitato, koncerne la prelegon de Kalocsay, s-ro J. Holzleithner, el Gmunden, rimarkas, ke li devis nur ridi, kiam Kalocsay prezentis modele tiajn poemojn, kiuj ne atingas eĉ la nivelon de bona prozo. Nu, temas pri la Zamenhof-poemo de Szilágyi, pri tre bela Kurzens-poemo, pri unu el la plej sukcesaj Hilda Dresen-versaĵoj, pri tre interesa originalaĵo de ĉina Esperanta poeto... Sed se s-ro J. Holzleithner, el Gmunden, deziras ridi, kiu envidus tion al li? Klarigi al li la belajojn de la supre nomitaj versoj? Kiu kapablus fari tiun tute senesperan taskon? — Tamen, jen kion mi vidas! S-ro J. Holzleithner, el Gmunden, denove okupiĝas pri la sorto de la Esperanta verso. Kaj ĉi-foje li estas plene kontentigita! Temas pri la versolibro de Alois Norbert, titolita »La mondo ridas«, pri kiu en la lasta numero de *Lingvo-Libro* mi konstatis, ke la aŭtoro ne scias bone la lingvon, ke lia verstekniko estas primitiva, ke liaj »bonhumoraj versoj« senas ĉian bonhumoron... Pri tiu ĉi libro s-ro J. Holzleithner, el Gmunden, skribas jene: »... Car ĉe anekdotoj kaj spritaĵoj la *formo* estas tre grava afero — nelerta formo povas komplete detruiri la efikon de la plej bona spritaĵo — oni nepre devas laŭdi la talenton de la aŭtoro, doni al ĉiuj serĉoj efikan formon, la formon de facile fluanta rimajo; kaj eĉ kelkaj malnovaj, konataj anekdotoj gajnas per la nova, aere flugetanta versovestataĵo freŝan kaj ravan aspekton. La rekomendinda kolektaĵo montras cetere, ke oni ankaŭ en la Esperantolingvo povas fari agrablajn versojn sen troa uzado de la tiel nomataj »poetaj licencoj«.« Jen, tiel parolis s-ro J. Holzleithner, el Gmunden. Hm... kiel lerte li scias sabri: nun, el tiu ĉi alia recenzo, klariĝas, ke ankaŭ la preleginto mem estas antaŭ li duba persono... Ĉu ne li uzis tiujn pekajn »poetajn licencojn«? Jes, kaj kion li elkovis per ilia helpo? Nu, ian Danteaŭ Baudelaire-librojn kaj tiajn fuŝaĵojn... Kaj kion faris Grabowski per tiuj licencoj? Tadeon? Ĉu ankaŭ tio estas io? Sed jen, vidu, kion faris mia kolego, Alois Norbert, sen tiuj licencoj, jen, vidu »La mondo ridas«, la ĉefverkon de la Esperanta poezio! — Ĉu pri tiaj recenzoj de s-ro J. Holzleithner, el Gmunden, respondas la tuta redakcio, aŭ sola li mem. Lastokaze, ĉu ne estus bone serĉi alian recenziston, kiu ne ridindigas la redakcion?

Unu el la plej interesaj Esperantogazetoj estas sendube *USE-EAO*. Kiel ajn oni rilatu al ĝiaj politikaj ideoj, certe ĉiu povas en ĝi trovi interesajojn.

Bonaj ĵurnalistoj sidas en ĝia redakcio, se foje aperos taga Esperanto-ĵurnalo, ĝian redakcion oni devus pleniĝi per uŝe-ĉanoj!

La Suda Stelo denove aperis! Ni salutu ĝin kaj uzu la okazon iom citi el ĝi. En la rubriko »Bonhumoro« mi trovis ŝercan vortaron, el kiu precipe du klarigojn mi trovis interesaj: *Sofisto*: homo, kies metio estas fari sofojn; la alia: *vesperto*: dolora sperto.

La Praktiko estas vigla, diversenhava, interesa kiel ĉiam. Multaj ŝercaĵoj troveblas en ĝi kaj en tia varmo estos refreŝige citi kelkajn. Jen:

Artistoj inter si.

— Nu, kolego, kiel iras via vivo? Ĉu vi navas bonan oficon?

— Mi estas malsat-artisto en la cirko.

— Kaj kian pagon vi ricevas?

— Pagon oni ne donas, nur loĝon kaj manĝon.

En malsanejo.

Kuracisto: Kiom da pacientoj mortis dum la nokto?

Flegistino: Tri.

Kuracisto: Sed por kvar mi ordonis la medikamenton.

Flegistino: Jes, sed unu el ili ne volis ĝin preni.

En la junia numero de *Ligilo* ni trovas interesan prilingvan artikolon, subskribitan de -anto, kiu temas pri la -ata, -ita problemoj.

Dansk Esperanto-Blad presigas alvokon al verkistoj kaj poetoj por kunlaboro en la gazeto. Ĝi faras tiun alvokon, ĉar la legantaro deziris legi literaturajojn. Feliĉa lando, kie troviĝas tia publiko kaj tia komprenema redakcio!

En *Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio* daŭras la oftado de »scipovi«. En mia lasta Revuo mi anoncis konkurson kun libropremio por tiuj, kiuj sendas al mi dek frazojn, en kiuj la uzo de »scipovi« ne estas evitebla. Venis nenia respondo. La konkurso plu validas!

Se ni legas niajn ĉefajn organizajn gazetojn, vizitas nin la »amara horo«, bone konata de ĉiuj esperantistoj, eĉ prikantata de niaj poetoj... En iu landa gazeto mi legis, ke eble la organiza krizo estos eĉ pli danĝera, ol estis siatempe la Ido-krizo. Sed ĉu vere tiel devas esti, ĉu particeco, memamo aŭ personaj antipatioj definitive blindigis niajn gvidantojn? Ĉu vere estus tiel malfacile konvinki ilin pri la sola elirovojo, pri kiu konsciigis jam tiel multaj malnovaj esperantistoj, kiu jam aperis ankaŭ sur la paĝoj de gravaj landaj

vestoj, kiu tre krike'oce observis la ĉirkaŭaĵojn, penante fiskapti ekscitan amintrigon el pekriĉa lageto. Kaj li flegme tradentis:

— Anglo ĉiam alte tenas sian *Nivelon*!

En profunda galerio baraktis Edvardo la Dentisto penante elmini ĉiujn portretojn de la Sankta Familio. Lin konstante ĝenis Ardante Popolan, kiu rajdante sur ora azeno entreprenis traduki ĉion el la »polla« lingvo kaj ĉien enĵetis pipron por disternigi sian famon.

— Lonkopolanski! — kolere blekis Edvardo en la gepatra lingvo.

— Krestomanski! — blasfeme respondis Ardante Popolan.

La disputon tre ĝuis la apude kuŝanta Leono Belmonta, kiu kuragige instigis jen unu, jen la alian: »Vi venkos, Sinjoro, vi venkos!«

Kaj imagu nian surprizon: en la groto rezervita al la vizitantoj, sidis la nobla Gasto Veringo, kiu rimparojn bredis kaj la arbon de la scio akvumis per regul-kaskadoj. Nin kore bonvenigante li laŭtigis sian feliĉon:

— Kontraŭ kesto da paroksitonaj rimoidoj mi aĉetis de Johano la Bardo lian mirindan elpensajon: la mil okulojn de Mr. Tot!

Tiam en la fundo de la Abismoj tondris teruraj protestoj de Johano la Forĝisto. Sed ilin tute kovris la impeta entuziasmo de la nobla Gasto.

— Nun mi povas samtempe el mil libroj suĉi la saĝon, el mil poemoj ĝui la rimojn, el mil knabinaj brustoj koni la nuancon de la cicoj! Do, vidu mi ne perdis mian Erudicion, sed male gastas ĉi tie por ĝin pli bone flegi! Ĝis floros mia kristala klero, Adiaŭ!

— Ĉu vin eble atendas la frat-animo Milda?

— Milda al mi tre karas, sed ne pli ol la vero!

— Tiam diru, kie orgojlas via Majstro Ko'oman la Kolosa?

— Kiel arbo senfo'ia li poreterne staras sur tiu roko nuda, la plej alta de la tuta cirko, tie tute apud la Malica Piko, kaj laca plu servi flori, frukti meze de la fridpisuloj, li parolas sole kun la grandaj ventoj en potenca kaj fan'oma lingvo jam ne komprenebla por mi. Li, la Unika...

Sed jam ne aŭdante, ni tumulte forpafiĝis al la kulmina Citadelo de l' Parnaso. Duonvoje ekstaris antaŭ ni b'ondhara herkulo, kiu sentencis kun forpuŝa gesto:

— Ĉiun esperon lasu pri l' enpaŝo!

Vane ni penis lin delogi proponante honor-umbilikon aŭ rimoflaran naztruon. Li restis neŝance'eblo en sia fortika masiveco, kiun nek norda vento nek cikoni-kalifo povus renversi. Karlo Brodo li estis, kaj nin tute rompis lia infana obstino.

Sube en la valo svarmis la damnitaj legioj. Sed ili jam ne interesis nin. Pretere ni rimarkis la birdkortan konsilanton Pugo-sur-Stono, kiu ŝanĝiginte meleagro pretendeme klukis apud Petro-l'Eta, la ko'erblekanta vir-ansero.

Nur sur la reven-vojo min trafis penso: Kie predikas Patriarko Jakob? — Guste tiam sin turnis al ni Kanuto inter du mango-glutoj:

— Post tro abunda festeno li iris por iom promeni. Ĉion troveblan en la Infero li pasie kolektas. Ekzemple ankoraŭ mankas al ŝi la Dekmila Damnito. Ĉu vi ne atendas lin iom; eble li interesigis, kion al li testamentis la Verda Kato?...

— Ne, decide kraĉis mia patrono, ni devas alveni supren antaŭ ol fermiĝos la lasta gastejo!

H. Ribeaupierre

gazetoj? Jes, pri la nepra kunekzistado de ambaŭ organizaĵoj: IEL kiel centro de la landaj societoj, kiu ja havu siajn delegitojn kaj individuajn membrojn; kaj UEA, ia reviviginta, ia nova UEA, kun nuraj individuaj membroj... IEL koncentru nian forton, ĝi reprezentu nian movadon alekstere, ĝi zorgu pri ĝia plua disvastigo; UEA gardu nian koron, ĝi savu por ni la esperantisman mem, sen kiu multaj el ni, malnovaj

esperantistoj, ne estus aliĝintaj al la movado. Mi ne kredas, ke nia movado ne povus finance subteni ambaŭ organizaĵojn. Se ili ambaŭ forlasos la vojon de la kvereloj, ili ambaŭ trovos la necesan apogon de la esperantistaro. Sinjoroj! El la nuna marĉo savu vin mem kaj nian movadon al la puraera alto de sinofero kaj reciproka estimo!

Lali Blond.

ORA LIBRO DE LA ESPERANTO-MOVADO. 1887—1937. Redaktis: V. Bleier kaj E. Cense. Eldonis: La Loka Kongresa Komitato de XXIX-a Universala Kongreso de Esperanto, 1937. Cefkomisio ĉe »Literatura Mondo«, Budapeŝt. 224 paĝoj. Kun multaj ilustraĵoj.

Jen, vere impona libro, kiu ĵus aperis okaze de la Varsovia Jubilea Kongreso. Ora Libro ĝi estas, ĉar la libro priskribas la evoluon kaj la nunan staton de la kvindek-jara Esperanto. Eĉ profetaĵojn ĝi enhavas el la plumoj de gravaj esperantistoj por la sekvontaj kvindek jaroj! La Ora Libro ricevis senpage la jubileantaj kongresanoj por memoro, kaj efektive pli belan donacon eĉ imagi ni ne povus. Ĝi ja estas vera dokumentaro, grava movada libro, kiu devas interesi ĉiun esperantiston, kiu serioze okupiĝas pri nia lingvo.

Sed ni rigardu pli proksime la libron.

Antaŭ ĉio la Ora Libro estimplene kaj dece honoras niajn mortintajn pionirojn, kiuj en la komenca periodo de Esperanto tiom sindone, entuziasme kaj heroe batalis por venki la indiferentecon de la mondo.

Poste sekvas intimaj rememoroj pri ili, kortuŝaj, karaj epizodoj. Pri Zamenhof aparte rememoras la esperantistaj veteranoj, kiuj estis feliĉaj persone vidi la Majstron kaj kun li paroli. Ni pli reliefe vidas lian noblan karakteron, modestecon, persiston, klarvidon en ĉi tiuj intimaj rememoroj.

Nun sekvas la listo de pioniroj niaj, al kiuj propre estas dediĉata la Ora Libro. Ja sen ilia glora laborado ne ekzistus jam nia lingvo. Ho, kiom ofte minacis danĝeroj nian lingvon en la unuaj tempoj! Tre ofte unu homo savis la tutan movadon! Kaj kiel kuragiĝis unu la alian niaj bravaj pioniroj el diversaj landoj! Tiutempe ĉiu esperantisto konis unu la alian almenaŭ koresponde kaj ili timzorge, angore observis la tutan movadon la laboradon de la aliaj samideanoj. Kaj la centro ĉiam estis la Majstro, kiu senĉese kuragiĝis, agitis, kritikis, aprobis, prijuĝis, direktis nian malfortan movadon per sia larĝskala korespondado kaj senpartia juĝkapablo.

La listo de la Veteranoj enhavas la nomojn de tiuj personoj, kiuj esperantiĝis ĝis 1905. Multaj el ili jam mortis, sed multaj ankoraŭ vivas kaj partoprenas en la esperantista movado. Dum la jubilea kongreso ili estis entuziasme honorataj, ja ili estis la veraj jubileantoj, kiuj travivis la evoluon de Esperanto, krizajn tempojn, la unuajn mondkongresojn esperantistajn, Ido-skismon, reformprovojn, mondmiliton ktp.

Kompreneble, la listoj de la pioniroj kaj veteranoj ne povas esti kompletaj. Kelkaj certe mankas, sed ili nepre pardonos la redaktantojn, kiuj nenium intencis ofendi; kiu konas tiajn laborojn kaj nian nuntempan larĝe disvastigitan movadon, tiu bone komprenos la eventualajn mankojn!

La dua parto de la Ora Libro enhavas tre gravajn raportojn, studojn, artikolojn pri niaj movado, literaturo, organizo, propagando, lingva evoluo de Esperanto, ktp.

G. Waringhien skribis la *historian skizon de la Esperanto Movado* dum la pasintaj kvindek jaroj. Ne nur el movada, sed ankaŭ el lingvistika, idea kaj literatura vidpunktoj li kritike skizas la evoluon de Esperanto. La lingvajn diskutojn, la rivaladojn, la tre interesan evoluon de nia Esp-a literaturo, organizajn problemojn, la klasbatalan skismon de SAT ktp.

Hans Jakob skribis vere aktualan raporton pri la *internacia organizo esperantista*. Tre interese li asertas, ke nenia Esp-a organizaĵo, ĉu nacia, ĉu internacia, enkorpiĝas ĉiujn esperantistojn, sed nur tre malgrandan parton de ili! El la raporto ni vidas la gloran rolon de UEA en nia movado. Nun, kiam ankaŭ UEA-n trafis skismo, certe ĉiu scivole legos ĉi tiun detalan kaj faksperantan raporton.

E. Malmgren faris artikolon pri la *Esperanto-Propagando en Svedlando*. Ni povas lerni el tiu artikolo la

sekretan de la efika propagando! Kiel ili sukcesis fari *amasmovadon* en Svedujo pere de eksterlandaj Esp-instruantoj, precipe Andreo Cseh, d-ro Szilágyi kaj Tibero Morariu. Ni ĝoje legas, ke pli ol 40.000 svedoj mendis la malmultekostan elementan korespondan Esperantokurson! Iliajn grupvojaĝojn al Estonio pere de Esperanta Turista Komisiono, la modelan laboradon de la Sveda Esp. Instituto. La malgranda ŝlosilo de Esp. estis eldonita en 180.000 ekzempleroj!

D-ro Antoni Czubrynski skribis artikolon por la *lerneja interŝtata Esperanto Akordo*. Li prave skribas, ke estas necese la *samtempa* enkonduko de Esp. en la diversŝtatajn lernejojn.

Jan Silhan verkis pri la *blinduloj sub la verda standardo*.

Sekvas raporto pri la *Internacia Scienca Asocio Esperantista*.

F. Szilágyi estas fidinda gvidanto tra la *Liriko en Esperanto*. Traleginte lian studon, ni efektive ekkonas kaj eksatas nian poezion, kaj ricevas el lia konciza trarigardo klaran bildon pri tio, kiom varia, multkolora kaj talenta estas nia liriko!

Ĝin sekvas *Kura Trarigardo de la Esperanta Prozo* kompilita el artikoloj de la Enciklopedio.

Jen aperas Kabe, la plej bona Esp-a stilisto; la unua romanverkisto Esperanta, Dro Vallienne (Kastelo de Prelongo), Luyken kaj ĉefe Baghy, poste Engholm, Forge, Raymond Schwartz, Szilágyi, Sturmer Bulthuis ktp. kaj la impona vico de la diversnaciaj Antologioj!

K. Kalocsay verkis pri la *kvindek jaroj de la lingvo*, montrante, ke ĝi estis periodo de konstanta evoluo. Li detale konigas ĉiun lingvan problemon, kiu tuŝas Esperanton: la du tendencojn en la lingvo: reformo kaj evoluo; la reformprovojn; la bolantan lingvomaterialon; la periodon de solidiĝo; la netakseblan valoron de la »Fundamenta Krestomatio«; la elkreskon de esp-ista popolo; la rivalecon inter la konservativa »Lingvo Internacia« kaj la pli evoluema »La Revuo«; la grandskalan libroeldonadon de la firmo Hachette en Parizo; la faman Bulonjan »Deklaracion« per kiu estis sankciita la netuŝebleco de la »Fundamento de Esperanto«; la diferencajn verkmanierojn de niaj tiutempe plej grandaj du stilistoj: Zamenhof kaj Kabe; la fondiĝon de la Lingva Komitato kaj de la Akademio; la Ido-skismon, kiu donis novan antaŭenpuŝon al nia gramatiko, por pli perfekta ellaboro; la Lingvajn Respondojn de Zamenhof, Grabowski kaj lian faman ĉeftradukon: Sinjoro Tadeo de Mickiewicz, kiun li aŭdace entreprenis; la postmilitan fortan esp. movadon en germanio kaj la germanajn Esp. lingvistojn, kiuj klopodis rekonduki Esperanton al la plej puritana logikeco kaj la alian modernan direkton, la t. n. »budapeŝtan skolon«, kiu grupiĝis ĉirkaŭ la »Literatura Mondo« farante literaturan vivon, eĉ literaturan lingvon, kiu estas jam perfekta ilo, por solvi la plej malfacilajn literaturajn kaj lingvajn problemojn.

La tria parto de la Ora Libro enhavas interesajn profetaĵojn de niaj reprezentaj ĉefuloj pri la sekvontaj kvindek jaroj de Esperanto. Ni esperu kun ili, ke ĝi estos jam multe, multe pli facila, ol estis la nun pasinta!

L. Halka

RIGARDU LA TERON. VERKIS HENDRIK WILLEM VAN LOON. Tradukis: Georgo Saville. Eldonis *Literatura Mondo*, Budapeŝt. Dua libro de AELA serio B. Formato 23×16 cm. Prezo: broŝ. 2.60 dol., bind. 2.95 dol. + 10% sendkost., 456-paĝa, ĉ. 200 intertekstaj ilustraĵoj, 16 koloraj, 12 nigraj tabeloj.)

Kiu ne sentis ankoraŭ, ke li volonte refreŝigus sian forgesitan geografian kaj historian scion, se tio ne estus tiel enua kaj malfacila?!

Jen la libro de la amerika verkisto: Van Loon. Per tiu ĉi libro vi ne nur facile kaj amuze refreŝigos sed

(ankaŭ aktualigos ĉion, kion vi sciis pri nia tero kaj ĝia loĝantaro. (La libro estas laŭ sistemo unuavice geografia, sed ĝi donas ankaŭ abundajn historiajn detalojn.) La klaraj, amuzaj, spritaj komparoj estas unuarangaj faciligoj: »La lumo ĉirkaŭras la teron 7-foje, dum oni klakas per siaj fingroj unufoje.« »La tera krusto estas tiel plena de truoj, kiel spongo.« Aŭ kiam li parolas pri la egaleco de la danoj: »La reĝa familio ne trudiĝas sur la unuan paĝon de la sensaciaj gazetoj, kaj kvankam nur kelkaj el la civitanoj havas 3 peltojn, neniu devas frostiĝi pro manko de tia vesto, kaj dum nur malgranda procento havas automobilon, ĉiu viro, virino kaj infano posedas almenaŭ 2 biciklojn.« — Aŭ plue, kiam li rakontas, ke en Norvegujo preskaŭ ĉiam pluas: »En Bergen la ĉevaloj timigite flankensaltas, se ili renkontas personon sen ombrelo.« Mi devas iomete reteni mian emon citi ankoraŭ pli el tiuj amuzaj ekzemploj, per kiuj li kvazaŭ lude instruas la geografion.

Vi demandas nun: Ĉu tio ĉi estas serioza geografio? Ho, jes. Ne nur la sekaj skribaĵoj povas esti seriozaj. Per la libro oni rigardas nian globon kvazaŭ el malproksima sed tre objektiva vidpunkto, de kie oni rimarkas la ĉefajn trajtojn, ekkonas la tuton. Do, vi seriozaj plenaĝuloj, ekprenu la geografian mapon kaj lasu vin gvidi tra la mondo per Van Loon. La junulojn mi ne alvokas, ĉar mi aŭdis de profesoro, ke, se la junularo legas geografiajn aŭ historiajn librojn, tiuj estas preskaŭ sole la verkoj de Wells kaj Van Loon.

La libro komenciĝas per ĝeneralaj scioj: difino de la vorto »geografio«, — kiel oni faris kaj faras landkartojn, — pri nia globo ĝenerale. Baldaŭ ĝi transiras al la treege interesaj detaloj pri la diversaj Eŭropaj landoj kun iliaj ĉiamaj (geologiaj) kaj nunaj (ekonomiaj kaj politikaj) cirkonstancoj, ĉiam elmontrante la influon de la naturo al la homa vivo, elmontrante, ke »estas landoj, en kiuj la homo submetiĝis al la naturaj ordonoj, tiel ke li iĝis ties mizera sklavo, kaj estas landoj, en kiuj la homo tiel komplete detruis la naturon, ke li perdis la kontakton kun tiu ĉiam vivanta patrino. Kaj fine estas landoj, en kiuj la homo kaj la naturo ellernis kompreni kaj ŝati unu la alian kaj ili interkonsentis kompromison por sia reciproka profito (ekz. la skandinava landoj). — Post Eŭropo ĝi kondukas nin al Azio, ne forgesante elmontri, kion signifas Azio al la cetera mondo. Treege interese ĝi rakontas pri »la kontinento de kontrastoj«, Afriko, kaj pri la »plej feliĉa kontinento«, Ameriko. Ĝi diras ĉion ĉirandante pri Aŭstralio kaj la ega insulmondo de la Oceanoj.

Van Loon skribas pri ĉio kun facileco, tre ĝueble, ofte ŝerce, kaj tiom logike, ke li donas al la leganto ne nur geografion sed ankaŭ la emon logike pensi, kion ni — ho, ofte bezonus.

Amuza helpilo en la libro estas ankaŭ la okulfrapaj, tre instruaj ilustraĵoj. Mi mencias nur kelkajn, kies trafeco mi tiom ĝuis, ke mi dezirus montri ilin al ĉiuj niaj ĝeinstruistoj. Mil vortojn ili povus anstataŭi per kelkaj strekoj. Tiaj bildoj estas ekz.: sur paĝo 34: La granda diferenco inter landkartoj plataj (ĉiam falsaj!) kaj tiuj desegnitaj sur globoj. P. 222—223: Hindujo plenplena de hindoj. — P. 373: La dezerto.

Ĉi tie mi devas menci, ke inter la vere trafaj klaraj bildoj troviĝas kelkaj iomete kaosaj, kiujn dua eldono verŝajne korektos (ekz. P. 79: De besto ĝis homo).

Same korektendaĵ estas kelkaj eraroj en la subskribo de la ilustraĵoj (anstataŭ »Rejno«: »Rodano«, — »Tura« anstataŭ »Jura«).

Ankaŭ la klarigoj kelkfoje, sed nur tre malofte, ne bone kalkulas pri la »mezokvalita leganto«, kiun la verkisto mem mencias kiel sian leganton. Ekz. kiu antaŭe ne komprenis la kronometron aŭ la sekstanton, ne ekkonos ĝin per la klarigo en la libro.

Sed neniel malhelpas tiuj ĉi kelkaj korektendaĵoj, ke la libro estu ĝuebla, tre instrua, kaj ke Van Loon, kiel homo, estu de siaj legantoj alte estimata kaj amata. Li estas vera homo, homo laŭ la esperantista idealo, kiu neniam kaŝas sian ĝustan opinion, en kies okuloj la tero ne

estas malplena globo, sed loĝata de »kunpasageroj«, kiuj ja povas dum iom da tempo erari pri »rasteorioj«, sed finfine nur ilia tutmonda kunlaborado povas esti nia estonteco. — La preskaŭ 100 paĝoj, sur kiuj li rakontas la historion de la sklavvendado, estas pli animskua legaĵo ol multaj romanoj.

La lasta ĉapitro de la libro havas la titolon »La plej nova tero.« La »plej nova tero« estas tiu, kiun esploris ne la »konkistadoroj«, ne la piratoj, sed la kuracistoj; Tero, kiujn la Ross-oj kaj aliaj liberigis de dangeŝaj malsanoj, moskitoj, venenaj insektoj. Ĉi tiu nova tero donos al ĉiu loĝanto de nia globo eblecon por home vivi. Sed la Ross-oj donacis la teron senkonsidere pri la haŭtkoloro de la homoj! — Tiu ĉi ĉapitro karakterizas Van Loon.

Mi mencias ankoraŭ la kelkloke vere poezian stilon de nia kara Van Loon. (Ĉar pense mi ofte tiel salutis lin tra la oceano). Jen du vere belaj priskriboj:

»Se la dezerto estas timiga, la trembrila malluma praarbaro estas terura. Ĝi tiom vivegas, ke ĝi senvivigas. Kaj tiel, tage kaj nokte, kaj nokte kaj tage, la kreĉlaro sin reciproke formangegas. La plej senkulpaspekta insekto havas plej mortigan pikilon. La plej bela floro portas en si kaŝitan venenon. Ĉiu korno kaj hufo kaj beko kaj dento estas kontraŭ ĉiu alia korno kaj hufo kaj beko kaj dento. La pulsobaton de l' vivo akompanas la grincado de ostoj kaj ŝirigo de molaj, brunaj haŭtoj.«

Por la fino mi lasis la duan, malpli malhelan:

»La grekoj forlasis sian Akropolon kiel loĝlokon kaj ĝi iĝis sanktejo — sanktejo, kiu fiere levis siajn blankajn, marmorajn templojn kontraŭ la violnuaĉa ĉielo de Attica, — sanktujo, kiu restas unike belega inter la elmontrindaj lokoj, en kiuj la genio de homo malkaŝiĝas en sia plej alta formo de perfekteco.«

G. Taborsky.

KARCERO de *Kensaku Simaki*, eldono de librejo Kanija, Kioto (Japanujo). El la japana originalo tradukis la Redakcio de »Tempo«, 163 paĝoj, prezo nemontrita.

Tiu ĉi volumo enhavas kvar novelojn: Lepro, Suferado, Falo kaj Blindiĝo. Kiel oni divenas, temas pri la mizeroj de mallibereja vivado. La aŭtoro apartenas al la juna literatura grupo kies specialaĵo estas la skizado de proletaj vivoj. »Karcero« ankaŭ temas pri »pensaj krimuloj«, kiuj estas ofte malpli bone traktataj ol ordinaraĵoj. La okcidenta leganto certe miros pri la severeco de la puno, kiel ankaŭ pri la treege longa karcerperiodo antaŭ juĝo; ankaŭ pri la kutimo kiu konsistas el »esploro de la pensado« de akuzitoj, ktp. Aliparte, multaj aferoj spertataj de la malliberigitaj en Japanujo ŝajnos al ne-japanoj pli severaj ol ili estas en la realeco. Tio klariĝas per la diverseco de la vivkutimoj. Efektive, se oni devigus eŭropanon vivi laŭ japanaj kutimoj, li sentus sin punita pli ol en karceron...

La grupo, kiu tradukis la verkon esploratan, apartenas al la plej aktivaj en Japanujo. Kioto estas tre intelekta urbo kaj la esperantistoj tie estas bonkvalitaj. Apenaŭ oni rimarkas kelkajn japanismojn, plejparte en la vort-uzado kaj frazkonstruo. Kelkaj eraretoj pri la uzo de la artikolo aŭ pri la uzo de la tempoj eĉ ne meritas esti citataj: la leganto ilin korektos aŭtomate. Kuriozaĵo estas la abunda uzo de punktoj. Troviĝas pluraj linioj da ili kelkloke. Oni ne bone komprenas, ĉu temas pri cenzuritaj vortoj, pri singardemo de la verkisto aŭ eldono aŭ eble tia estas la japana kutimo. Efektive, elipso estas ofte aplikata en japana konversacio kaj literaturo; oni kvazaŭ evitas la logikan, la klaran, la tute esprimitan. Eŭropano diras »ĝis la revido«, sed japano salutas per »... se tiel estas...« (pensante: se tiel estas, ke ni jam finparolis, ni devas disiĝi).

»Karcero« certe pliriĉigis nian literaturon per valoraj noveloj tre originalaj kaj ni ne hezitas rekomendi la libron al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la moderna japana literaturo.

J. M.

Muusses Esperanto Biblioteko, Purmerend. (Nederlando.) Redakcio: J. Glück, T. Jung kaj J. H. J. Willems.

N-ro 4. *Josefo Scherer*: TRA USONO PER RULIGANTA HEJMO.

En Usono antaŭ kelkaj jaroj komenciĝis nova modo: post la aŭtomobiloj oni ligis ruligantajn ĉarojn, pli bone: ruligantajn domojn, komfortajn hejmojn. Nun jam estas multaj miloj el ili. Tre praktika afero por vojaĝemuloj, por vagabondoj, por agentoj, kiuj multe devas vojaĝi, por prelegistoj, kiel Scherer, kiu faris jam longajn vojaĝojn per sia ruldromo en Usono. Kompreneble, tiaj praktikaj hejmoj, kiuj ĉien sekvas la loĝantojn, estas imag-eblaj nur en Usono, kie estas ĉie bonegaj ŝoseoj por aŭtomobiloj, staciejoj por parkado, kie oni ne trovas ĉiuhore novan landlimon, doganon, alian monsystemon, sed kie oni povas veturi kelk mil kilometrojn senĝene; halti, kie oni volas, libere, laŭplaĉe. Se estas varmege, ek al la montaro; se estas malvarme, antaŭen, al la sunplena Kalifornio! Ĉu ne ideala hejmo?

Ni envias niajn felicajn Usonajn homfratojn, pro ĉi tiuj vojaĝdomoj, kiuj estas ekipitaj per la plej granda komforto.

N-ro 6.—N-ro 7. LA KONGRESAJ PAROLADOJ DE D-RO L. L. ZAMENHOF. Unua parto, dua parto.

Tiuj ĉi du volumoj de la biblioteko enhavas sep kongresajn paroladojn de Zamenhof, krome lian paroladon en la Guildhall (City of London) en 1907, kaj lian faman leteron al N. Borovko, pri la deveno de Esperanto. La oka kaj lasta kongresa parolado troviĝas en la 10-a numero de la biblioteko.

Estis tre bona ideo eldoni la kongresajn paroladojn de la Majstro, ĉar ili estas veraj perloj, kiujn devas koni ĉiu esperantisto. La ok unuajn mondkongresojn Zamenhof malfermis tradicie per siaj paroladoj, kaj kiuj aŭdis ilin, neniam forgesos ilian efikon. Ili faris mirindan impreson al la aŭskultantoj, kiuj kiel revelacion aŭskultis la oratorojn de la Majstro. Tiuj ĉi paroladoj estas bone prilaboritaj, Zamenhof zorge preparis ilin de jaro al jaro, ili estas ideoriĉaj, klarstilaj, belegaj. Plenaj de esperantismo. En ili vera homo parolis al siaj homfratoj. Ili elradias la plej humanan homaranismon. Estas eksterordinare granda ĝuo kaj ĝojo legi kaj relegi ĉi tiujn paroladojn. Per ili oni povas vere ekkoni la noblan karakteron de la Majstro.

L. Halka

S. Stuit: SUR LA VERDA VOJO. Inter la flandroj. Eldonis: Frisa Esperanto-Instituto. Huizum (FR) Nederlando. 1937. 72 paĝoj.

Ĉi tiun libreton verkis nederlanda esperantisto, kiu instruis inter la flandroj laŭ la fama Cseh-metodo. Lirikaj rememoroj, eble plej bone tiel mi povus karakterizi ĉi facilstilan, agrablan verkon. Epizodoj, impresoj, vivo de esp-isto apud la rivero Izero. Plej sugesta kaj neforgesebla estas la ĉapitro: »La farun-muelejo«, transformita je fortikaĵo, kie kaj ĉirkaŭ kiu okazis sangaj bataloj dum la mondmilito dum longa tempo. Vere, emociplena priskribo kontraŭ la terurajoj de la milito.

L. Halka

Vilém Werner: HOMOJ SUR FLOGLACIO. Komedio en tri aktoj. Laŭ la tria eldono tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto Pioniroj, Olomouc. 1937. 110 paĝoj. Bindite.

Nun aperis ankaŭ en Esperanta traduko la jam mondfama teatraĵo de Vilém Werner: »Homoj sur floglacio« en tre bela eldono dank' al niaj bravaj Moraviaj Esperanto Pioniroj.

Ĝi estas tragikomedio plej reala, amara konsciens-konflikto, kiu en la kadro de putranta familia vivo respegulas nian tutan socion. Batalo de la infanoj kontraŭ la patro, lukto de generacioj prezentita en vervaj dialogoj. Kiel trafajn, vivplenajn scenojn havas ĉi tiu teatraĵo!

Ni vidas enscenigita nian propran vivon, la nuntempan aĉan sociordon, la teruran vivbatalon por la ĉiutaga pano.

La Esperanta eldono de ĉi tiu moderna komedio nepre pliriĉigos la mondfamon de la aŭtoro.

L. Halka

JAN VRBA: HOMO DE DIO. El la ĉefa tradukis: Jaroslav Hladky. 112 paĝoj. Eldonis: Moraviaj Esperanto Pioniroj.

Deksepjara knabo, kaŭze de meningito, perdas la aŭdpovon. Lia malespero, posta trankviliĝo, la trovo de sia loko inter la ĉirkaŭantaj homoj, lia rilato al la familianoj, precipe al la gepatroj, lia situacio en la kontoro, kie li iĝas utila, laboranta faktoro de la homa socio, lia dolora rezigno, kiam la amata knabino elektas anstataŭ li la sanan fraton, la trovo de sia vivsenco: subteni la maljunigintajn gepatrojn kaj esti bona al ĉiuj; kaj post la morto de la gepatroj la heroo ofero de sia vivo por savi la fileton de la amata edzino de sia frato: jen mallonge la temo de ĉi tiu romaneto. Ĉio ĉi estas rakontata per tiu simpleco, per kiu nur la plej grandajn aferojn oni povas rakonti. Kaj la aŭtoro montriĝas inda al la temo, eble nur en la meza parto de la romano, kiam li rakontas la vivon de lia heroo inter siaj kolegoj en la kontoro kaj lian rapidan validiĝon inter tiuj homoj, eble tie iĝas la rakonto iom skizeca, pala: tie la verkisto mem diras, kiel efikas al siaj ĉirkaŭantoj tiu ĉi stranga homo, sed ne sentigas tiun efikon per okazaĵoj, kiel decus al vera rotnanverkisto. Tamen en la unua parto, en la priskribo pri la konsciigo je la terura sortobato kaj la sekvantaj animumkrizoj, kaj en la tria parto, en la karakterizo de la rilato inter la heroo kaj la maljunigintaj gepatroj, la aŭtoro pruvigas bonega psikologo kaj profundira konanto de la homaj koroj. Altinspira humanismo spiras el ĉiu paĝo de la libro, ĝi apartenas al tiuj libroj, kies impresoj longe postvibras en la animo de la leganto; certe ĝi estas libro, kiu noble akcelas la strebon al la Bono. La tradukinto estu laŭdata pro la elekto.

La traduko ĝenerale estas tre kontentiga, ĝi preskaŭ atingas la celon de ĉiu bona traduko: malaperi modeste kaj forgesigi pri tio, ke oni legas neoriginalaĵon. Tamen estu permesataj kelkaj rimarkoj. »Li eĉ ektimis, ke iu el la ceteraj familianoj ne aŭdu ĝin.« La tradukinto certe volis diri: »Li eĉ ektimis, ke iu el la ceteraj familianoj aŭdos ĝin.« (Paĝo 10.) Sur paĝo 22.: »... kiel ilia korpa manko — kaj ankoraŭ pli ĝuste — ĝias konscio«, ĉu ne estus pli elegante eviti tiun ĉi strangan formon tiel: »... kiel ilia korpa manko — kaj ankoraŭ pli ĝuste — la konscio pri ĝi«. Post »plena« oni uzas »je« aŭ pli ĝuste: »de«, sed neniel »da«, kiel tion faras la tradukinto. Sur paĝo 37.: »Jordán malsereniĝis kaj amariĝis dum unu semajno«, hm, evidenta eraro, la teksto certe volas diri, ke Jordán estis malserena kaj amara dum unu tuta semajno, sed ne tion, kion -ig- esprimas, nome ke Jordán dum unu tuta semajno komencis esti malserena kaj amara. Paĝo 38.: anstataŭ »scenerio« uzendas *scenejo*. Sur la sama paĝo: *konfuzigi* estas uzata anstataŭ la ĝusta *konfuzi*. Sur paĝo 39.: anstataŭ »avanso« en la senco de rangaltiĝo mi preferus uzi »avanco«, des pli, ĉar ĝi jam estas registrita en la Parnasa Gvidlibro. Sur paĝo 51.: »montre-sciigante per la vizago«, ĉu ne sufiĉas: »montrante«? Paĝo 52.: »iratingis«, ĉu ne »atingis«? Ĉu ne estas stranga vorto sur la sama paĝo »falkaŭriĝis«? Paĝo 65.: »depost tiu tago«, ĉu ne sufiĉas »de tiu tago«? Paĝo 76.: »kromordinara«, ŝajnas al mi, ke pli bonas »eksterordinara«, aŭ »neordinara«.

Sed ĉi tiuj mankoj estas tiel sporadaj, ke ili neniam ĝenas la leganton, kiu cetere ne havas tempon por rimarki ilin: ja tiel lin katenas la libro!

Lali Blond

ARTUR DOMENECH: POEMOJ. En la eldono de Jaime Grau Casas. 36 paĝoj. Barcelono 1937.

Ce tiaj postmortaj eldonoj la recenzisto iom mallaŭtigu sian voĉon kaj ne tiel severe akcentu la eventualajn mankojn. Certe, se la aŭtoro mem estus aranginta la eldonon, li estus reviziinta siajn versojn kaj estus foriginta multajn el la malglataĵoj, nematuraĵoj de la volumo. Sed la eldoninto ja ne povis fari alion ol nur doni la versojn tiaj, kiaj ili restis.

La ĉefa temo de tiuj ĉi versoj estas la amo. Hm, sufiĉe elĉerpita temo, ĝi ne faciligas la laboron de la poeto. Kaj vere la poeto ne ĉiam sukcesas vekti la interesiĝon de la leganto, lia tekniko estas iom malforta, lia ritmo ofte

stumblas, kelkfoje lia verso estas kvazaŭ prozo. Ŝi ne povus kontesti, ke la aŭtoro havas inspiron de poeto, sed nur foje-foje li disponas pri la necesa esprimkapablo. Tamen troviĝas versoj, kiuj ekkaptas la fantazion de la leganto, ekzemple »La naskiĝo de amo« kaj mi pensas plej inde festi la memoron de la mortinto per la cito de ĝiaj lastaj strofoj:

»Tero, maro kaj ĉielo, penon kaj materialon
por modeli l' amfiguron ekliveris en komun':
ter' provizis por la korbo alabastron kaj opalon;
mar' por dentoj blankajn perlojn kaj por lipoj ruĝkoralon,
por hararo oran silkon la radioj de la sun'.

La helbluo de l' lazuro kun la mildo de gazelo
por okuloj kunfandiĝis, per magia sorĉkombin',
vangoj iĝis el du rozoj, pruntis voĉon la kardelo,
kaj al palma beltalio aliĝinte perla helo,
kiel spruc' de kisesenco, eknaskiĝis la virin'.

Kaj de tiam, de l' komenco de la mond', virino restas
la sanktejo, kie ardas la eterna ama flam':
celo gaja de la vivo, ŝi per sia ĉarmo estas,
kaj, vivanta amfiguro, tra l' jarcentoj ŝi atestas,
ke sur ter' la vivo floras, ĉar en ĝi regadas Am'.

Lali Blond.

ROLLET DE LISLE: FARADO KAJ ANALIZO DE
LA MALSIMPLAJ VORTOJ. Logika Esperanto. Paris,
35, rue du Sommerard, 1937. 28 pĝ.

La libro enhavas multajn interesajn kaj utilajn konstatojn pri la vortformado en Esperanto, sed, bedaŭrinde, mi devas diri, ke en siaj fundaj principoj ĝi estas erara.

En la Esperanta sintakso, kiel en tiu de ĉiuj lingvoj, la senpera determinanto de substantivo estas adjektivo, dum adjektivon kaj verbon senpera determinas adverbo (tuta lando, tute bela, tute forgesi).

La aŭtoro eraras en tio, ke ĉi tiun sintaksan manieron de senpera determino li volas trudi ankaŭ al la vortformado; do la determinanton de substantiva ĉefelemento li volas nepre analizi kiel adjektivon, tiun de la adjektivo kaj verbo kiel adverbos. Tiel li venas al rezultoj tute kuriozaj (ekz-e: *dormema*: dorm-ema) aŭ tro komplikitaj (*ĉevalejo*: por ĉevaloj destinata-ejo), ofte vere nekompreneble strangaj (*ĉevalaĉo*: ĉevalo estante-aĉa besto).

Estas strange, ke mian teorion pri vortformado li tute prisilentas, kvankam ties ampleksa prilaboriteco meritis, ke li almenaŭ provu ĝin refuti.

Kion diras mia teorio? Nu ĝi diras, ke la sintaksa determino kaj la vortkunmeta determino estas diferencaj, eĉ kontrastaj: ĉe vortformado ĝuste tiuj determinoj ne estas taŭgaj, kiuj en la sintakso estas la plej familiaraj. La determinanto en vortkunmeto ne povas respondi al la sintaksa senpera, rekta determinanto, sed ĉiam nur al determinanto malrekta (pere de prepozicio). Senperan, rektan determinon oni faras per aparta vorto (bona loĝejo; ne: bon-loĝejo — bonege farita; ne: boneg-farita — diligente lerni; ne: diligent-lerni). Male kunmetojn analizeblajn per prepozicio oni faras ĉiu-momente (*homloĝejo*: loĝejo de homo; *homplena*: plena de homoj; *ŝton-mortigi*: mortigi per ŝtonoj).

La aŭtoron eble konfuzas tio, ke anstataŭ DE oni povas uzi ankaŭ la a-finaĵon. Sed tie ĉi tiu finaĵo estas nur anstataŭaĵo de prepozicio.

Oni povus fari la regulon: En Esperanto nur tiuj kunmetoj estas bonaj, kiuj estas analizeblaj post la dismeto de la elementoj per intermetita prepozicio. Se ili estas analizeblaj nur per senpera determino, ili estas evitindaj.

Ce verba determinanto (ĉefelemento) oni havas apartan aferon: tie ĉi la flankelemento signifas la rezulton de la ago, kiun Esperanto esprimas ne per prepozicio, sed per predikata adjektivo (*purigi*: igi pura).

Nenio estas pli simpla, ol tiuj ĉi reguloj; ili rezultigas analizojn naturajn kaj facilajn, ne tiel harstarigajn, kia ekz-e: *densejo*: por dense kreski difinita-ejo (laŭ mi, simple: ejo de denso).

Esploro pri kapableco

Respondo al sinjoro Nekom Petent. Vi demandas nin, laŭ kiaj kriterioj oni esploras la kapablecon kaj meriton de la kandidatoj de la Lingva Komitato. Estus iom malfacile priskribi al vi tiun zorgan, ĝisfundan kaj detalegan esploron, kiun oni faras pri tiuj kompatindaj viktimoj, kiuj riskas submeti sin al tiu rigora ekzameno. Mi, malforta fraŭlino, apenaŭ kapablas tion al vi ekspliki. Prefere mi rakontos al vi mallongan historieton.

Bienulo foje anoncis, ke li serĉas mastrumanton.

Aperis antaŭ li kandidato.

— Cu vi scias bone mastrumi — li demandis.

— Nu, ne tre!

— Eble vi estas sperta pri bredado de kort-birdoj?

— Verdire, tute ne.

— Vi do scias kulturi fruktojn?

— Neniam mi provis.

— Produkti lakton?

— Apenaŭ.

— Grasigi porkojn?

— Porkojn? — ne!

— Diablon! — ekkoleris la bienulo. — Do kial vi vin prezentas? Kiom propre vi scias?

— Mi scias blasfemi kontraŭ la vetero!

Ĉi tion mi diris al vi sole kaj nure por vin amuzi. Mi rekte malpermesas, ke vi vidu en la supra historieto ian ajn analogion. Kaj mi ege protestus, se vi malice volus anstataŭigi la diversajn specojn de mastrumo per diversaj specoj de lingv-aferoj, kaj la veteron — per neologismoj. Tio estus misinterpreto, pri kiu mi ŝovus sur vin la tutan respondecon.

M. Alice Pilç.

Kompreneble, mi ne povis nun ree ekspliki mian tutan sistemon, kiu ja ankaŭ havas siajn komplikajojn de la plurelementaj kunmetoj, de la apudmetoj ktp. Sed certe ĝi neniam rezultigas tiajn monstretojn de analizo: *homeco*: de iu homon similanta-eco.

Se oni foje serioze konsiderus tiujn regulojn per detala diskutado, certe evidentigis ilia ĝusteco. Sed mi jam delonge rezignis tion esperi.

K. Kalocsay.

TUTMONDA ADRESARO aperos la 15. de decembro 1937. Akceptataj estas aliĝoj nur ĝis la 31. okt. 1937. La prezo de la enpresigo kosta 1 anglan ŝilingon aŭ 1 svisan frankon. Ciu paginto ricevas ankaŭ la Adresaron. Akceptotaj estas en la Adresaro ĉiu esperantisto kaj ankaŭ hoteloj, kafejoj kaj magazenoj. Ties prezo estas la duobla. Oni sendu ĉion al Internacia Esperanto Muzeo, Wien I. Neue Burg, Aŭstrio.

VARSOVIO KONGRESANO. No... Lerta glumarko por uzi sur valizoj de la kongresanoj. *Glumarkoj de la kongreso* en du koloroj.

KRYNICA. Bela, foto-ilustrita prospekto de tiu ĉi nun jam fama pola banloko, 24. paĝa. La banloko, vizitebla dum la tuta jaro, taŭga ankaŭ por vintro-sportoj, rajte portas la nomon »La reĝino de la polaj banejoj.« La kajeron lerte prilaboris la Scienca Esperanta Rondo en Bdygoszcz. plac Wolności 9.

I-A LABORISTA OLIMPIADO 1937. 25. JULIO — 1. AUGUSTO. *Konciza Gvidilo tra Antverpeno.* (Kolora titolpaĝo kun ŝajne flandra teksto.) 32 paĝa kajero kun antaŭparolo de la urbestro Cam. Huysmans, Antverpeno. Historia skizo, priskribo de la vidindaĵoj, kelkaj fotoj kaj multaj reklamoj.

LA MALGRANDA MONDO. *Lernolibreto por infanoj, verkita de Annie Rebers, ilustrita de T. Langeberg.*

Grandformata, 48 p. sur bona papero, forta kovrilo, prezo 30 cendoj hol., aŭ 3 resp. kup.

Ni devas kore saluti la aperon de tiu ĉi lernolibro, kiu enhavas lecionojn jam aperintajn en »La Vojo«, (monata infana gazeto de Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj). Laŭ la sciigo jam pli, ol 1000 infanoj estas instruitaj laŭ tiuj lecionoj. Ĝi ne enhavas komplete la tutan gramatikon, sed tre lerte kaj klare sur ĉiu paĝo alian lecionon kun vortoj kaj klarigoj pri historio de gefratoj, kio daŭras dum la tuta libro, ĝis la libertempo, kiam la infanoj, jam kiel bonaj amikoj, adiaŭas. Do la metodo estas simpla, amuza kaj verŝajne daŭre vekas la intereson pro kontinua rakonto. La vortaretoj kaj ekzercfrazoj estas en nederlanda lingvo, sed ĉiulingvano povas facile adapti la libreton, vere malmultkoston. Oni aparte povas ricevi (mendi) specialan gvidilon por la unuaj lecionoj, sed ĝi ne estis aldonita al la libreto. La instruisto devas forte prepari sin al ĉiu leciono, ĉar sur unu paĝo estas tro malmulte da ekzemploj kaj la gramatikon li devas klarigi en propra lingvo detale, kio ne enestas en la libro, do ĝi taŭgas nur por larĝa instruisto, tamen en ties mano ĝi certe alportos mirindan sukceson pro la interesa enhavo. La infanojn ja retenos ĝuste la malmulta teksto kaj amuzaj rakontetoj. Ili devas lerni la vortojn dum la lecionoj kaj hejme nur fari traduktaskojn (ankaŭ aparte mendotaj!). La libro ne enhavas la kunmetitajn formojn de la verbo, nur 18 pre-kaj ŝufiksojn, kaj la lastaj kvin lecionoj (paĝoj) estas ripeto de la ĝis tiam lernita gramatiko, sed kun novaj vortoj. Ĝi taŭgas ĉefe por lerneja instruado tutjara kaj oni nepre bezonas la duan volumeton (kie tenhavo aperos en »La Vojo« ĝis aŭgusto 1938), por daŭrigi la instruadon.

P. B.

POR INFORMI VIN... 8 paĝa kajereto de Libro-Servo de Esp. As. en Ĉeĥoslovakio, Praha XIX. Uralské nám 447.

VIZITU ĈEĤOSLOVAKION! *Ĉeĥoslovaka esperantistaro vin atendas.* Belega, moderna, foto-ilustrita kajero 12 paĝa, eldonita de la ĉeĥoslovaka komerca ministerio, enhavante ankaŭ la adresojn de la esperanto-societo kaj klubo en Praha. Plenaj informoj por turistoj, belegaj pejzaĝoj en ŝtato, kie esperantistaro estas dissemita kaj povas vere servi al la turisto.

VARSOVIO. *Pollando.* 24 paĝa fotoprospekto. Eldonis Ligo por Protekto de Turismo. Polaj Stataj Fervojoj 1937.

Bela, alloga eldono, invitilo al la kongreso, grandaj fotoj, adresoj de esp. societoj, malgranda urboplano, detala priskribo de kelkaj vidindaĵoj. Aparte valora la paĝo pri esperantaj tabuloj kaj tombo de Zamenhof. Sincera gratulo!

AUSTRIO 44 paĝa fotoilustrita kajero kun landkartoj pri fervoj-kaj aŭtovojoj. Eldonis Österreichische Verkehrswerbung, Komerca kaj Trafika Federacia Ministerio. Wien, I., Nibelungengasse 4.

La koloraj titolpaĝoj de la aŭstraj eldonaĵoj estas jam konataj, sed tiu ĉi meritas apartan laŭdon pro ĝia enhavo kaj amplekso, priskribante la federaciajn landojn, lagojn, saniglokojn, trafikilojn, ĉasadan, sportan, studajn eblecojn kaj rabatojn. Ni devas fieri pri tiu ĉi oficiala eldono!

P. B.

KOREKTO

Bedaŭrinde, la artikolo de Zamenhof en la n-ro 1. 1937 de *Lingvo-Libro* pri *Juda Gramatiko kaj Reformo de la Juda Lingvo*, tradukita el la juda, estis presita, pro malatento, sen la lasta preskorekto. Tiel okazis, ke ĝi svarmas de preŝeraroj.

La unuan parton, ĝis la unua steleto, verkis la tradukinto de la artikolo; la duan, ĝis la dua steleto, la redakcio de la »Lebn un Visnŝaft«, kie la artikolo siatempe aperis: Ni represas tie ĉi el la parto I. la 4, 5, 6, 9 kaj

el la parto II. la 4. kaj 17. alineojn; la romaj literoj signas la partojn, la arabaj la alineojn:

I.

(4) Por nia amaso aliaj lingvoj restos ankoraŭ por longe nealireblaj kaj ĝi devos legi ekskluzive judlingve. Do ni ne pereigu almenaŭ ĝian eblon legi per la neglekto de niaj aŭtoroj, la amaso ellernu sisteme, uzisian lingvon laŭregule kaj tiam la juda lingvo estos precize tia sama faktoro potenca de civilizo por judoj, kiel por ĉiu ne-judo, ne komprenanta aliajn lingvojn, lia gepatra, en kiu li povas legi.

(5) Inter la judoj estas multaj, kiuj ne komprenas la jargonon, sed ili volonte ĝin ellernus; inter la ne-judoj estas multaj, kiuj volus konatiĝi kun la lingvo de la judoj. Tamen, nun al homo, kiu ne loĝas en juda medio, estus pli facile lerni la lingvon de iu afrikana gento, ĉar ties gramatikon li povas akiri, sed ellerni la lingvon de milionoj da kulturaj en la tuta mondo konataj judoj estas absolute neeble! Bona gramatiko kaj konvena vortaro de jargono faras la lingvon, fine, atingeble facila por ĉiu lernonto.

(6) Sed, se ni deziras el la jargono fari lingvon, kiu havu kulturigan signifon por la judaj amasoj kaj samtempe estu lernebla por ĉiuj, kiuj ĝin ne komprenas kaj deziras ĝin lerni, ni devas antaŭ ĉio enkonduki por la jargono la latinajn literojn. La hebrea alfabeto kun la punktado anstataŭanta la vokalojn, kun la nedifinitaj, komplikaj S K T V kaj H-literoj, inter kiuj estas maleble nuanci; kun la absolute malklara prononco de multaj literoj ekz. »Vov« legiĝas kiel »V« »U« kaj »O«; A. I. E. povas esti eldiritaj kaj ne, kaj ilia elparolo estas tute neklara; B. K. P. T. S oni devas aparte punkti, se oni volas ilin legi tiel kaj ne alie, tiu alfabeto estas tute neadaptita al nuntempa lingvo kaj faras la uzon de jargono en ĉiuj rilatoj malfacila.

(9) Vere, nia okulo estas jam kutima al la jargono kun la hebrea alfabeto kaj la unuan tempon la jargono skribita kun la latina alfabeto havos strangan aspekton en niaj okuloj. Pli ol unu rutinulo verŝajne ridetos pri la »europeigita« jargono. Sed en tia grava afero, kia estas kutimiĝi la popolon al ĝusta legado kaj skribado kaj krei por la inteligentularo liberan aliron al la lingvo kaj literaturo de siaj fratoj — en tia grava afero la kutimo de la okulo, kompreneble, havas nenian signifon kaj se troviĝos tiaj, kiuj ridos, ni devas al ili respondi per malŝata silento. Sed se estas tre malfacile lukti kontraŭ la malnova kutimo, ni povas ja agi same kiel la germanoj en tiu okazo, enkonduki la latinan alfabeton poioime. Tiel ekzemple la jargonaj gazetoj povos unu el siaj fakoj komenci presi per latinaj literoj, poste pligrandigi la nombron de tiaj fakoj, ĝis la legantoj fine alkutimiĝos al la nova alfabeto, kiu kun la tempo tute elpuŝos la malnovan hebrean.

II.

(4) Erare oni kutime skribas en tiaj vortoj kiel hant (mano), vant (muro) k. a. la literon d ĉe la fino, ĉar oni opinias, ke t estas ne akre elparolita d. Kie la judlingva vorto finiĝas per d, tie la judoj elparolas tiun literon akre. Multaj vortoj, kiuj havas en la germana la literon d, havas en juda t kaj inverse. Ekzemple: en germana: Wind Hund; en juda: vint (vento), hunt (hundo). Pli akre tio aŭdiĝas ĉe hintlah (hundetoj) vintel (venteto). Germane: Schwert, Bart, jude bord (barbo) ŝverd (glavo); berdlah (barbetoj), ŝverdlah (glavetoj).


(17) Oni devas eviti vortojn, kiujn oni uzas en unu regiono aŭ ĉe iu klaso de homoj. Oni devas do, eviti la uzon de provincismoj, aŭ germanaj kaj hebreaj vortoj, kiuj estas malmulte bezonataj; ĉefe oni devas eviti slavajn vortojn, ĉar la unuaj estas iel proksimaj al la juda lingvo, dum la lastaj estas al ĝi preskaŭ tute fremdaj kaj plejparte nekonataj al la amaso de judoj, kiu ne loĝas en Rusujo.

*

En la unua alineo de la dua parto, la literoj z, Z devas havi supersignon.

NOVAĴOJ

el la eldonejo de Literatura Mondo



Naskiĝis en la kliniko de LITERATURA MONDO en aŭgusto 1937.
Generis: la sopiranta popolo kaj la mortinta Pirato — Edukas * * *
Frapas ĉiunonate
Nekorespondas la adreso: Budapeŝt, IX., Soroksári-ŭt 38.
Adresojn de monelpumpejoj vidu sur la dua paĝo
Pri pezeraroj respondecas la kompostisto

Moto:

Pasintan fumon de pirata pipo
sekvas pinĉa krak' de frapanta vipc
Sur haŭto ĝia frap': veron diras lipc

Jara abono 0.80 USA dolaroj. — Eldonas LITERATURA MONDO, Budapeŝt.
Postulu senpagan specimenon de la eldonejo.

LA CELO

SENPAGA GAZETO POR KOMENCANTOJ. — APERAS MONATE.
Eldonas LITERATURA MONDO Budapeŝt, IX., Soroksári-str. 38.

Kursgvidantoj postulu senpagan alsendon de la eldonejo.

ARGÛNTA DUOPO

Jubilea libro pri Baghy — Kalocsay

Kunlaboris ĉiuj eminentaj esperantistaj verkistoj, poetoj kaj amikoj de la jubileuloj.
La interes-varia enhavo de la libro, la intimaj priskriboj, la plej karakterizaj verkoj de la jubileuloj, faras la libron unika en sia speco.

Eleganta, bela, dukolore presita libro

en la formato de 235×15.5 cm.

Du volumoj, entute 384 paĝoj.

Enhavo de la I-a volumo:

La jubileantoj parolas pri si mem — Oni parolas pri la jubileantoj — Ilustraĵoj.

Enhavo de la II-a volumo:

Teatraĵoj — Poemoj — Scenoj — Muziknotoj — Ĉio, kio sufiĉas por aranĝi programajn vesperojn en grupoj.

Prezo: I-a volumo — 90 dolaroj, II-a volumo 1.10 USA dolaroj.

Aldonu 10% sendkostojn. — Aĉetanto de la du volumoj ricevas senpage unu bindilon por ambaŭ volumoj.



*Nia sperto, kaj rimarko,
Libron nur kun LoMo marko!*

ORA LIBRO

de la Esperanto-Movado

R E D A K T I S:

V. Bleier—E. Cense

Vi trovas en la libro trarigardon pri la unua jarkvindeko de Esperanto. Dediĉante paĝojn al la memoro de pioniroj kaj veteranoj, sekvas interesaj artikoloj pri temoj aktualaj kaj interesantaj ĉiun esperantiston. Legante la libron, facile kaj ĝue vi ekkonas la ĉefajn trajtojn, historion de Esperanto. La interesaj profetaĵoj pri la dua jarkvindeko de Esperanto pensigas ĉiun esperantiston.

La libro aperis en la formato de 23.5×15.5 cm. — 240 paĝoj, kun ilustraĵoj.

ENHAVO:

Paĝoj de Honoro — Paĝoj de Historio — Paĝoj de Profetaĵo — Ilustraĵoj

Prezo: 0.72 USA dolaroj plus 10% sendkosto.

Ĉefkomisio ĉe LITERATURA MONDO, Budapeŝt, IX. Soroksári-str. 38

**Nia sperto, kaj rimarko,
Libron nur kun Como marko!**

HENDRIK WILLEM VAN LOON


Rigardu la teron

Tradukis: Georgo Saville

La libro ampleksanta 456 paĝojn estas unu el inter la plej reprezentaj verkoj de Literatura Mondo.

Facilstile, ĝue ĝi instruas la geografion de nia planedo. Van Loon skribas pri ĉio kun la lerteco de sperta stilisto, ofte ŝerce, kaj tiom logike, ke li ne nur geografion donas al la leganto, sed ankaŭ la emon logike pensadi. Amuza helpilo en la libro estas ankaŭ la okulfrapaj, tre instruaj ilustraĵoj.

Ekzemple;



La Gofa Fluo en via kuirejo

Formato: 23.5×15.5 cm. 456 paĝoj, kun ĉ. 200 intertekstaj ilustraĵoj kaj 28 koloraj tabuloj.

Prezo: Broŝurita 2.60, bindita 2.95 USA dol. Aldonu 10% por sendkosto.
Broŝurita sen la koloraj tabuloj 1.80 dolaroj.

Mendu de la eldonejo; LITERATURA MONDO, Budapeŝt, IX. Soroksári-str. 38

**Nia sperto, kaj rimarko,
Libron nur kun Como marko!**

LINGVO * LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapest, IX. Soroksári út 38. V. 6. Hungarujo. Aparte aĉetebla. Unu numero kostas 0.05 USA dol. aŭ egalvaloron. Tri numeroj kune ekspe-dataj kostas nur 0.10 USA dol. aŭ proksimuman egalvaloron.

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Aperas kvaronjare. Nro 3-4. 1937

ĈIRKAŬ „LA RIFUĜEJO”

La artikolo de N. Kurzens, »La Rifugejo«, en la antaŭlasta numero de L. L. vekis grandan interesiĝon. El la multaj eĥoj, jen la respondo de K. R. C. Sturmer:

»La artikolo de Kurzens estas interesa kaj lerta, sed false bazita kaj erariga. Cetere, el lia bona opinio pri »Maria kaj la Grupo« oni emus konkludi lian nekompetenton pri literaturo.

Cia literaturo estas rifugeca. La respekto de s-ro Kurzens por Milton, Goethe kaj Puŝkin ŝajnas al mi pure tradicia kaj iom snobisma. Veras, ke multas la rubaĵo en Esp-o, sed tio estas egale vera pri la angla, franca, germana kaj hungara lingvoj, kaj neniel deprenas de la granda talento de Kalocsay kaj Baghy kaj aliaj elstaraj verkistoj niaj. Estus absurde diri, ke Kalocsay kaj Baghy estas »pesitaj kaj trovitaj tre malpezaj«. De kiuj?

Sed verŝajne oni devas atendi, ĝis ili estos tede trudataj, pro tradicia kaj historia valoro, en gimnazioj kaj universitatoj, same kiel Milton, Goethe kaj Puŝkin nuntempe.

La du lastaj paragrafoj de Kurzens estas vere inteligentaj kaj trafaj, sed mi sugestas, ke oni ne nur eduku, sed ankaŭ subtenu por aĉetado. En la nuna tempo tre malmultaj legas Esp-ajn librojn, sed eblas sugesti, ke oni donacu ilin kelkfoje, je festaj tagoj. Tia kutimo donos al s-ro Kurzens kaj aliaj la okazon eduki per selektado, kaj plenigos ilin per agrable supereca emocio.«

Nu, partoprenante en tiu ĉi diskuto, mi kredas, ke s-ro Kurzens tre trafe konstatis la staton de nia literatura vivo kaj ties malfortaĵajn flankojn. Tamen, mi opinias, ke li, pravega, en la konstato, estis malpli bonŝanca en la trovo de helpo. Per tio mi ne volas diri, ke lia postulo pri severa kritiko estas malgusta: estas vere, ke egala laŭdado de valoraĵoj kaj rubaĵoj estas rekte malutila, ĉar ĝi erarigas la legantan publikon: kuraĝigas la fuŝulojn kaj ĉagrenas la talentulojn, kiuj devas ree kaj ree sperti, ke ilia laboro ne estas taksata distinge. Do estas tre vere, ke la kritiko en Esp-o devas esti pli zorgata, ke la gazetoj kaj revuoj devas pli bone elekti siajn recenzantojn, ke la recenzado

devas ne esti plu oportuna rimedo ricevi librojn senpage, sed tasko zorge farata kaj responda.

Tamen, la kritiko ne sufiĉas sola. Bonan literaturon povas evoluigi nur leganta, komprenema, vivtenanta publiko. Jes, publiko, jen la unuavica bezonaĵo, laŭ mia opinio. Tia publiko certe eldevigas por si taŭgan literaturon, eĉ taŭgajn kritikistojn.

Efektive, neniam mankis talentuloj, kiuj volis sin dediĉi al la Esp-a literaturo. Se citi nur unu ekzemplon: kiel Esp-a poeto debutis unu el la plej grandaj nuntempaj poetoj de sia gepatra lingvo. Kaj kiel multaj eksilentas! Jes, legante ion valoran, mi ĉiam time pensas: Ĉu la aŭtoro ne estas tro talenta por resti Esp-a verkisto? Kiel longe li toleros nian senkritikecon, senpublikecon kaj — niajn simplistojn.

Kaj tie ĉi mi alvenas al la plej granda malhelpo de nia literatura evoluo — al la *simplismo*. Tiu propagandan devizon pri la eksterordinara simpleco de la lingvo, kiun Zamenhof siatempe prave proklamis pri la ekiranta, infana, senliteratura, sennuanca, senevolua Esperanto, tute anakronisme, malprave, eĉ rekte danĝere estas tro emfazi nun, kiam la literaturo, postulanta riĉan lingvon, propran lingvospiriton, firm-spinan sintakson, estas ne nur ornamento aŭ kurioza frandaĵo, sed, inter la nunaj cirkonstancoj, preskaŭ la ĉefa valorajo kaj plej grava manifestiĝo de nia movado. Pro tia devizo estiĝas esp-istaj amasoj, kiuj, konvinkinte pri tio, ke ili komplete ellernis ĉi tiun malmultvortan, sengramatikan, mirakle facilan lingvon, ĉe la lego de la unua paĝo de libro, kaj ĉe ties nekompreno, kun plena senreviĝo forjetas la libron — kaj ofte ankaŭ Esperanton.

ELLERNI — postulis iam Hodler, kaj ripetis Szilágyi sur ĉi tiu sama loko. La saman potencon organizon, kiun oni jam havas por la rapida duonbakado, oni devas ellabori por la perfektigo. Kiel Lali Blond prave diris, la interna propagando ŝajnas nun pli grava ol la ekstera. Se ĉiujn homojn, kiujn oni jam sukcesis varbi por la lernado de la lingvo, oni sukcesus perfektigi en la lingvo-scio, oni havus publikon, kiu indigas, kaj eĉ honorariojn, kiuj ebligas dediĉi vivon kaj talenton al nia literaturo. (-y).

Pri la Plena Gramatiko

RESPONDO AL SRO MARCELÉ

(Daŭrigo)

18) Vi ne akceptas nian distingon inter la signifo de la pasiva, mediala kaj refleksiva voĉoj. Tamen, kiam oni diras:

la knabo estas rulata

oni subkomprenas aganton, kiu rulas la knabon. Male, kiam oni diras:

la knabo ruliĝas

oni tute ne pensas konscie pri ekstera aganto; oni pensas nur pri la ruliĝo de la knabo, kiun ruliĝon li faras per si mem. Estas eble, ke iu lin ekrulis, sed tiu ne estas aganto, sed nur kaŭzanto. Kaj fine:

la knabo rulas sin

signifas, ke la knabo estas konscia aganto.

19) Vi diras, ke *cis* = *ĝis*. Por refuti tion sufiĉas citi solan frazon: *La bieno etendiĝas cis la rivero ĝis la landvojo kaj trans la rivero ĝis la monto.*

Vi diras, ke la Esp-a *ĝis* devenas de la latina *cis*. Estas eble. Sed ankaŭ konduki devenas de *conducere*, same kiel *kondukti*. Kaj el la germana *Bollwerk* devenis la franca *boulevard* kaj ĉi tiun la germanoj uzas kiel fremdan vorton, kun alia signifo ol *Bollwerk*. Unu radikido povas naski dum migrado plurajn infanojn kun diversaj signifoj.

20) Vi kondamnas la Zamenhofan »elflati monon«, ĉar »tiu ĉi prepozicio ne estas en ĝusta loko. Efektive, ĝi devus enkonduki la personan komplementon, kiu montras, el kiu oni akiras la monon. Pro la forigo de tiu komplemento, ĝis enkonduka prepozicio devas malaperi, ĉar ili ambaŭ faras tuton.«

Nu, se tio estus vera, oni ne povus diri: *enbati najlon, kunlabori en entrepreno; transdoni leteron*; ĉar oni ja ne volas diri: *bati en najlon, labori kun entrepreno, doni trans letero*. Kaj ĉu *subaĉeti homon* signifas: *aĉeti sub homo*?

Prepozicio kiel prefiksoido povas rilati al la cirkonstanca komplemento, esprimata eventuale per akuzativo (*eniri domon*), sed ankaŭ al subkomprenata komplemento: *elflati monon* (el iu); kaj eĉ al la post si staranta radikido mem: *perlabori* (-i per laboro). Tio estas nia sistemo, kaj tio estas la sistemo Zamenhofa.

21) Vi ne trovas en *peri* tiun individuan sencon, kiun mi. Sed rigardu:

Sendi leteron anstataŭ servisto.

Sendi leteron per servisto.

Jen du frazoj. Nun ni esprimu per la verbigo de la prepozicioj, kio okazis ĉe tiu sendo. En la unua okazo, evidente:

letero anstataŭis la serviston.

Se nun ni faras analogie frazon pri la dua okazo, ni ricevas:

letero peris la serviston.

Sed okazis ĝuste male:

servisto peris la leteron!

Vi argumentas pri la analogieco per tio, ke *peri* kaj *anstataŭi* estas: *esti pera, esti anstataŭa*. Sed tio nenion pravas, ĉar mem *pera* jam devenas ne de *per*, sed de *peri*. Ni rigardu:

anstataŭa afero estas afero *anstataŭ io*

pera afero ne estas *afero per io*, sed *afero per kiu okazas io*.

Tamen, *pere de* = *per*; analogie al tio, ke *helpi* proksimume estas *peri* kaj *helpo* de proksimume estas *per*.

Iom teorian, oni povas konkludi el ĉi tio strangajn aferojn. Nome, ni vidis, ke *per* ne kondukas ĉe la pliformado kiel la ceteraj prepozicioj, kaj, aliflanke, ke ĝi estas samsignifa kun *pere de* devenanta el la verba radikido *peri*. Oni do povus diri, *teorie*, ke *per* estas verba radikido, kaj la pseŭdo-prepozicio *per* estas simpla mallongigo de *pere de*, simile, kiel se ni farus el *helpo* de la pseŭdo-prepozicion *help*, aŭ el *fare de* la pseŭdo-prepozicion *far*.

Tiu ĉi lastan ni eĉ kuraĝis proponi por signi la agant-suplementon (kondamno *far* juĝisto).

Kompreneble, mi tre bone scias, ke *per* devenas etimologie el la latina prepozicio *per*. Sed nun mi faris esploron de lingvuzo, kaj ties rezulton ne povas sanĝi la etimologio.

22) Kion vi diras kontraŭ *logio*, tion oni povis diri ankaŭ kontraŭ *ism*, kiu same ne estis Esp-a elemento. Sed la analogio komencis ĝin trudi kiel tian, ĉar ea *oportunismo*, *latinismo*, *patriotismo* ktp. ĝi ŝajnis sufiksoido anstataŭ Esp-aj elementoj. Kaj tiel oni komencis uzi: *utilismo*, *homaranismo*, *adasismo* ktp. Fine ĝi estis oficialigita. Kaj, kio okazis pri *ism*, tio, *eble*, okazos ankaŭ pri *logio* (kp. *esperantologio*).

Cetere, mi kredas, ke unu el la vojoj de riĉiĝo estas, se Esp-o levas kelkajn oportunajn pseŭdoafiksojn al la rango de efektiva afikso. En la P. G. ni simple montris kelkajn tiajn eblojn, sed sen evidenta propono.

23) Vi diras, ke *virŝafo* estas *vira ŝafo*; laŭ nia sistemo ĝi estas *viro ŝafo*. Kiu estas prava.

Unuavide ŝajnas, ke vi. Efektive, ĉe la apudmeta kunmeto ĉiam la akcentata substantivo staras antaŭe: *instruistino* estas unuavice *instruisto* kaj nur flanke *ino*; en *majstro-ŝuisto* oni akcentas *majstro*, en *ŝuisto-majstro* oni akcentas *ŝuisto*. Sekve, laŭ la analogio de la in-kunmetoj, en *virŝafo* ŝajnas erara la akcentado de *vir*. Ŝajnus do, ke oni devus diri *ŝafviro*.

Tamen, tiu ĉi vorto ne taŭgas. Nome *vir* estas unuavice radikido, kies kunmetoj analizigas laŭ rilato: *ŝatviro* = *viro de ŝato*. Sekve, la analogio trudas ĉiam ĉi tiun analizmetodon, do *ŝafviro* estos komprenata prefere kiel *viro de ŝafoj* (ŝafisto). Oni do povus diri, ke la neceso trudis tie ĉi la prefiksitan uzon de *vir* (= *vira*), kaj ke oni devas ĝin klasi inter la veraj prefiksoj.

Tamen, ni klasis ĝin inter la radikoj pro jena konsidero:

En Esp-o mankas la signo de vireco: oni indikas ĝin ordinare per la nuda substantivo: *anglo* (viranglo); *kapro* (virkapro) kaj *kaprino*. Sekve, oni uzas *vir-nur* tiam, kiam oni volas akcenti, neprigi la virecon. Kaj tiu ĉi nepriga intenco tute bone motivas, ke oni metas *vir-* sur la pli akcentatan lokon.

24) Vi diras, ke *disde* estas malbona, ĉar »*dis* montras malkunigon. Sed, por ke ĝi estu ebla, necesas esprimita ago: *disdoni, disjeti* ktp. Sed en *disde*, kie estas la ago?»

Mi tute ne sentas tiun neceson. Ni vidu analogion.

Forjeti de si estas samsignifa kun *jeti for de si*. *For* montras malproksimigon kaj evidente, por ke ĝi estu ebla, necesas malproksimiga ago. Tamen, *for* staras sola, kaj la ago estas esprimita aparte:

Trans montras: en la alia flanko de disiganta spaco. Do, por ke ĝi estu ebla, necesas tia spaco. Sed, ĉe *transdoni leteron*, kie estas tiu spaco? Nu, ĝi estas subkomprenata: ĝi estas la spaco inter la donanto kaj la ricevanto.

Do, la necesa koncepto tute ne devas esti esprimita tuj post la prefiksoido. Ĝi povas esti esprimita aparte, kaj povas esti eĉ subkomprenata.

For de kaj *disde* estas tute analogiaj, ĉar *for* kaj *dis* ambaŭ havas adverban sencon. Sed, ĉar *dis* ne kutimas stari aparte, ĝi serĉas elementon, al kiu ĝi povas gluiĝi. Kaj, ĉar post ĝi staras prepozicio, ĝi gluiĝas al tiu.

Vi diras eble, ke prepozicio ne povas havi prefikson. Sed kion fari pri *malantaŭ*?

Oni riproĉis al *disde* alian aferon: ke *dis* signifas *for en ĉiuj direktoj*. Sed tio ne estas nepra. Per la frazo: *ŝi kaj li disiĝis por eterne* — oni certe ne volas diri, ke ambaŭ dispeciĝis laŭ ĉiuj direktoj. Ne estas do tro arbitre fari la konvencion, ke *disde* montru unu el la multaj sencoj de *de*: la lokan malproksimigon.

La avantaĝo de *disde* estus, ke ĝi estas kunmeto, do, se oni alkitimigus, oni apenaŭ sentus plu en ĝi la sencon

de *dis*, kaj oni uzas ĝis senĝene nur laŭ la konvencia senco. Male, ĉe *for*, kiu staras aparte, oni ĉiam sentas la propran sencan de *for*, kaj oni sentas ĝin troa en la esprimoj: *aceto for de*; *distingo for de* (vere, mi neniam renkontis ĝis nun tiujn ĉi esprimojn).

La samon, kaj eĉ plie, oni povas diri pri *de el*. Ĉar *el* staras sola oni tro sentas ĝian propran sencan: *el la interno eksteren*. Kaj en *aceto de el* u tiu propra senco tiel ĝenas, ke la frazo estas apenaŭ komprenebla ĉe la unua renkonto.

Disde do estas oportuna. Mi ne komprenas, kial oni protestas kontraŭ oportuna solvo tiom, ke oni pene serĉas kontraŭ ĝi argumentojn.

»Sama rezono estas aplikebla al *ekde* — diras vi. Kaj ankaŭ mi diras tion. Ĝi ne estas nova: Grabowski iniciatis ĝin jam antaŭ almenaŭ dudek jaroj, kaj, ĝojinde, ĝi pli kaj pli enhejmiĝas.

25) Vi diras, ke se oni uzas *ek* kiel interjekcion, oni rajtos uzi tiel ĉiujn prefiksojn kaj eble ĉiujn sufiksojn. Kaj vi faras la frazon: *mi ŝatas mian patrinon, bo!*

Jes! Argumenti per troigo! Tio estas tre ŝatata en Esp-ujo. Jen, mi sekvas vian ekzemplon:

Se oni uzas la interjekcion *fi* kiel prefikson, oni rajtas uzi tiel ĉiun interjekcion. Do:

fi insultas pri malnobleco; malnobla homo estas *fihomo*.

bez mokas pri konfuziteco, stulteco; stulta homo estas *behomo*.

bis aprobas aktoron; aprobinda aktoro estas *bisaktoro*.

pa esprimas senzorgecon; senzorga homo estas *pahomo*.

ba esprimas nekredemon; nekredema homo estas *bahomo*.

Kaj tiel plu.

26) La bonega solvo de Zamenhof, ke oni povas per la prefikso *pri* uzi verbon tiel, ke ĝia nereкта komplemento iĝas ĝia rekta komplemento, estas al vi absurda, ĉar ĝi ne konformiĝas al viaj rigidaj reguloj. Tamen, tio estas ne nur oportuna, sed ankaŭ natura, ĉar ĝi ne postulas eĉ konvencion.

Serĉi poŝon signifas, ke oni volas trovi poŝon. *Pri-serĉi poŝon* signifas, ke la serĉado koncernas la poŝon, sed ĉelas la enhavon de la poŝo. Same oni povas klarigi ĉiujn *priverbojn*. *Pri* ja signas proksimume *koncerne de* do oni signas per ĝi, ke temas nur pri koncernateco, ne pri rekta trafo.

Kompreneble, kiam la verbo havas prikomplementon, la prefiksoida kaj la prepozicia *pri* estas preskaŭ samsignifaj: *pripensi* — *pensi pri*. Sed kiam la koncernatecon oni devas montri per aliaj prepozicioj (de, al, en), *pri* povas esti uzata nur prefiksoida, ĉar tiam, en la kunmeto, oni ne sentas plu tiom ĝian propran sencan, ke ĝi ne povus esti uzata pli larĝe, en la senco de diversmaniera koncernateco.

Denove la sama afero. Ni ĝojas pri Zamenhofs oportuna solvo; vi katenas vin per viaj aprioriaj principoj kaj volas rigidigi tion, kio estas fleksebla.

27) Vi diras, ke *lumo* estas substantiva, sekve el ĝi devenas *luma*, kaj tiu ĉi naskas *lumi*: esti luma. Poste vi diras, ke *lumigi* estas *igi lumi*.

Nu, sekve: *ŝtono* estas substantivo, do ĝi naskas *ŝtona*, kaj tiu ĉi naskas *ŝtoni*: esti ŝtona.

Jen kion mi diris komence: vi formas okaze regulon, tute ne zorgante pri tio, ĉu ĝi estas ĝenerale valida.

Se *lumo* estas radike substantiva, ĝi naskas *lumi* senpere, same kiel senpere naskas *ŝtono* la verbon *ŝtoni*.

Sed vi diris, ke *igi* estas ĉiam *igi -i*, se ĝia substantiva flankelemento estas senpere verbigebla. Sekve: *lumigi* estas *igi lumi*. Jen via embaraso.

Laŭ mia opinio, *lum* estas verbradiko, kun la signifo: eligi radiojn. *Lumo* estas la ago *lumi* kaj samtempe ties rezulto, same kiel *sono* estas la ago *soni* kaj samtempe ties rezulto. *Lumo* naskas *luma* (lumo-a): karakterizata de lumo.

Ĉar io povas esti karakterizata de propra aŭ mal-

propra lumo, *luma* estas dusignifa (luma lampo — luma ĉambro). Same ankaŭ *lumigi* (eklumigi lampoj; la suno lumigas la ĉambrojn). Tio estas la nuna uzado.

Se oni volas ĉesigi tiun dusencecon, oni povas uzi *lumigi* nur en la unua, faktitiva senco, kaj en la dua senco uzi la Zamenhofan *prilumi* (lumigita lampo; prilumata strato, prilumitaj faktoj).

Provizi per ne-propra lumo estas esprimebla »ekzakte« per *prilumigi* aŭ per *lumumi*.

28) Via argumentado kontraŭ la a-finaĵo de la virinomoj estas interesa ekzemplo de tiu pensmaniero, kiu apriorie rifuzas ĉion novan, kaj poste serĉas argumentojn por tiu rifuzo.

Estas nekontesteble, ke la problemoj de la virinaj nomoj estas nesolvita en Esp-o, aŭ almenaŭ ĝi ne estas solvita kontentige. Kaj estas sendube, ke la plej naturajn, elegantajn, malpezajn formojn oni ricevus, se oni formus ilin per -a.

Sed tio rompus fundamentan regulon. Mi do elpensis rimedon, iom eble ruzan, per kiu, kiel oni diras hungare, oni povas satigi la kapron kaj konservi la brasikon. Ĝi, estas la adjektiva esprimo de la virinomoj, kun subkompreno de la elemento *ino*. *Julia* do estus *Julia (ino)*.

Tiun gajnon vi ŝajnas envii al Esperanto, ĉar vi klopodas ĉiel pruvi, ke oni ne povas tion fari. Ĉu vi estas prava?

Vi diras, ke la adjektivo montras genitivan rilaton, do *Julia ino* estas *ino de Julio*. Sed tia senco ne estas nepra!

Nome, la a-finaĵo havas diversajn sencojn, el kiuj unu estas: *kiu estas -o*. Ekz-e: *kverka arbo* estas: *arbo*, kiu estas kverko. Precipe ĉe personnomoj validiĝas tia senco; ekz-e *egoista giganto* estas ne giganto de egoisto, sed giganto, kiu estas egoisto. Pro tio, ĉe personindikaj apudmetoj oni ofte povas adjektive esprimi iun ajn el la du elementoj: *majstra oratoro* aŭ *oratoro majstro* diras ja preskaŭ la samon; simile: *soldata kamarado* kaj *kamarado soldato*, ambaŭ estas *soldatkamarado*.

Nenio malhelpas do, ke la esprimon *Julia ino* oni komprenu: *ino, kiu estas Julio*.

La konvencio konsistas nur en tio, ke ĉe la adjektiva formo de personnomoj oni subkomprenas la vorton *ino*. Kaj tiu konvencio estas tre fruktodona; la malfacila problemoj estas per ĝi solvita en maniero donanta naturajn, malpezajn, elegantajn formojn. Tion malhelpi do oni povas vere nur pro blinda rifuzemo kontraŭ ĉio nova.

29) Vi diras, ke *kunordita* estas malbona vorto, oni devas diri *kunordigita*.

Laŭ vi, *ordo* devenas de *ordi* (esti en ordo). *Ordi* ne povas signifi *meti en ordon*, ĉar tiam *ordo* estus *meto en ordon*.

Sed tie ĉi via gvidas danĝera principo: la fama »renversebleco« de Couturat. Same li diris, ke *marteli* ne povas signifi *agi per martelo*, ĉar tiam *martelo* devas signifi *agon per martelo*.

Laŭ la Fundamento kaj laŭ ĉiuj vortaroj, *ordo* estas substantiva radiko. Sekve, el ĝi oni povas senpere pluformi verbon: *ordi*. Se oni volas esprimi la nomon de la ago *ordi*, oni devas apliki *ad*, signante per ĝi la elfalantan i-finaĵon. La serio do estas: *ordo* — *ordi* — *ordado*. Tio tute konformas al la latina kaj itala lingvoj: *ordo* — *ordinare* — *ordinatio*; *ordine* — *ordinare* — *ordinazione*. Ankaŭ tie ĉi la pluformado okazas senpere per *-are* (= -i).

Kio estas la senco de *ordi*? Ni trovos ĝin per analogio. *Ordo* estas sence iom parenca al *formo*; ĝi signas tiun formon, kiun aro da objektoj prezentas en sia ĝusta aranĝiteco.

Formi ion signifas: doni al io formon. Sekve:

Ordi ion signifas: doni al io ordon.

Se *ordo* estus substantiva formo de la verbo *ordi* (= esti orda), oni certe ofte renkontus tiajn frazojn: *la aferoj ordas*, ĉar estas nature, ke oni ofte uzas vorton laŭ ĝia efektiva gramatika karaktero. Sed ĝis nun mi neniam renkontis la vorton *ordi* en tia senco, kaj mi dubas, ĉu ĝi estas trovebla en la tuta Esp-a literaturo.

Estas vere, ke oni uzas ofte la vorton *ordigi* en la

La provoj de la juda gramatiko

— Dro X* —

Altestimata Sinjoro Redaktoro!

Kun granda bedaŭro mi vidas, ke la fragmentoj, kiujn vi presas el mia manuskripto: »Provoj de juda gramatiko«, donas al la leganto falsan ideon pri la karaktero kaj celo de mia laboro, pri mia verko, kiun mi skribis antaŭ pli ol 30 jaroj, kaj kiun el kelkaj kaŭzoj mi de tiu tempo neniam trarigardis. Multaj legantoj opinias, ke tio estas serio da artikoloj lastatempe skribitaj de mi, kiujn mi nun prezentas por la juĝo de la leganto. Antaŭ 30 jaroj, kiam mi kun arda amo laboris super la juda lingvo, mi penis ne krei ion en ĝi aŭ fari proponojn, kiujn oni povas elserĉi nur per la vojo de indukcio, sed konstati en ĝi la gramatikajn leĝojn, kiujn ĝi posedas. Ju pli mi laboris des pli mi konvinkigis, ke la juda lingvo posedas severajn kaj ofte tre interesajn leĝojn. Konstati kaj koni tiujn ĉi leĝojn oni devas, se ni volas, ke nia lingvo ĉesu esti ia miksaĵa jargono kaj fariĝu vera lingvo; ke ĉiuj ĝin uzu egale sen hezitoj, ĉar anstataŭ erarvagi en mallumo, ĉiu sciis precize, kia formo estas ĝusta kaj kia ne.

Mi citos kelkajn ekzemplojn. Ni ne renkontus ekz. tiajn vortojn kiel »cajnale« (anstataŭ »cajndele«), se ĉiu klare sciis, ke laŭ la leĝo de nia lingvo ĉe ĉiu unusilaba vorto finiĝanta per »n«, la diminutiva sufikso devas komenciĝi per »d« (fan-fendel; kan-kendel; hon-hendel; con-cajndel; ŝpan-ŝpendel ktp.) kaj ke la vortoj finiĝantaj per »en« tiujn sufiksojn ne bezonas: oni do devas diri »ŝtekel«, »ajvl« anstataŭ »ŝtekendel«, »ajvendel«. La unusilabaj vortoj finiĝantaj per »l« alprenas »h«; ekz. majl-majlhel; ŝol-ŝelhel; kojll-kajlhel ktp.

Ni ne renkontus formon kiel »menvil«, se ni klare sciis, ke en nia lingvo antaŭ la verbo estas ĉiam uzata la formo »mi« kaj post la verbo »men«; ekz. »az mi zogl, men« (»se oni diras, oni diras«. La trad.)¹⁾

Ni ne renkontus la formon »fun dem«, se ĉiu sciis, ke laŭ la leĝoj de nia lingvo la prepozicion oni uzas kune kun la montra pronomo tiamaniere, ke en la mezo troviĝas la vorto »der« kaj de ambaŭ flankoj la prepozicio (fun-

*) Pseudonimo de Zamenhof. Vd. la antaŭajn du numerojn.

¹⁾ Piednote troviĝas granda refuta rimarko de la redaktoro de »Lebn un Visnŝaft« (Vivo kaj scienco).

La trad.

senco de ordi. Sed ĉar estas ĝenerala tendenco elimini la superfluaĵojn *igi*, ni faris tion en nia P. G. almenaŭ ĉe la pasiva partecipa formo, kiu klare montras, ke temas pri transitiva ago.

Mi esperas, ke mi sukcesis montri, ke viaj severaj riproĉoj baziĝas aŭ sur miskompreno de nia teksto, aŭ sur miskompreno de nia lingvo. Strange estas nur, ke vi tiom plaĉas al vi en la rolo de »vera Zamenhofano« kaj nin konstante akuzas per herezo — kvankam, kiel mi klare pruvis, estas ĝuste vi, kiu multloke, kie ni estas pure Zamenhofaj, deflankiĝas de via modelo — versaĵne, ĉar vi ne konas ĝin bone.

Alt-estime:

K. Katocsay

Koncerne al la morfologia kaj sintaksa parto, el viaj rimarkoj mi, por ŝpari lokon, ne respondas la punktojn pri la teknikaj terminoj *apozicio* kaj *epiteto*, pri *pli ol unu* kaj pri la vorto *taŭro*, ĉar la unuaj du punktoj estas tralaboritaj en la dua eldono kaj la tria punkto rilatas

derfun; cudercu; mit der mit; baderbaj aferojf ktp.)²⁾

La lastaj du vortoj ŝajnas kvazaŭ escepto, sed laŭregule ili estas ĝustaj, ĉar kelkaj prepozicioj havas duoblan formon (memstaran kaj verban). Tiamaniere uziĝas unue la memstara formo (»ba«, »af«) kaj poste la verba formo (»baj«, »of«) (»ĉe«, »sur«. La trad.); ni ne renkontus tiajn formojn kiel »a gutem«; »a ŝajnen« (anstataŭ »a guten«; »a ŝajnem«) (»bonan«, »belan«. La trad.), se ĉiu sciis, ke en nia lingvo la nereкта komplemento (nia lingvo havas du komplementojn: rektan kaj nerektan) de vira sekso ĉiam finiĝas per »en«, sed post »i« kaj post »n« la finaĵo ŝanĝiĝas je »em«. Ni ne renkontus tiajn formojn kiel »far der mel« (anstataŭ »far di mel«) (por la faruno. La trad.) se ni klare sciis, ke ĉiu partitiva nomo estas bezonata en nia lingvo plurale, eĉ se la verbo staranta apud ĝi estas uzata singulare; ni ne renkontus tion da misuzoj de la muta »e«, kiu ludas tiel gravan rolon en nia lingvo kaj posedas siajn severajn kaj difinitajn leĝojn; ni ne renkontus fine tiujn erarojn kontraŭ la fleksio de la substantivoj kaj verboj, kiujn tiel ofte faras eĉ la plej bonaj el niaj verkistoj simple pro tio, ĉar ili ne klarigis al si la leĝojn de la juda lingvo kaj opinias, ke nialingve, ĉiu povas skribi laŭ propra plaĉo.

Koncize: nia lingvo posedas severajn leĝojn, el kiuj kelkaj estas tre interesaj. La elserĉo kaj konstato de tiuj leĝoj — kiom tion permesis al mi miaj modestaj fortoj kaj mia ne tro sufiĉa sperto — estis la tuta celo de mia laboro antaŭ tridek kelkaj jaroj. Bedaŭrinde, anstataŭ konigi al la leganto miajn esploritajn gramatikajn faktojn, la redakcio prezentis al ili nur kelkajn teoriajn proponojn miajn, kiujn mi nun bedaŭre ne havas la eblon klarigi kaj publike defendi, kaj el kiuj kelkajn mi jam delonge rigardas nenecesaj, malnecesaj (ekz. pri la duobla ortografio de kelkaj vortoj). Pro tio, la legantoj akiras tute falsan ideon pri la karaktero kaj celo de mia juneca laboro.

Tial mi vin tre petas, sinjoro redaktoro, ĉesu presigi la eltiraĵojn de mia manuskripto, ĝis mi havos la eblon eldoni ĝin entute, kun la necesaj klarigoj kaj antaŭparolo.

Kun granda estimo: d-ro X.

El la juda: S. Guterman.

²⁾ Piednote kiel ĉe ¹⁾.

la demandon de neologismoj, pri kiu jam estas tede paroli. Ni vidu la ceterajn:

a) Vi tre longe pritraktas la demandon, ĉu oni povas uzi *ne ankoraŭ*. Vi pledas por tiu formo, dirante, ke logike ĝi estas pravigebla: »en: *li ne ankoraŭ parolas*, oni montras la ideon, ke la fakto *daŭre paroli*« (mi diras, pli ĝuste: la fakto *ankoraŭ paroli*) »ne ekzistas«. Vi estas prava. Sed kial uzi tiel longan kaj miskomprenoblan esprimon anstataŭ la pli klara kaj pli mallonga: *li jam ne parolas* aŭ *li ne parolas plu*? Cetere, nia malkonsilo temis pri io tute alia, nome pri tio, ke oni ne uzu *ne ankoraŭ* anstataŭ *ankoraŭ ne*, ĉar la neado rilatas ne al *ankoraŭ* tiaokaze, sed al la verbo. Precipe francoj emas por tia uzo, tradukante *pas encore* kun la franca vortordo. Kaj plej interese estas, ke vi mem, en la sama paragrafo, kie vi tiel bele klarigis la specialan senco de *ne ankoraŭ*, ĝin uzas erare en la simpla senco de *ankoraŭ ne*: vi diras: *estas ne ankoraŭ la momento* anstataŭ *ankoraŭ ne estas la momento*. Ni dankas, ke vi tiel demonstras, ke nia atentigo ne estis superflua.

b) Pri la klasigo de la verboj rilate al la pasivaj participoj (verboj de daŭro kaj rezulto, verboj de rezulto sen daŭro, verboj de daŭro sen rezulto) vi diras:

»Kiel neutile komplikita aspektas la tuta sistemo! La penso de Zamenhof estis ja klara kaj li ne bezonis kategoriojn en la verboj. Ili mem enklasigis, se ili volis kaj verkis nin ĝenis... Se la verkisto sciis precizigi sian penson, li ne povis erari. Dum nun, antaŭ la teoriaj kreitaj subtilaĵoj, oni sentas, kvazaŭ oni implikis sin en pikildratoj.«

Hm. Vi diras, ke »la verboj mem enklasigis«. Jes ja, certe! Nenio povus nin tiel pravigi, kiel ĉi tiu aserto. Fakte, ni faris nenion alian, ol konstati tiun enklasigon, kiun la verboj faris pri si mem. Per tio ni donis helpon al la verkisto, por ke li povu pli bone precizigi sian penson kaj ne eraru. La »precizigo de penso« ja estas simple, ke oni konscias, kion oni volas esprimi, ĉu agrezulton aŭ agdaŭron.

Vi diras, ke: *li estis konata* kaj *li estas konita* ne estas egalaj, ĉar »en la unua okazo la pensita momento kaj la montrita ago estas samtempaj, dum en la dua okazo ekzistas nenia samtempo«. — Nu, tio estas tute teoria, gramatikstruktura diferenco, havanta nenian signifon. Nin interesas tio, ĉu la *sencoj* egalas aŭ ne. Konstati tion estas iom malfacile, ĉar la formoj *estas konita*, *estis amita* neniam NENIAM estis uzataj de Zamenhof kaj de la bonaj aŭtoroj. Vi diras, ke *li estas amita de ŝi* signifas, ke ŝi amis lin, sed oni ne diras, ke tiu amo ĉesis: *ŝi amis lin*, eble *ŝi lin amas ankoraŭ*. Nu, ĉu entute necesas formo kun tiel malpreciza senco? Kaj, se oni volus esprimi ĝuste ĉi tiun malprecizan sencion, ĉu por tio taŭgus la esprimo *estas amita*? Ĉu ne ĉiu uzus prefere la supran longan frazon, se li volus esti komprenata?

Ni konfesas, ke la pasivaj participoj estas iom malfacilaj. Sed pri tio helpi oni povas ne per prisilento, sed sole per preciza klarigo. En la ĉiutaga lingvo-uzo ne estas ja granda malfeliĉo, se oni eraras. Sed por la literatura lingvo oni devis fine starigi la regulojn de la korekta uzado.

c) Vi neas, ke la pasiva voĉo pli tiras la atenton al la ago ol la aktiva. Al vi ŝajnas, ke *ŝi estis vestata* ne respondas al *oni ŝin vestadis*, sed al *oni ŝin vestis*. Laŭ vi oni *ŝin vestadis* en la pasivo estus *ŝi estis vestadata*.

Tro longe daŭrus ekpliki ĉi tie ĉiujn kontraŭargumentojn (ni faris tion en la dua eldono), do nun ni metas solan demandon. Kial oni neniam uzas AD kun ATA? (Efektive, mi kuraĝus veti, ke vi ne trovos *-adata* ĉe Z.) Nu, simple tial, ke ATA jam enhavas la sencan de AD, do apud ĝi tiu ĉi estas pleonasma.

Vi diras, ke ITA montras simplan antaŭtempecon, nenion pli. Nu, pri tio legu mian respondon al sro Pumpur en la DISKUTO de ĉi tiu numero.

d) Mi citas vin: »Sro Waringhien diras, ke kiam ad- verbo venas de verba radiko, oni povas post tiu ĉi adverbulo anstataŭigi la prepozicion per akuzativo. La supra regulo celas pravigi la formon *rilate sin* anst. *rilate al si*. Mi opinias, ke la verbeco de la radiko estas tute senefika en ĉi tiu okazo. Pri tio gravan eraron faris kelkaj gramatikistoj, de Beaufront ĉefe, kaj poste Zamenhof sub lia influo kaj puŝo.«

Poste vi kontestas la verban karakteron de *rilat*, malgraŭ ke »kelkaj vortaroj klasigis ĝin inter la verbojn«. Nu, inter tiuj kelkaj vortaroj troviĝas ankaŭ la Fundamenta.

Resume vi diras, ke ĉiun prepozicion oni povas anstataŭigi per akuzativo, do *rilate sin* estas nur la uzo de tiu tolero, en kiu la verbeco de la radiko ludas nenian rolon.

Por refuti tion, ni rimarkas nur, ke oni neniam trovas la esprimojn *fore min*, *kvar kilometrojn malproksime la urbon*, *mi staris kontraŭe la domon* ktp., sed oni ĉiam metas tiaokaze la prepozicion DE, ĉar ĉi tiaj adverboj ne estas verbdevenaj.

e) Laŭ vi, *fare de* estas »peza kaj iom stranga maŭpinajo, kiu ne estus ŝatinda«. Anstataŭe vi proponas uzi ĉiam la aktivan. Do, ekz-e anstataŭ »la murdo fare de Petro« oni uzu simple: »Petro murdis.« Nu, la frazojn, kun iom da peno oni ja povas transformi tiel, ke oni ĉiam evitu la objektajn kaj subjektajn suplementojn de la verbo-substantivoj, sed ofte tia transformo de la frazo estas pli peza kaj pli malfacile farebla, ol la uzo de *fare de*. Ekzemple: *Li aŭvide legis ĉiujn ĵurnalraportojn pri la kruela murdo de Petro fare de Paŭlo*. Kiel ĝin esprimi aktive? Eble: *li aŭvide legis ĉiujn ĵurnalraportojn, kiuj temis pri tio, ke Paŭlo kruele murdis Petron*. Sed la efekto de ĉi-lasto frazo estas iom alia.

Far' de laŭ vi estas nelogikaĵo, ĉar ĝi estas la elizio de *faro de*, ne de *fare de*. Sed ĝi estas ja tuta analogia al *dank' al* (danke al), kiun certe uzas ankaŭ vi mem.

Oni povas diskuti por aŭ kontraŭ FAR. Sed via atako kontraŭ ĝi ne estas konvinka. Vi diras, ke FAR entenas ideon pri *ago*, sed ne pri *rilato*, kiun esprimas prepozicio. Nu, tio ĉi ŝajnas al mi neutila subtilaĵo, kaj eĉ ne ĝusta, ĉar ekzistas ankaŭ *aga rilato*. *Murdo far Petro* diras ke inter la murdo kaj Petro ekzistas tiu rilato, ke Petro estas ĝia farinto. Kaj al *far* tute analogia estas *per*, kiu en kelkaj okazoj same montras agan rilaton; la diferenco estas nur, ke tiu ago estas esprimebla per verbo alia ol la frazverbo: *sendi leteron per servisto* (oni sendas, la servisto portas la leteron, do la servisto faras tiun agon, kiu estas necesa por la efektivigo de la letersendo).

f) Vi parolas tre multe kontraŭ *vidpunkto*; mi citas ĝin laŭvorte:

»Sro Waringhien skribas: *El la vidpunkto de la logiko, la propozicio konsistas nepre el du elementoj*.

Mi ja scias, ke tiaj frazoj estas oftaj; sed mi opinias, ke ili estas faro de verkistoj malatentaj. Sro Waringhien kiu scipovas skribi multe pli bone, devus ne toleri al si tiujn ĉi nekonsilindajn aranĝojn, precipe tial ke lia stilo estos rigardata, kiel modelo.

Unue: »*la propozicio, kiu konsistas nepre el du elementoj*« ne »eliras« el la »*vidpunkto*«, kio tamen montras el: *el la vidpunkto*...

Due: la prepozicio *de*, kiu enkondukas la komplementon de »*vidpunkto*« kredigas, ke ĉi tiu *vidpunkto* estas tiu *de la logiko*, dum ĝi estas tiu, *kiun ni havas pri la logiko*. Evidente oni tamen komprenas; sed, precipe en lingvo ne ankoraŭ plene farita, oni devas peni al pleja korekteco. Cetere, tio ne ĉiam estas facila, ĉar niaj naciaj kutimoj blindigas kaj puŝas nin. Sed mi opinias, ke granda severo estas necesa. Gi ŝirmos kontraŭ disfalo. Tro da tolero povas malutili al Esperanto, malfpurigante ĝin.

Laŭ mia gusto, la frazo citita estus jene bonigebla: *laŭ vidpunkto logika*, aŭ eĉ preferinde: *logike, la propozicio konsistas nepre el du elementoj*; aŭ, kun la adverbulo apudmetita, *la propozicioj logike konsistas nepre el du elementoj*.

Sama rimarko pri: *el la vidpunkto de la gramatiko* (malbona genitivo), kiu malprave montras la »*vidpunkton de la gramatiko*« anstataŭ montri la nian; *el nia vidpunkto pri la gramatiko* estas certe pli bona. Sed oni povus diri simple: *gramatike*, kiel ĉi supre: *logike*.

Konkurso

por la legintoj de la Ĉeĥoslovaka Antologio

La Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko okazigis konkurson por la legintoj de la *Ĉeĥoslovaka Antologio*, kies kondiĉoj estas publikigitaj en *Lingvo-Libro*, j. 1936, n-ro 2, paĝo 17. Tasko de la partoprenontoj estis:

1. Kiun el la prozaĵoj aŭ poemoj de la libro vi trovas la plej bona?

2. Argumentu per kelkaj vortoj vian juĝon.

Unu premio, 100 Kč. kontante, estis lotumota inter tiuj respondintoj, kiuj estos voĉdonintaj por la verko, ricevinta la plej grandan nombron de voĉoj. Dua premio, ankaŭ 100 Kč., estis atribuita al tiu, kies valorjuĝon la juĝ-komisiono trovas plej trafa.

La rezulto montris, ke ne regas unueca opinio inter la legintoj. Eĉ du respondoj ne koincidas reciproke. Tial la juĝ-komisiono atribuis la premiojn al du prijuĝoj, kiuj atestas, ke la partoprenintoj de la konkurso plej profunde penetris en la spiriton de la verko. La unua estas S-o T.

»Vidpunkto«! kia stranga vorto! Sed, pri ĝi, Sro Waringhien ne estas kulpa. Kiam ĝi rilatas al la logiko, al la gramatiko, la vorto »vidpunkto« signifas: *se ni vidas esploras, ktp. en logika, gramatika maniero*. Estas ja ideo pri maniero, sed ne pri loko (kiun montras punkto). Do: *logike, gramatike*.

Plie, ĉar *vid* estas nature verba radiko montranta agon, ĝi kompreneble formas verbon, kies verbadjektivo aktiva: *vida* signifas: kiu entenas la kapablon vidi (latenta ago). Kio estas: punkto kiu entenas latente vidpovon? Nu, la senco de *vidpunkto* estas: *punkto de kie oni vidas, sekve: punkto por vidi, ejo por vidi = videjo, rigardejo*.

Ci tiuj du lastaj vortoj ĝuste tradukas »point de vue« en propra senco. En figura senco, preferinde estas: *konsidero, konsiderante, -inte, konsidere al (je): konsiderante la logikon, oni devas ...; konsidere al la logiko, la propozicioj ... (rilate al la logiko)*.

Subtilaĵojn oni povas respondi nur per subtilaĵoj.

Vidpunkto estas *punkto de vido*, punkto de kie oni ion vidas. Rigardante statuon el diversaj vidpunktoj, oni vidas ties diversajn flankojn.

En la modernaj lingvoj *vidpunkto* ricevis ankaŭ metaforan uzon. Same, kiel ĉe statuoj influas nian vidon la flanko, de kie ni rigardas, ĉe spiritaĵoj ĝin povas influu la doktrino, sistemo, teorio, opinio, kiu estis de ni akceptita. Figure do *vidpunkto* ricevis la senco de tia doktrino aŭ sistemo. Eĉ ĝi tute perdis sian originan senco. *Rigardi statuon el diversaj vidpunktoj* signifas en la plej multaj Eŭropaj lingvoj ne: rigardi ĝin de diversaj flankoj, sed: taksu ĝin laŭ diversaj konsideroj.

La doktrinon, sistemon ktp. oni povas ligi nur per DE, ĉar DE estas la ĝenerala ligilo inter substantivoj.

Sed kial EL? Nu ĝuste pro tio, ke ĉi tie *vidpunkto* estas uzata metafore. Ne temas do pri loko, sed pri abstrakta ideo. Nia penso tute lokas sin en tiu abstrakta punkto, kaj efikas kvazaŭ el ĝi, same kiel iu rigardas el ĉambro.

Estas tre karakterize, ke vi tiom malamikas al ĉi tiu simpla bilda esprimo. Tio montras vian ĝeneralan tendencon: neniel konsideri la praktikan bezonon de la parolo, la neceson de sukaj, turnriĉaj esprimoj, entute tion, kio faras la lingvon vivanta. Por vi Esperanto estas nur ia supera algebro, kie oni konstante devas ŝvite peni, ke oni povu marŝi inter la katenoj de la subtilaj logikaĵoj.

L. C. Bluett, South View, Chesswood Road, Worthing, Anglujo, kaj la dua estas S-ino Mathilde Gicquel, 28. Avenue St. Surin, Limoges, Francujo, al kiuj la EAC forsendis kontante la premiojn po 100 Kč. Aliaj alvenintaj respondoj estis konfirmitaj per sendo de gvid-folio el la Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Sube ni publikigas la premiitajn prijuĝojn pri la Ĉeĥoslovaka Antologio.

PRIJUGO DE S-ANO T. L. C. BLUETT, WORTHING, ANGLUJO.

Tiu el la prozaĵoj kaj poemoj en la libro, kiun mi trovas la plej bona, estas »Kudrilo« de Alois Vojtěch Smilovský. Jen estas kelkaj argumentoj por ĉi tiu juĝo.

La demando ne estas, kiu el la specimenoj plej plaĉas al mi, sed kiun mi trovas la plej bona. Tiuj du demandoj ja ne estas identaj; tamen mi ne nur trovis,

Kiel ofte vi nomas vin adepto de la »vera Zamenhofa Esperanto« en via pritraktado! Kaj vi tendencas ĝuste la kontraŭon de tio, por kio Zamenhof ĉiam pledis! Memoru liajn vortojn pri la neceso de idiotismoj!

g) Vi tre decide pledas por particip-adverboj ne rilatantaj al la subjekto: *sendu la leterojn afrankite*. Vi diras, ke ili estas adverboj, do devas kaj povas esti uzataj kiel la ceteraj adverboj. Tion trudas la saĝo; oni ne rajtas fari regulon laŭ sia propra plaĉo, sed oni devas konstati tion, kio estas.

Nu, la regulon, ke la particip-adverbo ĉiam rilatas al la subjekto, starigis Zamenhof mem. Estas vere, ke li kelkfoje malobeis sian propran regulon.

Kion do sekvi? Ĉu la regulon aŭ la tre sporadaj deflankiĝojn?

En tiaj okazoj, laŭ nia opinio, oni devas konsideri antaŭ ĉio la oportunecon kaj la klarecon. Nu, estas sendube, ke per la permeso de la nesubjektaj particip-adverboj grave suferus la klareco. Ekzemple, en la frazo: *Petro batis Paŭlon alprenite al la muro*, kiu estus alpremita, ĉu Petro, aŭ Paŭlo? Aŭ: *mi sendas al vi ĉi-enfermite novan poemon* — ĉu la poemo en la letero, aŭ la poeto en malliberejo estas enfermita? *Li estas vere feliĉa homo, konsiderante tion, ke li tranaĝis la krizon* — kiu konsideras, ĉu li, aŭ mi, kiu parolas nun pri li? *Dirante la veron, li ĉiam malsukcesas* — ĉu mi anoncas, ke mi nun diras la veron, aŭ li malsukcesas, ĉar li diras la veron? *Ne trinku akvon varmigite de la suno* — ĉu la homo aŭ la akvo ne estu varmigita?

Laŭ vi, *ĉe-mete, ĉi-enferme, afranke, preme* ne taŭgas, ĉar ili entenas, latente, la ideon pri aktiva ago, dum oni devus montri ideon pasivan. Sed, laŭ mia teorio, la verbadverboj aĉvenas el verbosubstantivoj: *afranke* estas *afranko-e, karakterizate de afranko*. Kaj *afranko* povas enteni pasivan ideon (*afranko de letero*), do la saman pasivan ideon povas enteni ankaŭ *afranke*, deveninta el *afranko*. Ankaŭ tio »konformas al la pura logiko«, kiel viaj konkludoj, laŭ via aserto. Entute, en lingvo ekzistas diversaj logikoj, depende de elirpunktoj, kaj vidpunktoj diversaj. Konvinki en gramatikaj aferoj ofte estas tre malfacile ĝuste pro tio, ke la kontraŭulo, enkokoniginte en sia propra logiko, ne povas ekvidi logikon eble pli oportunan.

K. Kalocsay

ke la nomita rakonto faris al mi la plej agrablan, kiel ankaŭ la plej fortan kaj neforgeseblan impreson, sed mi opinias ankaŭ, ke ĝi estas la plej lerte konstruita rakonto, kaj ankaŭ la plej trafte esprimita. Krom tio, ne altrudante moral-instruon, kaj ne deflankiĝante de la rakonto, la aŭtoro enigis en la mensojn de la legantoj la plej profundajn veraĵojn.

Aliaj el la specimenoj faras fortan impreson, sed (kvankam el severe literatura vidpunkto tio ne estas malmerito) impreson malagrablan; ekzemple la rakonto pri la senkompata murdo de bonvolema maljunulino — rakonto tiel terure simila al la reala vivo en tio, ke mankas ia justa aŭ feliĉa fino («Marŝo en cirklo» de Emik Vachek). Aliaj tiaj ekzemploj estas la terura bildo de mezepoka militado («Malsato» de František Langer) aŭ la eĉ pli terura bildo de la moderna militado («Mamma mia» de Jan Hrušovský), kiu forte rememorigas pri terura okazaĵo dum la lastatempa sieĝo de la Citadelo en Toledo.

Tamen — dank' al Dio — la plej profundaj kaj gravaj aferoj de nia vivo troviĝas ne en la teruraĵoj — »en la ventego kaj la tertremo« — sed »en la blovado de delikata venteto«. Do eĉ tiuj teruraĵoj ne faras tiel fortan impreson, kiel la simpla rakonto pri la malriĉa tajloro Kubásek. Sed por tia rezulto necesas la plej granda genio flanke de la aŭtoro.

Kubásek ja estis homo kun tre aminda karaktero. Se oni preter ĉio postulus, ke ĉiu tasko, estu konsciencie kaj akurate plenumata, Kubásek kredebla jam fariĝus la plej riĉa tajloro en la urbo; sed oni preferis tajlorojn, kiuj povis provizi vestojn iom pli laŭmodajn, kaj Kubásek iom post iom malriĉiĝis, kaj devis loĝi ne en la mezo de la urbo, sed en Koráb. »kaduka, unuetaĝa domo en la fino de la antaŭurbo«. Sed kiel ajn premeĝaj fariĝis la zorgoj, kiuj ĉiam akompanas la malriĉecon, li neniam eĉ iomete perdis la honestecon, la kuraĝon, la senmakulan netecon de sia eksterajo, aŭ la internan senton pri digno kaj deco. Li ĉiam restis amiko al ĉiuj homoj — eĉ al siaj kreditoroj.

Nenio donas al la leganto pli fortan impreson pri la admirinda karaktero de la tajloro ol tio, ke eĉ tiu famkonata grumblulo, la maljuna preĝeja ĥorestro Putynka, laŭdis lin, precipe pro tio, ke ĉe la solenaj mesoj Kubásek »frapis la tamburojn tiel bone, kiel neniu en la urbo. Kubásek nombris la paŭzojn harprecize kaj ekfrapis ĝustatempe, eĉ se li havis en la tuta »Kredo« nur unu solan okonan noton...«

Ni nun venas — post tiu enkonduka priskribo de la karaktero de la tajloro — al la »historiaĵo« pri la kudrilo, kiu estas la ĉefa temo de la aŭtoro. Kubásek estis tre okupita en la tagoj antaŭ la pentekosta dimanĉo, kaj li fariĝis tre laca, ĉar li devis labori tage kaj nokte, por ke ĉiuj menditaj vestoj estu pretaj; kaj la lasta plenumota tasko estis fari antaŭ tiu tago la unuan viran vestareton por la preskaŭ kvarjara unusola filo de lia amiko Živna, afero tre grava por la infano kaj ties adoranta patro. Kubásek estis promesinta per plej sanktaj promesoj, ke la vestareto estos ĝustatempe preta, kaj post tio neplenumi la promesvorton, estus ja terura afero.

Jam estis la sabata vespero antaŭ la pentekosta dimanĉo, kiam Kubásek estis preta eklabori pri la vestareto, kaj li jam estis lacega, do li elserĉis kudrilon, ne ian ajn kudrilon, sed »la« kudrilon, »sian« specialan kudrilon, kiu laŭ lia fantazio kudris per si mem, eĉ kiam ĝia mastro estis tre laca.

Sed dum li kudris, »lia« kudrilo elfalis el lia mano kaj tute malaperis. El tiu ŝajne bagatela okazaĵo rezultis grandaj malfeliĉoj. La brava homo, kiu ĝis nun kuraĝe

elportis ĉiajn katastrofojn, subite demoraligis. La kutime bone sin reganta tajloro koleris kaj eĉ blasfemis, li ekbruligis kandelon por serĉi »sian« kudrilon, kaj vane malpurigis per sebo la pene frotlavitan plankon; li elkuris el la domo, kaj oni trovis lin apud la puto en la korto meditantan pri sinmortigo. Lia edzino rekondukis lin en la domon, sed li ne sentis sin kapabla daŭrigi la laboron per alia kudrilo, kaj estis jam longe post noktomezo, do li dormis dum kelke da horoj.

Kiam li levigis en la mateno, li sentis sin ankoraŭ paralizita per honto pri la perdo de sia reputacio, kaj krom tio, kiam li komencis sin razi, li tranĉvundis sin tiel multe, ke li ne kuraĝis iri al la preĝejo por plenumi sian oficon de tamburisto en la preĝeja orkestro; kaj li devis priplori ankoraŭ denove sian reputacion... Fine lia edzino bonŝance trovis »lian« kudrilon, kiu estis falinta en lian poŝon. Tiam Kubásek regajnis sian memfidon, baldaŭ plenumis sian taskon ne multe pli malfrue, kaj la afero finiĝis feliĉe.

Mi devas konfesi, ke en ĉi tiu rakonto mankas unu tre grava kvalito: — la kredebleco. Eble membro de la tajloro metio trovas ĝin pli kredebla, ol aliaj ĝin trovas. Estas ja absurde kaj nekredebla, ke tajloro tiel malesperus pro la perdo de unu kudrilo, eĉ se ĝi estus ial de li tre preferata. Sed efektive en tiu absurdeco mem troviĝas la genia trafeco de la rakonto. Ĉu ni efektive rajtas malestimigi Kubásek? Ĉu ne ĉiu el ni ofte faras similajn absurdaĵojn, preskaŭ egale ridindajn?

Ĉiu el ni estas Kubásek. Al ĉiu leganto diras la aŭtoro, kiel diris la profeto Natan al la reĝo David: »Vi estas tiu homo.« Al ĉiu leganto li diras, kiel al Kubásek diris ties edzino: »Pro malinda kudrilo vi forbruligis dukreĵceran kandelon.« Kiel diris la maljuna ĥorestro Putynka (de kiu la aŭtoro originale aŭdis la historieton): »Ni metu manon sur la koron... Ĉu ne havas ĉiu el ni sian kudrilon, pro kiu li forbruligas kandelojn? Kaj ne nur ni, unuopaj homoj, sed ankaŭ tutaj nacioj...«

Per tia simpla rimarko de maljunulo en la fino de la rakonto, kaj ne per altrudita teda moral-instrua prediko, la aŭtoro estigas en la menso de ĉiu leganto vicon da seriozaj pensoj. Per tiel malgrandaj truoj, kiajn senfinajn perspektivojn li malkaŝas! Kiel diras la angla poeto William Blake (1757—1827), estas la tasko de la geniulo, fariĝinte kvazaŭ simpla infano:

»vidi la mondon en sablero,
ĉielon en eta flor'.

Estas sur man' senfina afero,
kaj la eterno en hor'...«

(To see the world in a grain of sand,
And a heaven in a wild flower,
Hold infinity in the palm of your hand,
and eternity in an hour.)

PRIJUGO DE S-INO MATHILDE GICQUEL, LIMOGES, FRANCUJO.

Kial nur unu, dum mi volus enskribi ĉiujn nomojn en la Antologio? Mi devas unu post la alia repuŝi, ĉiujn el la longa vico de ŝatataj aŭtoroj, por finfine reteni nur unu: Božena Němcová.

El tiu deviga elekto, kiam da bedaŭroj. Ĉu mi ne amas Janon Neruda kaj liajn popolajn poemojn? Ĉu la »Golgoto« de J. Svatopluk Machar ne emociis min ĝis larmoj? Ĉu la »Juna amo« de Antonin Sova ne entuziasmigis min? Ĉu mi ne ĝuis la subtilan analizon de l' »homa koro de Karel Capek? Kaj ĉu mi diru, kiel ĝoje mi prezentis al miaj du infanoj la »Lampiran familion«

PRI LA RECENZO DE
»PROGRESADO KAJ LA PASINTECO«

(Lingvo * Libro N-ro, 1, 1937, p. 11.)

Permesu al mi doni kelke da rimarkoj pri la dirita recenzo.

1. Pri »necesaj sufiksoj«: ekzistas diversaj opinioj pri la neceseco aŭ neceseco de tiu aŭ alia sufikso; laŭ mia opinio la vortoj *individualismo*, *industrialismo*, kaj *racionalismo* estas sufiĉe internaciaj, por eniri en la lingvon, kaj la laste nomita troviĝas en la Dua Aldono.

La aŭtoro de la lingvo uzis *-emeco* en 76 lokoj, kaj *-emo* en 14 lokoj; unu el la 14 (*sciemo* en la Dua Libro) malaperis, kiam la fabelo »La Ombro« represiĝis en Fabeloj II. sub la titolo »Ombro«; vidu 140/39. Supozeble do li ne opiniis, ke »-emo plene sufiĉas«.

»Ĉiuj la sektoj«; jes, ĉar mi skribis ne pri ĉiuj ekzistantaj sektoj, sed pri ĉiuj tiuj sektoj, kun kiuj la aŭtoro de la libro havis aferon.

Mi ne vidas sufiĉan motivon por uzi la artikolon antaŭ *naturu*, *tempo*, *progreso* k. t. p., kiam la senco estas klara sen la artikolo. Kiam de Beaufront reviziis la Ekzercaron, li skribis: »La papero estas blanka. L' akvo estas fluidaĵo. La ĉemizojn, kolumojn... ni nomas tolaĵo. La ŝtalo estas fleksebla,

sed la fero ne estas fleksebla. La vitro estas rompebla.« Tamen Zamenhof ne akceptis ĉi tiujn ŝanĝojn.

»Estos necesa resumi kelkajn...«; mi jam montris aliloke, ke la uzado de adjektivo aŭ adverbo en tiaj okazoj estas tute libera.

Vastigi: Zamenhof uzis ĉi tiun formon en 18 lokoj.

La radiko *degrad'* staras en la Universala Vortaro.

Interklarigisto havas iom pravigon en Hamleto 90/15:

»mi volonte estus klarigisto inter vi kaj via amato.«

La recenzinto diras, ke majuskloj ĉe la vortoj *Juda*, *Greka* k. c. ne estas Zamenhofaj. Tio estas eraro. En la unua tempo Zamenhof skribis *rusa*, *pola*, *germana* k. c., sed poste li alprenis la alian metodon. En la Fabeloj la ŝanĝigo venas post iom; en la unua parto troviĝas ses minuskloj kontraŭ du majuskloj, kaj en la partoj dua kaj tria la majuskloj havas grandan plimulton. En Genezo ni havas *hebreu* (XLI. 12.) kaj *hebreo* (XIV. 13); vidu en la Hachette eldono; en la cetero de la Malnova Testamento la majuskloj regas absolute: *Hebreu*, *Haldea*, *Egipta*, *Siria* k. c., kaj tio ne estas farita de la Biblia Komitato. Povas esti, ke la uzado de

majuskloj ne estas *kutima*; en tia okazo la uzantoj aŭ ne sufiĉe esploris la Zamenhofan literaturon, aŭ prefere sekvas siajn personajn gustojn kaj opiniojn, anstataŭ »imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto«.

»Hinduo« ne estas »antikva Hindo«; »Hinduo« estas adepto de la religio »Hinduismo«, konfesata de granda parto de la loĝantoj de Hindujo.

Laŭ la Zamenhofa uzado »pasanto« ĉiam estas »homo, kiu pasas«, sekve »pasinto« estas »homo, kiu pasis«. (Komparu la konsilon pri *estonto* kaj *estonteco* en la Respondo 46, p. 59 en la Plena Kolekto.) Kofman uzis *pasinto* anstataŭ *pasinteco* (Krest. 443/18), sed nur pro priritma postulo.

Pri la verkoj de Erasmus mi volis uzi la originalan titolon, sed mi ne sukcesis trovi ĝin.

William Bailey.
(La tradukinto.)

Estimata Samideano!

En via raporto pri mia broŝuro (Furado kaj analizo de la malsimplaj vortoj) — en *Lingvo-Libro* 2. 1937. — vi diras, »ke estas strange ke mi silentas pri via teorio kaj ne provas rifuti ĝin«. La kaŭzo estas, ke mi ne verkis gene-

de Jan Karafiát? Kaj tiom da aliaj verkistoj-amikoj, kiujn mi trovis en tiu ĉi libro, el kiuj mi ĉerpis spiritan kaj koran nutron. Mi ne povas ĉion mencii.

Cu el la aro da bonaj amikoj oni povas diri, kiun oni preferas? Cu ĉiu el ili ne havas siajn specialajn virtojn kaj malvirtojn, pro kiuj ni amas lin? Tamen foje okazas, ke en kunestado de tiu aŭ tiu ĉi, ni sentas nin pli feliĉaj ol kun la aliaj. Tiam ĝi tamen ne estas elekto; tio estas senpripensa, kvazaŭ senkonscia afero. Same okazas al mi koncerne la Ĉeĥoslovakian Antologion.

Baudelaire, malkovrante Edgaron Poe, ne pli ĝojis ol mi, malkovrante Boženan Nĕmcová. Mi sentas ŝin tre proksima al mi kaj sentas min en harmonio kun ŝiaj sentoj.

Nur kvar paĝoj en la libro sufiĉas por tio. Sed mi deziras nun ŝian tutan verkaron, por esti pli longatempe kune kun ŝi.

Frazon post frazo, la spirita ĝuo eniris mian animon, lumo en la nigran baraktadon; melodio en la disharmonio; konsolo por la peza koro.

Sub tiu freŝa, infaneca fantazio, sub tiuj triloj de facilventa muziko, sub tiuj rapidaj movoj de kaprica danco mi malkovris la tutan filozofion de Nĕmcová: nepre eliri el ĉi tiu dolorplena, senviva vivo. Eliri pere de tiu memova forto, kiun ni eltrovos, se ni scios serĉi ĝin en la profundo de l' animo. Tiam malgraŭ ĉiuj suferoj de la ĉiutaga vivo, kaj spite al ofta tento de l' ripoziga morto, ni sukcesas viri, plue vivi.

Si instruas al ni, kiel ŝi sukcesis bori al si la vojon tra la neesplorita arbaro de la vivo. Mi ne perdis fidon

nek amon al homoj« ŝi diras. Per tiu ĉi filozofio ŝi renkontiĝas kun Baghy.

Samtempe sur la traborita vojo ŝi sentas la florojn de la fantazio. Ŝia stilo estas tiom bildopova, ke ofte nur per unusola vorto ŝi malfermas al ni larĝan horizonton, kie svarmas sentoj kaj sentimentoj tre diversaj... »Ridi, danci.«

Ofte nur elvokivaj nuancoj igas min nek analizi nek pripensi la muzikan momenton. Kvazaŭ nestus en la frazo kapric-aera muziko de Claude Debussy, nia delikata franca muzikisto. Kvazaŭ la senparolaj kantoj, la grizehelaj akvareloj de la poemoj de Paul Verlaine... Debussy, Verlaine, Baghy, jen tri verkistoj de mi tre amataj.

Por mi en la pasinta jarcento Božena Nĕmcová ludis ian mirindan violonĉelon. El la kordoj de la instrumento eliris vibrado, kiun nun — nur nun — mi povas aŭdi, dank' al la ondoj de la lingvo Esperanto, dank' al la radio-stacio Literatura Mondo, dank' al la orkestro-ĉefo Pumpr... vibrado, kiu trafe resonas en mia animo, ĉar je la sama takto mia animo oscilas.

Kaj nun, mi ne scias, al kiu danki, ĉu denove al Zamenhof, kiu eltrovis la verdajn ondojn, ĉu al la orkestro-ĉefo, kiu tiom lerte interpretas, ĉu al la radio-stacio, kiu sendas tian muzikon en la tutan mondon, ĉu al miaj du profesoroj (Sro Chiland en Versailles kaj mia propra edzo), kiuj instruante min pri Esperanto, ebligis al mi posedi la perfektan detektilon. La konkurso estas por mi nura okazo por diri al Vi ĉiuj, O Ginz, Stan. Kamaryt, kaj ĉiuj tradukintoj kaj kunlaborintoj, ke la Ĉeĥoslovaka Antologio estas netaksebla trezoro.

ralan studon pri la diversaj proponitaj teorioj, sed nur prezentis la mian.

Pli prave mi rajtas miri, ke vi ne menciis en via Plena Gramatiko (pĝ. 29.) mian teorion publikigitan antaŭ 25 jaroj.

Mi ne rifutis la vian, lasante tiun taskon al la kompetentuloj, kiuj bonvolos kompari kun ĝi la mian. Ili elektu inter la tre simpla principo, el kiu ĝi devenas, t. e. *malsimpla vorto estas mallongigo de esprimo*, kaj la via, kies principo estas, ke »la sintaksa determino kaj la vortkunmeto estas diferencaj, eĉ kontrastaj«, principo, kiun vi tute ne pravigas, kaj kiu kondukas vin al eksterordinaraj konkludoj, ekzemple *la vortefikoj rekta kaj inversa* (p. 35.).

Cetere vi devas konfesi, ke »ĝi havas siajn komplikajn ĉe la plurelementaj kunmetoj, ĉe la apudmetoj, k. t. p.«. Ĝi ne »rezultigas monstretojn de analizo«, tute simple, ĉar ĝi ne analizas. Ekzemple, por analizi *homeco*, anstataŭ *eco de iu homon similanta* vi trovas *eco de homo*, sed vi ne diras kia estas la *eco de homo*: simileco, forto, inteligento k. t. p.; ankaŭ mi povus analizi *de homo posedata eco*.

Mi ne komprenas vian kritikon pri DE. Sed sur la 23-a paĝo de mia broŝuro mi montris, ke ĝi havas nur unu signifon anstataŭ dek aŭ dekdu, kiel ĝenerale oni — kaj vi — diras. *Urĝas, ke tiu eraro estu forigita el la vortaroj kaj gramatikoj*, ĉar ĝi estas unu el la plej ofte uzataj kritikoj de la kontraŭuloj de Esperanto.

Anstataŭ sendi al vi la kritikojn, kiujn vi deziris ricevi pri via Gramatiko, mi preferis publikigi broŝurojn pri diversaj temoj, kiujn vi pritraktis — propraj nomoj, malsimplaj vortoj, vortfarado —, ĉar mi opinias, ke kritiko utilas nur kiam ĝi proponas alian teorion kaj solvojn ol tiuj, pri kiuj ĝi ne konsentas. Tiam la leganto povas elekti tute libere.

Mi opinias, ke vi eraris titolante vian verkon: Plena Gramatiko. Fakte, ĝi ne estas gramatiko; ĝi estas studado de la formo, kiun devas havi la esprimo por ĝuste kaj senmanke reprezenti la plusion. Ebligas tian studadon nur lingvo, kies elementoj estas precize difinitaj, kaj kuniĝas laŭ nur logikaj kaj precizaj reguloj, t. e. Esperanto.

Sangante tiun titolon, vi pli klare montrus vian celon kaj evitus kredigi, ke Esperanto estas tiel komplikata lingvo, ke necesas dika volumo por klarigi ĝian gramatikon.

Tutkore via
Rollet de l'Isle.

*

Estimata Samideano!

Kompreneble, mi tute ne pretendis, ke via traktato okupiĝu, punkto post punkto, pri mia teorio, do ke ĝi estu kvazaŭ ties kritiko. Sed eble vi estus povinta menciĝi ĝin mallonge en la antaŭparolo, same kiel mi, en la Plena Gramatiko, menciis ĉiujn antaŭajn sistemojn. Se mi ne menciis la vian, ties kaŭzo estas simple, ke mi ĝin ne konis: neniam mi legis tiun numeron de la Internacia Scienca Revuo, en kiu ĝi aperis. Male, vi certe konis mian sistemon, ĉar la P. G.-on mi sendigis al vi. Via nemencio do devis al mi ŝajni ignoro.

Via regulo: »malsimpla vorto estas mallongigo de esprimo« estas tiel vasta, ke ĝi ne estas valida. Laŭ la lingvo-uzo, oni ne povas tiel mallongigi ĉiujn esprimojn, nur certajn. Nenie vi trovas ekzemple en nia literaturo la esprimojn: *divershomoj, malrapidlerni, malproksimamiko, laclernantoj, molpano*, ktp. Kial? Ĉar ilia analizo okazus per senpera sintaksa determino: *malrapide lerni, malproksima amiko, laclaj lernantoj, mola pano*. Vi eraras do dirante, ke mian principon mi nenie pravigas: ĝin ja plene pravigas la lingvo-uzo.

Vi diras pri mia konstato pri la *vortefikoj rekta kaj inversa*, ke ili estas »eksterordinaraj konkludoj«. Sed la

rekta vortefiko ja estas evidenta! *Kantaro* ekz-e signifas aron de kantoj, do la verba radiko *kant* substantivigis per la vortefiko de la substantiva *-aro*; same: *pregaro*; vi mem citas la vortojn *belisto*, kiu estas *isto* (okupiganta pri *belo*, do la adjektiva radiko *bel* substantivigis per la vortefiko de la substantiva *-isto*. Kaj la inversan vortefikon vi mem rekonas, kiam vi parolas pri *senforta* (pĝ. 27.): tie vi diras per aliaj vorton la samon, kion mi.

Vi diras, ke mi ne analizas, ĉar la vorton *homeco* mi dismetas je *eco de homo*, sed mi ne diras, kia estas la *eco de homo*. Nu, *homeco* laŭ mi estas *homo eco*, t. e. *eco homo*: homo rigardata kiel *eco*, la tuta kvalitkomplekso de homo. Sed neniel ĝi estas *eco posedata de homo*. Bonvolu legi ankoraŭ unufoje la koncernenan ĉapitron. Via pritraktado pri DE ŝajnas al mi tre stranga. Teorie oni eble povus rekonduki ĉiujn sencojn de DE al unu komuna signifo. Sed tio neniel ŝanĝas la fakton, ke *praktike* DE estas erarige plursenca. Nur unu ekzemplon: *La ĉevalo estis aĉetita de Petro* (ĉu Petro aĉetis, aŭ oni aĉetis de li?).

Mi kredas, ke por silentigi la kritikojn, oni devas forigi tiun ĉi plursencecon ne el la gramatikoj, sed el la lingvo.

De multaj flankoj oni riproĉis al ni la titolon de nia libro. Tial en la dua eldono ĝi tekstos: **PLENA GRAMATI-KO. Detala komentario pri vorto kaj frazo.**

Bedaŭrinde, mi ne povis nun, pro manko de loko, ree ekspliki ĉi tie mian tutan sistemon; cetere mi tion jam faris dufoje respondante al la kritikoj de s-roj Inglada kaj Marcelé. Post atenta tralego de tiuj respondoj, mi kredas, oni povas trovi klarigon pri ĉiuj dubaj punktoj; plu paroli pri tiu temo devigis min al ripetadoj, kiujn mi volas eviti.

Tre sincere via:
K. Kalocsay.

PRI LA FINA ASPEKTO

Estimata Sinjoro Kalocsay!

Mi hieraŭ eksciis, ke estas aperonta la dua eldono de la Plena Gramatiko. Mi gratulas. Permesu al mi ĉe tiu okazo diri kelkajn vortojn pri unu ĉapitro. En la P. G., I-a aldono, sur paĝo 193 (§ 237) ni legas, ke en E. mankas esprimilo pri la FINA ASPEKTO de verboj. Kaj oni uzas diversajn surgatojn (EL-, TRA-, FIN-, SAT-, TUT-), el kiuj tamen neniu plene taŭgas. Vi scias, ke slavojn tre ofte ĝenas, se ili en E. ne povas esprimi tiam aŭ alian aspekton, je kiuj ilia lingvo abundas.

Supozu, ke Zamenhof kreis al ni finan aspekton. Ni helpu nin per EKS-. Tiu ideo ne estas tro aŭdaca. Mi jam legis en poemo: »... Vidvino eksploris sub vagon' de karbo (= mortis)«, kaj mi mem iam-tiam prove uzis la saman prefikson, ekzemple: »La mirto eksfloris, ven-

toj ĝia disblovas...« aŭ »la larmoj sur vangoj eksivas...« Mi ne estas gramatikisto kaj ne opinias min kompetenta prijuĝi la korektecon de tia eksperimento. Tamen, mi kredas, ke la propono ne »eks-solvas« nian problemon. La kaŭzon mi vidas en alia loko.

a) Ekzistas verboj, precipe netransitivaj, kiuj sendanĝere toleras ĝeneralan finaspektan prefikson (ekzemple EKS-). Komparu nur: La flamoj eksflagris; la vento eksblovis; knabinoj ekskantis; eho ekssonis (!); homamaso ekskriis... Ni vidas, ke en tiu ĉi grupo troviĝas ankaŭ transitivaj verboj (ekskanti la kanton). Sed ilia objekto imagigas nenian materian rezulton.

b) Ekzistas verboj (transitivaj), kiuj postulas ĉiam objekton, kiu esprimas materian rezulton. Tiam la ĝenerala fina aspekto estas logike plursenca, nepreciza kaj konfuziva. Oni ja ne scias, ĉu la ago, kiun oni ĵus »eks-agis«, havis la celitan sukceson, aŭ ĉu oni kapitulacis,

ne akirinte la rezulton. Kion signifas la nepreciza »eks-konstrui«? Diverson: a) Oni ĉesigis la konstru-laboron, ne plu zorgante pri la sorto de la konstruata objekto; b) oni pretigis la verkon ĝis la lasta briko. Tial la anemia verbo »eks-maĝi« diras al mi preskaŭ nenion; kaj mi preferas *EL-maĝi* (nenio restis); aŭ *FIN-maĝi* (mi ne diras, ĉu oni havas la stomakon plena, kaj ĉu io postrestis aŭ ne); kaj *SAT-maĝi* (do rezultas stato vere sukcesa kaj kontentiga).

Komparu aliajn rezultativajn verbojn: *eksplugi kampon*; *eksfosi sulkon*; *ekspentri bildon*; *ekslegi libron*; *eksaĉeti domon*. Similaj turnoĵoj ne kontentigas nian lingvosenton.

Sume kaj resume: unu forma FINA ASPEKTO estas nur teoria postulato kaj ne malutilas, se ĝi mankas en Esperanto.

Via sindona: Dr. Tomáš Pampř.

*

Kara Samideano!

Tre klare vi disvolvis la problemon de la fina aspekto; efektive, tiu aspekto entenas du aspektojn:

1) unu, kiu signas simple la ĉeson de ia ago, sen konsidero de tio, ĉu tiu ago estas farita ĝis la fino necesa por havi la intencatan plenan rezulton.

2) unu, kiu signas la plenan plenumon de la ago, kiu estigas la plenan rezulton intencitan.

Por neniu el tiuj du aspektoj ekzistas speciala prefikso en Esperanto. Kaj estas sendube, ke ilin oni ne povus signi per la sama prefikso.

Por la unua aspekto, kiun oni povus nomi *ĉesa*, EKS ne estas taŭga, ĉar ĉe verboj komencigantaj per *s-*, ĝin oni ne povus distingi de EK: *eksoni* estas same prononcata kiel *eksoni*; same *ekskribi* *ekssopiri* ktp. Oni povus eble uzi EKS malantaŭe: *skribeksi*, *soneksi*, *sopireksi*, vortoj tute regule kunmetitaj. Mi tamen ne tre entuziasmas pri ĉi tiu solvo pro ties stranga sono. Ŝajnas tute sufiĉa la uzado de *ĉesi* tiaokaze: *ĉesi skribi*, *soni*, *sopiri*.

Pli sentigas la neceso de la alia aspekto, kiun oni povas nomi *rezulta*. Plej oportune estus uzi PER por ĝin signi: *perskribi leteron*, *perkonstrui domon*, *perpentri bildon*, *perpurigi*, *perbrosi veston*, ktp. Sed, kiel ajn oportuna kaj utila, ankaŭ ĉi tiu solvo ne ŝajnas havi multan ŝancon, ĉar nia lingvo-uzo tre malfacile akceptas novajn formojn elementajn.

Interese estas, ke ĉi tiu demando entenas ankaŭ la faman problemon pri ATA-ITA, kaj multe helpas ĝin komprenigi. Fakte, ATA kun *estis* respondas al la ĉesa aspekto: *la letero estis hieraŭ skribata* diras, ke oni skribadis la leteron, sed tute ne asertas, ke oni ĝin ankaŭ finis: ĝi do diras simple, ke oni skribis kaj poste ĉesis skribi. Siavice, ITA kun *estis* respondas al la rezulta aspekto: *la letero estis hieraŭ skribita* diras, ke oni ja finis la leteron.

Mi scias, ke kelkaj ne volas tion akcepti. Sed tiuj konsideru, kio estas la diferenco inter: *la domo estis konstruata* kaj *la domo estas konstruita*. Evidente, la unua frazo diras, ke oni konstruadis la domon iam antaŭe, sed nenion diras pri tio, ĉu oni konstruis ĝin komplete. La dua frazo, siavice, diras, ke oni komplete finis la konstruon, kaj, nun, en la nuntempo, ni havas antaŭ ni ties rezulton. Male, se estus vere, kion kelkaj asertas, ke ITA signas simp'an antaŭtempecon, sen ia senco de rezulto, la du supraj frazoj estus plene samsignifaj, ĉar estus ja tute egale, ĉu la antaŭtempecon rilate al la nuntempo oni signas per *estIS* kaj ATA aŭ per *estAS* kaj ITA. Nu, ĉar ĉiu devas rekoni, ke la du supraj frazoj ne estas samsignifaj, estas nekontesteble, ke ITA signas krom la antaŭ-

tempeco ankaŭ ion alian. Kaj tio estas la komplete farita rezulto de la ago.

El tio sekvas, ke ĉe verboj de agoj, kiuj ne lasas post si rezulton, ITA ne estas uzbla. *Estas konITA*, *estas amITA* do estas eraraj formoj, ĉar tiuj verboj havas nur aspekton ĉesan, sed ne havas aspekton rezultan. Oni povas diri nur: *estis konATA*, *estis amATA*. Tio ankaŭ konformas al la lingvo-uzo.

Krome, ekzistas verboj, kies ago ne havas daŭron. Sekve, tiuj agoj aŭ okazas, aŭ ne: ili ne povas ĉesi sen rezulto, ĉar tiaokaze ili tute ne manifestigas. Se mi komencas perdi mian horloĝon, sed poste mi ĉesas ĝin perdi, evidente mi neniel ĝin perdos, la perdo mem absolute ne okazos, ne ekzistos. La perdon mi konstato nur post ĝia efektiviĝo per ĝia rezulto (manko). *Perdi* do ne havas ĉesan aspekton, sed nur rezultan. Tial oni devas uzi ĝin kun ITA: *la horloĝo estis hieraŭ perdita*. Tamen, oni povas uzi ankaŭ ATA, sed nur ĉe ripetado: *lia mono en Monte Carlo estis perdata tagon post tago, ĝis fine ĝi estis tute perdita*. (La pledantoj por simpla antaŭtempeco de ITA rimarku, ke *perdata* ĉi tie signas okazaĵon ĝuste posttempa rilate al *perdata*, ĉar la sinsekvaj perdoj okazis ja pli frue ol la plena perdiĝo kun la komplete rezulto (manko de mono). Do ĉe ITA la antaŭtempeco estas malpli grava ol la rezulto-senco.

Pardonu, ke mi diris ĉion ĉi: mi scias, ke antaŭ vi tute klara estas ĉi tiu tuta afero. Mi volis nur kapti la okazon, klarigi la problemon de ATA-ITA el ĉi tiu nova vidpunkto, ĉar eĉ en tre eminentaj kapoj regas ĉi-rilate obstina konfuzo.

Via tre sincere: K. Kalocsay.

LITERATURA FRANDAĴO

estas la grandformata, preskaŭ tricentpaĝa romano de

grafo A. Tolstoj:

Princo Serebrjanij

en la modela traduko de M. Ŝidlovskaja

Eldonita antaŭ la mondmilito kaj tradukita de unu el la plej bonaj stilistoj tiutempaj, ĝi estas nun jam klasika kaj pro tio forte rekomendinda ne nur el literatura, sed ankaŭ el lingvistuda vidpunkto.

Prezo de broŝurita eldono 1.— dol. afrankita. Riceveblaj nur 30 ekzempleroj.

LIBROAĈETA ORGANIZAĴO

(Literatura Mondo) Budapeŝt, IX. Soroksári-str. 38. Hungarujo.

Ĉu silenti?

En la 2-a n-ro de L. L. ni legis tre favoran recenzon pri la libro Rigardu la Teron de H. W. van Loon. Koncerne la ĝeneralan geografion la recenzinto nepre pravas. Sed legante la specialan parton de la verko, en kiu la aŭtoro priparolas la diversajn ŝtatojn, jen laŭde jen moke, oni bedaŭras, ke li ne restis super sia temo.

Ne nur ĉe pure scienca verko, sed ankaŭ ĉe verko popularscienca, oni ŝatas antaŭ ĉio du ecojn, nome objektivcon kaj precizecon. Kiu serĉas ambaŭ ecojn en la ĉapitro Ĉeĥoslovakio, tiu vane serĉas. Jam la subtitolo Fabrikaĵo de la Versaja Traktato montras, kiajn okulvitrojn la aŭtoro surnazigis skribante ĝin. Per la sama titolo distingis la aŭtoro ankaŭ Jugoslavujon.

La moko, ke la ĉeĥoslovaka ĉefurbo ne plu nomigas Prag sed Praha, ke la rivero, sur kies bordo la ĉeĥoj loĝas 15 jarcentojn, ne plu nomigas Moldau sed Vltava, ŝajnas al mi iom naiva. Eĉ al negroj oni ja rekonas la rajton nomi riverojn kaj montojn en ilia afrika regiono en lingvo, kiu ili parolas. Tium ĉi naturan emon montras ankaŭ Esperanto, lingvo certe neniel ŝovinisma. Kion vi pensus pri atentigo en germana gazeto, ke »Wien« ne plu situas ĉe »Donau«, sed ke »Vieno« estas lokita ĉe »Danubo«. Kompreneble neniu malpermesis al niaj germanaj samlandanoj uzi tiujn nomojn, kiuj estas kutimaj en ilia lingvo.

Deziri al popolo ĉe l' »proksima milito bonan feliĉon« (p. 240/7 ms-malsupre)... jen cinikismo, se ni konsideras la centmilojn da mortigitoj kaj kripluloj, kiuj estas la rezultato eĉ de la plej »feliĉa milito«. Kaj kontraŭ kiu? Nu kontraŭ la legantoj de la verko, kiuj najbaras la bondeziran ŝtaton.

S-ro van Loon mencias 9 milionojn da ĉeĥoj, 4 milionojn da slovakoj kaj 3 milionojn da germanoj, do entute 16 milionojn da loĝantoj, dume nia respubliko havas hodiaŭ iom pli ol 15 milionojn da loĝantoj kune kun la hungaroj, subkarpato-rusoj kaj poloj.

S-ro van Loon skribas: »... estas tre malfacile profeti, ĉu ĝi (komprenu: Ĉeĥoslovakio) povos postvivi per si mem. Unue, la lando estas enfermita, senmara. Due, ne multe da amo sentiĝas inter la protestantaj ĉeĥoj kaj la katolikaj slovakoj«.

Nu, ankaŭ Hungarujo, Aŭstrujo kaj Svisujo estas senmaraj. Tiu ĉi malavantaĝo, kvankam grava, nuntempe ne estas la plej alta barilo staranta sur la vojo de l' internacia merkato. Spite nian senmarecon oni renkontas eksterlande pli ofte la markon »Made in Czechoslovakia« ol de multaj ŝtatoj ĉemaraj. Naturaj malhelpaĵoj estas venkeblaj, nevenkeblaj estas tiuj bariloj, kiujn la popoloj mem starigis sur la limoj de siaj ŝtatoj. Oni malfermu la limojn al libera merkato kaj post du-tri jaroj portos la tuta Eŭropo ŝuojn de... Bata.

Responde al s-ro van Loon estu permesite citi la opinionon de H. G. Wels: »El ĉiuj novaj ŝtatoj en la centra Eŭropo estas Ĉeĥoslovakio eble la plej esperiga sub sia prezidento kaj sciencisto Masaryk kaj kun sia ministro por eksterlando E. Beneš, kiu estas unu el la plej kapablaj ŝtatistoj en Eŭropo... La centra situo de Ĉeĥoslovakio kaj la fakto, ke ĝia klera kaj energia loĝantaro kun slava lingvo kaj centra-eŭropa kulturo estas natura ponto inter la okcidenta Eŭropo kaj la slava mondo, donas al tiu ĉi ŝtato en la nova Eŭropo

signifon, kiu ege transpaŝas ĝiajn areon kaj nombron de l' loĝantaro.«

Tre surpriza novaĵo al ĉiu ĉeĥoslovako estas la aserto, ke la ĉeĥoj estas protestantoj. Jen la statistiko el la jaro 1930:

Bohemujo kun 67% da ĉeĥoj havis 75% da katolikoj.

Moravi-Silezia lando kun 74% da ĉeĥoj 86% da katolikoj.

Slovakio kun 72% da slovakoj 72% da katolikoj.

Ne eblas do aserti, ke la ĉeĥoj estas protestantoj, ankaŭ ne en popularscienca verko por »mezkalita« leganto.

Religiaj diferencoj do ne povas esti la kaŭzo de »senĉesaj kvereloj kaj intervenĝadoj«... ho, oni preskaŭ aŭdas kanonpafadon. Kaj jen, tiun ĉi spektaklon observas la »politike tute sensignifa« Moravio kiel aplaudanta publiko... laŭ s-ro van Loon. Ni aldonu, ke tiu ĉi »politike tute sensignifa« lando donacis al la ĉeĥoslovaka popolo T. G. Masaryk, la Prezidenton-Liberiginton. Cetere, ĉu oni povas en demokratia ŝtato paroli pri sensignifaj landoj? Ĉu mia balotilo ne estas samvalora kiel la balotilo de nia prezidento, egale en kiu angulo en nia ŝtato mi loĝas? S-ro van Loon asertas, ke »la 9,000,000 da ĉeĥoj traktas la 4,000,000 da slovakoj simile kiel ili estis antaŭe traktataj de la hungaroj.« Jen la respondo: T. G. Masaryk estis Moravia slovakoj kaj la nuna ministro-prezidento d-ro Hodža (elp. hoĝa) estas pursanga slovakoj. Antaŭ la abdiko de T. G. M. estis do sur la du plej gravaj postenoj de nia ŝtato slovakoj!

S-ro van Loon tamen pravas, ke ekzistas kvereloj inter ĉeĥoj kaj slovakoj, sed ili ekzistas ankaŭ inter ĉeĥoj kaj slovakoj same kiel inter slovakoj kaj slovakoj.

S-ro van Loon mencias sur p. 168/12 s., ke la slavoj faris en la estinta monarkio 47%, la germanoj 25% kaj la hungaroj 19% (la aŭstra oficiala statistiko el la j. 1910 mencias: 47.8%, 23.3%, 19.6%). Tamen li miras, ke la plimulto, kulture neniel malpli alte staranta ol la 42.9%-a reganta maplimulto, ne emis daŭre ludi la rolon de »kolonio« (sic!).

Ke la franca estas oficiala lingvo en Francujo, la rumana en Rumanujo, neniu surprizas. Neniu ankaŭ surprizis, ke la pola iĝis oficiala en Polujo. Neniu do povas surprizi, ke la ĉeĥoslovaka iĝis oficiala lingvo en Ĉeĥoslovakio. Sed laŭ s-ro van Loon tio estas akto de venĝo! Tamen en ĉiu urbo kun pli ol 20% de germana aŭ hungara loĝantaro ĉiu ŝtata oficisto laŭleĝe oficas ankaŭ germane respektive hungare. Neniu ja povas lojale postuli, ke ĉeĥoslovaka oficisto oficu kun ĉeĥo aŭ slovakoj en pure ĉeĥa aŭ slovakaj urbo... germane! Cetere du germanaj ministroj — lastatempe tri — partoprenas de la jaro 1926 en la registaro kaj ĉiu vengita akto devus do okazi sub ilia kontrolo kaj kun ilia konsento. Certe la plej preciza indikilo pri justa aŭ maljusta, bonvola aŭ malbonvola traktado al malplimultoj estas la lernejoj. Por »nur tolerataj dialektoj« neniu ŝtato vivtenas lernejojn, neniu ŝtato elspezas milionajn sumojn. Sed parolu la statistiko! En la lernojaroj 1934—35 havis lernejojn ekzemple:

ĉeĥoslovakoj	—	—	—	16.610
germanoj	—	—	—	5.290
hungaroj	—	—	—	935
subkarpato-rusoj	—	—	—	722 ktp.

La registaro energie zorgas kaj laboras por levi ankaŭ en Slovakio la kulturalan nivelon al tiu de la »historiaj« landoj (t. e. Bohemujo kaj la Moravi-Silezia lando). Tiun ĉi kulturalan verkon admiras ĉiu eksterlandano vizitanta Slovakion, sed precipe tiuj, kiuj konis Slovakion antaŭ la jaro 1918.

Jam antaŭ 300 jaroj starigis nia granda ĉeĥa pedagogo Komenský-Comenius unua la principon, ke la elementa instruado okazu al ĉiu lernanto en lia gepatra lingvo. Kaj same natura estas, ke la lernantoj estas unuavice instruataj pri siaj hejmo kaj nacia historio, pri siaj literaturo kaj arto kaj duavice pri la historio, literaturo kaj arto de la ceteraj popoloj. Tiun ĉi principon sekvas nun ĉiuj popoloj sur la tuta terglobo kaj s-ro van Loon konsentas. Sed kiam ankaŭ la ĉeĥoslovaka popolo aplikas la principon de unu el siaj plej grandaj filoj, s-ro van Loon opinias necese moke konstati, ke »la nova generacio de ĉeĥaj infanoj estas rigore nutrataj per literaturo de pure ĉeĥa deveno.« Ankaŭ sen s-ro van Loon ni bone konscias pri la graveco de fremdaj lingvoj: ĉiu ĉeĥa infano vizitanta la duagradan elementan lernejon — multaj jam en la unuagrada — lernas la germanan. En la mezlernejoj lernas niaj studentoj krome la francan aŭ anglan; iam ili lernas laŭ sia elekto la rusan, italan, hispanan, serbo-kroatan, rumanan k. t. p. Vere, niaj studentoj sciis ŝati la enkondukon de Esperanto en la trafikajn kaj kulturajn rilatojn inter la popoloj! Ni do ne bone komprenas, kial s-ro van Loon atentigas speciale nin ĉeĥoslovakojn pri la graveco de la 100 milionoj de »la ĉefa nacio de l' mondo« (p. 161/6 ms). Ekzistas ja pli malgrandaj popoloj kaj lingve multe pli izolitaj ol la ĉeĥoslovakoj, apartenantaj al la 250-miliona slava lingvo-familio.*

Pri la graveco de la ekonomia unuo, kiun prezentis la danuba monarkio, ni same konscias, kiel s-ro van Loon. »Sed la homo ne estas nur stomako serĉanta nutraĵon« (p. 210/6 s). Ankaŭ la vivo de popoloj havas du flankojn, nome ekonomian, kiu estas internacia, kaj kulturalan, kiu estas nacia, ĉar popolonacio estas ĝia portanto. Tamen ni konscias, ke la diversaj kulturoj influas sin reciproke, evoluante tiel al pli alta ŝtupo, al kulturo homara, kiun efike akcekos Esperanto, stariganta ĝin sur homaran fundamenton, t. e. fundamento de neŭtrala lingvo. Tamen la nacia kulturo restos la fekunda humo, sur kiu ĝi kreskos, kiu ĝin nutros. La liberan kulturalan flankon de l' popola vivo certigas la politika sendependeco. Jen kial necesis disrompi la monarkion... neniu povas racie atendi de socia klaso (rim. legu popolo), ke ĝi sin mortigu mem por la profito de la alia« (p. 200/19 s) kaj ankaŭ pro tio, ĉar »klera memintereso estas la ĉefa ekzisto-lego« (p. 209/8 s). Ekonomie la monarkio estis unuo, politike ĝi estis disfalonta konglomerato. Tamen ni ĉeĥoslovakoj estas konvinkitaj, ke la ekonomiaj centripetaj fortoj denove kunfandos tion, kion la centrifugaj disrompis... devis disrompi.

La ĉeĥoslovaka respubliko estas la verko de T. G. Masaryk kaj de liaj fidelaj kunlaborantoj d-ro Beneš kaj la slovako d-ro Stefánik. T. G. M. estis laŭ eksterlanda aserto — amerika, angla, franca k. a. — la plej granda reprezentanto de la nuntempa demokratio. T. G. M., kiu plej meritis pro la disrompo de l' estiinta monarkio, antaŭvidis kaj deziris ne nur la restarigon de la ekonomia unuo ampleksanta la danuban monarkion, li estis konvinkita pri la neceso de

multe pli granda ekonomia unuo, nome pri la neceso de la Unuigitaj Statoj de Eŭropo.

Prave aldonis s-ro van Loon koncizajn historiajn skizojn al la diversaj ŝtatoj, ĉar multo de l' hodiaŭo kaj morgaŭo komprenebligas per la scio de l' hieraŭo. Tia historia skizo mankas, se mi ne eraras, nur ĉe la Ĉeĥoslovaka Respubliko. Alie la aŭtoro ne estus povinta paroli pri »fabrikaĵo«, sen kontraŭdiri sin mem.

Dum la mondmilito T. G. Masaryk kaj pli ol centmil ĉeĥoslovakaj soldatoj-volontuloj laboris kaj batalis, por ke efektiviĝu la profetaj vortoj de Komenský: Mi firme kredas, ke post paso de tempestoj kaj suferoj la regado pri viaj aferoj revenos en viajn manojn, ho ĉeĥa popolo. Dum la lastaj tagoj de l' mondmilito la 28-an de oktobro 1918 deklaris la ĉeĥoslovaka popolo sian ŝtaton libera, sendependa respubliko.. ĉu la Versajla Konferenco povis poste ne rekoni ĝin?

Oni eble miro, ke mia polemika artikolo estas pli longa ol la ĉapitro Ĉeĥoslovakio en la verko de s-ro van Loon. Nu ankaŭ la jena frazo estas mallonga: Esperanto estas ne vivkapabla fabrikaĵo de L. L. Zamenhof. Sed por refuti tiun ĉi aserton, oni devus citi la duonon de l' multpaĝa protokolo pri la Pariza Konferenco »Esperanto en la praktika vivo«.

T. Kilian.

Nota: Ni ricevis la jenan artikolon kaj kompreneble ni volonte kaj lojale disponigas lokon al ĝi. Sed kun granda bedaŭro ni devas mallongigi la artikolon, ĉar ĝia amplekso tute ne estas proporcia al nia gazeto. Fakte oni devus prizorgi la aperon de tiaspecaj artikoloj en la koncernaj landoj. Estas tute nature, ke la redakcio ne volas diskuti pri la artikolo, nur rimarkigi, ke la menciita »moko« pri la diversaj nacilingvaj nomoj de la geografiaj lokoj tute ne estas moko, nur simpla, eble iom bonhumora konstato pri tio, ke la nuntempe ofta ŝanĝo de la loknomoj estas embarasa al tiuj, kiuj en la feliĉaj »pacjaroj« jam al kutimiĝis al certaj geografiaj nomoj. Pro manko de loko ni tute ne povis publikigi la statistikajn tabelojn de la artikolo, same ne la sufiĉe ampleksan historian skizon, sed la legantoj, kiuj interesiĝas pri la detaloj de la subaj asertoj, certe trovos manieron kontentigi sian sciemon.

Ni devas aldoni, ke en tiu ĉi okazo ni mem sentis, ke ni ne povas resti rigide principaj, sed samtempe estas konstatebla fakto, ke tiaj diskutoj estas malfacile aplikeblaj al la kadroj de lingvista kaj librista organo.

La redakcio de L. L.

ATENTU!

De longa tempo ni librotenas kelkajn pagojn, kiujn ni ricevis pere de nia pola poŝteekonto.

La nomo de la sendinto estas nelegebla aŭ almenaŭ de ni ne konata. Preciza adreso mankas. La pagoj havas nenian indikon.

Ci sube ni detaligas la nomojn de tiuj samideanoj kaj petas, ke ili bonvolu anonci al ni la celon de ilia pago.

Samideanoj estas petataj averti, se iu el inter la nomoj estas konatulo.

S-ro F. J. Monthaan C. & C. i. Rotterdam 2.50 gld.

S-ro Slezak Gustav, Naklo, CSR. 40.— ĉkr.

Esperantista Eldeo Kolin (laŭlitere) CSR. 21.— ĉkr.

S-ro C. Royer, Paryi, Francujo, 38.50 fr.

S-ro Joh. v. Leeven, Hoondam (??) 2.— gld.

* Ni trovas la opinion de Van Loon tute ĝenerala!

SUGESTOJ

La grupa kaso ne havas monon...

— estas tre ofta diro de la grupaj funkciantoj. Faru do! estas nia sugesto. Kaj monon fari plej facile estas eble per libroj. Ĉiu esperantisto amas havi libron. Sed malmultaj havas sufiĉe da mono por aĉeti seriozajn librojn. Sed ankaŭ ĉiu homo estas riskema pri kelkaj cendoj aŭ centimoj. Faru do dum la jaro tri-kvar lotumadojn en la grupejo pri libroj. Lotumu precize tiavaloran libron, kian valoron vi enspezos per la lotumado. Kiel tamen restas al vi mono? Tre simple. Utiligu la librojn, kiujn nia katalogo pri uzitaj libroj al vi prezentas. Tiuj uzitaj libroj plej ofte estas nur iom makulaj aŭ markitaj per ia enskribo aŭ subskribo. Tamen, ili estas 40—50% pli malkaraj ol la regula vendoprezio. Vi lotumos la librojn laŭ la regula vendoprezio kaj por vi restas la diferenco, kio estas preskaŭ la duono de la tuta lotuma sumo.

Sed eĉ se vi lotumus tute novajn librojn, vi ĝuas certan rabaton el niaj libroj kaj vi gajnos tiun sumon.

Jen, gajnu monon por la grupa kaso.

Grupa biblioteko en la komunuma biblioteko

En la ĉiam interesa »Flandra Esperantisto«, n-ro decembro 1937 ni legas la sekvan artikolon el la plumo de s-ano DE Troeyer:

Estas fakto, ke ĝenerale malgranda estas la nombro de la Esperanto-grupoj, kiuj posedas bibliotekon bone organizitan kaj bone funkciantan; pluraj grupoj eĉ tute ne havas bibliotekon aŭ posedas kelkajn librojn kiujn en longe forgesitaj tempoj oni iam aĉetis per la grupa kaso, sed kiuj nun troviĝas ie ĉe la sekretario, la kasisto aŭ la prezidanto hejme, sed neniam estas legataj, pro la simpla kaŭzo, ke ilia ekzistado ne plu estas konata de la klubanoj.

Tamen, kiel valora helpo, kia bona materialo por interesaj grupvesperoj, kiel utila ekzercado por perfektigi en a lingva praktiko, kiel riĉa fonto de praktikaj konoj, de agrablaj kaj lernigaj distraĵoj estas por la klubmembroj la legado de bone elektitaj Esperanto-libroj!

Jes, certe, la regula funkciado de biblioteko ofte okazigas multe da peno kaj laboro. — Ofte mankas la kapabla aŭ la sindonema persono por sin okupi pri ĝi; — oni perdas multe da tempo dum la pruntedonado de la libroj kaj la grupkunvenoj estas mallongaj; — oni ne ĉiam disponas pri taŭga loko en la klubejo por meti la librojn; — ofte libroj perdiĝas aŭ difektiĝas.

Sed tamen, mankas multe en Esperanto-klubo sen biblioteko. — Ĉu en ĉiu sekcio ne troviĝas iu, kiu volus sin dediĉi al la tasko de bibliotekisto? Jen maniero por interesigi plian membron al la vivo de via klubo; en bone organizita grupo la kiel eble plej multe da membroj havas sian funkcion kaj respondecon. — Ne gravas, se je la komenco li ne estas spertulo, se li nur havas iom da libertempo kaj la necesan bonvolon, se nur li mem ŝatas librojn. — Kaj ne estas nepre necese okazigi la pruntedonadon de la libroj dum la kutimaj kunvenoj, oni povas fiksi regulajn tagojn kaj horojn por tio. Kaj se la bibliotekisto bone tenas kompletan katalogon de ĉiuj siaj libroj (kuranta numero, titolo, numero de la libro, prezo, dato de la akiro, aŭtoro, rimarkoj) kaj kartojn

unu por ĉiu membro de la grupo (numero de la libro, dato de la pruntedono, titolo de la libro, dato de ricevo), bone ordigitajn en skatolo, ne multaj libroj perdiĝos. Kaj ne gravas, se la libroj uzdifektiĝas dum la legado; malmultekosta bindaĵo kun rigida kovrilo el kartono tamen multe plilongigas la vivon de la libroj.

Por tiuj grupoj, kiuj, malgraŭ ĉio, ne sukcesas bone funkciadigi sian bibliotekon, mi volas citi la ekzemplon de unu el niaj sekcioj, kiu, post interkonsento kun la estraro de publika komunuma biblioteko, pruntedone cedis sian librotrezoron al tiu biblioteko. La libroj estas provizitaj de verda glumarĉko, kiu, krom la nomo de la Esperanta grupo kaj la verda stelo, mencias, ke tiu libro apartenas al tiu klubo kaj estas pruntehavebla je la prezo de 0.25 fr. De tiu sumo la biblioteko deprenas 0.05 fr. por siaj administrataj kostoj. La aliaj 0.20 fr. estas por la klubo, kiu devas utiligi ilin por aĉeti novajn librojn, kaj tiamaniere nun disponas pri tute aparta fakto en la komunuma biblioteko.

Tiu sistemo, kiu metas la Esperantan legaĵon je la dispono de la publiko kaj, per aparta katalogo, atentigas pri la Esperanta literaturo, estas certe imit-ebla en multaj okazoj.

Konsilinde estas antaŭfiksi en la kontrakto inter Esperanto-grupo kaj Biblioteko, klaŭzon pri translo de la libroj en la okazo, se la Esperanto-klubo eventuale poste ĉesus; plejofte la biblioteko postulos por si la rajton de mastreco, almenaŭ ek de dek jaroj post la ĉeso de la koncerna Esperanta-klubo. Tiuokaze la klubstatutoj kompreneble ne enhavu, kiel tio ofte okazas, klaŭzon difinantan, ke la Ligo akiras la posedon de la kluba havaĵo post eventuala ĉeso de la sekcio, sed esceptu la librojn de tiu translo...

La „Epoko“ Libro-klubo

Lastatempe en Britujo naskiĝis kaj trafis grandan sukceson diversaj naciaj libro-kluboj, kiuj celas havigi al siaj membroj librojn je relative malaltaj prezoj. Tiaj kluboj ĉiumonate eldonas novan libron, kiu estas vendata al la membroj por 2 ŝ. 6. (2.50 svisaj frankoj). La membroj promesas aĉeti la monatan libron dum minimume ses monatoj kaj ili pagas por ĉiu libro nur post ricevo. La kluboj povas malmultekoste eldoni la librojn ĉar ili scias jam antaŭe ĝuste kiom da libroj ili devos presigi. La plej sukcesa el tiaj kluboj en Britujo estas la Left Book Club (Maldekstra Libro-Klubo), kiu, kiel diras la nomo, eldonas librojn laŭ »maldekstra« ideologio. Kvankam tiu klubo ekzistas nur iomete pli ol unu jaron ĝi havas preskaŭ 50.000 membrojn.

La direktoroj de la Esperanto Publishing Company konstatis la sukceson de tiu sistemo kaj opiniis, ke ĝi povus esti tre efike aplikata al Esperanto-Libroj. Ili do starigis la »EPOKO« LIBRO-KLUBON, kiu dumonate havigos al siaj membroj libron proksimume 200-paĝan, 18×11.5 cm., bone presitan kaj broŝuritan je la por Esperanto-libroj tre malalta prezo de 1 angla ŝilingo. La unua libro estis »Murdo en la Orienta Ekspreso« de Agatha Christie. Tiu rakonto estas unuaklasa moderna detektiva romano, kiu nepre tenas la atenton de la leganto de la unua paĝo ĝis la lasta, kaj la tute internacia atmosfero aparte interesos Esperantistojn.

Plia informo pri la »EPOKO« LIBRO-KLUBO kaj aligiloj estas haveblaj de ĉiuj Esperantistaj libro-vendistoj.

Komuniko de la sekretario de la Komisiono por la Jubilea Stelo

La 8-an de aŭgusto 1937 dum la 29. Universala Jubilea Kongreso de Esperanto en Varsovio, en la granda salono de la kongresejo okazis la Festa Vespero de Veteranoj de la Esperanto-Movado.

La solenajon prezidis, en la ĉesto de S-ro B. Wyński, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, S-ro R. Saković, sekretariis S-ro J. Litauer.

Post enkondukaj vortoj la orkestro ludis »Esperon« kaj »Kanton de l' Ligo« de Mozart kaj S-ro Julio Baghy prononcis profunde kortuŝan paroladon dediĉitan al la rememoro de penoj kaj laboroj de unuaj pioniroj de Esperanto.

Dum la malŝaŭta ludo de »Funebra Marŝo« de Chopin la inspirita oratoro elvokis unu post la alia nomojn de la plej unuaj kaj de la plej famaj ne plu vivantaj esperantistoj. En la plena salonego ĉiuj ekstaris. Korsir-malgaje apenaŭ ludis la muziko, plore sonis la karaj, neniam forgesotaj nomoj. Multaj okuloj estis plenaj de larmoj.

Kaj kiam ĉesis la funebra marŝo, Baghy entuziasme en la nomo de la grandega kulturmovado esperantista dankis la vivantajn pionirojn de la unua kvaron-jarcento de Esperanto.

La solenan paroladon de S-ro Baghy sekvis la publika disdono al la veteranoj per la prezidanto de la solenaĵo de atestoj kaj de jubileaj steloj.

La artaj atestoj enhavas la jenan tekston:

»La XXIX. Jubilea Universala Kongreso de Esp-o en Varsovio 1937 decidis esprimi sian estimon per aljuĝo de la . . . jubilea stelo pro la pionira agado al . . . el . . . , kiu aliĝis al la aktivaj batalantoj por la lingvo internacia Esperanto en la jaro . . . Varsovio, la 8-an de Aŭgusto 1937. Prezidanto de la Kongreso: prof. O. Bujwid, Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato: B. Wyszynski, Sekretario de la Komisiono por la Jubilea Stelo: Józef Litauer.«

Laŭ la regularo de »Jubilea Stelo«, aperinta en la n-ro 1—2. de »La Jubilea« (januaro-februaro 1937), organo de la 29. Universala Kongreso de Esperanto, al la esperantistoj, kies partopreno en la movado datiĝas antaŭ la aŭgusto de 1905 j. estis aljuĝita la »ora«, al la esperantistoj kies partopreno en la movado datiĝas antaŭ la aŭgusto de 1912 j. estis aljuĝita la »argenta« Jubilea Stelo.

La Jubilea Stelo estas mezgranda verda stelo kun ora aŭ argenta nombro »50« en la mezo, la stelo estas interplektita kun ora aŭ argenta laŭr-branĉo. La steloj surportas sur maldekstra flanko la numeron de la koncerna atesto. La steloj por viroj estas alkroĉitaj sur butono, por virinoj: sur broĉo. Gis nun la Jubilea Stelo estas aljuĝita al la jenaj gesamideanoj:

Ora:

Ĝeneralo Tadeusz Kasprzycki, pola ministro de militaj aferoj, Arne Arnesen, Carl Barthel, Louis Bastien, Leo Belmont, Paul Blaise, Herman Boucon, Ismael Gomes Braga, R. Déchaux, Ernest Deligny, Edinburga Esperanto Societo, Franciszek Ender, Adolf Feiner, Izydor Fels, Corrado Grazzini, Zygmunt Greffkowicz, Roman Dobrzanski, Stanislaw Kamaryt, Leon Klimecki, Ivan H. Krestanov, Marcel Laignier, Johan Lovli, Jean Jaques Moquier, National Institut for the Blind, National Library for the Blind, Stefan Nenkov, Albin Neuzil, Paul Nylen, William Percy Merrick, Edmond Privat, Gustaw John Ramstedt, Eduard Stettler, Rollet de l'Isle, Wilhelm Róbin, Georges Saget, Roman Sakowicz, Otto Simon, Kunitaro Takahaŝi, Dawid Tenenbaum, Harald Thilander, Carl Thulin, Association Valentin Haly pour le bien des aveugles, Hugo Vilhelm Salokannel, W. Willumsen, Aleksandro Antoni Zakrjevski, Adam Zamenhof, Jean Couteaux, Boleslaw Gluchowski, Julian Jarecki, Leon

Szejnman, Ignacy I. Krenicki, Józef Krenicki, Stanislaw Szabuniewicz, Stanislaw Essigman, Adam Gabryel Furmanik, August Sochacki, Juliusz Kriss, Emilian Loth, Leopold Lubliner, Wladyslaw Pozner, Jan Günther, Teofil Kozłara, Teodoro Kovács, Aleksandro Laguer, Kajetan Seper, Gabriel Chavet, Mieczyslaw Czerwinski, Hans H. Kürsteiner, Jacob Schmidt, Emile Gasse, Roman Palleja, P. Pouchot, Mieczyslaw Rogalski, Prosper Couffinal, Charles Fahrner, Eugeno Fuchs, Ludoviko Lajos, Stefano Molnár Nagy.

Jane Baird, Eugenie Cense, Regina Fels, Nesta Ford, Poittevin, Teofila Essigman, Fanny Uhrová—Krivancová, Rose Vogt, Zofia Zamenhof, Felicja Szyzko—Witulska, Paulina Muszkatblat, Aleksandro Dombrovski, Asile Recordon, Esperanto Societo Bern, Soeures Aveugles de St. Paul, Janina Ender.

Argenta:

Léon Agourtime, Alf Arnesen, Henri Aubé, Julio Baghy, Ozkar Baum, John Bergh, Robert Berg, Brazila Ligo Esperantista, Odo Bujwid, Modesto Carolfi, Michal Chmielinski, Edgar de Coster, Rajmund Cech, Antoni Czubrynski, Andreo Cseh, Esperanto-Societo »Danubio«, Andreo Deistler, Les Denysiuk, Didrik Didriksen, Jergu Dinju, W. Doroŝenko, René Dubois, O. J. Elvernen, Alfred Engländer, Géza Balkay, Marian Grodzki, Albert Gustavssen, K. Geršater, György Solti, Ekedalen Hallin, Olans Halvorsen, Henry W. Hetzel, J. V. Holleman, Edward Imsdahl, Harry Ingham, J. R. G. Isbrücker, Hnat Jakimczuk, Hans Jakob, Lajos Jankovich, Sam Jansson, Jenö Ausländer, Leopold Dreher, Peter Johannesen, Sigrid Johannessen, Hugo Jokl, Teo Jung, Rudolf Kaftan, Kolomano Kalocsay, Halfdan Karterud, Anatolo Koh, Emil Kolodziej, Antonio Krtsmary, Moriz Lackenbacher, Józef Litauer, Stefan Lubliner, Seth Lünegren, E. Mage, C. Mattsen, Józef Migacz, Miklós Bánó, Hagbart Mörk, William R. Mackay, Anton Nilsson, Adolf Oberrotman, Ignác Pataki, Andreas Pedersen, Stanislaw Peksa, A. C. Pettersen, Emil Pfeffer, Oskar Popper, Leon Rosenstock, Wilhelm Sandberg, Franz Josef Schade, Josef Schamanek, Ludwig Sengebusch, Vilho Setälä, Karl Otto Sikor, Hugo Sirk, O. Brochmann, Sletterod, Romuald Soloniewicz, Olaf Storen, Jakób Szapiro, Rafaele Tancredi, Samuel Szulc, Ramizo Turi, Edward Wiesenfeld, F. Staes—Vandervoorde, R. F. Vanghan, Kazimierz Zajackowski, Oskar Zimmermann, Julius Glück, Hugo Steiner, Stanislaw Karolczyk, Stanislaw Sudelik, Benedykt Herold, Jan Kostecki, Leon Ferencowicz, Cecil C. Goldsmith, John Johansson, Tadeusz Kaciczak, Wlodzimierz Miernicki, Kenji Osaka, Stanislaw Rudnicki, Hideo Yagi, Henryk Schnützer, Edward Spielmann, Stanislaw Braun, Jozefo Koch, Wladyslaw Mergel, Wlodzimierz Pfeiffer, Paul Uline, Endre Dienes, Józef Friedrich, Béla Holley, Kazimierz Tyminski, Vakok József nádor kir. orsz. intézete.

Hanna Anderssen, Eileen de Burgh Daly, Rosa Bye, Anna Dirnova, Helmi Dresen, Signe Helgerssen, Matilda Hershkovici, Klara Hruby, Julia C. Isbrücker, Carla Jacobsen, Antoinette Jennen, Gerda Julin, Hedwig Kaes, Eva Karlssen, Katalin Schultz, Agnes Melchior, Amelia Maggunssen, Margit Riedel, Mária Molnár, Agnes G. Macfarlane, Minna Miksch, Hanna Nilsson, Nila Nilsson, Melania Pietsch, Mario Polednova, Ada Pyntu, Emma Raff, Astrid Sirevog, Howard Sondford, Elly Stoes, Lewissa Strandman, Anna Weinstein, Izydora Waloŝczak, Lidia Zamenhof, Julia Neubergowa, Helena Dawidow, Marie Charlotte Merrick, Leonia Weiler, Helmi Josefsson, Renée Uline, Teréz Stefan.

Ĉiuj personoj senescepte, kiuj jam ricevis la atestojn kaj la stelojn, bonvolu nepre kvitanci je suba adreso pri tiu ricevo nur per simpla poŝtkarto kun la detala

JUNECA ARDO, rakonto de *N. Bartelmes*. Eldonis SAT, Paris, 67 Av. Gambetta. 120 pĝ. Formato: 13×20 cm. Prezo: 7.50 fr. fr. + 10%.

En la lastaj kvin-ses jaroj, la originala Esp-a literaturo multe pli progresis ol dum la antaŭaj unu-du jardekoj. Krom la verkoj de la majstro-poetoj Baghy kaj Kalocsay, mi povus mencii aron da verkoj originalaj, kiuj atingis altan nivelon. La »Dekdu Poetoj« estas ĉarma bukedo, plektita el verkoj de novaj poetoj. Mirindaj sonharmonioj kaj valoraj enprofundiĝoj atestas, ke la Esp-a originala poezio vere »elkreskis el la »infan-ŝuoj«.

Sed apud la konataj verkistoj de L. M. kaj ĝiaj eldonadoj, aperis ankaŭ kelkaj laboristaj verkistoj. En la nuntempaj ĉefaj organoj de la laborista esperantistaro ni vidas talentajn poetojn, lertajn novelistojn. Ili diferencas de siaj antaŭuloj en tio, ke anstataŭ la literature senvalora afiŝ-stilo ili konstruas artajn formojn, faras profundajn poeziajn pentrojn, saturitajn per mondkoncepto socialisma.

Nun mi prezentas al la legantaro unu el tiuj verkistoj.

La prozaj verkoj de Bartelmes preskaŭ ĉiam temas pri la vivo kaj problemoj de infanoj kaj junularo. Ankaŭ en lia »Juneca Ardo« li restis fidela al sia amata temaro.

Antaŭ ĉio ni povas konstati, ke longegan vojon postlasis la aŭtoro ekde »Diablidoj« (lia antaŭa prozverko) ĝis »Juneca Ardo«: dum tiu vojo li multe vidis, multe observis, kaj kolektis multe da sovaĝaj floroj en la apudvojoj kampoj kaj arbaroj.

Ce la pentro de infano kaj junulo sukcesas proporcie tre malmultaj verkistoj, ĉar la temo postulas senmankan konon de la infana animo, profundan komprenon, amon: krom tio, ĝi postulas la longan studon kaj observadon de tiu mirakloplena aparta mondo, en kiu vivas la etaj homoj: infanoj kaj adoleskuloj. Vane ni travivis mem tiun mondon, tamen ni staras eble tute senkomprene ĉe kontraŭniaj propraj filoj. Sed, kio ne prosperis al multaj aŭtoroj, tio prosperis al Bartelmes en tiu ĉi rakonto.

adreso kaj profesio de la ricevinto kaj la n-ro de la stelo.

Ciuj jam ricevintaj la jubilean stelon, konforme al la anonco sur la pago 3/4 de la Kongresa Libro, bonvolu, se ili tion ankoraŭ ne faris, pagi, se ili ĉeestis la kongreson por stelo kaj atesto kune: 2 zl., se ili ne ĉeestis la kongreson: 4 zl.

La supre cititaj personoj, kiuj ne ankoraŭ ricevis la jubilean stelon kaj ateston, bonvolu pagi al la suba adreso po 2 zl. aŭ po 4 zl., laŭ tio, ĉu ili ĉeestis aŭ ne ĉeestis la kongreson, krome ili pagu por sendkostoj (rekomendite): en Polujo: 90 gr., ekster Polujo: 1.30 zl.

La esperantistoj aliĝintaj al la Esperanto-movado antaŭ la aŭgusto 1905 (ora stelo) kaj antaŭ la aŭgusto 1912 (argenta stelo), kiuj ne estas supre cititaj, povas ankoraŭ ricevi la jubilean stelon kaj ateston, se ili skribos pri tio al la suba adreso kaj pagos: la ĉeestintoj la kongreson: 2 zl., la ne ĉeestintoj la kongreson: 4 zl., kaj por sendkostoj (rekomendite) en Polujo: 90 gr., ekster Polujo: 1.30 zl. Bonvolu komuniki: viajn antaŭ-nomon, nomon, adreson kaj la jaron de aliĝo al la Esperanto-movado, se eble kun iaj pruvoj. La pagoj de 2 aŭ 4 zl. devas kovri la elspezojn por la preĝigo de steloj, atestoj kaj la arango de la »Festo de Veteranoj«.

*

Dum la Jubilea Kongreso aperis projekto pri la fondo en Warszawa de la internacia »Rondo de Veteranoj de Esperanto«, grupiganta esperantistojn de antaŭ la

Nur alte fluganta animo, pura de ĉia persona depoteino, povas profunde enrigardi kaj kompreni, kaj sekve pentri, majstre pentri la infanon kaj junulon. Kvankam la infano kaj junulo ne estas pritrakteblaj sur komuna bazo, ĉar la vivomondo de infano konsiderinde diferencas de tiu de la junulo, Bartelmes tamen sukcese pentras ilin ambaŭ, malgraŭ ke li ne pritraktas ĉe la junulo la aktualajn problemojn de la junularo, priskribante nur epizode, nur laŭmemore, travivaĵojn siajn kaj tiujn de Albo, kiu estas la unu-sola aktiva figuro de la rakonto.

Li diras:

(Pĝ. 32.) »La zorgadon pri ili la infanoj rekompencas per siaflanka proksimiĝo, intimiĝo, netruda edukemo. Tiel la edukanto fariĝas edukato, la edukatoj edukantoj. Mi trovis, ke la diferenco de aĝoj en kolektiva vivo ne ludas gravan rolon, kaj antaŭ ĉio mi devas konstati, ke moviĝante inter infanoj, oni ne nur donas, sed ankaŭ prenas.«

La rakonto komenciĝas en laborista infan-kolonio, kien, por la lerneja ferio somera, estis veturigataj el la urbo laboristaj infanoj por ricevi iom da koloro de vivo sur la palajn vangojn. »Ni iris en la parkon kiel homoj, al kiuj apartenas la tuta mondo... Estis ia ensorĉa atmosfero!« — diras la aŭtoro. En tiu parko li ekvidas unuafoje Albon, kiu fariĝos lia intima amiko. Ili ludas ĉiam kune. La fadenoj de ilia amikeco ne disiriĝas ankaŭ post la paso de la ferio.

Pri la vivo en la infankolonio Bartelmes parolas jene:

(Pĝ. 25.) »Baldaŭ mi devis konstati, ke la ruĝa triangula tuko, kiun portis ni infanoj ĉirkaŭ la kolo, ankoraŭ ne signifas, ke la portantoj estas penitritaj de la ideoj de boneco, egaleco kaj frateco. La tukon portis ankaŭ knabo, kiu estis elfunde malica kaj kiu malŝatis vidi puran, neĝenatan ĝojon.«

Albo, per sia gajo, delikata animo, eksterordinare

aŭgusto 1912. kaj celanta per plifaciligado de interrilatoj de la membroj kreskigon inter ili de la fortika sento de solidareco por eventuala kreo por ili de servaro de reciproka morala kaj materiala diversspeca helpo.

*

La veteranoj, dezirantaj kunfandi kaj aliĝi al tiu ĉi Rondo, bonvolu skribi pri tio al la suba adreso kaj enpigi la enirkotizon de 1,50 zl. (por la unuaj korespondelspezoj).

Pagmaniero: Poŝtmandatoj aŭ poŝtĉekoj al »29 Universala Jubilea Kongreso de Esperanto«, Warszawa, Pollando — pola poŝtĉekkonto P. K. O. 23/45 —. Sen iaj aldonoj, aŭ Poŝtĉekkonto de la kasisto de la Kongreso:

S-ro Stefan Lubliner, Warszawa:

Berlin 156.660,	Bruxelles 222.461,
S'Gravenhage 145.532,	Kopenhavn 249.02,
Luxembourg 4593,	Riga 3838,
Praha 501.385,	Paris 110.097,
Stockholm 4375,	Tokio 325.94.

Samtempe skribu (legeble) al la sola adreso de la Komisiono por la Jubilea Stelo: S-ro J. Litauer, Warszawa, Pollando, Marszalkowska 81.

J. Litauer,

sekretario de la Komisiono por la Jubilea Stelo.

rekta karaktero, forte efikas al sia kamaradeto kaj baldaŭ staras antaŭ li kiel modelo.

La rakonton de Bartelmes oni povas dividi en du partojn. La unua prezentas al ni infanojn, la dua junulojn. Kaj dum la unuan parton igas interesa kaj plezuriga la etaj problemoj kaj petoladoj de infanoj, la duan jam superregas la flamo, la »juneca ardo« de junuloj, kiuj subite troviĝas, ofte sen plena kompreno, en la mezo de vivproblemoj kaj luktoj. Nebule ili ekvidas celojn, nebule ili ekkomprenas ideojn, kaj per la ardo de sia juna koro ili jetas sin en la ofte tre aĉajn luktojn, kiuj svarmas sur la vojo de la vivo. Kaj tiel ili trafas la ekstreman maldekstron. Pri la unua impresio jene parolas Albo al sia amiko:

(Pg. 70.) »Mi aŭdis multegajn sonantajn frazojn kaj en tiuj frazoj troviĝis multaj esprimoj ofte ripetigantaj, kiuj estis por mi tute nekutimaj, ofte eĉ ne klaraj, kaj kiuj finiĝis senescepte per -ismo: imperialismo, militismo, komunismo, kapitalismo, oportunismo, reformismo kaj aliaj.«

La du junuloj laboregas en la movado, servante kiel kurieroj, kaj nerve atendas la tagon de l' ekbatalo. La tago alvenas, sed nenio okazas, ĉar la »Centra Komitato« decidis tiel. La du junulojn ekregas senreviĝo pri la gvidantoj kaj movado, en kiu estiĝas granda haoso. Albo estas mal-liberigita, kaj, kelkajn tagojn poste, kiam li reliberiĝas, li malaperas, iras eksterlanden. En la unua letero li skribas:

(Pg. 109.) »Mi fortunigis de la gepatra domo por savi min el la teruro kaj abomeno, kiu ekkaptis min pri la mondo. Lasu min sola trovi la vojon ekster la relaro kutima, kiun mi tro rapide foruzis. Eble miaj fortoj sin montris sufiĉe grandaj por venki super ĉio, kio kontraŭstaras. Kaj — tiam eble mi revenos...«

Kaj fakte li revenas.

Per la psikologiaj substrektoj sin sekvantaj tra la 120 paĝoj de la libro, la rakonto ricevas majstran formon. Interesaj dialogoj kaptas la atenton, kaj la delikataj epizodetoj memorigas kelkajn similajn el nia propra vivo, kiujn, sen la lego de la rakonto, neniam ni estus rememorintaj. Bartelmes rakontas pri junecaj ardoj, pri flamoj alte flagrantaj, sed li mem ĉiam restas trankvile brulanta lampo. Li estas objektiva kaj havas bonan realismon. Nur unufoje li elreliĝas: La reveno de Albo estas hazardo, kia ne ekzistas. Li revenas per aeroplano, kiu katastrofe falas ĝuste en tiun kinejon, trarompante ties tegmenton, en kiu lia amiko rigardas filmon.

Sed tiun romantisman makulon forviŝas la bele kaj arte pentrita figuro de la delikata Albo, kiu post tiu akcidento mortas laŭ la libro, sed vivas ankoraŭ longe en la memoro de la leganto.

Por fini, mi citas el la antaŭparolo de la verkisto:

»La rakonton mi verkis jam antaŭ kelkaj jaroj. Mi troviĝis, kiam mi kaptis la plumon por skribi ĉi tiujn memorarojn, en animstato de senluziĝinto. Doninte mian fidon kaj ankaŭ mian planan laborforton kun disciplinemo al partio, kies internacieco kaj nekompromisemo min logis, mi iom post iom devis konvinkiĝi pri ties erarplena vojirado. Mi akiris la konvinkon, ke ne dank' al ĝia agado kaj agitado venos la tago, en kiu triumfos la Socialismo.

Per la supra citaĵo Bartelmes diras, ke la maturulo reviziis la agojn de la junulo kaj trovis vojon pli rektan kaj ĝustan ol tiu, sur kiu paŝadis la junulo plena de juneca ardo. *EMBA.*

AGATHA CHRISTIE: MURDO EN LA ORIENTA EKSPRESO. Epoko-libro nro 1. Eldonas The Esperanto Publishing Co Ltd. 18x45 cm. 192-paĝa, prezo por abonantoj 1 ŝilingo, por aliaj 2 ŝilingoj.

Generale mi ne ŝatas detektivromanojn. Mia opinio se literaturo estas io ekscita, tiam ĝi devas eksciti la homan cerbon al pensado, al celado por pli bona mondo, al la ŝanĝo de la malbona en la homa vivo. Mi kontestas, ke la celo de la literaturo eĉ en iuj partoj devas esti nura tempopasigo, forgesigo de la malbono, kio okazas al la etaj homoj ĉiutage. Eĉ kiam mi legas poemojn, mi serĉas en ili ne nur momentan ĝuon de la bele sonorantaj rimoj, ne nur momentan ravon per la lula aŭ vigla ritmo, per la belaj kaj novaj komparoj, kiujn iu genio de la lingvouzado trovas, sed la enhavon: ĉu ĝi plifortigas en ni noblajn pasiojn, ĉu ĝi levas nin pli alten aŭ ne. Sed literaturo povas havi ankoraŭ pluajn celojn: ĝi povas al ni efektive konatigi la homon, la naturon eĉ en beletristika aŭ en poema formo, sen iu ajn senpera instrua celo; literaturo povas konatigi al ni pasinton kaj iufoje estonton. Vere, tiun ĉi literaturon disigas de la detektivromano jam nur kelkaj paŝoj, sed mi ne ŝatas fari tiujn kelkajn paŝojn. Mi ne deziras frosttremi pro okazaj fakte neokazintaj kaj ĉefe ofte ankaŭ ne okaz-eblaj. Mi ne deziras narkoti mian cerbon per ekscitaĵoj, kiam la celo estas nur la narkoto kaj nenio pli.

Bedaŭrinde mi apartenas al la ega malplimulto de la homoj. Plejparto de ili serĉas la narkoton kaj tamen inter la narkotiloj plej nobla estas la skribo. Jes, la skribo, kiu narkotas la amasojn por Hitler, same narkotas la amasojn por iu »mondfama« detektiva aŭ bandita figuro. Ili ne rimarkas, ke ĉiu verkisto de detektivaj romanoj kvazaŭ ripetas sin. La amaso eĉ ĝojas kvazaŭ antaŭsupozi, kiu estas la finrezulto de la multaj kaj surprizaj okazoj. Ili kvazaŭ identigas sin kun la verkisto kaj la ĉefa venko de la detektivo aspektas, kvazaŭ ilia venko super la malbono, kiu ĉirkaŭas ilian vivon. Jes ja, tiel la vivo estas pli facila...

Mi diras, ke mi apartenas al la malplimulto, sed pro tio humile konfesas, ke estas bezonataj ankaŭ en nia literaturo tiaspecaj verkoj. Ili iuokaze tamen preparas la homojn al legado de kelkaj pli indaj libroj kaj alia sukceso povas ebligi al eldonisto la eldonon de malpli

Sinjoro Tadeo

la ĉetverko de

Antono Grabowski

dum longa tempo ne estis

ricevebla. Nun post mul-

aj serĉoj ni trovis entute

25 ekzemplerojn

binditajn en tre bona stato.

Ni vendas ilin al niaj kli-

entoj unuavice po

2 — dolaroj

por unu afrankite. —

Mendojn ni akceptas ĝis la elĉerpigo de la provizo.

Libroĉeta Organizaĵo ĉe Literatura Mondo

populaj verkoj, se li ne rigardas nuran profiton. Estas do kelkaj motivoj, kiuj subtenas la aperigon de tiaj verkoj ankaŭ en nia lingvo kaj faris bone EPC, komencante la eldonon de tia serio, el kiu la unua libro kuŝas antaŭ mi legita.

Libro en serio de detektivromanoj, tre bone elektita. La libro apartenas al la »moralaj« detektivromanoj. Ĝi estas streĉa, okazas en ĝi murdo, sed ĉiokaze la murdito nur ricevas la merititan punon. Kompreneble la murdantoj plenumas honoragon, kiam ili murdas kaj tiel fariĝas rakonto, kion povas legi ankaŭ infanoj. La tuta esploro de la detektivo estas bazita sur psikologiaj faktoj. La libro vere plenumas la taskon: esti streĉa ĝis la fino kaj eĉ ne suspektigi, kiu(j) estas la murdinto(j).

Guste pro tiu ĉi karakterizilo la teksto estas facila, ĝi estas taŭga ankaŭ por esperantistoj komencantoj... se la eldonejo estus reviziinta pli zorge la manuskripton de la tradukinto. Li (aŭ ŝi?) certe havas la necesan tradukistan talenton, sed estas ankaŭ certe, keline multe laboris ankaŭ sur tiu tereno. Estas en la libro stilaj malkorektaĵoj kaj tiaj evidentaj gramatikaj eraroj, kiaj okazas ĉefe en febrorrapida traduklaboro.

Iufoje superflujaj artikoloj, vortoj tro anglismaj (kompetenta anstataŭ afereca aŭ aferema), iufoje mankoj de akuzativo: ĉio atestas pri rapida traduko. Sed estas tamen kelkaj eraroj, kiuj verŝajne devenas de la malcerteco de tradukinto. Bonegal (anst. Bonege), *velkita*j flavaj haroj, ŝajnas strange al mi, sidis sin, ĝi intrigas min, li flankenmetis ĝin *per* rido, plena da postsignoj, mirego aperis sur la vizagon, mi ne tion faras (kelkfoje eĉ!) anstataŭ: mi ne faras tion, aŭ: mi tion ne faras; mi aŭdis paŝojn venantaj (plurfoje same eraro); tion, sinjorino, mi nomas ateston; okazas ŝanĝoj de verbotempoj, uzo de pasinto anstataŭ estanta tempo ktp. sufiĉe ofte. La refleksiva pronomo estas tre malcerte uzata (*sia* anstataŭ *ilia*, *si* anstataŭ *si mem*). Strangaj kombinoj, kiel *en tie*; mikso de transitivaj kaj netransitivaj verboj ekz. ŝi koncentrigis sian atenton; kaj la nuna afero pliĉagrenigos lin? Estas tre ĝenaj preseraroj: *kompromantan*, anstataŭ *kompromitantan*; *ekscitan* anstataŭ *ekscititan*, *dolĉigis* anstataŭ *dolĉiĝis*; ktp.

Mi esperas, ke la eldonejo pli bone revizios la estontajn manuskriptojn kaj tiam la libroj plenumos la taskon, kiun ili intencas: esti facila legaĵo por mallongaj vojaĝoj aŭ ekscito al la nervoj. V. B.

VERDA STACIO — ESPERANTA ALMANAKO DE LA ĈEĤOSLOVAKA RADIO. Redaktis: Dalibor Chalupa kaj Jiri V. Samla. Eldonis la Ĉeĥoslovaka Radio pere de sia filia stacio *Radiojournal*, Brno, Kounicova 44. CSR. Kartonita, 80 p. Prezo: 8 kĉ.

Sur luksa papero belega preso, multaj interesaj fotoj, valora enhavo, vere bela donaco al la esperantistaro de la Verda Stacio. Brno. Post paĝoj pri la prezidinto kaj prezidanto de la respubliko, d-ro Ladislav Sourek, prezidanto de la Ĉeĥoslovaka radio varmege salutas la tutmondan aŭskultantaron. D-ro Miloš Kareš, ĉefo de la literatura sekcio priskribas la belajojn de la respubliko. Sekvas detaloj pri la evoluo de la ĉeĥoslovaka radio kaj pri uzo de Esperanto en 5 stacioj, precipe en Brno, konigante la esperantajn programojn kaj la rezulton, kion ĝi atingis en eksterlando. La belaj fotoj pri la lando, stacio, prezentadoj kaj precipe pri la jam laŭvoĉe konataj radioparolantoj kaj aktoroj de TRAKT, la tuto kune estas *bonega dokumento* pri uzo de Esp-o en granda radioentrepreno. Ĝi estas uzenda en aliaj ŝtatoj por prui la vivon kaj utilon de Esperanto en radio! Se nur en kvin aliaj ŝtatoj oni similmaniere uzus Esperanton, ĝi estus jam grava faktoro en la radiosfero. Kaj fine donaceto: sceno pri Esperanto, prezentita el Brno en 1934 »Cu revo aŭ fakto?« prezentbla naci-lingve aŭ Esperante en alilandaj radiostacioj kaj eĉ publikaj vesperoj. Por la tuta tre plaĉe prezentita libro la *Radiojournal* kaj la kunlaborantoj meritas sincerajn gratulon kaj dankon. P. B.

LA JUNĤA VIVO. Internacia kantararo. Eldonis junulara gazeto »La Juna Vivo«. West-Grafdijk, H-N. Nederlando. Prezo: 1 pengo (Hfl —.35). 62 p. 16x12 cm. 34 kantetoj kun muziknotoj precipe taŭga por infanoj, junularaj kursoj, grupvesperoj. La prezo vere estas malalta, do oni uzu ilin vaste. Domage la kantararo ne estas sufiĉe diversnacia, estus bone kompletigi kun kantoj infanaj kaj popolaj el aliaj nacioj (ekzemple estas jam je dispono tiaj el hungara kaj norvega kantararoj). La vigla bonenhava gazeto »La Juna Vivo«, kiu publikigis jam malkaran lernolibron kaj nun prezentas al ni tiun ĉi kantararon, meritas la atenton kaj apogon de la esperantista junularo. P. B.

INTERNACIA KONFERENCO: RAPORTOJ KAJ KONKLUDOJ. Paris 1937. 14. 17. Majo. »*Esperanto en moderna vivo*«.

Internacia Ekspozicio de Artoj kaj Teknikoj en la Moderna Vivo. Paris. 142 paĝoj. Kvar partoj: Esperanto en lernejoj, sciencoj kaj teknikoj, internacia trafiko, intelektaj interŝanĝoj. Antaŭparolo de André Baudet. Kun vera ĝojo oni devas saluti tiun ĉi libron, kiu enhavas la laboron kaj rezoluciojn faritajn de la komisionoj, kiuj kunsidis en la pariza Ekspozicio dum la konferenco sub alta patronado de s-ro Albert Lebrun. Riĉa materialo de indikoj, raportoj, konkludoj, interesa dokumentaro, kiu en multaj rilatoj inde kompletigas la »Enciklopedion de Esperanto«. La rekomendojn kaj rezoluciojn oni devus traduki kaj aperigi en fakrevuoj naci-lingvaj, ili estu nepre prezentitaj al la koncernaj ŝtataj kaj aliaj oficejoj, estraroj. Kelkaj raportoj estas aparte gravaj kaj tre interesaj. La tuta verko estas — se oni konsideras la nunan ekonomian situacion — bona mejloŝtono de jubileo de nia movado, kaj ĝi pravas la bonan laboron, kion per la konferenco serioze kaj sukcese faris la nova IEL kun multaj malnovaj kaj novaj fakuloj-esperantistoj. Rimarkinde estas, ke ĉiuj fakoj konkludis al la postulo: Esperanton en la lernejoj!

Aparte leginda estas la artikolo de f-ino L. Zamenhof pri Humanismo.

Kompreneble, ne ĉiu fako kaj ne ĉiu parto povis esti plene elaborita kaj ĉe raportoj mankas kelkaj partoj, kiujn oni estus povinta facile kompletigi el la »Enciklopedio«. Detaloj mankas ekzemple de stenografio, de la religio estas detale konigata nur la katolika movado, tute mankas la laboro de Kristana E. Ligo Internacia, bahajismo estas nur menciata, kompare al la tre detala klarigo pri Institucio de la Nepersona Vivo. Man- kas ankaŭ la ĝisnuna uzado inter skoltoj. En la sekcio »Plastikaj Artoj« aperis la raporteto de »Literatura Mondo«. Kun bedaŭro mi ekscias iam, ke la verŝajne simile bona materialo de la Viena Konferenco pro morto de s-ro Kreuz perdiĝis. Des pli mi ĝojas, ke oni tiel rapide kaj bonaranĝe eldonis tiun ĉi raportaron, kies partoj devas esti konigataj en grupaj kunvenoj. Plej volonte mi menciis ĉiujn bonajn fakajn raportojn kaj proponojn, sed ne estas loko ĉi tie kaj mi esperas, ke ĉiuj societoj, grupoj kaj propagandistoj ekhavos tiun studmaterialon por uzi ĝin en komenco de novaj kvin- dekjaraj kaj serioze zorgos, ke la sindona penado de tiom da bravaj kunlaborantoj, aparte ĉi tie ne menci- ataj, estu vaste utiligata por enkonduko kaj disvastigo de Esperanto. P. B.

EDWARD OZIMEK: EKSPLODO DE L' PACO. Telegramo al la Ligo de Nacioj kaj al la homo. Varsovio 1937. Eldono de la aŭtoro. Prezo: 20 groŝoj. 16 p. El pola lingvo tradukis ing. J. P. kaj J. Z. okazis de la jubilea kongreso en Varsovio. Adreso de l'aŭtoro: E. Ozimek, Dluga 28/47. Warszawa, Polujo. (Li deziras interrilati kun ĉiulandaj pacifistoj!)

La kajero enhavas la dezirojn de idealistoj, pacifis- toj, de homoj, kiuj deziras *vivi bone, longe, libere*. La projekto pri reorganizo de la Ligo de Nacioj kaj kreo de *Unuigitaj Ŝtatoj de la Mondo* (aŭ almenaŭ de Euro- po) ja ne estas nova, sed la punktoj estas bone ordigitaj

Jubileo de Prof. D-ro Odo Bujwid

La 30-an novembro 1937 festis la korifeo de la Esperanta movado en Polujo kaj senjoro de polaj universitatoj, prof. Dr. Odo Bujwid sian 80-jaran naskiĝtagon.

Prof. Bujwid, mondfama scienculo, unu el plej konataj kunlaborantoj de prof. Pasteur kaj fondinto de unua bakteriologia Instituto en Polujo, posedas ankoraŭ la saman junecan fervoron kaj laborentuziasmon kiel antaŭ multaj jaroj.

Naskiĝinta en 1857-a jaro en Wilno, Li devis kiel juna knabo forlasi sian hejmurbon, ĉar lia patro kaŭze de partopreno la polan ribelon en jaro 1863 perdis ŝtatan okupon. Juna Bujwid finis, estante ofte en granda mizero, siajn gimnaziajn kaj universitatajn studojn en Warszawa. Jam kiel studento Li akiris la Oran sciencajn kaj Arĝentan Medalionojn pro siaj sciencaj laboroj. Dank' al tiuj distingoj Li ricevis stipendion por plua studado eksterlande.


Post kelkaj laboroj ĉe Pasteur en Parizo kaj Koch en Berlino, revenas Dr. Bujwid al Kraków kaj fondas en tiu urbo unuan post Francujo Instituton por inokuloj kontraŭ rabio. Baldaŭ Li estis nomita profesoro de la Higieno ĉe la Krakova Universitato, kie Li restis ĝis la jaro 1916.

Prof. Bujwid ne kontentiĝas nur kun la transplantado al Polujo de scio akirita ĉe Pasteur kaj Koch, sed ankaŭ Li laboras konstante kun senkompara pacieneco je disvolviĝo de bakteriologia scienco, kaj multaj eltrovaĵoj kaj novaĵoj sur la kampo de tiu grava scienco eliris el Lia laborejo, kiuj kaŭzis, ke Lia nomo ĉiam pli grandan gloron en la medicina mondo akiris. En la jaro 1889 disvastiĝis en iama Galicio epidemio de difterito, kiu forrabis multajn homajn vivojn kaj nur dank' al produktado de difteritoserumo de prof. Bujwid povis la kuracistoj venki la danĝeran malsanon.

Granda merito de prof. Bujwid estis Lia fervora kunlaboro ĉe la Krakova akvokonduko.

Malgraŭ Lia preskaŭ superhoma scienca laboro trovis prof. Bujwid ĉiam tempon partopreni la socian vivon. Ne ekzistis kaj ekzistas socia aŭ mizerikorda akcio, kiu ne trovis en prof. Bujwid sian protektanton kaj ŝirmanton. — Ĉie oni povis lin trovi, ĉie estis profesoro Bujwid kaj en ĉiu nobla organizacio aktiva membro aŭ prezidanto. Pola Societo de Popollernejo, la Ruĝa Kruco »la Helpo de la Patrino«, ĉiu nobla misio dum la mondkaj bolŝevik-milito, kiun li kiel militkuracisto (kolonelo) partoprenis, povis ĉe prof. Bujwid trovi sian fidelan defendinton.

La pola ŝtato honoris prof. Dr. Bujwid por Liaj meritoj per la Komtura Kruco de Ordeno de Polonia



Restituta kaj Ora Meritkruco (unu el la plej altaj polaj distingoj). Krom tio posedas prof. Bujwid multajn eksterlandajn distingojn, inter aliaj distingon de la Franca Honora Legio.

En la jaro 1912 akceptis prof. Bujwid la gvidantan rolon en la esperanta movado. Kiel kolego kaj amiko de la Kreinto de tiu mirakla lingvo, de dro Zamenhof, fariĝis ankaŭ dro Bujwid fervora adepto de la ideala movado, kiu celis la interfratiĝon de la homaro, kaj Lia kunhelpo ĉe la disvolvo de tiu movado estis plej sindona kaj neprofitema. Dro Bujwid estas prezidanto de la pola Esperanta Delegitaro kaj prezidanto de la Universala Scienca Esperanta Asocio.

Prof. Bujwid, kiu estas ne nur granda scienculo, sed ankaŭ nobla, plenalora, vere kultura homo, pruvis en la lasta politikema tempo, dank' al sia libera, nobla pensmaniero, kiu permesis kontraŭbatali la ghettodemandon sur la polaj universitatoj, ke ĉe Li la scienco kaj vera kulturo ne nur frazoj estas, sed ke Li ĉiutempe estas preta por tiuj idealoj batali.

Sian vivforton pruvis prof. Bujwid, kiam Li antaŭ unu jaro, kiel preskaŭ 80-jara junulo vojaĝis al Brazilio por partopreni la Brazilan Esperantan Kongreson kaj kie Li samtempe faris plujajn esplorojn kaj studojn sur tereno de bakteriologio.

Multaj, la plej sinceraj bondeziroj ne nur de tuta Polujo, sed ankaŭ de tuta kultura mondo akompanas tiun noblan homon sur Lia plua vivojo.

Dro. Henryk Dattner.

kaj kelkaj tre allogaj, ekz.: malpermesi privatan fabrikadon kaj komercadon de armiloj, spekulacion, mortigadon (ankaŭ juĝejan!), doni al ĉiuj monatan libertempon, forigi diferencon inter laboristoj kaj intelektuloj, internacia monunuco, tutmonda enkonduko de Esperanto. Mi ne povas ĉion mencii, sed — la deziroj estas tro belaj por realigi en la nuna materia memama mondo. La aŭtoro postulas, ke ĉiu homo estu respondeca pri la ĝenerala stato! Jam tiel estas, — sed la homoj, precipe la gvidantoj, ne konscias pri tio — kaj tial bedaŭrinde ne estas atendebla, ke la Ligo de Nacioj povu »likvidi ĉiujn diskut-punktojn inter la ŝtatoj«, devigi »cedon de kolonioj« al aliaj, puni la ŝtaton, kiu ne obeas. Wilson havis nur 12 punktojn, tamen oni ne realigis ilin. Ozimek proponas 44. Lia ĉefa eraro — laŭ mi — estas, ke li pensas: 99.9% de la homaro samopinias, kiel li. Nu, ni vidas, ke grandaj amasoj, — kaj ne, kiel Ozimek opinias, nur la riĉuloj kaj gvidantoj, — ne deziras tian senperfortan egalecon, amikan, harmonian kunvivon kun ĉiuj rasoj kaj nacioj. Oni devus unue eduki ilin, ŝanĝi ilian animon — kaj tion ne povos Ligo de Nacioj kaj

la multaj intereso, kiuj regas la ŝtatojn, la mondon ĝuste kontraŭ la deziroj de Ozimek, ĉar ilia intereso estas tute alia. Sen perforto, per ordono, amike la Ligo de Nacioj ne povas forigi ankaŭ la teritoriajn kaŭzojn, ĉar la opaj nacioj tute ne estas kontentaj kaj en la broŝuro ne estas rimedo por solvi ilin, ekzemple la konflikton inter Polujo kaj Litovujo pri la malnova litova urbo: Vilno. — La politiko estas malamo, avideco, fiereco. — Jes, en la privata kaj interŝtata juĝado devus veni la regado de la pura amo. Vere ni ĉiuj estas respondaj, ĉar kiam en la propraj animoj kaj faroj de ĉiu homo realiĝos la amo, kion Jesuo proklamis, — kio estas en ĉiu vera religio —, tiam ĉesos sur la tero mortigo, buĉado kaj milito. Komencu ĉiu en si mem. Eĉ se ni efikas nur en propra rondo, ni jam faris ion.

La kajero enhavas kelkajn prezerarojn, iom stranga estas la uzado de »ci« anstataŭ »vi«, la uzado de »ĉu« anstataŭ »aŭ«. La ĝusta vorto estas »eksploati«, ne: »eksploati«. »Ĉesu la mortigadon« ĝuste: »Ĉesigu la mortigadon«. Kelkloke estas uzata »as« anstataŭ »os«. Mi ne aprobas »Versalo« anstataŭ »Versailles«. Cetere

la manketoj ne gravaj ne forprenas ion el la interesa enhavo de tiu ĉi serioze studinda kajereto. Ĝi memorigas min al la alvoko de *Zamenhof* al la diplomatadoj dum la mondmilito...

P. B.

LA VIVO DE SANKTA HONEN, verkita de *Isii-Mamine*, tradukita el la japana de Nisidi-Ryōya, 77 paĝoj.

Nia literaturo pliriĉiĝis per tiu ĉi valora broŝuro. Budhismo estas la granda religio, kiu originas el Hindujo, disvastiĝas en la tuta Oriento, forgesiĝis kaj degeneris en multaj landoj, sed floris kaj evoluis en Japanujo. Estas do tute feliĉe, ke japana samideano donas al ni tradukon de japana verkisto pri temo budhisma: kompetenteco pariĝas tiamaniere kun la avantaĝoj de Esperanto. Konsiderante la gravecon de la verko, mi aplikas al ĝi iom severan metodon de recenzo, sed mi tion faras kun sincera rekomendo kaj ne kun la intenco malutili al la aŭtoro kaj tradukinto.

En la komenco ni ekscias, ke la budhismo dividiĝis en du partojn: Suda (Hinayana aŭ Malgranda Veturilo) kaj Norda (Mahayana aŭ Granda Veturilo). Sankta Hōnen, la heroo de la rakonto, apartenis al la Zyōdo (elparolu: ĝoodo) sekto, kiu estas branĉo de la Granda Veturilo. La aŭtoro forgesas klarigi la doktrinan diferencon inter Granda kaj Malgranda Veturiloj, kvankam tio estus facila: Granda Veturilo volas diri, ke la koncernaj sektoj estas pri la grandaj amasoj kaj Malgranda Veturilo volas diri, ke la koncernaj sektoj estas filozofiaj, esoteraj doktrinoj, taŭgaj nur por la elito. Sekve, la leganto ne scias la ĉefaferon: ke Sankta Hōnen estas populara figuro de unu el la plej disvastiĝintaj budhismaj sektoj en Japanujo.

Por okcidentuloj S-ta Hōnen similas al kristanisma sanktulo. Estas io *katolika* en tiu ĉi sekto, kiu volas fariĝi universala (la vera senco de »katolika«) kaj reĵetas racion. »Por liberigi sian animon, homa lernado kaj saĝeco estas senvalora« (paĝo 46.). — »Mi certe revenos en la Puran Landon, ĉar de tie mi venis teren«. — Aliparte, oni riproĉos, ke S-ta Hōnen faris krimon en infaneco: vundis atakanton de la patrino, en akra kontrasto kun kristanisma doktrino. Eble tie ĉi kaŝiĝas la diferenco inter budhismo kaj kristanismo: la unua estas pli tolerema ol la dua. S-ta Hōnen konvertiĝis kaj nomis sin »farinto de ĉiuj krimoj«.

La praktikado de Zyōdo-budhismo estas afero tre simpla: oni devas ripetadi la nomon de Amida aŭ la simplan frazon: »Namu Amida-bucu« (Savu min, Amida). S-ta Hōnen diris tion 60.000-foje en tago. Oni demandas sin vane: kio okazus, se ĉiu sekvus tiun ĉi rekomendon? Ĉu ne estus preferinde savi la aliajn laŭ la instruo de la Malgranda Veturilo?

En unu loko la aŭtoro skribas: »Jesuo-Kristo estis unu el la Bodhisatvoj«. Sendube, ĉar »Bodhisatvo« estas sanktulo, kiu sin dediĉas al la savo de aliuloj, kaj Krista volis savi la tutan homan genton. Sed kristanoj neniel konsentos al »unu el«, mi kredas. Budhismo emas kompromisi kun Kristanismo, sed ne reciproke. Kiel la angloj diras: »tie ĉi estas la hundo enterigita«.

Kiel ajn estu pri la doktrina enhavo, la verko ĵetas interesan lumon al la japana historio, tiel malmulte konata al la Okcidento kaj eble eĉ malpli al la Oriento...

Interalie ni ekscias, ke jam en la antikvo la japana registaro emis senkreditigajn popularajn religisektojn per ĉikanoj pri-virinaĵoj. Kiel nun, ankaŭ en la antikvo, la sektantoj rapide perdis la kuraĝon kaj konsilis apostati al la Majstro (paĝo 31.). — Ni ekscias ankaŭ, ke la ĉefministro »ofte disputis kun la Imperiestro«. Kial ne? Juda sanktulo foje kontraŭdiris Dion kaj venkis! Sed en la nuna Japanujo tio estus neimagebla. Plie ni ekscias, ke la Imperiestro malpermesis la sekton, sed »tiuj severaj ordonoj estis tro malfortaj por esti obeataj«. La Imperiestro ordonis detruu la tombon de S-ta Hōnen, sed reprezentanto de la Ŝogun (reganto) kontraŭstaris »uzante sian glavon«. Hodiaŭ li estus rigardata kiel plej granda krimulo pri »leŝe-majesté« (insulto al Imperiestro) kaj devus *harakiri*. Tiel ni vidas, ke la potenco de la Imperiestro estis malpli granda en la Mezepoko ol en la nuna

tempo. Kia ĝi estas hodiaŭ efektive? Vane ni studas la historion por respondi al tiu demando.

La *stilo kaj sintakso* de la traduko estas ĝenerale bonaj. La sekva paragrafo sur paĝo 3. estas tamen nekomprenbla: »La nomo de Hōnen estas konata en Japanujo, sed ne en la tuta mondo. Sed per tio neniu povas neglekti lian religion.« Kion signifas tio? Sur p. 27. ni konsterniĝas, legante: »vi ne faru insultojn al principoj«. Al germano tio estus pardonebla, sed ne al japano, kies lingvo eĉ ne konas tian gramatikan formon (anstataŭ: »igi«). Pleonasmoj estas kelkloke uzataj, kiel en »Katio tiodera-templo« (*tera* aŭ *dera* signifas *templon* en si mem!): la templo Katio estus preferinde, kvankam mi scias, ke la japanaj samideanoj ne ŝatas tiun sole logikan solvon. — »Vi devas sin dediĉi« (anstataŭ *vin dediĉi*), erara uzo aŭ ne-uzo de la artikolo, *reveni* anstataŭ *reiri* (vidu la citon pri la Pura Lando en la komenco de tiu ĉi artikolo) estas aliaj japanismoj kelkloke troveblaj en la verko. Mi eĉ ne mencias ilin, sed en la Antaŭparolo estas menciite, ke tri okcidentaj gesamideanoj tralegis la manuskripton. Sendube iliaj okuloj ne estis tre akraj...

Pri la ĝenerala arango de la presado mi devas rimarkigi la sekvan eraron, pripensindan ĉe ĉiuj japanaj eldonaĵoj: oni rajtas uzi japanmanieran ortografion (»Nipponski-Rōmazi«), sed en tiu okazo oni devas aldoni la Esperantan elparolon aŭ klarigi la tutan sistemon. En tiu ĉi libro tia klarigo estas donita — sur la paĝo 48. Ĝis kiam oni atingas tiun paĝon, oni erare legos ĉiun japanan vorton! Tian klarigon oni donu tuj en la komenco aŭ oni almenaŭ resendu la leganton al la koncerna loko per asterisko.

Alia simila riproĉeto: en ĉiuj japanaj libroj oni montras la prezon kaj la eldonejon en japana lingvo, laŭ la postuloj de la japana leĝo. Kial oni ne presigas la samajn informojn ankaŭ Esperante? Estas vere, ke neniam leĝo tion postulas krom tiu de la racio, ĉar temas ja pri libroj precipe verkitaĵoj por la eksterlando; la japana publiko povas ja legi japane multe pli bonajn kaj malkarajn klarigojn pri budhismaj temoj.

Entute: mi varme rekomendas la aceton de tiu ĉi libro al okcidentaj samideanoj: ĝi havas plaĉan, orientecan aspekton, la titolo estas donita sur la interna kovrilo ankaŭ per bele desegnitaj ideografiaĵoj kaj ĝi estos ornamento por la libroŝranko — se oni bindigos ĝin en pli bonan bindaĵon, kian ĝi certe meritas. *Migranto.*

VIVO DE ZAMENHOF de *Edmond Privat*. Eldonis: The Esperanto Publishing Co., LTD. Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo. 1937. Dua eldono. Ilustrita kaj bindita. Prezo: 3 ŝ. 6 p. Aŭfranko 4 p. 133 p., bind.

Jen aperis en dua eldono la fama biografio verko de Edmond Privat, ĉar la unua eldono jam tute elĉerpiĝis. La verko ricevis eĉ pli belan kostumon, ilustraĵojn, belan bindon kaj ĝi estas nun la unua volumo de la Libraro Bolingbroke-Mudie, por esti kaj konservi la memoron de la iama fama prezidanto de la Brita Esperantistaro, kiu perdis sian vivon dum la mondmilito en Francujo.

La verko estas jam klasika kaj konata de ĉiu bona esperantisto, ĉar ĝi donas fidelan bildon pri la genia aŭtoro de Esperanto, ĝi detale konigas al ni la medion kie li vivis kaj laboris. La landon, naskiĝurbon, la diversajn popolojn tie vivantajn, la politikan situacion, la familion de Zamenhof, liajn gepatrojn, gefratojn, la pogromon en Bjalistok, la ekburgonigon de la ideo pri Lingvo Internacia por akceli la interfratiĝon de la popoloj plenaj de antaŭjuĝoj unu kontraŭ la alia pro la diverseco de lingvoj kaj religioj.

Ni vidas la junan Zamenhofon kiel gimnazianon en Varsovio, kie, konatiĝante kun la latina kaj angla lingvoj, serĉas la eblecojn por la efektivigo de sia infana revo, lian unuan projekton en 1878, poste la patran malpermeson. Venas la studentaj jaroj en Moskvo ĉe la Universitato. Dume la patro forbruligis hejme liajn kajorojn pri la Internacia Lingvo, sed li ne malesperiĝas, ĉar li laŭ memoro facile reverkas la tutan, eĉ konstante pli

perfektigas, elprovas sian lingvoprojekton, tradukante, verkante en ĝi.

Fine la lingvo maturiĝis por la eldonado. Sed li vane serĉas eldoniston. Nur per la helpo de sia bopatro li sukcesas eldoni la Unuan Libron en 1887, sub pseŭdonimo d-ro Esperanto Li edziĝas. Ni vidas lin batali kun la malfacilaj vivkondiĉoj, la unuajn aliĝojn, la komencan periodon de nia lingvo.

Ni ekkonas lin el la pluraj ĉapitroj de la libro kiel idealistan profeton, kuraciston de la malriĉuloj, lian religiemon, lian modestan karakteron, noblan pensmanieron, lian »Homaranismon«.

Sekvas la unuaj Esp. mondkongresoj kaj liaj famaj kongresaj paroladoj, kiuj estas kvazaŭ revelacioj de lia interna memo, ni ekkonas lin kiel lingviston, la reforman agitadon en 1894, la Ido-skismon ktp., kiel verkiston, kiu fondas la bazon de nia literaturo, kiel tradukanton de tre famaj klasikaj verkoj el diversaj lingvoj. Ni trovas lian faman cignokanton en la Krakovia Kongreso en 1912, liajn internajn batalojn kaj la finon de lia vivo dum la mondmilito, kiam li devis sperti la plej kruelajn sortobatojn kaj la ruiniĝon de liaj belaj ideoj.

La stilo de Edmond Privat estas simpla, konciza, kristalpura, vere modela. Ni esperas, ke ankaŭ ĉi tiu dua eldono rapide elĉerpigos!

László Halka.

MUUSSES ESPERANTO BIBLIOTEKO. Esperanto-Eldonejo. J. Muusses — Purmerend. Nederlando. Redakcio: J. Glück, T. Jung kaj J. H. J. Willems.

Unu kajero 19.5×13 cm., 32-paĝa. Unu numero 0.35 gld. Unu serio de dek numeroj 2.50 gld. plus send-kostoj.

No 8. *La avo de Aleksandro Petöfi.* El la hungara tradukis: Ladislao Spierer.

Petöfi estas konata ĉie en la tuta mondo kiel genia poeto, sed liaj prozaj verkoj estas preskaŭ ne konataj. Jen, malgranda verko en prozo de Petöfi, kaj legante ĝin, vi povas baldaŭ rimarki, ke lirikisto verkis ĝin. La »Avo« estas tiel simpla, kiel ia fabelo. La sentoj regas ĝin. La mirinda forto de la fidela amo. Simplaj, emoci-plenaj, puraj pensoj. Malriĉaj homoj. Idilia familia rondo el la vivo de la hungaraj kamparanoj.

La traduko estas fidela, ĝi sukcesas respuguligi la naivan ĉarmon de la originalo.

Unu erareton mi nur notas. Petöfi mortis ne en 1879, sed en 1849, en la tempo de la fama hungara libermilito. Preseraro.

No 9. *La jurnaskito.* Nekredebla historio de Ricardo Becerro de Bengoa. El la hispana tradukis: José Fernando Berenguer.

»La jurnaskito« estas tre kurioza historio pri homo maljuna, kiun operacias lia amiko, por ke li fariĝu longviva; la operacio sukcesas, sed tamen estis iom da erareto en ĝi, ĉar la maljunulo, anstataŭ resti en konstanta forto, rejunigis, ĉiam fariĝas pli juna 80—70—60 ktp. jara, elkreskas liaj haroj, dentoj, komencas interesiĝi pri virinoj, fine li forĝas legi, skribi, fariĝas knabo, poste suĉinfano kaj tiel mortas, elĉerpinte sian vivenerĝion. Dume okazas al li la plej strangaj aventuroj. Tre sprita, freŝa, faciltona, interesa, fantaziriĉa rakonto. Tre leginda!

No 10. *La jubilea kongreso de Esperanto 1912.* (La VIII-a kongreso en Kraków.) Rememoraĵoj kaj oficialaj dokumentoj. Arangi kaj kompilis: Julius Glück.

Okaze de la kongreso oni eldonis Jubilean Albumon. Ĉar ĝi estas jam ne plu havebla, MEB denove eldonis ĝin dediĉante ĉi tiun argentan, 25-jaran jubilean libron al la 50-jara Ora Jubilea Kongreso de Esperanto.

La libro enhavas la lastan paroladon kongresan de Zamenhof, raportojn, priskribon de la kongreso kaj du famajn originalajn poemojn de Antoni Grabowski, en kiuj li varme kaj dolore salutas la jubilean mondkongreson, kiun oni tiutempe ne povis arangi en Varsovio pro la malsimpatio de la rusa reĝimo al Esperanto.

No 11. *La ora jubilea kongreso de Esperanto 1937.* Paroladoj faritaj okaze de la 29-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, 7—15-a de aŭgusto 1937. Arangi kaj kompilis: Julius Glück.

La libro estas tre aktuala dokumentaro el la ĵus pasinta Ora jubilea kongreso de Esperanto. Ĝi enhavas kelkajn interesajn paroladojn kaj poemojn ĉe la tombo de Zamenhof de L. Bastien, kaj de Varma Thilander, ĉe la tombo de Grabowski de Julius Glück, paroladon de Varma Thilander en la interkonatiĝa vespero de la blinduloj, paroladon de Julius Glück pri Zamenhof kiel scienculo kaj filozofo, paroladon de Paul Nylén, dum la Ferma Kunsido. Aldonita estas artikolo de Zamenhof: »Pri la kongreso«.

Kiuj ne povis ĉeesti nian oran kongreson, certe anime nun reserĉos la ĝojon de la jubileantoj, legante ĉi tiujn interesajn paroladojn kaj poemojn.

No 12. *Nordlandaj fabeloj de Joël Thézard.* (Ilustritaĵ per kvin desegnoj de la aŭtoro.)

Joël Thézard estas fama franca desegnisto, krome esperantisto, kiu multe vojaĝis, multe desegnis, havas multajn impresojn kaj tial povas multe rakonti. Li havas bonan humoron, francan spriton, elegantan esprimopovon, fluan stilon. Li rakontas al ni pri *Piĉak, juna laponido*, pri lia terura aventuro kun la blanka urso, pri la *Vento-vestisto*, kiu venton vendas efektive por bona prezo, pri *Skop, la fokido*, kaj ties aventuroj, pri la *vikinga ŝako*, fabelon el la legendaj historiaj tempoj. Ankaŭ plenaĝuloj povas trovi ĝuon en ĉi tiuj bele skribitaj-desegnita fabeloj.

L. Halka.

CICIO MAR: FORGESITAJ HOMOJ. 240 paĝoj. Eldonis: La Verdfolio-Librejo, Shanghai, 1937.

Originala ĉina novelokolekto! Jen, kio nepre vekas scivolon... Kaj la scivolo rekompenciĝos, ĉar la libro enhavas vere interesajn novelojn, ĉar la aŭtoro pruviĝas talenta verkisto. La libro temas pri la vivo de la ĉina vilaĝo; ŝajnas al mi, ke tiu temo estas sufiĉe »nekonata ĉi« por eŭropa leganto. Jen denova pruvo pri la tuja utiligeblo de Esperanto: certe en memultaj eŭropaj lingvoj aperis libroj pri tiu temo, kaj certe apenaŭ troviĝas eŭropa lingvo, en kiu aperis tiel aŭtenta priskribo el plumo de ĉino, kiu kolektis siajn proprajn knabaĝaĵojn rememorojn...

El tiuj rememoroj naskiĝis historioj plenaj de sango kaj karno. Kvankam foje-foje en la noveloj mankas la eventoj, kvankam foje-foje la ellaboro de iu novelo restis tro skizeca, kvankam foje-foje troviĝas turnoj, kiuj por eŭropano ŝajnas iom naivaj: tamen kaptas nin la vivŝvela kreforto de l' verkinto, per kiu li starigas antaŭ la okulojn de la leganto figurojn plenajn de vivo. Kaj kelkaj figuroj vere gluiĝas al la memoro de la leginto, ekzemple malfacile oni forĝesus la *drinkeman onklon*, la *hazardludeman Triumfon Van*, la ruzan *Nigran Hundon Can* ktp.

La ĉefa temo de la prezentita vivo estas la malsato. Terura vizio restas en la animo de la leganto pri la suferoj de la ĉina vilaĝano. Jes, mi memoras, foje-foje la eŭropaj ĵurnaloj aperigas artikolojn (kiam ili hazarde malhavas presmaterialon) pri la Ĉiniaj malsatoj, kvin-sesliniaj artikoletoj, kiu preskaŭ malaperas inter la artikoletoj pri famaj filmsteloj aŭ inter milvortaj panegiroj raportantaj pri la heroeo de iu pilkludanto-primado... Kaj troviĝas homoj, kiuj legas tiujn artikoletojn, balancas la kapon kaj iom ekkompatas la bedaŭrindajn ĉinojn. Sed la fama Ĉinia malsato nur nun superstis en mia fantazio realajn konturojn, kiam mi legis la libron de Cicio Mar... Kaj neniam mi povos forgesi la novelon, en kiu du fratoj ŝteliras sur la kampojn por ŝteli iom da greno, kiu povus savi la vivon al la edzino, al la infanoj (el kiuj unu jam mortis pro la malsato) kaj por la sesdek-jara patrino, kiu jam tiel malfortiĝis pro la malsato, ke de tagoj ŝi jam ne povas forlasi la liton. Ekscitite ni sekvas la embuskantajn fratinojn, kiuj devas atendi la plenan eknoktiĝon por senrimarke agi, kaj tragike tuŝas la terura fino, kiam la fratinoj trafas la kuglojn de la gardantoj. La tuta poezio de la krepuskantaj kampoj spiras sian ravan odoron en ĉi tiu novelo, kaj la tuta mizero de la homa vivo ekhurlas en ĝi... Kaj, kiel bela promeso pri la estonto, superarkas ĝin la sinofera amo de frato al frato, de homo al homo...

Bedaŭrinde la lingvo de la verkinto multe postrestas al lia verkista talento. Oni nepre rimarkas lian seriozan klopodon por bona stilo kaj oni ĝoje povas konstati, ke li sukcesis sufiĉe bele, se ni konsideras, kiajn malfacilaĵojn prezentas por ĉino la ellerno de lingvo tiom diferenca de la propra. Tamen mi devas riproĉi al li, ke antaŭ ol eldoni sian manuskripton li ne reviziigis ĝin per lingvo-sperta esperantisto. Tiukaze estus forrestintaj multaj malglataĵoj, gramatikaj eraroj, kiuj ja nebligas, ke la libron oni povu rekomendi al ankoraŭ ne plene spertaj esperantistoj. Komprenible en kadro de recenzo oni ne povus detale preparoli ĉiujn ĉi erarojn, ili estas tro multaj por tio. Tamen pri kelkaj mi nepre volas atentigi la aŭtoron.

Post *por ke* oni uzas u-modon kaj ne indikativon, kiel la aŭtoro faras. En rakontoj li ofte uzas prezencon anstataŭ la sole ĝusta pasinto. Sur paĝo 4.: »La virino... ekturnis al la edzo« aŭ *ekturnis sin*, aŭ *ekturniĝis* ĝustas. Sur paĝo 5.: »el unu malnova sako«; estas interese, kiel multaj Esperantaj verkistoj ne sentas la elegantecon de la manko de l' nedinifa artikolo. Tiu ĉi manko estas unu el la plej Esperantaj karakterizaĵoj de la lingvo, kiu donas al ĝi multan ĉarmon. Do kial ĝin neglekti? Anstataŭ *surpriziĝi* ĝustas *surprizi*, anstataŭ *deviĝas* ĝustas *devas*. Tiaj pekoj ne estas pardoneblaj, per simpla postrigardo en la Plena Vortaro la aŭtoro estus povinta eviti ĝin! Anstataŭ »multe de mono« oni uzas »multe da mono«; anstataŭ »suĉigistino« oni uzas »nutristino«. Anstataŭ »rediri« pli belas »respondi«. En la senco de »montriĝas« la aŭtoro konstante uzas »montras«, same li uzas »kuntiras« anstataŭ »kuntiriĝas«. Post »al« oni ne uzas akuzativon. Entute la akuzativo estas unu el la malfortaj flankoj de la aŭtoro... Sur paĝo 29, ni legas: »Kiu scias, kiom da jaroj li vivos post li perdos la laborkapablon?« anst. la ĝusta: »Kiu scias, kiom da jaroj li vivos post la perdo de la laborkapablo?« Anstataŭ »ŝin ĉesi« ĝustas »ĉesi«.

Ni esperas, ke la sekvonta libro de la aŭtoro ne havos tiujn ĉi mankojn. En tiu ĉi espero ni tre deziras, ke li daŭrigu malkovri al ni, eŭropanoj, la misteran ĉinan mondon.

John Atkins.

100 PIKANTAJ PANSMIRAĴOJ, kolektitaj de *Dro M. Topolansky* kaj *F. Ruhm*. Tradukis el la germana *Dro H. Sirk*. Ruhm-Verlag, Vieno (Aŭstrio). 42 paĝoj. Prezo: 1 ŝ. 20 gr. (aŭstria), pagebla ankaŭ per respondukuponoj.

Post la multaj libroj nutrantaĵoj la spiriton, jen io por la korpo; pli precize: por la stomako. Mi kredas, ke oni akceptos ĝin bonvole kaj al ĉiuj legantoj mi deziras bonan apetiton. Vere, oni miras, kian variecon oni povas atingi per tiuj pantrantaĵoj kaj per la io ŝmirita sur ĝin. La lego mem estas gastronomia plezuro kaj rimarkeble pliintensigas la salivproduktadon.

Bedaŭrinde, ni ne povis doni la libron por recenzo al sperta mastrino, kvankam la sola eblo de inda recenzo estus, se oni farus ĉiujn receptojn laŭvice kaj zorge karakterizus kaj kritikus ĉiun aparte laŭ eksteraj, gusto, aromo kaj odoro. Manke de tia faksperto, mi devis verki mian recenzon nur el fantazio (el ventro, kiel oni diras ĉe ni). Sed ankaŭ en tia »aera« maniero mi tre ĝuis dum lego la diversajn sandviĉ-simfoniojn. Jes, mi ĝuis tiel multe, ke estas tre sendanke de mi nun kritiki lingve la verkon, mi devus esti sufiĉe subaĉetita por silenti pri la ĉi-koncernaj mankoj.

Tamen, mi, perfide, notas jenajn kritikindaĵojn:

1. La lingvaĵo estas iom tro germana; oni devas klopodi je pli internacia Esp-a esprimmaniero.
2. Tiuj *laŭ amerika*, *laŭ Brabanta* ktp. iel ne estas Esp-aj. Necesus aŭ *laŭ amerika maniero*, aŭ *laŭamerika*, *laŭ-Brabanta*.
3. Preskaŭ neniu el la »teknikaj terminoj« de la tradukinto mi povas konsenti. *Hardkuiritaj*, *hardaj ovo* devus esti *trakuiritaj*, *malmolaj* aŭ (aŭdace!) *duraj*. *Hardfromaĝo*, *molfromaĝo* devus esti *malmola* kaj *mola* (du vortoj!). *Tramasinigi vandon* — kial ne simple *mueli*?

Ete hakita signifas *iomete hakita*, dum la aŭtoro volas esprimi ĝuste la malon, kion oni devus esprimi per *delikate*, *subtile* (aŭ *fajne*) *hakita*. *Suitigi en butero* — kial ne *friti*, aŭ *friteti*? *Turnmovi* estas nekutima anstataŭ la *Zamenhova kirlomiksi*. La vorto *trapasigi* ŝajnas mallerta; efektive, la demando estas malfacila: estus bone konservi la internacian radikon *pass*, sed ĝi apenaŭ estas plu rekon-ebla, se oni tiel priluas ĝin antaŭe kaj poste; tial eble tamen pli bone estus uzi alian esprimon, eble *transpremi* aŭ *premkribi*.

Mi rimarkas ankoraŭ, ke anstataŭ la iom misgusta *ŝmirajo* mi preferus la tute internacian vorton *sandviĉo*. Kaj mi rapide finas tiun ĉi lingvumadon, ĉar ĉi tie temas pri langumado, kio estas tute alia kaj multe pli ĝuebla afero.

A. K.

TUTMONDA ADRESARO DE LA ESPERANTISTOJ 1938. Eldonis reg. konsilanto H. Steiner, Bisamberg ĉe Wien, Aŭstrio. 128 paĝoj. Prezo: 2 ang. ŝil. aŭ 4 resp. kup.

Renaskiĝis la antaŭmilita tutmonda adresaro. Celo: doni adresojn de esperantistoj, societoj kaj grupoj en la tuta mondo, sendepende de tio, al kiu asocio aŭ ligo ili apartenas.

Vere impone, ke el 106 ŝtatoj en 2565 lokoj 5743 adresoj estas troveblaj. Ni esperu, ke la intenco: eldoni adresaron en 1938 kun 10.000 adresoj realiĝos. Do mendu la novan eldonon por 4 angla ŝil. — Estus rekomendinde, se per ia signo oni povus facile trovi, kiu el la personoj deziras korespondi, ĉar la plimulto ŝajne ne deziras kaj se ili — precipe el ekzotikaj landoj — estos pro la apero de la adreso superŝutitaj de korespondemuloj, ili venontjare ne publikigos sian adreson kaj la korespondemuloj — ne ricevinte respondon — seniluziĝinte forlasos la movadon! Do estu singardaj!

Por ne-esperantisto la adresaro efikas nur pro la ŝtatoj el ĉiuj mondpartoj, la nombro estas iom malmulta, kiam oni fanfaronas pri centmiloj kaj mem IEL povus eldoni adresaron de 13.000 membroj. Estas necese, ke vere ĉiuj grupoj enŝendu siajn adresojn kaj ĉiuj korespondemuloj anoncu sin kaj oni ĉiam zorge forigu la jam ne ekzistantajn gazetojn kaj societojn.

P. B.

venu al Berno! *Invitas vin al XXX-a Universal Esperanto Kongreso en 1938 en Bern, Svislando.*

Bela mapo kun kolora bildo, disdonita dum la kongreso en Varsovio, en kiu la svisa federala konsilantaro, la svisaj ministroj, la berna kantona registaro, la berna urbestro, UEA, Svisa Esp. Societo kaj aliaj invitas al XXX-a Universal Kongreso al Berno por 1938. Honora prezidanto estas federala konsilanto d-ro M. Pilet-Golaz, ĉefo de la Svisa Ministerio de Fervojoj kaj Poŝto. Enhavo: germanlingvaj leteroj de la federala konsilantaro kaj berna urbestro, invitletero de UEA kaj svisaj societoj, aligilo, deklaro de partopreno, la (jam recenzita) prospekto de Berno eldonita de la Trafika Kontoro de la Urbo Berno.

Oni devas ĝoji, ke oficialaj instancoj kaj landaj societoj kune invitas al belega Svisujo, por festi inter montoj en gastama urbo. Mi nur devas rimarki, ke UEA nun fariĝis denove la *organizo de individuaj membroj*, do tiu malnova UEA, kiu aranĝis UEA-kongresojn, sed neniam la Universalajn! Tion aranĝis la »Konstanta Komitato de Kongresoj« interkonsente kun la landaj societoj kaj poste Konstanta Representantaro de la landaj societoj kune kun I. C. K., al kiu aliĝis ankaŭ UEA. Dum la periodo, kiam sub UEA kolektiĝis la landaj societoj, la arango de la kongresoj transiris komprenibile al UEA, sed se UEA pretendas nun esti *aparte de la landaj societoj*, kaj nur por individuaj membroj, kial ĝi volas nepre aranĝi la universalan kongreson, kiam la naciaj societoj, kunigintaj en IEL akceptis arangon por la sama jaro en Londono. Mi mem eble preferus Bernon, sed kial ne estas ebla interkonsento? Kaj kiel ne konkorde fari kun la naciaj societoj (ne nur kun la berna, estona, pola)? Fari du universalajn

kongresojn en sama jaro estas same ridinde, kiel havi du jarlibrojn kun delegita listo, P. B.

LA FERMO KAJ SEKIGO DE LA SUDA MARO. 30 paĝa kajero kun 31 fotoj kaj unu plano. Eldonis Nederlanda Generala Fremdultrafika Asocio. Por resp. kup. sendas ĝin la Internacia Cseh Instituto, Riouwstraat 172. Den Haag.

La sekigado de la »Suda Maro« en Nederlando estas tia grandioza laboro kaj teknike tiel interesā kaj studinda, ke oni povas danke akcepti la bonegan kajeron pri tiu giganta verko de la nederlanda nacio. La kajero estas traduko de ing. J. R. G. *Isbrücker*, prezidanto de la Esp. Akademio, la klaraj fotoj elaeraj estas faritaj de nederlanda reĝa aertrafika societo. Teknikistojn, inĝenierojn kaj ĉiujn homojn, kiuj scivolos pri teknikaj laboroj kaj homa kulturo, tiu ĉi detala priskribo multe interesos; kaj ĝin montrante al fakuloj, vi povas pruvi la utilecon de Esperanto, konigi gravan laboron de malgranda nacio. P. B.

LA RIFUGEJO. Antaŭparolo kaj unua ĉapitro el libro de H. T. *Hamblin*. Eldonis F. W. Hipsley, 16. Broadway, Codsall, Wolverhampton, Anglujo. — 5 multobliligitaj paĝoj. Senpage havebla, sed oni petas apogon por resp. kup.

Tiu ĉi verketo, kies komenco nun aperis, volas gvidi la pensantajn homojn al la konstato de la Vero, por eliri el negativaj statoj: malsano, infekto, mizero, malfeliĉeco. Por liberigi el tiuj oni devas unue koni ilian kaŭzon. Oni devas internen rigardi, ekscii, ke la animo kaj korpo de la homo estas nur iloj por esprimado de la reala memo: la spirito. Ties rekono kunigas kun la »Spirito de Dio, kaj tio signifas venkon de ĉiuj malfacilaĵoj. Malantaŭ la eksteraj neperfektaĵoj estas la perfekteco de la realaĵo, la interna mondo, kiun poetoj kaj profetoj ĉiam sentis. Jesuo Kristo estis revelacio de la perfekta Kristo-homo kaj en ĉiuj el ni estas tiu perfekta Kristo-homo, kiu ekvivante, ŝanĝos ĉion. — Pro la temo la teksto estas iom peza kaj ne populare-alloga, sed espereble estos multaj, kiujn ĝi interesos kaj kiuj ebligos la aperon de la tuta verketo. P. B.

LA RIFUGEJO II. KAJ III. ĈAPITROJ. 4—4 paĝaj kajeretoj (senpagaj). F. W. Hipsley, 16. Broadway, Codsall, Wolverhampton, Anglujo.

La du ĉapitroj akre pravas, ke la homo ne povas deklari ion reala, ĉar ĉion li perceptas nur per la sentoj kaj ties manko aŭ vario elvokas tute alian percepton de eksteraj objektoj. Sed nun jam la scienco mem pruvis, ke la plej forta materio konsistas el movigantaj elektrotoj. Vido, aŭdo, k. t. p. dependas de la vibradoj perceptitaj kaj ia ŝanĝo en niaj organoj povus vidigi al ni tute alian mondon. Malantaŭ la ŝajna neperfekteco estas nur unu reala: la Dia Ideo. Tial pligravas la regno interna, ol la ekstera. Tamen ankaŭ la anima vivo ne estas reala. Dependas de la homa animo, ĉu unu vidas kun abomeno la kotan pejzaĝon en vespera krepusko kaj alia rave priskribas ĝin. *Ĉiu mem kreas sian individuan mondon.* Eksteraj perceptoj kaj okazajoj dependas de la interna animo. Ties efekto estas mankoj, malsukceso, malsano, malfeliĉo. Dio donis perfektan vivon, sed nia interna vivo ne atingas la dian idealon, ni vivas laŭ alia vibrado. La menso de la individuoj devas ŝanĝiĝi al Amo kaj Vero tiam malaperos la individua kaj tuthomara malbonoj. P. B.

A. VIRULY: POR LA HONORO DE NIA LANDO. Trad. P. W. Van Sijn. 22-paĝa kajero kun bela kovrilo kaj kelkaj desegnaĵoj. Prezo: Ned. Gld. — 20. D. Van Sijn & Zonen, Rotterdam, Nederlando.

A. Viruly estas ĉefaviadisto de la granda nederlanda aerlinio K. L. M. kaj la kajero estas pledo por aviado super la militpensado kun plej nobla intenco. En formo de letero al junulo ĝi montras la honoran flankon de aviadista servo kaj la misuzon jam ĝeneralan kaj teruran

por militceloj kaj amasbuĉado. Ĝi deklaras, ke la aerdefendo ne estos efika kaj en »Aldono« oni petas aligon al »International Peace Campaign«—»Rassemblement Universel pour la Paix« por formi internacian aerpotencon, kiu servu eviti la eksplodon (la kajero uzas: esplodo) de militaj konfliktoj. Adreso: The New Commonwealth« Tournooiveld 4. Den Haag, Hollando. P. B.

KOREA ESPERANTISTO. Nro 1. 1937. Kvaronjara eldono de Korea Esperantista Asocio, 190 Johoku-ĉo, Seoul, Korea. Jarabono sv. fr. 2.—.

20 paĝa bela kajero kun kovrilpaĝo, kelkaj fotoj. Ni deziras daŭran, sukcesan vivon al tiu ĉi malproksima kolego, kiu laŭ vortoj de la redakcio »aperigis sin sen ia ajn vundo en ĉi malfacila tempo« kaj estas »orfa floreto en terura uragano«. Krom redakciaj vortoj, salutoj estas interesa artikolo pri vortaroj kaj gramatikoj de la korea lingvo, rakonto de *Taejun Li* tradukita el korea lingvo, komenco de unuakta komedio de *Jeng Jin Kim*, ankaŭ el korea lingvo, verso pri radio-gimnastiko kaj komenco de rakonto de *H. U. Hong*. Mi proponas por tia revuo tiajn rakontojn, kiuj finiĝas en sama kajero, do ĉiu kajero estu memstara speguleto pri nacia literaturo. P. B.

XXXIV-A EUKARISTIA MONDKONGRESO DUM MAJO 1938. Budapest. 10-paĝa, blukolora fotoprospekto kun tre bonstila artikolo pri la mondkongreso kaj la unua katolika eukaristia Esperanta kunveno 26—29 de Majo 1938, kun kelkaj fotoj. Subkomitato de la kongreso: Hungarlanda Katolika Esperanto Societo, Budapest, IV., Petöfi Sándor-u. 9. I. 3.

Oni devus vaste ĝin disvastigi, precipe ĉe katolikoj, ĉar ĝi pravas valoran uzon de Esperanto ĉe grandega mondkongreso. P. B.

VERMLANDO (Svede Värmland). Esperanta Turista Asocio, Tegelbacken, Stockholm, 1937. Formato: 20×14 cm., 32 paĝoj.

Tiu ĉi bele ilustrita broŝureto kondukas nin tra la plej bela regiono de Svedlando, konata el la fama libro »*Gösta Berling*« de *Selma Lagerlöf*. Kiu ne volus vidi tiun ĉi romantikan kaj tamen realan landon? La bele presita, lukse eldonita foto-kajero estas samtempe jarlibro de Esperanta Turista Asocio, kiu en antaŭparolo prezentas interesan raporton pri sia agado, vere praktika kaj utila. En 7-paĝa svedlingva aldono estas raporto pri vojaĝo al Estonio. Impona estas la listo sur la lasta kovrilpaĝo de la reprezentejoj de la ETA en la tuta lando.

KIAM ALVENAS, TIAM EKVETURAS! Faldfolioeto foto-ilustrita, 10-paĝa, kun granda surdorsa landkarto pri Manĉoukŭo. Eldonis: Generala Direkcio de Fervojoj Sud-Manĉurja Fervoja Kompanio (S. M. R.), Tokio, »Marubiru«. Mukden, Manĉoukŭo.

Tre alloga, moderne farita informilo pri vizito de tiu ĉi nova ŝtato, hoteloj, urboj, ekskursoj, komforta vagonaro, amuzajoj. Aparta priskribo de »Asia« super-ekspresa trajno (140 km. po horo). Horaroj kaj prezoj el Eŭropo ĝis Mukden. Do ekvojaĝu! Du difektoj: manko pri adresoj esperantistaj (informejoj, interpretistoj) — diversa uzo por sama nomo: *Manĉurio, Manĉoukŭo*. La unua certe pli internacia! P. B.

SVISLANDO EN LA NEGO. Eldonita de la Svisa Turisma Centro, Zürich. 24-paĝa, fotoilustrita kajero kun landkarto de Svislando.

Oni devas ĝoje saluti tiun ĉi novan oficialan eldonon pri belega Svislando. Nun ni konatigas kun la vintraj vivo kaj pejzaĝoj, kun detala listo de la vintro-sportlokoj. En somero 1939 estos ankaŭ ekspozicio en Svislando. Ĉu oni bezonas aparte rekomendi viziton al tiu ĉi belega lando? P. B.

FRANZESBAD. Jen alia pruvo, ke la ĉeĥoslovakaj banejoj rekonas Esperanton. Vere bela 20 paĝa prospekto

kun urboplano kaj aldono de la foto pri la Esperanto-Monumento el jaro 1914.

PELIKAN INKO. Efika esperantlingva prospekto de la firmo Günther Wagner, Wien X/1. Laxenburgerstr. 52. 4 paĝa, ilustrita. Ankaŭ pri farbkuŝenoj, gumo, gluilo, skribmaŝin-rubando, stencilpapero.

LIECHTENSTEIN ĉe Rhein. 10 paĝa prospekto eldonita sub aŭsp. de UEA, ricevebla de Verband der Liechtensteinischen Verkehrsvereine, Vaduz. La bildoj pravas, ke la bela princlando estas vere tre taŭga *ferio-lando*. La tekston bone kompilis Hugo Steiner, Wien.

VIENA FOIRO 6.—13. Sept. 1936. 6 paĝa bela, moderna prospekto en korekta Esperanta lingvo. Oni ekŝatis Vienon kiel kongresurbon, certe multaj deziris ĝin viziti uzante la rabatojn de la foiro.

AUSTRIO. 32 paĝa bela prospekto kun aparta landkarto. Eldonis Österreichische Verkehrswerbung, Wien I., Nibelungengasse 4. Sur la titolpaĝoj ridetas al ni tipaj aŭstraj vilaĝankapoj. La tuta kajero estas tiel zorge kaj bele farita, ke ĝi povas servi kiel modelo. Oni trovas detalan liston de ĉiuj banlokoj kaj lagoj en la bela estinta kongreslando.

ESPERANTAJ LERNOLIBROJ KAJ VORTAROJ DE TAGBLATT-BIBLIOTEKO. Unu paĝa folieto de la konata eldonejo, Wien I., Wollzeile 20. pri la rekomendindaj libroj de dro Emil Pfeffer.

FALDFOLIO PRI LA INTERNACIA EKSPozICIO PARIS aperis en Esperanto, multkolora, enhavante la avantaĝojn de la ekspozicia vizito. Havebla per unu resp. kup. ĉe Soc. Franca por la Propagando de Esperanto, 34, rue de Chabrol, Paris (10e).

VIENA FOIRO. 5—12. Sept. 1937. Kolora, ses paĝa faldprospekteto. Petu de Wiener Messe, Wien, VII., Messepalast.

PACIFIKA KOMERCEJO, FOIRO, EKSPozICIO. En 1940 estos en Los Angeles, Kalifornio, granda daŭra foiro kaj oni esperas fari esperantan fakon. Oni skribu al »Pacific Mercado«, Mr. W. A. Simpson, Vic-President, 816 W. 5th Street, Los Angeles, California, petante informojn (sed ne pri Esperanto!). La Pacifika Ekspozicia Korporacio projektas por 1942 grandegan ekspozicion por la ŝtatoj ĉirkaŭ la Pacifika Oceano.

LA SOLVO DE LA SOCIA PROBLEMO PER LA GENERALA NUTRODEVO. (Represo el la revuo »Allgemeine Nährpflicht« Nr. 86. Marto 1937. 6 paĝa teksto kun titolbildo de Josef Popper-Lynkeus.

Interesa klarigo el radiparolado de Inĝeniero Ludwig Karpe, Telpic-Schönau, farita en Radio-Praha la 16-an de januaro 1930. La tezon de la ĝenerala nutrodevo kreis en 1878 Josef Popper-Lynkeus, ĝin publikigis jam en 1912. Kelkloke jam societoj volas realigi liajn pensojn, kiuj prezentas ponton inter prakristaneco kaj nuntempa ekonomia sistemo, volante ebligi, ke ĉiuj homoj estu egalrajte vivsubtenataj. Pluajn detalojn petu de Felix Frankl, Wien IV., Belvederegasse 9/5. Aŭstrio.

HOTEL ESPERANTO, Selce, Jugoslavujo. Folieto pri Hotelo-Pensio Esperanto ĉe belaga dalmacia marbordo kun malaltaj prezoj por esperantistoj. La hotelon fondis esperantisto dro. G. I. Sianojecki, nun gvidas ĝin bofilo kaj filino.

AUSTRIO, refreŝigo, amuzado, sporto kaj arto en la vojaĝlando Aŭstrio. Jen la titolo de moderne aranĝita folio ĉion rakontas pri ĝi.

Do multaj uzu la 80%-an rabaton, promesitan al eksterlandaj gastoj!

AL VIENO DUM ĈIUJ SEZONOJ. 16 paĝa faldprospekto kun multaj desegnaĵoj kaj bela titolpaĝo. Eldonis: Fremduloficejo de la urbo Wien, VII., Mariahilferstrasse 2. La bela prospekto montras anstataŭ per fotoj per desegnaĵoj tion, kion la bela aŭstra ĉefurbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo prezentas al siaj gastoj, farante programon por ĉiuj monatoj.

I. GDYNIA, *Pollando.*

II. KRAKOW, *Pollando.*

III. VILNO, *Pollando,* 24-paĝaj fotokajeroj.

Ĉiuj eldonoj de la Ligo por Protekto de Turismo, Polaj Stataj Fervojoj 1937, kun malgrandaj urboplanoj, esperantistaj adresoj, en Krakow monro de Zamenhofa strato.

Simile belaj kajeroj, kiel tiuj pri Varsovio. La fiera havenurbo *Gdynia*, la ŝatata kongresurbo *Krakovo*, la iama litova urbo *Vilno* prezentas siajn plej allogajn partojn. Aparte valore estas, ke la kajeroj ne estas simplaj prospektoj, sed enhavas pretan gvidvoj-montrilon tra la belaj urboj. P. B.

ESPERANTISTA LIBERTEMPEJO LAZNE BĚLOHRAD, Ĉeĥoslovakujo. 4 paĝa fotoprospekto pri tiu ĉi bela loko, kie de jaroj kunvenas diversnaciaj esperantistoj por kune ĝui libertempon en interkompreno kaj harmonio. Eldono de Esperantista Klubo en Lázně Bělohrad.

EK AL MANĈOUKUO! 26-paĝa, tre bele ilustrita foto-kajero kun aparta granda fervoja karto de Manĉoukŭo. Eldonita de »Generala Direkcio de Fervojoj, Sud-Manĉuria Fervoja Kompanio« (S. M. R.); Mukden, Manĉoukŭo. 1937.

Se vi volas scii, kiamaniere vi povas atingi tiun ĉi tre interesan, parte jam modernigitan ŝtaton, kio estas certe vizitinda, — kaj pri klimato, hoteloj, mono, pasporto, ĉefaj urboj, — petu tiun ĉi kajeron. Bona preso sur eleganta papero, belaj fotoj. Laŭ mia opinio la lando devus havi internacian nomon — simile, kiel en Esperanto ni ne uzas »Suomi«, sed Finnlando, — por *Manĉoukŭo* por alinacianoj pli taŭgas *Manĉurio*. La kajero estas pruvo pri oficiala uzo de Esperanto en ekstrema Oriento. Beklaŭrinde en ĝi mankas esperantistaj adresoj. P. B.

30-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Londono 30 Julio—6 Aŭgusto 1938. Kolora, premita glumarko argentblu-kolora, montranta ponton super la rivero Themse. La kongreson aranĝas Internacia Esperanto Ligo.

Ni informas niajn membrojn, ke la unua libro de AELA/1937: Jolanta Földes: **La strato de fiŝanta kato** estas ŝus ekspedata. Parte ni jam ekspedis kaj finos en ĉi tiuj tagoj.

*

Kelkaj abonantoj ankoraŭ ne renovigis sian abonon. Ni ĝojos ricevi ilian pagon en la proksimaj tagoj kaj alvokas ilian atenton al niaj poŝikontoj en diversaj landoj. Ĉiupagu laŭ la plej konvena maniero por li.

*

LINGVO LIBRO abonantoj bonvolu noti, ke la nuna numero estas la 3 kaj 4-a numeroj de 1937. Pro la granda intereso kaj ĝisnuna alfluo de abonoj al la gazeto, mi havas la fortan esperon, ke sekvontan jaron ni povos regule aperigi la gazeton. Tion akceli, ni petas la abonantojn, bonvolu sendi la abonon baldaŭ al ni. Bonvolu rimarki, ke la gazeto estas tiom malmultekosta, ke ĝi aperiaŭ toleras la koston de ĉu unu atentiga karto.

PREZARO DE UZITAJ LIBROJ

III.

Prezoj en USA dolaroj

Andersen: Fabeloj I.	0.27	Rousseau: Poliglota—Wademakun de internacia farmacio	0.40
— Adreslibro de Pollandaj Esperantistoj	0.20	Strindberg: La konscienco riproças	0.24
Bennemann: Internacia Kantaro (muziko)	0.60	Shakespeare: Hamleto	0.22
Boirac: Plena Vortaro Esp-esp.a Esp-franca	0.80	Spicer: Kroataj poeziaĵoj	0.08
Burvinkel: La kormalsanoj	0.10	S'ovackij: Mazepa	0.30
Baghy: Dancu Marionetoj	0.20	Schiller: La rabistoj	0.32
— Barbiro de Sevilla	0.20	Stamatiadis: Nova gramatika libro	0.70
Butler: Kantaro Esperanta	0.16	Sapiro: Babiloj de bonhumora Zamenhofano	0.06
Baghy: Viktimoj (bind.)	0.50	Schneeberger: Lernolibro de Esp. stenografio	0.10
Cart: Vortaro de oficialaj radikvortoj	0.04	Schramm: Esperanta stenografio	0.10
Conscience: Leono de Flandrujo (broŝ.)	0.60	Thomson: Multe pli la amo	0.10
Conscience: Leono de Flandrujo (bind.)	0.76	Touglas: Kvin noveloj	0.50
Chamisso: Petro Schlemihl	0.16	Tauchmann: Garboj	0.10
Devjatnin: Unuaj Esperantaj satiroj	0.10	William: Legolibreto	0.12
Dreher: Supera kurso de Esp.	0.20	Wunsch: Pri varmokulturo	0.06
Delaisi: La venonta milito	0.10	Wolski: Halka	0.14
— Estona Antologio I.	0.38	Vámberí: Kriminologio	0.15
— Esperantismaj versaĵoj	0.08	Romains: Knock	0.24
Esslemont: Baha'ŭlla kaj la nova epoko	0.30	Schmidt—Gotha: Gustav Vasa	0.14
Furmanov: Capejev	0.44	Luyken: Stranga Heredajo (broŝ.)	0.78
— Forpelataj Homoj	0.08	Lessing: Natan la Saĝulo broŝ.	0.17
Forge: Mr. Tot aĉetas mil okulojn	0.50	— Fabiola broŝ.	1.02
Goethe: Hermano kaj Doroteo	0.15	Hauff: La Karavano broŝ.	0.14
Goethe: Ifigenio en Taurido	0.20	Schwarz: La stranga butikoj broŝ.	0.24
Gogol: La revizoro	0.15	Kalocsay—Waringhien: Plena Gramatiko de Esperanto, I. eldono (broŝ.)	0.90
Hankel: Sableroj	0.12	Ĉiuj numeroj de Int. Mondliteraturo po 0.12	
Hohlov: La tajdo	0.14	Aldonu 10% por sendkostoj	
Heine: La rabeno de Bacharach	0.14	Maloftaĵoj:	
Haeffker: Jarmiloj pasas I., II. (bind.)	1.60	Baghy: Preter la vivo I-a eldono	
Hekler: Arthistorio (broŝ.)	1.20	— Esperanto Biblioteko Internacia I-a eldono ĉiuj numeroj	
Ibsen: Imperiestro kaj Galileano	0.60	Karinthy: Morgaŭ Matene	
Kalocsay: Mondo kaj Koro	0.05	Ladavèze: Demandaro, I-a kaj II-a eldonoj	
Kalocsay: Lingvo, stilo, formo (broŝ.)	0.20	— Libro de la kvina kongreso de Esperanto	
Kalocsay: Lingvo, stilo, formo (bind.)	0.43	Przybyszewski: La neĝo	
— Kvin-lingva radio-vortaro (Ginz)	0.06	Tolstoj: Unu animo en ĉiuj	
— Karaktero	0.06	Tolstoj: Dio vidas veron, sed ne baldaŭ diros	
Krestanoff: Bulgara Antologio	0.50	Tolstoj: Kie estas amo, tie estas dio	
Lessing: Mina de Barnhelm	0.20	Tolstoj: Sieĝo de Sebastopol	
— Lingvaj respondoj	0.16	Tolstoj: Kaŭkaza militkaptito	
Molière: La malsanulo pro imago	0.12	Suttner: For la batalilojn!	
Moffett: La karto mistera	0.04	— La urbo de belega sensencaĵo	
Madách: La tragedio de l' Homo (broŝ.)	0.36	— Albrecht Dürer (granda eldono)	
Molière: La nobela burĝo	0.24	Rolandkanto (trad.: Dr. Noël)	
Oberrottman: La lastaj tagoj de Zamenhof	0.08	Multaj centoj da jarkolektoj el Esperanto-gazetoj	
— Parizaj paroladoj de Abdul Baha	0.40	Luyken: Mirinda Amo	
— Provo de marista terminalo	0.24		
— Proverbaro Esperanta	0.20		
Richter: Esperanto-gvidanto	0.05		
Rémarque: La vojo returne (bind.)	0.75		
— Rhodes kaj la fruaj tagoj de Esp. en Anglujo (bind.) 0.60 (broŝ.) 0.38			

Postulu detalan prospekton pri multnavaĵoj, kolektoj kaj maloftaĵoj de LAO. Ni prizorgas al vi ĉiun deziratan libron.

LIBRO AĈETA ORGANIZAĴO ĉe Literatura Mondo, Budapest, IX., Soroksári-str. 38.

Kursgvidantoj, atentu!

Ni helpas al vi dum la kurso kaj sendas donacon al viaj kursanoj. Skribu al: K. KALOCSAY, BUDAPEST, VIII, Mária utca 34. Hungarujo.

Gvidantoj de daurigaj kursoj,

kiuj deziras ricevi senpage la 500 paĝan duan eldonon de „Plena Gramatiko de Esperanto“, verkitan de K. Kalocsay kaj G. Waringhien, skribu al: Literatura Mondo, Budapest, IX., Soroksári-str. 38. Hungarujo.